OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO.

# LA RONDO

JAN. 1945. No.4. VOL. 5.

ELDONITA de F.R.BANHAM,
2 BANCHORY St., ESSENDON W5, VICTORIA, AŬSTRALIA.

# LA RONDO.

Lingve kontrolas F.R.BANHAM,
2 Banchory St., Essendon, W5 VIC.

ooo

Enhave arangas F-ino L.E.BAILEY,
18 Sherbourne Rd., Medindie Gdns., Adelaide, S.Aus.

---ooooo---

## PRI "CO-OPERATION".

Jen broŝuro de Kristana socialisto kiu plumnomiĝas "Pax". Ĝi estas pli idea ol plana kaj konsistas el provo klarigi kion li komprenas per "co-operation", aŭ kion la recenzanto nomus interhelpismo. Li rimarkas ke en la gazetoj, preĝejoj kaj aliloke aŭdiĝas tre multe da sensenca kaj sencela dirado pri "co-operation". Mankas difinoj. Li kritikas la kooperajn kompaniojn produktajn aŭ konsumajn, asertante ke ĉar ili defendas nur interesojn de membroj ili neniel diferencas de pure komercaj entreprenoj kaj akcikompanioj. Sed laŭ lia opinio la kooperaj havas en si la kadron kaj ĝermon de la latenta "co-operative commonwealth." Li favoras unu valuton tramondan, bazitan sur la decimala sistemo de mono, ankaŭ universalan pezunuecon.

Doni subvenciojn anstataŭ justeco similas forsiteli akvon el truhava boato. Popeca monhelpo ne povas savi terkulturistojn kontraŭ monda prezkonkurso kaj altkosta, trohipotekita tero. La mondo devas rezigni la "jangalan vivon": mono per si mem ne povas sanigi la socion tiom longe kiom la homoj interbatalas por gajni ĝin. Se pli da mono distribuiĝos kiel predikas la Douglas Credit, dum ni konservas la komercaĉan konkuremon, la socio ankoraŭ plifunden enmarĉiĝos---ĉar la malpli kaj tute senskrupulaj finfine posedos la tuton.

Sub kia politikaformo tia bela epoko povus naskiĝi "Pax" ne klare indikas, sed kontentigas sin citi pikajn dirojn de aliaj pensuloj, finfine konfesante ke "el tiu komplika miksaĵo da penso ni devos formi al si akceptindan planon." Akceptinda por kiuj?

Li citas el Angla gazeto (17.1.41): Ĉu vin impresas tio, ke via infano kreskadas en mondo milita? Ke li tage atendas danĝeron kaj pensas ke eksterordinara ekzisto estas fakte ordinara vivo? Ĉu vi iam konsideris tion, ke aeroplanoj, bomboj, tankoj, mortigado, suferado estas esenca parto de la vivo de la hodiaŭaj infanoj?

Se vi deziras ke via infano prenu inde utilan lokon en paca mondo, vi devas zorgi ke li venu en intimecon kun la aferoj de

la paco. Li devas vidi florojn, bonajn librojn, belajn pensesprimojn en bildo kaj poemo, por ke li amu la puran, la veran kaj la noblan. Li devas vidi en via konstanta konduto kaj parolo tion kio instigas en li la plej bonan. La pacan mondon, kiun ni ĉiuj sopiras, devas eniri infanoj kun paco en la koro.

(Sp. de Pax, 27 Kireep Rd., Balwyn E8,VIC.)

---------------------------------------F.R.BANHAM.

YARRALUMLA---RAKONTO PRI ENTERIGITA TREZORO.

(El The Advertiser, Adelaide, 7 Okt., 1944, iom densigita.)

Kiam la nova ĉefgubernatoro, la Duko de Gloucester (elp.gloste) loĝos ĉe Yarralumla (Canberra) li ektrovos, ke pri la maljuna hejmo iras rakonto mistera, ĉar laŭ pli-malpli neakordaj raportoj fantomo ---vera nigrula fantomo Aŭstralia---foje promenas tie!

La rakonto komenciĝas per rabo de juvelo kaj finiĝas per vojrabistoj kaj murdo al fidela nigrulo, kies skeleto, oni diras, kuŝas ĉe la piedo de granda deodaro, aĝa pli ol cent jarojn, kiu estas la prifieraĵo de Yarralumla.

La kroniko de la mistero troviĝas en malnova letero aŭ manskribaĵo, ne subsignita, date 1881, trovita en la palacoon loĝejo post kiam ĝia antaŭa posedanto transdonis ĝin al la Aŭstralia Registaro. Jen la teksto de la letero:-

"En 1826, ĉe malmulte konata paŝtbieno en Kvinslando, James Cobbity ŝtele perdis grandan diamanton. Oni eltrovis, ke la ŝtelon faris unu el pundomanoj kiuj antaŭe forkuris, eble al N.S.Kimrujo. Oni kaptis le pundomanon en 1858 sed estis neeble trovi la diamanton; krome, la pundomano (nomo nekonata) neniel volis doni informon, spite al oftaj batoj. Jam en 1842 li lasis al grumo skribon kun mapo de la loko kie kaŝsidas la diamanto. Pro malgranda kulpo oni sendis la grumon al malliberejo ĉe Berrima. Li estis lerta pri ĉevaloj, kaj unu tagon dum siaj dejoroj, li plektis ŝnuron el pajlo kaj ĵetis ĝin trans la muron, kie ĝi alteniĝis al ia feraĵo; grimpinte ĝin, li forkuris. Li kaj lia familio multe da jaroj loĝis okcidente, laŭdire de Pastro James Hassell, kiu, sciante ke la grumo nun honeste vivas, ne opiniis necese denunci kontraŭ li. Mi havas nenian kialon kredi ke li provis vendi la diamanton. Se estus konate, ke li posedas aĵon tiom valoran, suspekto povus trafi lin kaj kaŭzus lian areston.

Post lia morto lia filo posedis la juvelon, kaj kun fidela nigrulo aliris al Sidnejo. Post kiam lasi urbon Cooma direkte al Queanbeyan (kŭinbejan), ili renkontis vojrabistan bandon. La nigrulo kaj lia kunulo disiĝis, sed fine la rabistoj kaptis kaj serĉis la unuan sed nenion trovis, ĉar li jam antaŭe glutis la juvelon. La bando kolere pafis lin. Li estis enterigita en peco de grundo apartenanta al kolonelo Gibbes, kaj poste al sinjoro Campbell. Mi kredas ke la diamanto estas inter liaj ostoj. Ĝi

---

Mr. [illegible] in A.B.C.Weekly pag2 26, Jan 6. 1945, holds up an Esp-o grammar which he has bought after seeing strange words on a notice board. Good propaganda for Esp-ists to write to Editor commenting.

tre alte valoras. Mia mano malfortiĝas pro aĝo, alie mi priskribus la mizeron tra kiu mi travivis. Miamvivo malspariĝis, mia mono elspeziĝis. Mi mortas preskaŭ tute senhava, kaj vide mian celon. Mi kredas ke la kadavro kuŝas sub la granda deodaro-arbo. Pro tio ke farjs la enterigon nigruloj, la tombo estas ronda truo.

Kredu kaj havigu al vi riĉon. Moku kaj lasu la juvelon en ĝia kaŝejo."

La deodaro ankoraŭ estas tie, laŭdire la plej bela el sia speco en Aŭstralio. Ĝi estas la patro de centoj da idoj en la plantejoj kaj parkoj de La Canberra-urbareo, kaj ankoraŭ donas jare multe da semoj al la registaraj plantidejoj. La posedanto de Yarralumla ĉiam taksis la belan maljunan arbon pli alte ol la ŝancon trovi trezoron ĉe ĝiaj radikoj.

Ĉu aŭ ne ekzistas fantomo, la duko kaj dukino tre forte sentos la ĉarmon de malnova domego, triestaĝa, verd-frontona, kiu estos ilia hejmo en Aŭstralio. Vastaj grundoj ĉirkaŭas ĝin, kaj ĝardeno kiun amo kaj arteco prizorgis Lady Gowrie. Ĝi havas belan panoraman vidon trans ondaforma ŝafkamparo al la krutaj montoj de la Aŭstraliaj Alpoj 15 aŭ 20 mejlojn for. Ĉe la antaŭo sidas komuna ŝaftonda ŝedo ĉe la malsupro de paca valeto. Povus troviĝi malmultaj scenoj pli tipe Aŭstraliaj. (L.E.B.(Trad.)

PETO. Laŭ Plena Vortaro guberniestro (aŭ gubernatoro) estas administranto de "administracia parto de lando aŭ kolonio." Al kelkaj la titolo ŝajnas stranga, uzata en rilato al Aŭstralio, "memreganta" unuo de la Brita Imperio. Por helpi al fromdaj E-istoj, ĉu iu leganto, kun intereso pri la konstitucio Aŭstralia kaj la regformoj Imerpiaj, sendus mallongan artikolon pri la roloj kaj funkcioj de tiuj ĉi kvazaŭ-vicreĝoj Ŝtataj kaj Federaciaj? (La Redaktoro)

---

## EL LETERO DE WILLIAM COWPER AL PASTRO JOHN NEWTON.

la 21an de Aŭgusto 1780.

......La jenan okazintaĵon oni ne devus preterpasi silente, en tia loko kie tre malmulte da notindaĵoj estas troveblaj. Lastan Merkredon nokte, dum ni vespermanĝis inter la oka kaj la naŭa, mi aŭdis nekutiman bruon en la posta saloneto; kvazaŭ unu el la leporoj, implikiĝinta, penadas sin liberigi. Mi jus estis leviĝonta de la tablo, kiam la bruo ĉesis. Post ĉirkaŭ kvin minutoj voĉo de ekster la pordo de la saloneto demandis: ĉu iu el miaj leporoj liberiĝis. Tuj mi kuris en la alian ĉambron kaj konstatis ke mia kompatinda, plej kara Puss (1) eskapis. Ŝi jam tramordetis la plektaĵon per kiu mi pensis ke mi sufiĉe sekurigis la fenestron, kaj kiun mi preferas antaŭ iu alia speco de fenestra kurteno, ĉar ĝi enlasas bone da aero. De tie mi rapidiris en la kuirejon, kaj tie mi vidis la kuraĝan Thomas Freeman, kiu diris al mi ke, vidinte ŝin tuj post kiam ŝi falis

en la straton, li provis kovri ŝin por sia ĉapelo, sed ŝi kriegis kaj saltis trans la kapon. Tiam mi petis lin ke li ĉasu kiel eble plej rapide, kaj mi aldonis Richard Coleman al la ĉaso, ĉar tiu estis pli facilmova kaj portis malpli da pezo ol Thomas. Mi ne esperis revidi ŝin, sed deziris scii, se eble, kio okazos al ŝi. Post iom malpli ol horo Richard revenis, preskaŭ senspira, kun la jena rakonto: Ke, nelonge post kiam li komencis kuri, li postlasis Thomas kaj vidis multenombran ĉasistaron de viroj, virinoj, infanoj kaj hundoj; ke li faris sian eblon deteni la hundojn, kaj antaŭnelonge kure preterpasis la amason, tiel ke la konkurso estis inter li mem kaj Puss; ŝi tute trakuris tra la vilaĝon kaj laŭ la vojeto kiu kondukas al Dropshott. Malmulte da tempo antaŭ ol ŝi alvenis al la domo, li akiris la antaŭlokon kaj flankenpelis ŝin. Ŝi turniĝis ree al la vilaĝo kaj baldaŭ, reenirinte tien, serĉis ŝirmkovron en la tanejo de sinjoro Wagstaff, apud la domo de sinjoro Drake. La rikoltuloj de sinjoro Struges, vespermanĝante, vidis ŝin de la flanko de la vojo. Tie ŝi trafis en la tanputojn, plenajn de akvo; kaj dum ŝi elgrimpis el unu puto al alia kaj preskaŭ dronis, iu el la viroj kapte eltiris ŝin per la oreloj. Oni forte lavis ŝin en sitelo por forpurigi la kalkon el ŝiaj haroj, kaj ŝi hejmen-portiĝis en saketo je la deka. La ŝerco kostis al ni kvar ŝilingojn sed kredu al mi, ni ne bedaŭris pri eĉ unu spesdeko de tiu sumo. La kompatinda besto ricevis nur vundeton je unu ungo kaj je unu orelo, kaj nuntempe fartas preskaŭ same bone kiel antaŭe. Via, mia kara amiko, W.C.

S.J.WOOLNOUGH (trad)

(1) Puss. Dorlota nomo por katoj, leporoj. Cowper manie amis la leporojn. (Rim. de la Red.)

---

## PRI STRANGA HOMO KAJ PLI STRANGAJ VORTOJ.

Okazis post kunveno de la Melburna Grupo "Rendevuo," ke mi restis tempeton post la aliaj anoj foriris. Mi kolektis miajn aĵojn kaj komencis eliri kiam, baranta la vojon, maljuna, malgrasa homo abrupte alparolis min, "He, vi! Ne foriru! Vi estas la prezidanto, ĉu ne? Metu vian rubaĵon sur la plankon kaj aŭskultu. Mi intencas klarigi al vi novajn regulojn pri la uzo de vortoj en Esperanto."

Mi estis surprizita kaj mi konfesas, iom kolera, ĉar mi estis laca, la horo malfrua kaj mi deziris trafi vagonaron. Malgraŭ tio, ĝentile mi respondis, "Jes, Sinjoro, mi estas la prezidanto. Mi gratulas vin pro via flua Esperanto. Vi ŝajne konas min. Eble vi bonvolos informi min al kiu mi havas la honoron paroli?"

"Ha, tio signifas ke vi deziras scii mian nomon. Plezure mi vin informas ke mi ne intencas diri ĝin. 'Honoron paroli al mi,' he! ha ha! Bone vi scias ke vi parolas al mi nur ĉar vi ne povas eviti min. Sufiĉe por vi se mi diras ke mi estas Esperantisto de la fruaj tagoj. Ha, la belaj fruaj tagoj de Esperanto! Sed la

nunaj...bah! Kia TAMPO estas la nuna! Malĝentila TAMPO, aĉa TAMPO, fi TAMPO!"

"TAMPO?" mi respondis, "Pardonu min, Sinjoro, sed mi tute ne komprenas tiun vorton. 'TAMPO'. Kion ĝi signifas?"

"TIMPO?TAMPO?TOMPO--kaj vi ne komprenas? Hontu, Sinjoro, hontu!"

"TIMPO,TAMPO,TOMPO," mi rediris la vortojn, kaj cerbumadis. Tiam mi foliumis vortaron,sed la sinjoro mangestis al mi ĉesigi la serĉon!

"Ĝi estas formo eltrovita de la hungara geniulo, C.E.R.Bumy, fama amiko de Kalosĉay. Ĉu vi ne legis "Lingvo,Stilo, kaj Formo?" li demandis, "Ĝi anstataŭas la neutilan vorton 'tempo'. TAMPO, por la estanta tempo, TIMPO, por la estinta tempo, kaj TOMPO, por la estonta tempo. Bedaŭrinde tiuj vortoj ne genuas en iu ajn vortaro."

"Ne genuas, Sinjoro? Pardonu min. Mi tute ne komprenas. Eble vi intencis diri ke tiuj vortoj ne staras, aŭ sidas, en iu ajn vortaro?"

"Mi ja intencis diri ĝuste tion kion mi diris. Se vortoj povas 'stari' en vortaro por Kalosĉay; 'sidi' en vortaro por Banham; kaj 'kuŝi' tie por kelkaj aliaj; ili povas'genui' en la sama loko por mi."

Venis al mi la sento ke li mokis min, kaj malafable mi respondis, "Vortoj ne genuas. Tiu estas ridinda, nelogika ideo."

"Ho," li diris maldolĉe, "Kaj ĉu ne estas egale ridinda, nelogika ideo ke ili kuŝas, sidas, aŭ staras?"

"Jes, eble, en tre rigida senco, vi pravas. Sed laŭ pli larĝa vidpunkto, oni povas imagi ke ili 'staras',aŭ eĉ'sidas' en la---"

"Se vi povas imagi tion," li interrompis, "aliaj povas facile imagi ke vortoj 'genuas'--kaj ne nur genuas, sed 'loĝas', 'marŝas','enlitiĝas, kaj'dormas' en la vortaro. Sed--sufiĉe. Ĉi tiu estas la temo pri kiu mi venis paroli. Jen! Mi donas al via Rendevuo Grupo mian mondfaman tabelon de la envortaraj vortoj. Ĝi estos tiel grava por la Esperanto lingvo kiel la tabelo de la korelativaj vortoj estas."

Li donis al mi bele presitan tabelon kaj mi legis:

"TABELO DE LA ENVORTARAJ VORTOJ," kompilita de F.Antomo. Kaj ĉe la kapoj de la kolonoj mi legis kun miro kaj admiro, la sekvantajn titolojn:

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| "Lacaj vortoj | kiuj | | <u>kuŝas</u> | en la | vortaro. |
| Krurlacaj | " | " | <u>sidas</u> | " | " |
| Pieddoloraj | " | " | genuas | " | " |
| Nelacaj | " | " | staras | " | " |
| Kaŝemaj | " | " | troviĝas | " | " |
| Neuzitaj | " | " | dormas | " | " |
| Fluidaj | " | " | fluas | " | " |
| Solidaj | " | " | situas | " | " |
| Nebulaj | " | " | svebas | " | " |
| **Alkoholaj** | " | " | zigzagas | " | " |

kaj tiel plu tra 392 grandaj kolonoj.

Tuj evidentiĝis al mi ke tiu homo estas geniulo. Fakte, nur tiaj uloj agas tiel malĝentile.

"Honorata Majstro!" mi balbutis, "Kia genia verko! Ho, dankojn, mil dankojn, por ĝi. Ĉiu devas ellerni vian mirindan, simplan sist-

emon. Sed, ĝis tiu feliĉa tago venas, ni bezonas esprimon klarigi ke citita vorto estas en la vortaro. Kiel alie nelertaj homoj kiel mi, povas klarigi al eĉ pli mallertaj homoj, ke ĝi vere envortaras? Elektu por ni unu ĝeneralan vorton, mi petegas!"

Respektoplene mi turnis la kapon por aŭdi la respondon, sed... Zip!...li malaperis, tiel fantome kiel li aperis!

Ho, Gesinjoroj! Tre, tre rava estas la sporto paroli kun fama Esperanta fantomo; sed, ve, ho ve! la vizito lasis malbonan lingvan dornon je mi. De tiu nokto mi ne scias kiel diri ke vorto sid---star---genu--- Peston al ĝi! sed diri tion kion faras vortoj dum ili estas en la vortaro.

Post longa kaj profunda pensado, pli kaj pli mi iĝas certa ke la vizitanto, le genia Sinjoro F. Antomo, aŭtoro de la tabelo, estas neniu alia ol la verkisto de alia stranga dokumento pri la unua kunveno, kiun ni trovis sur la tablo (sen nomo kaj sen klarigo) ĉe la dua kunveno de la Melburna Rendevuo.

Kaj mi estas certa ke li vizitis ankaŭ aliajn Esperantistojn en Melburno. Pro lia influo, hodiaŭ vortoj 'staras', 'sidas', 'trovigas', kaj tiel simile, sed neniam plu simple 'ESTAS' en la vortaro.

------------------------------------------ E.S.HANKS.

## TRADUK-KONKURSOJ.

Traduko de Konkurso 17: (Kompilita el 3 tradukoj).

La turoj de Zenit aspire leviĝis super la nebuleto matena; severaspektaj turoj el ŝtalo kaj cemento kaj kalkŝtono, fortikaj kiel rokaĵoj kaj delikataj kiel arĝentaj stangetoj. Ili estis nek citadeloj nek preĝejoj, sed sincere kaj bele: oficejaj konstruaĵoj.

La nebuleto kompate kovris la puntecajn strukturaĵojn de antaŭaj generacioj: la poŝt-oficejon kun ĝia ŝindo-torturita mansardo, la ruĝbrikajn minaretojn de kompataj domoj malnovaj, fabrikojn kun nesufiĉaj kaj fulgokovritaj fenestroj, lignajn lu-domojn kotkolorajn. La urbo estis plena de tiaj groteskaĵoj, sed la senmakulaj turoj forpuŝis ilin de la komerca centro, kaj sur la foraj montetoj estis brile novaj domoj, hejmoj--laŭ ŝajno--por ridado kaj trankvileco.

VENKINTA GRUPO: Western Australian Esperanto League.

Tradukota Teksto Konkurso 19:

For man is omnipotent. There is no goal he can imagine in the realm of mind which he cannot reach sooner or later in the realm of matter. There is no force yet discovered which is strong enough to foil him: through his children he can overcome even the apparent finality of death. There is no fear so potent that it will for ever deter him, nor any suffering so great that he cannot endure it for

his spirit's sake. In him is every quality that he attributes to his gods: beauty, wisdom, omniscience, omnipotence, divinity. There is even immortality. (Stephen Haggard: I'll Go to Bed at Noon.)

Tradukoj devas atingi la subskribinton antaŭ la 10.2.45.

P.E.SCHWERIN, 1 Carabella Flats, McDougall St., MILSONS POINT, N.S.W.

---

## LINGVAJ MALFACILAĴOJ.

Amikoj miaj sugestis, ke mi renkontu tiun maloftan specimenon, por-ĉinan japanon---nome, la bone konatan Maldekstrul-aŭtoron Wataru Kaji. Ni kunvenis en maleleganta ĉambro, plena de cigared-fumo, malfrue en la vespero. S-ro Kaji sidis sur malalta seĝo, mordetante arañisojn kaj trinkante teon. Li havis belan, aristokratan vizaĝon, longan kaj mallarĝan, tre palan. Li aspektis kiel juna paĝio. Sed li ne estis tiom juna: li estis edzo kun pluraj infanoj, kaj lia kariero en Japanujo kiel radikala agitisto estis longa kaj okazoriĉa. Kiel membro de l' Partio de Laboristoj kaj Farmbienuloj kaj de la Kontraŭ-Imperiista Ligo li estis arestita plurfoje de la Japana polico. Fine li eskapis al Shanghai alivestita kiel aktoro. De post la ekesto de la "Incidento" li propagand-laboris sporade kontraŭ la Japana Armeo.

Neniam antaŭe mi spertis tiajn lingvajn malfacilaĵojn kiel nun dum mia konversacio kun Wataru Kaji. Li parolis tute ne la anglan kaj tre malmulte la ĉinan lingvon. Li venis al nia renkonto kune kun ĉina amiko, kiu scipovis paroli japane sed neniujn lingvojn okcidentajn. Niaj gastigantoj, la luintoj de la fumoplena ĉambro, estis ĉina-germana paro. La ĉina edzo parolis sian gepatran lingvon kaj bone la germanan. Lia angla scio estis nebone. Kiam Kaji ekrakontis historion japanlingve, ĉiu frazo devis esti tradukata pere de lia kamarado ĉinen, poste ekprenita de nia ĉina gastiganto, kiu tradukis ĝin germanen al sia blonda edzino. Ŝi siavice esprimis ĝin por mi anglalingve. Niaj demandoj kaj respondoj tiamaniere migris pene de mi al sinjoro Kaji kaj returne, kun tri metamorfozoj survoje. Neniu eblis diri la ekzaktan rilaton inter la originaj frazoj kaj ilia fina traduko. Kiam ajn unu el ni ekscitiĝis dum la diskutado, li aŭ ŝi preskaŭ ne povis atendi, ĝis la traduka proceduro estis finita, ĝis la respondo alvenis. (El Eve Curie: Journey Among Warriors.)

---S-ino K.R.SCHWERIN.

ERAROJ en la Dec. 34/2 "kornikpiedoj"; 37/18 grupigos; 38/7 de mals. forstreku "la"; 39/6 dronas; 7, Nye; 41/8-9 alia; bonkora; 42, forstreku liniojn 3/4.

---

## ASOCIAJ AFEROJ.

I.E.L. Kiel membroj scias, la kotizoj de la Ligo komenciĝas je la 1a de Januaro. Sendu vian kotizon senprokraste al la Cefdaligito S-ro L.E.PFAHL, 64 Brighton St., Croydon N.S.W. Frue en Februaro ni sendos la kotizojn al la ĉefsidejo de la Ligo, kaj A.E.A.tre volas pligrandigi nian antaŭan plejbonan membro-ciferon, precipe en la plialtaj kategorioj. Ĉiuj niaj individuaj membroj estas liganoj (A.M.), kaj esperebla kiel eble plej multaj abonos la Jarlibron kaj monatan gazeton, "Esperanto Internacia." Jen la kategorioj:-

- MJ --- Ricevas I.E.L. Jarlibron 5/-
- MA --- Ricevas I.E.L. Jarlibron kaj Gazeton, 11/3
- MS --- Ricevas kiel MA sed pagas plialtan kotizon por finance helpi la Ligon.

Pro tio, ke oni nun povas sendi la Gazeton al liberigitaj landoj, la Ligo volas sendi ĝin al malnovaj samideanoj, tiel denove allogante ilin al nia celo. Tiuj liberigitoj kruele suferis kaj estas sen la rimedoj pagi por ĝi. La Ligo komencis planon per kiu vi povas pagi la kotizon de liberigito kaj se vi volas ili konatiĝos la donacinton al donacito. Se vi volos korespondanton en liberigita lando, jen vere unika ŝanco. Sendu tiajn donacojn al S-ro PFAHL kun via propra kotizo.

LA RONDO.

A.E.A. KOTIZOJ. Pro pli altaj kostoj de materialo, kaj por meti la Gazetan financon sur pli firma bazo la Estraro, je rekomendo de la Redakcio de La Rondo, decidis tuj plialtigi la kotizon de A.E.A. al 6/- ĉiujare. Tiu sumo ankoraŭ enhavas la abonprezon de nia oficiala organo. Aparta abono al La Rondo kostos 4/6 ĉiujare. Ni estas certaj, ke niaj membroj kaj legantoj konsente akceptos la ŝanĝon, konstatante, ke ni jam prokrastis la plialtigon dum multaj monatoj. Bonvolu sendi kotizojn kaj abonojn al F-ino W.ADDIS (S.Aus.), nia Kasistino.

LIBROSERVO. En la lastaj monatoj multaj membroj utiligis la ŝancon importi librojn pere de la libroservo. La plejofte menditaj libroj estis: Fulcher & Long (Eng - Esp) 12/6 kaj Millidge (Esp - Eng) 16/6 Aliaj popularaj volumoj estis Vojo Returne, Riĉa kaj Sen Mono, kaj Aventuroj de Marteno Drake: por ĉiu 6/6. Key to Esp., la eta propagandilo sendebla al neparolantoj de Esp. en aliaj landoj, ankaŭ mendiĝis libere. Ili estas haveblaj en Itala, Hispana, kaj Franca lingvoj Prezo 6d. Mendu importeblajn librojn pere de la Sekretario.

G.H.HILLERMAN, (Sekretario) 15 Morrice St., Lane Cove, N.S.W.

STATISTIKO. Individuaj Membroj (kiuj estas membroj de I.E.L. en la kategorio AM aŭ pli alta) 164. Grupaj Membroj (Are aligitaj de la kluboj sed kiuj ne estas Individuaj Membroj de A.E.A. 148. Sumo de Membroj de la Asocio 312.

G.H.HILLERMAN 13.12.44.

## KASO DE LA RONDO.

KVITANCOJ ricevitaj dum Dec. S-ro C,Schmidt (don) 5/-; S-ro Costa 10/- (5/- don.); S-ro Thompson (don) 2/6; S-ro N.Grant 5/-; S-ro E. Crowe 5/-, S-ro P.Holmes 5/-, F-ino S.Taylor 5/-, S-ro F.G.Clifton 5/-, £2.2.6.

Al la ĝenerala kaso 9/-, al La Rondo £1.13.6.
Elspezoj £3.10.1; Deficito £2.12.8.

(F-ino) W.ADDIS, (Kasistino) 25 Greville Avenue, Flinders Park, South Aus.

---

## PYKE MEMORIGA EKZAMENO 1944.

La jenaj ŝtatoj estis reprezentitaj:- Okcidento Aŭstralio, Viktorio, Tasmanio, Nova Sud-Kimrujo. El Okcidenta Aŭstralio 11 kandidatoj; el Viktorio 5; el Nova Sud-Kimrujo 4; el Tasmanio 1---21. 9 konkursis por la premio. 12 provis gajni la atestilon. La gajninto de la premio (£5-5-0)(aljuĝita al la studinto kiu studis dum ne pli ol unu jaro, kaj ricevis la plej multajn poentojn :

S-ro GUISEPPE CETTINI el Perth, Okcidenta Aŭstralio.

Atestiloj estis aljuĝitaj al la jenaj :-

| | | | |
|---|---|---|---|
| S-ino I.CALDERA, | Okc. Aŭs. | S-ro J.BUTLER, | Nov.Sud.Kim. |
| F-ino E.WILLIS, | " " | " K.L.G.SMITH, | " " |
| F-ino E.CHANDLER, | " " | " W.LANGHAM, | " " |
| A.S.O. MARGARET HARRIS, | Viktorio | " W.GASSNER, | " " |
| Ft/Lt. I.MADDERN | " | " F.E.SCHWERIN, | " " |

---

MELBURNA FESTO ZAMENHOFA. La 13an de Dec-o, Melburna Esp-a Klubo memorfestis la naskiĝan datrevenon de D-ro Zamenhof ĉe la Business & Professional Women's Club Rooms. Multaj anoj ĉeestis kaj ankaŭ sam-oj el Usono kaj Sidnejo, nome la tre respektinda Pastro Gabriel Pausback, helpanta estro de la Karmelita Ordeno, kaj Leŭtenanto Towsey. Ĉi tiu, same kiel Pastro Pausback, parolas kelkajn naciajn lingvojn, sed tamen ili ambaŭ opinias ke Esp-o estas studinda. Ankaŭ ĉeestis F-ino Tilly Aston, tre bone konata sam-ino, kiu komplezis al la ĉeestantoj per kelke da vortoj E-aj kaj ŝi ankoraŭ parolas tre flue.

S-ro Rawson raportis pri la rezulto de la Pyke Memoriga Ekzameno, kaj S-ro Drummond donis la atestilojn al la gajnintoj kiuj alestis, nome Flight-Lt.Maddern kaj S-ro Butler. S-ro Rawson ankaŭ parolis pri la rolo de Esp-o en la nuna kaj postmilita mondo.

Ĉiuj ĝuis la belan kantadon de F-ino F.Grant, S-inoj R.Craigie kaj Mitchell, kaj S-ro E.Mackenzie. Ilin akompanis fortepiane S-ino A.Grant, S-ino Craigie kaj F-ino Godfrey respektive. Entute,

kontentiga fino al sukcesplena jaro.

---------------------------------------- E.M.HILL.

LASTATEMPAJ NOVAĴOJ.

Brazilo. La Prezidanto de la Republiko, D-ro Vargas, patronas la Dekan Brazilan Kongreson Aprile 1944

Britujo. La Societo de Britaj Esp-aj Instruistoj havis somerlernejon. Pri instruistoj aferoj skribu al F-ino Nixon, B.A., 183 Woodlands Park-Rd., Bourneville, Birmingham.

Danujo. Dana Esp-a Ligo nombras 792 en 32 kluboj. Jarkubveno en Fredericia kun 164 homoj.

Egiptujo. Egipta Esperanto-Asocio refondiĝis. "Le Progres Egyptien" unuapaĝe publikiĝis artikolon favoran al Esp-o kontraŭ Basic...La Querelle de l'Esperanto et du Basic English.

Irlando. Pastro Riobard, Mt. Melleray Abbey, Cappoquin, Irlando, donos Esp-an legaĵon pri la Maria Legio.

Novegujo. Membrocifero 469; korespondkurso vigliĝas, 4-foje tiom de antaŭ la milito. Bugge-Paulsen milit-kaptito en Germanujo.

Sudafriko. Decembromeze la radio Johennesburg donis parolon pri la la 85a nasktago de Zamenhof.

Maroko. Universala Filatelia Esperanto-Klubo, 5 Rue Savorgnan de Brazza, Casablanca; utila organizo por p.m. kolektantoj.

----------------------------------------

DIPLOMA DATREVENO. S-ro C.W.BALLARD, de Melburno, verstela veterano, salutas kun siaj amikoj la tridekan datrevenon de sia B.E.A.-diplomitiĝo. "La Rondo" kore gratulas, esperante ke ankoraŭ jaroj de interesa kaj utila laboro atendas lin.

----------------------------------------

SKRIBIS S-ino Langtree al S-ro Tom Wickham de The House of Commons, England. Jen lia respondo :-

"Your letero 14 July enclosing pamphlets in the Esp-o language, for which I thank you, has reached me.
I have read them with interest and only wish I had some spare time to devote to the study of this international language.
As it is, I fear I shall have to make do with English and French in the West, Persian and Hindustani in the East, and a smattering of Russian. Having expended a good deal of time in learning languages I can appreciate the value of a lingua franca.
With all good wishes, Yours sincerely, TOM WICKHAM.

Ŝi skribis ankaŭ al Sir Ernest Fick, who replied "If I find an opportunity to put in a good word for Esperanto and Esperantists, I shall be very pleased to do so." Ankaŭ ŝi skribis al Prof.Murdoch, Dakin (who knew Prof. Collinson of Liverpool University), The Watchman, Dr. Goddard, several newscommentators, Hughes, Menzies, Evatt, Curtain, Forde, foreign embassies, and others, and questions to the Quiz Kids.

---

(Lastmomente ricevita).

POR LA NOVA JARO.

Sur la sojlo de la Nova Jaro
Nia vivosorto nun troviĝas,
Dum ĉe la vekrioj de l'homaro
La pasinta jaro forruliĝas.

Kiom da suferoj ĝi venigis,
Kiom da esperoj ĝi fortrompis,
Kiom da animoj ĝi mortigis
Kaj da vivoj ĝi disrompis?

Ho, aŭskultu, Di jam ĝemon nian,
Donu do al Via infanaro
Promesitan "tagon" sanktan Vian
Kaj ekestu vera la Novjaro!

D.J.RABINOVIĈ-TAJC. Ĥadera, Palestine.

---

Moudrá Pavla. La tutmonda paco ŝajnas esti neatingebla, sed mi firme kredas kaj mi ne estas sola, kiu havas tian konvinkon, le iam venos la tempo, kiam la stelo de la paco ekbrilos super la kompatinda homaro.

Abdul Baha. La malsano, kiu turmentas la homaron, estas manko de amo kaj foresto de altruismo. Sen amo kaj konkordo neniam estos progreso aŭ prospero. Neniam okazos plibonigo, neniam interkonsento inter la homaro, se la sentemo de homoj ne estos vigligata de iu potenco.

---

KOREKTO por Adresaro :- Sr W.Ballard....devus esti Sr C.W.Ballard, 29 Lansdowne Rd., East St.Kilda S2, R.D.Prezidinto ER, IT-PM.
Sr P.Hudson....devus esti Sr P.T.B. Hudson, 11 Webster St., Oakleigh, SE 12, R,U,A, IT-PM.

---

Published by F.R.BANHAM, 2 Banchory St., Essendon, W5, VIC.

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO.

# LA RONDO

Jul. 1945. No 5, VOL. 5.

ELDONITA de F.R.BANHAM,
2 BANCHORY St., ESSENDON W5, VICTORIA, AŬSTRALIA.

# LA RONDO.

Lingve kontrolas F.R.BANHAM,
2 Banchory St., Essendon, W5 VIC.

ooo

Enhave aranĝas F-ino L.E.BAILEY,
18 Sherbourne Rd., Medindie Gdns., Adelaide, S.AUS.

---ooooo---

## LA "HISPANA MALLIBERULO" - TROMPO.

(Kondensita el Scribner-Commentator, Stanton Delaplane, Reader's Digest, 1941)

Unumatene en la lasta printempo kelkaj centoj da Usonaj komercistoj kaj profesiuloj---inter ili pastro en San Francisko---malfermis identajn kovertojn kaj legis:

"Estimata sinjoro! Persono, kiu konas vin, igis min alfidi al vi delikatan aferon, de kiu dependas ne nur la estonteco de mia kara filino, sed mia vera ekzisto mem..........."

Tiel komenciĝas la malnova-malnova "Hispana Malliberulo"---trompo. Ĉiumonate 10,000 tiaj leteroj transiras la landlimon de el Meksiko. Per akraj okuloj trompistoj sude de la landlimo traserĉas Usonajn adreslibrojn kaj kompilas novan liston de viktimoj ĉiutage. Laŭ la Usonaj poŝt-inspektoroj ĉiujare ĉirkaŭ 150 Amerikanoj pagas po 3600 dolarojn, por sciiĝi pri la malnova historio, importita al la Nova Mondo precize 50 jarojn post la vojaĝo de Kolumbus. En 1542 juĝejo en Sevilja (Hispanujo) registris la unuan "Hispana Malliberulo" - trompon. Ĝi havis 400 jarojn de seninterrompa sukceso kaj funkcias nuntempe kun preskaŭ neniu ŝanĝo; eĉ la fraz-aranĝo de la leteroj restas la sama.

Estas kortuŝa Letero Numero Unu de la "Hispana Malliberulo" - serio, kiu ekfalis sur la matenmanĝo-tablon de l' pastro E.A.Lowther, pastro de l' Urba Templo en San Francisko. La unua allogaĵo estas kalkulita, por forigi la etajn fiŝojn kaj restigi tiujn brilajn orfiŝojn, kiuj pagas pli ol 500,000 dolarojn ĉiujare por subteni ĉi tiun trompist-ludon.

"Mi estis bankisto en Vera Kruz," la letero tekstas, "kaj post kelkaj malfeliĉaj spekulacioj mi estis devigita fuĝi kun mia bela 18-jara filino. Ĉu vi volos helpi al mi, por rehavigi 300,000 dolarojn kaŝitajn en sekretaj fakoj de valizo kaj kofro? Pro via ĝeno mi pagos al vi trionon de la menciita sumo, t.e. 100,000 dolarojn."

D-ro Lowther maltrankviliĝis. Li skribis responde, ke ---kvankam kompreneble li ne povus aprobi iun kontraŭleĝan agon, li ĝoje helpus al malfeliĉulo."

La dua stereotip-letero venis de Meksikio aer-poste. Ĝi estas

por alfiksi la hokon. N un, diris la skribanto, estante certa pri kunsentema korespondanto li senŝarĝigus sin. "Mi estas en malliberejo, por trapasi tri jarojn kaj pagi punmonon de 3,600 dolaroj pro bankroto." Ĉifonita gazeta eltranĉaĵo, sciiganta pri la kaptado de la bankisto kaj lia filino, estis aldonita. Antaŭ ol la Meksikia leĝistaro transprenis lin---tiel tekstis la letero---la bankisto kaŝis 285,000 dolarojn en Usona valuto en kofro, kiun li transdonis al Usona doganejo en Teksas. Sed lia valizo kune kun aliaj havaĵoj estis konfiskita de Meksikaj oficistoj kaj baldaŭ estus vendotaj, por parte pagi la punmonon de 3,600 dolaroj. Kaj jen la insido: la valizo vendota je kelkaj moneroj enhavas ne nur la kvitancon pri la kofro, sed ankaŭ kontant-ĉekon al Teksas-banko pri 15,000 dolaroj. Se la punmono ne povus esti pagata kaj la valizo rehavigata, ĉio estus perdita! "Mi ne havas la honoron, koni vin persone," tekstis la letero, "sed amiko via, alia Usonano, donis al mi vian nomon. Mi ne povas diri al vi, kiu li estas; li estas ĉi tie en malliberejo sub alia nomo, ĉar li ne volas senhonorigi sian familion."

La letero daŭrigis kvietigi ĉiujn dubojn, kiuj eble ankoraŭ restadis en la animo de l' viktimo. La bankisto povas skribi malkaŝe pri tiaj konfidencaj aferoj, li klarigas, ĉar li amikiĝis kun malliberej-gardisto, al kies diskreteco oni povas absolute fidi kaj al kiu vi povas sendi viajn respondojn. Kial la gardisto ne povas malfermi la valizon, elpreni la ĉekon kaj pagi la punmonon? Ĉar la valizo, tenita de malliberej-oficistoj, estas sigelita. Rompitaj sigeloj estus rimarkitaj antaŭ ol la gardisto kontantigi la ĉekon. Nur unu vojo prezentiĝas: vi devas veni, pagi la punmonon, rehavigi la valizon. Post tio la vojo estos malferma al la riĉaĵoj ne nur de la valizo, sed ankaŭ de la kofro mem!

"Post kiam vi kontentigis la gardiston, ke vi havas la 3,600 dolarojn, por pagi la punmonon, li rompos la sigelojn kaj montros al vi la kvitancon kaj la bankĉekon. Vi telegrafos kaj kontrolos ilin. Post tio, kaj nur post tio, kiam vi konvinkiĝis pri nia sukceso, vi pagos la monon." Poste sekvis detalaj instrukcioj. La filino devus aliĝi al la triumfa procesio de Meksiko al la landlimo, postuli la ĉekmonon kaj kofron. La pastro povus poste reiri hejmen kun 100,000 dolaroj, dankante al providenco, kiu rekompencas homojn pro bonaj agoj. Se li ankoraŭ hezitas---"Mi petegas vin, mia kara sinjoro, plenumante mian peton vi savus la estontecon de tiu senkulpa infano, mia amata filino." La valizo estas vendota en ĉi tiu monato, ĉu d-ro Lowther kaj liaj 3,600 dolaroj bonvolus rapidi?

Tiel finiĝis la dua letero. Kiel al 149 aliaj homoj, tiel ankaŭ al d-ro Lowther la embaraso de la bankisto ŝajnis esplorinda. Cetere: li kaj lia edzino estis planintaj libertempon. Do, kial ne Meksikio? Aeroplano portis la geedzojn Lowther al Meksiko-Urbo. Tiu vojo estis tute normala. Poste D-ro Lowther sciiĝis: pakisto el Vaŝingtono, juvelisto el Novjorko, kolegio-profesoro el Nov-Anglujo, glaci-vendisto el Georgio, konstruisto el Miĉigan, spicisto el Kalifornio kaj advokato el Pensilvenio konfesis malgaĵe, ke ili prenis la saman vojaĝ-vojon. La Usona registaro registris nomojn

de viktimoj de post 60 jaroj.

La kurteno malleviĝis por Akto Tri, kiam la geedzoj Lowther alvenis en la aerodromo de Meksiko. Tie envenis "Senor Rangel," afabla, riverenca, angle-parolanta helpisto al la trompo. Li estas, li diris, la bofrato de la malliberej-gardisto. La geedzoj kaj S-ro Rangel prenis fiakron al la hotelo kaj poste veturis senprokraste al la malliberejo, por vidi la malliberulon. La gardisto elvenis nur sufiĉe longe por diri, ke estas tro malfrue por vidi la malliberulojn, kaj ĉu D-ro Lowther bonvolus havi la monon preta"mañana"?

Sekvintan tagon Senor Rangel renkontis ilin en restoracio proksime al la malliberejo. Post kelkaj minutoj Meksikiano, kun botoj kaj pistoloj ŝteliniris tra la pordo. Estis denove la malliberej-gardisto. S-r Rangel interpretis: "La esplor-juĝisto eksuspektis, ĉar la bankisto aranĝis nuligi la malpermeson pri la valizo. Vi ne povos vidi lin hodiaŭ, eble morgaŭ." D-ro Lowther komencis senti kvazaŭ li eniris ekzotan melodramon. Tiu maltrankvileco---se li nur estus sciinta tion---estis intence inspirita, por prepari lin al la rapid-akto baldaŭ venonta.

En la mateno Senor Rangel, D-ro Lowther kaj la supozita gardisto renkontiĝis en la sama restoracio. Tiufoje oni ne parolis pri la obleco, vidi la malliberulon aŭ la supozitan amikon de d-ro Lowther, kiu rekomendis lin por la servo. La 'coup de grace' (finofara bato) estis aplikita kun lerteco, kiun la bando akiris en 400 jaroj. El la bluzo de l' gardisto elvenis koverto enhavanta kofro-ŝlosilon, kvitancon kaj imponan kontant-ĉekon pri 15,000 dolaroj. S-ro Rangel ree interpretis: "Li ne povis atendi; li jam rompis la sigelojn sur la valizo. La juĝisto ordonis esploron, kaj oni eble sekvos vin. Rapidu, donu al li la monon por pagi la punsumon, aŭ ni ĉiuj estos perditaj!" D-ro Lowther transdonis la monon. Se iu pli ruza viktimo postulis kontroladon de la ĉeko, S-ro Rangel ne kontraŭis. Sed kutime la viktimo estis avertita, ke li eble estos gardata; prefere la gardisto sendu la telegramojn al la Teksas Banko kaj al la doganejo. Tiukaze la gardisto revenis poste kun lerte falsitaj telegramoj respondaj, kiuj atestis la validecon de la ĉeko kaj kvitanco. Se la viktimo ankoraŭ hezitis, S-ro Rangel kondukis lin al forlasita magazeno, kiel li traktis la pakiston el Vaŝingtono. Tie li ponarde vundis lin en la brako kaj ofertis, fortranĉi liajn orelojn de la kapo. La pakisto transdonis la monon.

Ne restas multo, kiun la viktimo povus fari. Liaj plendoj lasas la Meksikian policon strange kvieta. Iam norde de la limo, venante el Teksas-banko kun ĉeko stampita "falsaĵo" en la mano, li kvietiĝas antaŭ ol li atingas la plej proksiman policejon. Li pripensas, kiel la rakonto aspektus en la hejmurba gazeto. La 285,000 dolaroj, ĉu ili estis ŝtelitaj? La 18-jara bela filino kaj la vojaĝo al la landlimo. Ne...preferinde forgesi ĉion. Viroj, kiuj fine atestis, troviĝis priskribitaj de la defenda advokato kiel personoj, kiuj "iris al Meksiko kun ŝtelado en la koro."

La trompo fine estis prijuĝita, ĉar D-ro Lowther havis la kuraĝon kaj publikan spiriton plendi. Li vizitis sian malnovan amikon J.Daniels, Usonan ambasadoron en Meksikio. Kelkajn horojn poste

Ŝtat-departementaj telegram-dratoj varmiĝis kaj poŝta inspektoro Speake estis survoje suden. Federacia ĵurjuĝejo en San Francisko kondamnis kvin personojn en Meksiko pro poŝt-trompado. Ne ekzistas elliver-kontrakto en Meksiko rilate al poŝt-trompado. Sed unutage du el la akuzitoj, nomitaj en la protokolo, aperis sur la Internacia Ponto en Laredo, Teksas. La fakto, ke ili sidis inter ege armitaj Meksikaj policistoj ŝajne ne surprizis la Usonan polic-inspektoro, kiu renkontis ilin.

Unusemajna juĝ-esploro en San Francisko, kaj Juan Barrena kaj Camilio Vasquez estis kondamnitaj pasigi ses jarojn en federacia malliberejo kaj punpagi po 2,000 dolarojn. Tri aliaj, nomitaj en la protokolo, estas liberaj. La Meksika sekreta servo konstatas, ke granda Hispana-Malliberul-bando ankoraŭ restas libera. Eĉ dum la registara prokuroro postulis, sendi Barrena kaj Vasquez en ejon kie ili ne plu povus trompi Amerikanojn, iu Y.M.C.A.-sekretario venis al la poŝt-inspektoro, oficanta en la sama konstruaĵo; li montris leteron, kiun li ricevis kun la matenaj poŝtaĵoj. La inspektoro legis nur la unuan paragrafon: "Estimata sinjoro! Persono, kiu konas vin, igis min alfidi al vi delikatan aferon...Mi estas en malliberejo...."

---------------------------- P.E.SCHWERIN. (Trad.)

PRETER SONĜOJ DE L' AVARECO. (El PUNCH 6/12/29)

Eble kaŝaŭskultantoj neniam aŭdas bonaĵojn pri si, sed foje ili aŭdas ion ja mirigan kaj interesan. Plue, kiam oni estas invitita sidi en la infanejo kaj ĝoje tion faras, ĉar tie brulas bonega fajro, certe ian paroladon okazantan oni rajtas aŭskulti, eĉ se ŝajne ties ĉeesto forgesiĝas.

Hester estis invitita pasigi la posttagmezon kun Barbara kaj ekscite entreprenis rakonti viziton kiun ŝi baldaŭ faros al onklino kiu loĝas en kastelo aĝe kvincentjarojn, onklino kiu posedas du aŭtomobilojn kaj multaliajn bonaĵojn; al ĉio Barbara aŭskultis kun, eble, envia silento. Post nelonge, kiam gastino kaj gastigantino okupiĝis pri vestado kaj senvestigo de la plej novaj aldonoj al la pupfamilio, mi aŭdis Barbara rimarkigi per okaza tono de neinteroso:

"Mi nun diros al vi pri mia kuzino, se vi volos."

"Via komika maljuna Kuzino Tabitha? Mi konas ŝin," respondis Hester.

"Ne, tute ne! Mia treege riĉa kuzino. Mi neniam antaŭe diris al vi pri ŝi, sed ŝi estas ja terura riĉa kaj loĝas en domo aĝe kvardekmil jarojn kun tricent ĉambroj en ĝi."

Ŝi paŭzis sufiĉan tempon por lasi enpenetri tiujn faktojn dum mi vigliĝis kaj atentis.

"Ŝi havas centojn kaj centojn da geservistoj," daŭris Barbara, "Domservistinoj, kuiristoj, kaj aŭtodirektistoj kaj multmultaj pli."

Ĉi tie mi sentis min devigata eniri la paroladon.

"Tiom da geservistoj nepre estas ĝeno," mi rimarkigis, "probable ili multe kverelas."

"N e, ili ne. Ili amas esti tie. Kaj troviĝas bonegajoj por manĝi---ĉokoladoj en ĉiuj ĉambroj, skatoloj plenaj de ili, ni nure prenas kelkajn, kaj tiam oni enlokigas pli da skatoloj."

Ŝi flirtis la manon laŭ nobelina maniero. Hester silentis sed videble impresiĝis.

"Sia nomo estas Rosy," daŭris Barbara.

"Rosy kio?"

Eble, duonsekunde, la kuzino de Rosy ŝajne sin perdis, sed ŝi reposediĝis tiom rapide, ke apenaŭ estas juste ĝin mencii.

"Howard," ŝi firme diris, "sed nenia parenco de nia D-ro Howard. Ĝi estas belega domo. Ĉiuj ĉambroj odoras pro parfumo---Rosy havas botelojn kaj boltelojn da ĝi, kelojn plenplenajn. Kaj estas naŭ lakeoj, ĉiuj altkreskaj. Kiam mi tien iras por resti, tri el ili venas al la stacidomo por elpreni miajn pakaĵojn kaj porti ilin al la aŭtomobilo. Ĝi enhavas belegajn kusenojn, kaj oni sidas en grandaj brakseĝoj---ne ordinaraj aŭtosidejoj, kaj ŝi havas grandegan tapiŝeton el leonpeltoj, subkovrita per purpura silko."

"Mia onklino Nancy ankaŭ havas grandegan peltan tapiŝeton," rimarkigis Hester.

"Kvardek tri homoj estis mortigataj akirante la leonojn por la tapiŝeto de Rosy," Barbara informis nin. "Ho, ni havis kelkajn bonegajn veturojn en tiu aŭtomobilo.'" Ŝi sopiris---sopiro memoriga de ravoj preter la atingo de ordinaraj homoj. Tiam ŝi daŭris kun freŝa entuziasmo:-

"Ĉu vi scias? Unufojon, Rosy havis festenon, kaj poste ni deziris fari ion ekscita, do ni eniris la grandan aŭtomobilon kaj veturis ĉie en la ĝardeno, ĉie sur la herbejetoj kaj florbedoj, ĉion frakasante. Sed ni ne ĝeniĝis. Tio ja estis amuzado!"

La bakanala sceno aperigita de tiu priskribo, certigis mian opinion ke Rosy, pri kiu mi de la unua momento dubis, ne taŭgas kiel deca kunulino por Barbara.

"Ĉu vi havis multajn festenojn?" demandis Hester.

"Nu, ne la tutan tempon, sed kompreneble kutime aspektas kiel festeno, ĉar Rosy havas tiel belegajn robojn, preskaŭ ĉiu el veluro kaj atlaso. Kaj ŝi ĉiam portas vesperrobojn, eĉ kiam ŝi butikumas."

"Ĉu tio aspektas---er---konvena?" mi demandis.

"Aspektas belege," Barbara lakone respondis. "Kaj kiam mi restas kun ŝi mi havas tiom da roboj kiom mi deziras por mi mem, kaj ŝuojn konformajn, kaj kiam Rosy kaj mi promenadas en la kamparo ni ankoraŭ portas niajn plej bonajn atlasajn ŝuojn---la tutan tempon."

"Sed ĉu ili ne baldaŭ difektiĝas? La plandoj estas tiel tre maldikaj."

"Ja, sed kiam ili eluziĝas ni nure ĵetas ilin super heĝon, ĉar ĉiam aŭto venas jus post ni kun multe da novaj ŝuoj en ĝi, kaj ni eniras kaj surmetas alian paron. Ŝtrumpoj ankaŭ, se ni deziras."

"Mi komprenas. F-ino Howard ja prepariĝis por ĉiuj okokazaĵoj, ĉu ne?" Mi diris.

"Ja, ĉio kiel tiu," konsentis Barbara.

"Kiajn leterojn vi sendube skribas hejmen!"

"Ne, mi neniam ĝenas min skribi kiam mi estas ĉe Rosy," diris Barbara aplombe, "mi nure sendas telegramojn. Dek aŭ dek du kelktagojn sendas Rosy kaj mi. Ni ne prizorgas pri la mono."

Mi ekvidis Hester; ŝi portis klaran similecon al la Reĝina de Ŝiba survoje hejmen, kaj mi mem sentis min iom malforta.

"Mi havis neniam ideon ke iam ekzistis gehomoj tiom riĉaj," estis ĉio kion mi kapblis trovi por diri.

Barbara ridetis indulge je ni.

"Ho, sed ne troviĝas multaj personoj tiel riĉaj kiel estas Rosy," ŝi sciigis nin kun sopiro de kompleta kontenteco."

---------------------------------------<u>L.E.BAILEY</u> (trad)

## <u>PAPERA PECETO EL BELGUJO.</u>

Aŭtografa kolektado kredeble dum kaj post la milito, fariĝos la preferata krom-laboro de multaj geviroj. Kolektantoj ankoraŭ altŝatas la subskribojn de historiaj herooj de la unua mondmilito, de Marŝalo Foch ĝis Serĝento York.

Unu el la plej notindaj troviĝis ne antaŭ la jaro 1928a, dek jarojn post la Armistico, kiam nekonato eniris la magazenon de la nun mortinta Thomas F.Madigan, la bone konata aŭtograf-kolektisto, de New York. Madigan konjektis, ke tiu altkreska, negrasa vizitanto ne si mem estas kolektanto; laŭ aspekto li estas maristo, kaj tia fakte li ja estis---ŝipestro de Belga ŝarĝŝipo. Dirante, "Jen, eble, tio ĉi interesos vin," li eltiris el sia poŝo malgrandan peceton da papero sur kiu troviĝis kelkaj frazoj en la Franca lingvo. "Feb, 4 1914.....Ricevita 400 frankojn, pro servado kiel flegistino. Edith Cavell."

"Kiamaniere vi ricevis ĉi tion?"

La malgrasa Belgo ridetis. "De la Germana oficisto kiu mortigis ŝin!"

"Sed ĉu tiu oficisto ne estis mem mortigita ĉirkaŭ la tempo de la Armistico?" demandis Madigan singarde. "Ĉu vi batalis kun la Belgoj?"

"La respondo al ambaŭ demandoj estas---jes. Mi estris la virojn kiuj mortigis lin. Ja per miaj propraj manoj...nu, do, li jam mortis." Iakaŭze Madigan fidis la nekonaton, eĉ antaŭ ol li certigis sin por pasporto kaj aliaj dokumentoj. Ŝajne li ne estas viro kia streĉus la cerbon por fari efekton, ĉar li iom nevole daŭrigis la historion.

"Jus antaŭ la Armistico la Belgoj kaptis kolonelon Bulke, kiu estris la tacmenton kiu mortpafis Edith Cavell. La Germana Kolonelo estis ja fanfaronema pri sia partopreno en la afero. Kutime li estis malcedema arestito kaj fine fariĝis tiel ribelema, ke dum neatendita kverelo li estis mortigita. Mi estris la trupon kiu gardis lin," diris la Belgo, "inter liaj posedaĵoj, pri kiuj oni ordonis min ilin traserĉi, mi trovis tiun pecon da papero. Kial li konservis ĝin dum tri jaroj, mi ne scias. Mi konservis ĝin dum pli ol dek

jaroj. Mi jam portis ĝin dum multaj miaj mond-vojaĝoj."
Madigan aĉetis la paperpecon, kvankam forpasis multe da tempo antaŭ ol li povis kompari ĝin kun konataj aŭtografaĵoj de F-ino Edith Cavell. Efektive, li ja pliriĉigis sian kolekton, per unu el la malmultaj aŭtentaj subskriboj de la martirita flegistino. (James Aldridge, in Saturday Evening Post.)

------------------------------C.W.BALLARD. (Trad.)

## ASOCIAJ AFEROJ.

LIBROSERVO. Malgraŭ la fakto, ke dum 1944 ni vendis librojn je la valoro de £60, ni ne tute kontentigis bezonojn de kursanoj kaj ofte ili devis atendi dum monatoj la alvenon de sopiritaj vortaroj, kaj lernolibroj. La profito de la jarkomerco helpos eviti prokrastojn en 1945.
N ova provizo da Edinburgh Vortaro (4/3) atingis perantojn en Januaro kaj ankaŭ la popûlara Step by Step in Esp. (paper 4/3). Pliaj ekzempleroj venos de tempo al tempo.
S-ro Pitt (Vic.) havas plenan provizon de Home Student (1/2) kaj la aliaj Perantoj ricevos provizon en Marto. Ili ĉiuj havas aĉeteblajn ekzemplerojn de la tre utila Grammar & Commentary (Cox 11/-) kiu d evus esti en la manoj de ĉiu progresinto. Practical Course in Esp. (3/-) por novuloj ankoraŭ estas havebla.
Bonvole notu! NOVA ADRESO de S-ro PITT. De ĉirkaŭ 7/2/45 ĝi estos Koornong School, Warrandyte, VIC.
S-ro Chamberlain, nia Peranto en W.Aus. ankaŭ havas: 1 Alegorioj el la Naturo (5p.) 3 La Karavano (1/-), 1 Luno de Izrael (6/6), 1 Ok Noveloj (1/-), 1 Armea Terminaro (1/6), kaj 1 Biblio (Uzita 6/-)
Nia Peranto en Vic. havas 5 Alegorioj el La Naturo (5p.), 1 Concise Course (Uzita, 1/3), 1 Esp. Shorthand (1/6), 2 Ok Novelpj (1/-), 3 Progress Reader (1/-).
F-ino Carrick, La Peranto en Qld., havas 1 Pinokjo (Pinoccio) (6/6), 1 Karavano (1/-), 8 Alegorioj el la Naturo (5d.).
Al ĉiuj prezoj supre menciitaj aldonu afrankon. Ni mencias la nombron da libroj en provizo pro tio ke multaj el ili ne plu estas haveblaj.

PROPAGANDO. Estus bona propagando se samideano(j) en ĉiu urbo povus donaci al ties biblioteko kelkajn priesperanto-librojn. Jen kelkaj sugestoj:- Grammar and Commentary, Practical Course in Esp. (haveblaj ĉe perantoj). Ni povos importi por donacontoj la jenajn librojn, ĉiam akceptindajn de bibliotekoj.
The Language Problem (10/-), Life of Zamenhof (Eng. Ed.) 4/6, Vivo de Zamenhof 6/6, Step by Step in Esp. (cloth 6/6), kaj la vortaroj, Fulcher & Long (12/6), Millidge (16/6).

KOTIZOJ. Ni memorigas membrojn ke la kotizo nun estas 6/-, (enhavas abonon al LA RONDO 4/6. Nepre pagu frue, alie la Kasistino devas sidi longajn horojn, pretigante memorigilojn al nepagintoj.

Fr-ino Bailey bedaŭras, ke nia nova titolpaĝo, pro diversaj malhelpoj, ne ree aperos antaŭ Marto aŭ eble Aprilo. Malfeliĉe, post ĝia unua apero en Novembro, la ŝablonaĵo disfalis kiam sur la presmaŝino.

-----------------------------------G.H.HILLERMAN, (Sek.)
15 Morrice St., Lane Cove, N.S.W.

MORTO DE S-RO GEENEN.

Kruela sorto forrabis de ni nian karan samideanon, la nederlandan mariston, s-ron Cornelius H.Geenen, kiu mortis 20-jara pro akcidento en Sidnejo, la 8-an de Decembro.

Du tagojn antaŭe, dum deĵoro en sia submarŝipo, li suprenīris ŝtupetaron portante pezan objekton en la mano. Sur la pluve-malsekaj ŝtupetoj lia piedo glitis, li perdis la ekvilibron, falis unue sur breton, poste kapantaŭen sur la ferdekon. Danĝere vundita pro rompo de kranio kaj aliaj ostoj, li estis transportita en hospitalon, kie liaj suferoj finiĝis post du tagoj. Esperantistoj ĉeestis la funebran diservon kaj akompanis lin dum lia lasta vojaĝo al la Northern Suburbs-tombejo, kie multnombra aro da kun-ŝipanoj salutis lin per honor-salvoj.

Pro lia foriro la Esperanto-movado en Aŭstralio multe suferos; li arde propagandis nian lingvon, kien ajn li iris. Ĉiam li donis sian helpon al la movado, kiam ajn la militservo tion permesis. Lia vigla entuziasmo kaj simpatia sinteno allogis centojn da aŭskultantoj dum vorb-paroladoj en la Sidneja Domain, kie li praktike demonstraciis la valoron de Esperanto, rakontante pri siaj spertoj en Okupita Eŭropo. Kiam oni malpermesis al li, paroli publike, li daŭrigis sian propagandan aktivecon en kluboj kaj lernejaj cirkloj. Krom tio, krom sia marista okupo, li trovis tempon por ĉiu-vespera studado kaj planis por la estonteco, por reveno al sia amata patrujo kaj rekonstruo de civila vivado. Ĉion tion abrupte finis kruela momento.

Ni, kiuj konis s-ron Geenen, neniam forgesos lian ĉarman personecon. En la klubo, en la hejmo, en la strato---ĉiam li estis ĝentila, bonhumora kaj de vigla afableco. Kaj pro tio li postlasis multajn amikojn......

Nia kara samideano kaj amiko ripozu en paco!

Dec. 1944, Sydney Esperanto Society

KVINSLANDO. Kelke da tagoj antaŭ la Zamenhof-naskfesto, la Brisbana Esperanto-Societo faris finon al bona jaro per kunveno en kiu diskutiĝis la freŝdata libro de Frederick Bodmer, "The Loom of Language." Malfermis la diskuton s-ro Wanmer, kiu citis la ĉapitron en kiu la aŭtoro pritraktas la demandon pri Internacia

Lingvo kaj aparte Esperanto . Partoprenis la argumenton D-ro L. Jarvis Nye (eminenta kuracisto, s-ro Schindler (universitato de Kvinslando) kaj Leŭt. Muntz (Polujo). S-ro O.Suess, ekspres. prezidis. Antaŭ la festmanĝo radiparolis s-ro Wanmer per 4BK. S-ro J.Mc Donald (prez-o) prezidis la festmanĝon en la komforta Friends' Meeting House (Kvakeroj) Aninoj, inter ili la nelacigebla sek-ino, f-ino Carrick, pretigis dolĉgustan manĝon. Sekvis ĝin paroletoj, kantoj kaj belpejzaĝaj filmoj de s-ro K.Brown.

---------------------------------------- S.WANMER.

## "RENDEVUO" LITERATURA KONKURSO.

La gajnanto de la premio por la jaro 1944 estas Dr. C.J.CALDERA de Perth, W.Aus.

Ni ricevis provojn el 3 ŝtatoj, nome W.Aus., Q'ld, kaj Vic. Ĉu ni povas esperi ke ankaŭ NSW, S.Aus., kaj Tasm. partoprenos en 1945?

Malgraŭ ke ni presis en LA RONDO klaran informon pri la kondiĉoj. kelkaj ne konformis al ili. Unu ne uzis plumnomon sur la verko; du ne sendis kun la verko sigelitan koverton en kiu estas la nomo, adreso, kaj plumnomo; alia sendis plumnomon, sed tute ne donis informon pri la propra nomo.

"AJNULO" ! Bonvolu sendi vian nomon kaj adreson.

La "Rendevuo" dankas ĉiujn kiuj partoprenis, kaj speciale dankas al la juĝanto pro bonkora laboro.

--------------------------------ERNEST S.HANKS, Prezidanto.

## TRADUK-KONKURSOJ.

Traduko de Konkurso 18: (Kompilita el 3 tradukoj.)

Unu Matenon sinjorino Miniver vekiĝis kun iu sento de fatalo, iu ekscio, ke la tago enhavus ion timendan. Ĝi ne estis iu premega pezo, kiel operacio aŭ kiel adiaŭo de la plej bona amiko loĝonta en Tasmanio; nek estis ĝi io tiel malpeza, kiel komitata kunveno aŭ surda onklo ĉe l' vespermanĝo: estis iu speco de duonmezpeza fatalo.

Unue tio konfuzis ŝin. Laŭscie ŝi havus neniujn rendevuojn en tiu tago, nek agrablajn nek malajn, kaj tio en si mem estus bona. Esti tute libera por unu tago signifas: estis por unu tago senmortulo. Laŭ la ĉina proverbo ŝi devus senti sin dia. Sed la eta obtuza pezo daŭris treni kaj premi.

Venkinta Grupo: SYDNEY ESPERANTO SOCIETY.

Tradukota Teksto Konkurso 20.

He turned his face to hers, and looking into her wet eyes, gently kissed her unresisting lips. The kiss was a sacrament for her.

She bowed her head and held it bowed. He was spell-bound by her fair and pure charm. Had she bowed her head in shame, or in acquiescence, ormin both? He was intimidated by her innocence. She had no age then; she was neither old nor young, neither mature nor unripe. She was simply that which had been immaculate. Alexis averted his gaze. B efore he had decided what he should do next, she had risen with a hysterical, instinctive swiftness and vanished. How beautiful and exciting, he thought, was the whirl of her white skirt as she flew up the steep stairs into the dark world of the salt-marshes! (Arnold Bennett: Last Love.)

Tradukoj devas atingi la subskribinton antaŭ la 10.3.45.

P.SCHWERIN. 1 Carabella Flats, McDougall St., Milson's Point, NSW.

---

## LINGVAJ NOTOJ.

B RAZILO AŬ BRAZILIO? Pri tiu landnomo Zamenhof en "Lingvaj Respondoj," N-ro 47 (1911) skribis:- "Se mi dum longa tempo uzadis Brazilujo, Ĉilujo k.t.p., mi konfesas nun, ke tio estas eraro. Ni povus diri Brazilo, Ĉilo, k.t.p., tamen mi ne konsilas tion fari, parte pro tio, ke per la Slavoj kaj la Germanoj, kiuj alkutimiĝis al Brazilia, Brazilion, Ĉiliec, la vortoj Brazilo, Ĉilo, ĉiam sonus kiel nomoj de popoloj, parte pro tio, ke la longatempe uzitaj formoj Brazilo, Ĉilo en la senco de popolo donus nun grandan konfuzon, se la samajn formojn ni uzus nun en la senco de lando. Sed tute oportune eviti samtempe ĉiujn tri malbonaĵojn ( t.e. eraron kontraŭkutimecon kaj konfuzon) ni povas tre bone, se ni de nun uzados por la diritaj landoj la formojn Brazilio, Ĉilio; kaj tiel mi konsilas agi." Tamen, malgraŭ tiu konsilo kaj la averto pri konfuzo, la koncernataj Sudamerik.Esp-istoj uzas Brazilo kiel sian landnomon, kaj ankaŭ uzas ĝin I.E.L. en sia jarlibro kaj eldonaĵoj.
Laŭ tiu konsilo de Zamenhof ni havas ankaŭ Meksikio (la lando), kaj Meksiko (la ĉefurbo).

ĈIUJ LA AMIKOJ.... En 1931 M.C.Butler skribis al mi "Mi scias, ke la lernolibroj, mia ankaŭ, konsilas diri ĉiuj musoj. Mi kopiis tion de miaj antaŭuloj. Tamen, Wm. Bailey (lingva Akademio) forte diras, ke tre ofte ĉiuj la estas bona kaj eĉ necesa, kaj tute logika. Ni dirus: ĉiuj tiuj musoj, kiuj....Nu, se la estas mallongigo de tiuj, ĉiuj la estas praviĝebla.

Ĉiuj musoj --- ĉiuj senescepte.
Ĉiuj la musoj (pri kiuj mi parolas) --- ĉiuj tiuj musoj.

La subskribinto ĵus rimarkis interesan linion en la Buljona Deklaracio: "tial la amikoj...ĉiuj grupiĝis." (tio egalas: tial ĉiuj la amikoj grupiĝis....). Legantoj studu la frazon per propraj okuloj.

F.R.B.

## LITERATURECA TRADUKO (1)

Sub tiu rubriko ni donos de temp' al tempo mallongan pecon de paralela traduko, por ke legantoj povu tuj kompari la du tekstojn kaj ekzerci la menson pri arto nefacila sed forte alloga.

Tradukante verkaĵon de pensemulo kia Powys, ni rimarkas la fakton, ke liaj vortoj ofte permesas diversajn redonojn, laŭ la diversaj konceptoj, kiujn havas la tradukantoj pri iliaj signifoj. En tiu rilato mi precipe atentigas pri "incorrigible","innocence", "articulated reconciliation", kiuj tie ĉi tre dubinde tradukiĝus per siaj "vortaraj" difinoj. Evidente estas, ke eĉ en lingvaĵo nomata "plain English" dense kuŝas dubsignifaj vortoj, dusencaj esprimoj, pri kiuj la legantoj povus longe disputi, kaj pri kiuj ofte ankaŭ la verkinto mem ne povus ilin klare difini, ĉar la vorto aŭ frazo generiĝis en la varma febro de efemera emocio anstataŭ en la vigliga aèro de preciza racio.

Nur per tradukado aŭ parafrazado, ni povas certigi al ni tion: ĉu aŭ ĉu ne ni perfekte kaj laŭvorte komprenas tiun aŭ tiun ĉi tekston el impona lingvaĵo. Tro ofte ni kontentiĝas per suprajaj impresoj, provizante al ni facilajn konjektojn por kompletigi la sencon.

Inter la legantoj do troviĝas iuj, kiuj komprenas la vortojn de Powys nesamsence ol la tradukinto. Tio estas komprenebla. Li prezentas du modestajn provojn al legantoj, esperante ke tiel li povos turni kelkies atenton al la misteraj rilatoj de la homa penso kun ĝia pervorta esprimo. Unua provo:-

"The Toilers of the Sea"

Victor Hugo is the greatest of all incorrigible romanticists. Something between a prophet, a charlatan, a rhetorician, and a spoiled child, he believes in God, in democracy, in innocence, in justice,and he has a noble and unqualified devotion to human heroism and the depths of the dangerous sea. He has that arbitrary, maniacal inventive imagination which is very rare except in children--and in spite of his theatrical gestures he has the power of conjuring up scenes of incredible beauty and terror.

"La Laboristoj de la Maro."

Victor Hugo estas la plej granda el ĉiuj pasiaj Romantikistoj. Estas en li iom de la karaktero de profeto, ĉarlatano, retoro, kaj trodorlotita infano; li kredas al Dio, en demokratio, en animpureco, en justeco, kaj havas noblan kaj senkondiĉan sindonemon al homa heroeco kaj la fundo de la danĝera maro. Krome li havas tiun arbitran, manian, elpenseman imagopovon, kiu estas posedata de tre malmultaj ekster la infanoj--kaj, malgraŭ siaj teatrecaj gestoj, la povon sorĉkrei scenojn de nekredeblaj beleco kaj teruro.

Dua provo en nia venonta numero.

----Tradukis F.R.BANHAM el "One Hundred Best Books")John Cowper Powys, Little Blue Books No.435)

---

## PREĜETO DE HUNG-SO-FAN.

Nokto mirinda, Luno magia, Parfumo jasmena,
Rave, ekstaze sonĝigu, mi petas, la Karulineton!
Estigu en ŝi, nerezisteble, la egan Sopiron
Min revidi, min ĉirkaŭbraki, kor-apud-kore!
Tiomege ardigu, ke mi ekaŭdos antaŭ Krepusko
la delikatan ŝian Frapeton sur mia Pordo!
Parfumo jasmena, Luno magia, Nokto mirinda,
Per ŝiaj Kisoj, tiel mi scios, ke Vi komplezis!

------------------------------------ JOEDIKO (Trad.)

## ŜTORMO SUR LA MONTETO.

Sabaton matene leviĝis ventego kiu eĉ la domegon skuis tiel ke ŝajnis fenestroj rompiĝos.

Kurioze la arboj, kiuj kovras la montosupron, ne defalis, pro tio ke ili estas kutimiĝintaj al la ventegoj kaj iliaj radikoj estas tiom firme establitaj en la krevoj de la grandaj rokegoj.

Malfrue en la tago la kondiĉoj iom mildiĝis, sed tuj alvenis granda nubo de ruĝa polvo kiu plenigis la valojn ĉirkaŭ la montego kaj aspektis kiel netravidebla nebulo. Tiu restis ĝis dimanĉo matene. Subite je la sesa matene alvenis kelkaj pezaj gutoj de pluvo, kaj post kelke da minutoj la tuta polva nubo malaperis---sterniĝinta sur la soifanta tero, kie antaŭ nur kelkaj horoj fontoj, kiuj neniam antaŭe ĉesis fluadi, baldaŭ removiĝis kaj provizis akvon por la soifanta bestaro.

La ŝanĝo en la aspekto de la pejzaĝo estas rimarkinda. Purigitaj estas la folioj, la floroj resaniĝas, la herbo denove verdiĝas, kaj la tuta naturo ŝajnas kanti dankajn himnojn al la Ĉiopova. Hodiaŭ la bildo antaŭ la domego estas eksterordinare belega. Ĉiu arbo kiu havas la sunon malantaŭ ĝi havas multajn intensajn kolorojn ---ruĝa, flava, bruna, skarlata, verda, intermiksiĝas kun blankaj floroj, dum malantaŭ la tuto reĝas centoj da mejloj da intense blual alpaj montoj. Vidaĵo kiu, unufoje vidita, neniam estos forgesebla.

La suno brilegas, la aero estas pura, la birdoj pepas feliĉe, kaj la sola bedaŭro estas, ke neniu krom la estraro kaj la servistaro povas resti pli longe ol du semajnoj, pro tio ke tiom multe da personoj tre deziras viziti ĉi tiun unikan kaj dezirindan sanigejon.

KAROLO THOMPSON.

Rimarko de la Redaktoro. Verŝajne la aŭtoro priskribas la veteron de Dec. 16, 1944, kiu estis terure malagrabla---polvo, fumo, varmego. Li donas impresojn de la vidpunkto de homo ferianta ĉe la plej fama gastejo monta en Viktorio, la Ŝtata ĉe Monto Buffalo.

---

## KASO de la RONDO.

Kvitancoj ricevitaj dum Januaro 1945:- Donaco de amikino £5. S-ro E.Stevens 6/-, S-ro Downes 5/-, S-ino Bach 6/-, S-ino Dougan 6/-, S-roj Ted Crawford 4/6, F.Halls 5/-, F.Pitt 6/-, Langham 6/-, F-ino O'Connor 6/-, S-ro Dwyer 5/-, Dr. MacLurkin (2 yrs) 10/-, S-ino Breakspear 6/-, S-ino J.Traill 5/-, S-ro J.Rose 5/-, F-ino Telfer 6/-, S-roj Szekfy 15/-, Rev. C.C.Cowling 5/-, S-roj Dudley 4/-, L.Fekonya 6/- (don 4/-) Leo Miller 5/-, D.C.Miller 5/-, A Saar 5/-, Rev. Father Gabriel Pausbeck 5/-, S-ino Grant (2 yrs) 10/-, W.Aus. Esp.Soc. 6/-, Brisbane Esp.Soc.6/-, ......£13.3.6.
Al la Generala Kaso £2.9.6. Al La Rondo £10.14.0.
Elspezoj £3.11.1 En la Kaso £4.10.3.

F-ino W.ADDIS, (kasistino) 25 Greville Ave., Flinders Park. S.Aus.

**Please notify the cashier immediately of any change of address and check your address with the year book.**

---

## KINAJ PESTOJ.

Inter tiaj estas la "cacklebug" (babilaĉinsekto), plejofte virino, kiu parolfluadas dum tuta filmo. Sekvas jene bona kuracilo, sed ĝi postulas kuraĝon en la aplikado: Diru en firma sed afabla tono, "Sinjorino, tio estas tretre interesa sed ne facile aŭdata. Bonvolu pli da voĉo! Kelkaj homoj fore en la antaŭa parto de la teatro ne povas vin aŭskulti."

Ankaŭ tiu, kiu botfrapadas la seĝon, plejofte viro aŭ knabo. Li pereu en la finfina loko de la nekuraceble malbonaj! El ĉiuj bestaĉaj, maldecaj porkoj, kiuj la kinojn ensvarmas kaj profanas, la seĝbatanto estas inter la plej malpuraĉaj, nepardoneblaj. Li estas brutaĉo sen moroj, cerbo aŭ socia sento. Tia fiporko faligas sian naŭzan korpaĉon rekte post la viktimo kaj tra la tute prezento, kun siaj genuoj krucitaj, li piedfrapas abomeninde la seĝdorson antaŭ si, per tio incitante ĝis mortigfrenezo ĝian okupanton. Se mi estus inter juĝantaro, kiam ĝi esploras homon, kiu strangolis seĝfrapinton, mi ne nur favorus honoran senkulpigon sed ankaŭ persvadus miajn kunulojn kolekti por li dankmonon. Sur tia diablo sidiĝus nenia sinrespektanta karnmuŝo, ĉar ĝi timus pri ptomaina veneniĝo. La nura kuracilo por tia bruto estas botelo frakasata sur la kranio. En efektive civilizita lando severe punitaj estus homoj, kiuj ne krakfrapis seĝbatulon je unua ekaŭdo. "The Argus", Melbourne, 15.7.44.

---------------------------- F.R.B . (Trad.)

Apud rivereto kampara bubo salutis fiŝanton el grandurbo: "Kiom vi kaptis, Sinjoro?" "Ankoraŭ neniom." "Ne tro malbone. Ulo fiŝis tie dum du semajnoj sed li ne kaptis pli ol vi havas post nur horduono."

Published by F.R.BANHAM, 2 Banchory St., Essendon, W5, VIC.

OFICIALA ORGANO DE LA AUSTRALIA ESPERANTO ASOCIO

# LA RONDO

## THE AUSTRALIAN ESPERANTO MONTHLY

ELDONITA DE F.R. BANHAM.
2 BANCHORY ST. ESSENDON W.5
VICTORIA AUSTRALIA.

VOL. 5 No. 6

Mch 1945.

# L A R O N D O.

Lingve kontrolas F.R.BANHAM,
2 Banchory St., Essendon, W5 VIC.
ooo
Enhave aranĝas F-ino L.E. BAILEY,
18 Sherbourne Rd., Medindie Gdns., Adelaide, S.AUS.
---ooooo---

## LA TEKSILO DE LINGVAĴO.

Recenzo, de Wilhelm Solzbacher, Ph.D., pri la libro "The Loom of Language," de Frederick Bodmer, Lancelot Hogben, Editor.

Tradukis el The American Esperantist, Nov.-Dec. 1944, Pastro Gabrielo Pausback, O. Carm.

Multaj personoj aĉetis The Loom of Language (vidu American Esperantist, Majo-Junio 1944); mi tamen volus scii, kiom da ili ĝin finlegis? Ĝi serĉas al tiuj kiuj jam per la vivo studis la lingvojn, sed ĝi certe ne plenumas la promesojn de la aŭtoro rilate al komencantoj: "Multaj homoj kiuj havas malgrandan aŭ ankaŭ neniun scion de strangaj lingvoj volus havi plu; kaj multaj studus tiajn lingvojn se ili ne senkuraĝiĝus pro la tre malgravaj rezultoj kiujn alportas jaroj da studo ĉe lernejo aŭ ĉe universitato. Unu celo de The Loom of Language estas montri ke fakte ne ekzistas efektive necese senkuraĝiĝi." Mi mem estas certega ke 99% de la lingvaj novicoj kiuj prenas en mano The Loom of Language venos al kontraŭa konkludo. Se ili atingas eĉ al paĝo 30 ili sen dubeto respondos al S-ro Bodmer: "La leganto kiu serĉas libron spritan por litlegado faros bone ne preni ĉi tiun....aŭ trinku almenaŭ unu "de antikve" ("old-fashioned," t.e., la trinkaĵo alkohola) antaŭ ol li komencos legi."

Tiu gazeto (The American Esperantist) jam elmontris ke "la argumento por artefarita interlingvo estas bone prezentita" en la libro. Tamen la fiorega kritiko de ĉi ties aŭtoro pri Esperanto apenaŭ konvinkos iun kiu jam studis serioze la strukturon de tiu "ĉefverko de logiko kaj simpleco," kiel nomis le genian interlingvon de Zamenhof dudek sep membroj de la Franca Akademio de Sciencoj. La kritiko pri Esperanto en The Loom povas reduktiĝi ĝis kvin argumentoj. Mallonge ni ekzamenu ĉiujn :-

(1) "Se persono ne estas manĝegulo, ĝardenkultivulo aŭ ornitologo, estas malfacile vidi kial vortlibro Angla-Esperanta de 36 paĝoj devas enhavi tiajn esprimojn kiaj <u>artichoke</u>---artiŝoko; <u>artichoke</u> (Jerusalem)---helianto; <u>nightshade</u> (deadly)---beladono; <u>nightshade</u> (woody)---dolĉamaro.....La "Ŝlosilo al Esperanto" ankoraŭ pli precizeme specialigas, listante <u>kiso</u>---kiss, kaj <u>ŝmaco</u>---noisy kiss.

Se mi shake botelon, Esperanto diras skui sed se mi shake la manon de amiko, ĝi diras manpremi."

Respondo: Tiu kritiko koncernas ne tiom la lingvon kiom ĝiajn lernlibrojn, "ŝlosilojn" k.t.p. Mi konfesas ke en dudek du jaroj de vasta uzado de Esperanto mi neniam uzis ŝmaco, beladonosaŭ dolĉamaro, kaj ke mi ne povus klarigi en iu ajn lingvo la malsamon inter la du specoj de nightshade. Malsame ol Basika Angla, kiu ne havas vortojn por aĉeti kaj vendi, kaj por piroj, persikoj kaj prunoj, Esperanto estas kompleta lingvo kun unu preciza vorto por ĉiu objekto. Ne necesas, tamen, instrui lernantojn je vortoj kiujn ili neniam devos uzi; la ordinaraj Esperantaj ŝlosiloj saĝe povus moderniĝi. Ili estas ja perfektaj je la aspekto logika; sed la logiko ne estas posedo ĉefa de la ordinara homo. La ŝlosiloj do devas inkliniĝi al la principoj de amasa psikologio. Ili povus forlasi vortojn ne uzitajn en ĉiutaga vivo kaj listi anstataŭ kelke de kombinitaj. Plue, Esperantaj vortoj devas skribiĝi kun siaj finaĵoj, ĉar la homoj estas ja maliaboremaj!

Pri la shaking hands S-ro Bodmer scias ke tiu estas tipa Anglaĵo. Oni povu uzi la vorton samsignifan en lingvo Franca (secouer aŭ ebranler) kaj vidu kiel ridinde ĝi sonas.

(2) "Por dog oni nature atendas kano (cane en Itala lingvo, cao en Portugala, chien en Franca) respondanta al nia adjektivo canine. Respekte al sentimento Germana kaj Skandinava, tamen, la vorto estas hundo.....Unu el la plej internaciaj vortoj en ĉiutaga lingvaĵo estas school (Latine schola, Itale scuola, Germane Schule, Svede skola). Zamenhof elektis lernejo."

Respondo: Kial oni devas "nature atendi kano por dog?" La Esperanta vorto kano respondas al Angla cane, Franca canne, Hispana cana, Itala canna. La Esperanta vorto hundo, plue, respondas al Angla hound, Germana Hund, Dana Hund, Nederlanda hond. Kial devas Franco trovi pli malfacile pensasocii kano kun chien ol kun canne? La vorto skolo, cetere, ekzistas en Esperanto kun la signifo de skolo de penso aŭ skolo de arto. Zamenhof ne elektis lernejo, sed li ja elektis lerni por to learn, respondante al la verbo, kiel ekzistas en la Angla, Germana, Nederlanda, Dana, Sveda, Norvega kaj Islanda lingvoj. Lernejo (loko por lerni) estas vorto derivita kaj tuj komprenebla al ĉiu kiu scias la Esperantajn sufiksojn. Krome, se estus neceso, skolo povus uziĝi laŭ Regulo 15 de la Fundamento.

(3) "Sesono ne signifas season, kiel ni povus supozi. Ĝi signifas one-sixth. Tiel ankaŭ fosilo signifas spade kaj ne fossil. Ankaŭ la nutraĵo amela nomita sago ne evitis vundegon. Ĝia propra nomo ŝanĝiĝis al saguo, supoze ĉar sago (Latine sagitta) necesis por signifi Esperantan arrow."

Respondo: Season estas en Esperanto sezono. Estas vere ke sesono (ses--six; on---sufikso signanta frakcion) signifas one-sixth. Sed en Esperanto samsonoj kiel sesono kaj sezono ne venas ofte ol en iu natura lingvo. Kiam tiaj samsonoj okazas, kiel en

tiu kazo, ili certe ne povas konsideriĝi kiel serioza malfacilaĵo.

Estas malfacile kredi ke la stulta rimarko pri *sago* venas de sperta lingvisto. La originala enlanda nomo (en lingvoj Papua, Malaja kaj Java) de la nutraĵo amela, kaj palmo de kiu ĝi devenas, estas *sagu*; France estas *sagou* kaj Hispane, *sagu*. Ĉu povis D-ro Zamenhof elekti radikon pli korektan ol *saguo* (la -o estas la finaĵo)? La vorto *sago* en la Angla kaj Germana estas ja la formo "Vundegata."

Ĉar *il-* signifas *instrument* kaj *fos-* estas radiko kun signifo *to dig* la Esperanta *fosilo* certe diras *spade*. *Fossil* Esperanto estas *fosilio* (Lat. *fossilia*). Ĉiu Esperantisto bone scias la sufikson *il-*; tial la atendebleco interŝanĝi *fosilo* kaj *fosilio* ne estas granda.

Kelkaj kritikantoj konsideras Esperantan tekston de la vidpunkto de tuja komprenebleco por poliglotoj kiuj ne studis la Esperantan gramatikon kaj la regulojn por la formado de vortoj. Tiun tujan komprenebleco ni ne pretendas por Esperanto. Facileco de legado, de skribado kaj de parolado, ne nur por poliglotoj sed por ĉiuj, **post** studado de la dek ses reguloj gramatikaj kaj de la tridek sep sufiksoj kaj prefiksoj---tio estas la kriterio. Kaj en tiu rilato Esperanto estas nepre senegala kaj supera je ĉiuj naciaj lingvoj, "basikaj" projektoj kaj kia ajn alia konsidereblâjo.

Bodmer asertas ke kelkaj Esperantaj vortoj, kiel *nacio* (nation) kaj *kafo* (coffee), estas "distorditaj." Fonetika literumado ja faras iom da tiaj "distordoj" neeviteblaj (Vidu kiel kelkaj vortoj skribiĝas Hispane kaj Itale!). Sed kion ni devas diri pri Kataluna *nacio*, Nederlanda *natie*, Rusa *nacja*, Bulgara *nacja*, Portugala *nacao*? Kion diri pri Germana *Kaffee*, Rusa *kofe*, Dana *Kaffe*, Pola *kawa*?

(4) Bodmer kredas ke la pluralo ne devas esti deviga; ankaŭ ke la akuzativo neniel devas esti. Neniu lingvo, ni respondas, povas uziĝi sen la pluralo. Krom se oni aldonas al ĉiu vorto ciferon (unu, du, kelkaj, multaj) aŭ formas pluralon per ripeto (hundo- unu hundo; hundo hundo - kelkaj hundoj), oni bezonas pluralon. Kiam oni aldonas ciferon, la pluralo ne estas ja necesa de la vidpunkto de logiko. Sed ĉu estus pli facila tia lingvo kiu uzus la pluralon iufoje kaj ne alifoje? Estas same facile kompreni (kaj ankaŭ tiel neprecize) la Esperantan *du hundo* kiel la Anglan *two dog*. Ne estas tamen, pli malfacile diri *du hundoj* kaj *two dogs* se la lernado de pluralo estas ja deviga.

Verdire, nespertaj Esperantistoj el la Angle-parolantaj kaj Latinaj landoj kelkfoje eraras en la uzo de la akuzativo, malgraŭ ke en ĉiuj okcidentaj lingvoj restas ankoraŭ iaj transvivintaj signoj de la akuzativo (en Angla *I* kaj *me*, *he* kaj *him*, *they* kaj *them*), kaj ĉiam estas personoj kiuj neniam lernas kiel korekte uzi who kaj whom. La akuzativo Esperanta havas grandajn avantaĝojn, en tiu speciale, ke ĝi faras ebla al la homoj kutimaj al lingvoj kiuj uzas alian vortordon la kapablon esprimi sin ĝuste, eĉ kiam ili tradukas laŭvorte el siaj propraj lingvoj. Kiam Usonano aŭ Hispano iufoje forgesas la akuzativon en Esperanto, tio ne malhelpas komprenon.

Post sporto li uzos la akutizavon senkonscie.

(5) Lancelot Hogben kredas ke "intervortlibro" devas enhavi pli-multe da Grekaj vortoj ol oni uzas en Esperanto. Li montras ke, pli kaj pli, sciencaj kaj teknikaj vortoj de Greka deveno eniras la hodiaŭajn lingvojn. Kompreneble, ĉiuj Grekaj vortoj internacie uzataj estas akceptitaj en Esperanton preskaŭ senŝanĝe: ekz-e, termometro, fotografi, geografio, kromosomo, biologio, televizio, pseŭdonimo, mikrofono. Hogben eraras, tamen, se li kredas ke la ordinara persono havas iun ajn ideon pri la signifo de la bazaj radikoj Grekaj. Ĉiu paroladas facile pri paragraphs kaj paratroopers, sed kiu scias ke para signifas ĉirkaŭ aŭ por? Ĉiu scias apostle kaj Apocalypse, sed neniu pensas ke apo signifas de. Tele signifas malproksime, kaj graphein, skribi. Tamen telegrafi tute ne estas "skribi al persono malproksime loĝanta." Elektrajoj ne fariĝas el sukceno, kiel la ... Greka vorto elmontrus; paragrafo ne estas simple "io ĉirkaŭskribita"; geologio ne estas "io dirita pri la tero." Terminoj teknikaj estas vortoj artefaritaj kiuj ricevas sian signifon, ne de la Greka etimologio, sed dank' al scienca difino pri kiu la klerulaj konsentas. La kialo por preferi Grekajn radikojn estas ĝuste tio: elekti elementojn kiuj ne estas en ĝenerala uzado kaj tial ne havas iujn antaŭfiksiĝintajn signifojn.

Kritikinte Esperanton, The Loom of Language ne starigis eĉ unu argumenton kiu povas kontraŭstari provon de analizo kritika. Esperanto estas lingvo vivanta. Ĝia gramatika strukturo kaj baza vortaro troviĝis prava kaj sufiĉa dum kvindek jaroj de uzado tra la tuta mondo. Ĝia vortaro evoluas senĉese laŭ modernaj bezonoj, kaj ŝanĝoj pli-malpli gravaj obliĝas laŭ la reguloj de la Fundamento. Ne necesas ke iu refaru la laboron de D-ro Zamenhof.

Fine, The Loom of Language diras (p.448): "Al multaj homoj la... vortoj internacia lingvo aŭ monda helplingvo estas sinonimaj kun Esperanto." Do, D-ro Bodmer, kial ne konfesi ke estas bonaj kialoj por tio?

........................

Remarko de la Redaktoro: Legantoj kiuj ricevas la British Esperantist povas kompari ties recenzon.

---

## ALDONE AL "THE LOOM OF LANGUAGE."

Pritraktante Esperanton, la aŭtoro erare asertas, ke en Esp-o ne trovas sin litero V. Tiu eraro kondukis lin dufoje uzi "linguo" sur p.467. Tiupaĝe, en la trilinia "ekzemplo" de Esperantaĵo, li faras ses erarojn: nome, "filosofo, linguo, dezirebla (dezirinda), komunicado, de lando al alia (de unu lando al alia). P.464 "amote" devus esti "amota"; p.498 "difora" (diferenca). La Esperanta "kuglo" havas sencon de la Germana Kugel uzata pripafilo (bullet, shot, ball), ne en ĉi ties senco de "sfero, globo." P.464 li asertas, ke estas en Esp-o "about 50 derivative prefixes, suffixes and infixes," sed p.467

"six profixes and 22 suffixes." Kio estas la 22 "infixes?" P.465 la aŭtoro, S-ro Bodmer, nomas bo- "a whim of Dr. Zamenhof himself" (kapricanĵo de D-ro Z. mem). Tia ĝi certe ne estas. Ĉu efektive Bodmer ne rekonas en ĝi la Francan beau- uzata prefikse, kiel ĉe "beaux-parents," "beau-pere?" Verdire, malmultaj se eĉ iuj el la Esp-aj afiksoj estas arbitre aŭ fantazie elektitaj.

P. 462, dirante, ke Ĥ estas malfacile prononceble de homoj Latinidlingvaj, B odmer ignoras la fakton, ke Hispano-parolantoj havas la gorĝan J, kiel en "mujer", "Jose".

P, 460 li skribis, ke la aŭtoro de IDO estis Louis de Beaufront. Mi forte dubas. La Occidentalisroj en 1938, post zorga ekzamenado d e dokumentoj, trovis multe da atesto indike al tio, ke Couturat cerbe naskis ĝin. Tion neniu ĝis nun refutis.

Fine, kiel povis lingvisto skribi (p. 484) "straight-jacket" anstataŭ "strait-jacket?"

-------------------------------------- F.R.BANHAM.

## LA KAMARADO.

(Kvar scenoj el militista vivo).

Originalaĵo de C.J.CALDERA. Premiita verkaĵo en la konkurso aranĝits de la Melburna Esperanta Rondevuo, 1944.

SCENO UNUA. Tendo en milita tendaro; du pajlaj matracoj sur ligna planko. Soldato elrampas el sub kovriloj, frotante al si la okulojn; poste, rigardas al kunulo, kiu laŭte ronkas; li antaŭpaŝas al la dormanto kaj lin skuegas ĉe la ŝultro, ĝis li malfermas la okulojn por rigardi kun kvazaŭ stulta esprimo al la ĝenanto.

"Kio okazas?"

"Jam la trumpisto forblovis la pulmojn! Ni ellitiĝu, Vilĉjo, se vi ne volas, ke la serĝento nin punu."

"Vi pravas, Tomĉoj; mi tute ne aŭdis la trumpetadon kaj, sen via zorgo, mi ankoraŭ dormus! Ve! Mia kapo doloras, la buŝaĉo gustas amare."

"Mi tute ne miras! Vi revenis hejmen en profunda nokto, ebriega, laŭkutime. Mi tute ne scias, kiel vi povas toleri ĝin, tagon post tago, sen malsaniĝo. Sendube vi estas fortika kiel leono, sed, permesu, ke mi diru al vi, ke ankaŭ la ŝtalo pro troa streĉado fine rompiĝas! Vi scias, ke mi ne havas kontraŭ-alkoholan antaŭjuĝon; mi mem iafoje ĝuas trinketon da biero aŭ da vino, sed neniam mi perdis la regpovon kaj, sekve, mi neniam ebriiĝis. Se vi daŭros tiel sendube vi ruinigos viajn sanon kaj estontecon. Ĉiuj oficiroj jam vin malestimas pro tio, sed ili malpravas, ĉar mi vin bone konas kaj scias kian koron vi havas, kaj malgraŭ via ronkado kaj daŭra ebrieco, mi ne volus ŝanĝi tendkunulon. Vi estas al mi malfermita libro, en kiu mi legas la bonon kaj malbonon. Verdire, neniu malbona en ĝi sin trovas, nur...amemo al drinkado! Kial vi ne penas eviti la kunestón de tiuj friponoj de la alia tendo, kiuj ĝojas del-

agi vin al ebrieco ĉiunokte? Mi bedaŭras, ke mi devas iri domen ĉiuvespere, ĉar mi volonte restus kun vi, por vin dekutimigi de tiu malbela pasio. Promesu al mi, ke hodiaŭ vespere, vi iros al la kinejo anstataŭ eniri la hotelan trinkejon."

"Via prediko estas tute kiel mia patrino mem povus fari al mi, sed mi konsentas, ke vi pravas kaj viajn vortojn diktas la koro. Mi estas sentaŭgulo, sed kion fari? Ĝi estas malbona kutimo, kiun mi akiris depost la komenciĝo de ĉi tiu malbenita milito. Vi scias, ke mi malamas la militistan vivon, sed mi estis devigita servi, kaj por droni mian animribelon mi devas drinki; tio donas al mi forgeson, laŭ mia bezono. Pri la opinio de la diablaj oficiroj, mi tute ne zorgas; ili min ne ŝatas, ĉar ili komprenas, ke mi estas dinamita kartoĉo, kiun ili devas tuŝi tre singardeme. Vi estas bonulo, kaj mi vin dankas pro via interesuĝi."

"Ni rapidu, la aliaj jam revenas de la ŝprucbano!"

SCENA DUA. Sama tendo post semajno, je la deka vespere. Ambaŭ soldatoj kuŝas interparolante mallaŭtvoĉe.

"Kial vi forlasis la hejmon tiel frue, Tomĉjo?"

"Kara Vilĉjo, mi devis eliri el la domo frue, por ne ekciti la nervojn de la edzino. Ŝi estas ĉiam bonega, sed post kelkaj semajnoj ŝi aspektas malsana; ŝi malgrasiĝis kaj paliĝis kaj ŝiaj nervoj estas tre ŝtreĉitaj. Ŝi devas zorgi, sola, pri la tri infanoj kaj la du knaboj, de post mia foresto de la hejmo,fariĝis iom malobeemaj kaj malfacile disciplineblaj; aldone, la servo ĉe la Ruĝa Kruco al kiu ŝi aliĝis, devigas sin labori pli ol la fortoj permesas, kaj nun ŝi havas nervolaciĝon. Hodiaŭ mi parolis pri ne gravaj aferoj rilate al la domo kaj esprimis mian vidpunkton tute afable; ŝi havis nervatakon kaj ekploris, singultis, tute senkaŭze. La situacio estis iom delikhta; mi penis ŝin konsoli, sed la afero pli malboniĝis kaj sekve mi opiniis, ke la plej taŭga rimedo estis anonci al ŝi, ke mi havis pli mallongan forpermeson ol kutiman, kaj mi revenis. Mi ĝuas, ke vi estas ĉi tie por interparoli kun mi."

"Mi vidas, ke ankaŭ la edza vivo ne estas tute rozkolora, kiel mi iafoje supozis!"

"Certe, ne ĉiam oni povas ŝerci kaj ridi, sed en tiu ĉi okazo, mi ne rajtas kulpigi la edzinon pro ŝia konduto, ĉar mi konstatas, ke la kaŭzo estas nervmalsano; sendube, mi ĉagreniĝis, ĉar mi antaŭ vidis la neceson ŝin forsendi el la kutima ĉirkaŭaĵo por libertempi iaĺoke, kaj mi ankaŭ scias, ke ŝi rifuzos iri pro la infanoj, kiuj devas ĉeesti la lernejon, kaj pro la milita kromlaboro ĉe la Ruĝa Kruco, kiu vere estas la kaŭzo de la malsaniĝo; ĝi estis la lasta guto en la glason, kiu kaŭzis la forverŝadon! Kia miksaĵo!"

"Vi pravas, sed, se vi intencas paroli nur pri ĉagrenoj, estas pli oportune, ke ni dormu, almenaŭ tiel vi forgesos, se nur vi ne sonĝos pri ili! Mi vin deziras bonan nokton!"

SCENO TRIA. Matene, je la deka. Vilĉjo promenas sencele sur la razeno antaŭ la dometo de la stabo, finfininte la matenan ekzercadon. El la staboficejo foriras Tomĉjo, kiu marŝas antaŭen kun vitrecaj okuloj larĝe malfermitaj, kiel viro kiu ĵus ricevis timigan
novaĵon.

"Tomĉjo, kio estas al vi? Vi aspektas kiel somnambulo! Ĉu vi min ne vidas?"

"Ho, jes, mi estis distrita kaj pripensis aferojn."

"Kion do? Ĉu vi ricevis gravajn informojn, telefone, pri la sano de la edzino?"

"Ne, Vilĉjo, temas pri mia forsendo al la batallinio."

"Ne ŝercu, kun via edzino malsana, tio ja, tute ne povas okazi, vi nur devas paroli malkaŝe al la kapitano, li mem estas edzo, kaj bone komprenos vian situacion. Li anstataŭigos vin per alia soldato."

"Jes, sed la afero ne estas tiel simpla. Unue, kion oni opinius pri mi, se mi penos eviti la plenumon de mia devo? Ĉiuj, oficiroj kaj soldatoj, kredus min malkuraĝa kaj mian privatan kialon konsiderus nur kiel pretekston; vi bone scias, kiom ofte similan trompajon oni penas fari. Duo, la edzino estas tre patriotema kaj ŝi mem konsiderus min 'flavulo' por uzi nian jargonon rilate al malkuraĝulo. Ŝi neniam komprenus, ke mi tion farus nur por ŝin helpi, kaj tian malfavoran juĝon de la edzino, mi tute ne povus toleri. Pro tio, mi devas suferi la sekvojn de mia maloportuna translokiĝo; mi klopodos interesigi amikan familion, por ke oni bone zorgu la edzinon dum mia foresto. Fine, ĉu vi opinias, ke mi konsentus peti, ke oni min lasu hejme, kiam mi scias, ke ne irante, alian viron oni sendos anstataŭ mi; se, hazarde, li mortus aŭ kripliĝus, mi sentus la respondecon de tiu dum mia tuta vivo, kiel krimo premanta sur mia konscienco. Tute neeble! Ĝis la revido; mi iros al la provizejo."

SCENO KVARA. Post semajno, sur la sama loko, kunvenas la soldatoj de la plotono, kiu devas forlasi por iri al la fronto post du horoj. Vilĉjo marŝetas iom nerveme flanke de Tomĉjo, kiu portas batalūniformon, preta por foriri; li havas malĝojan vizaĝon. La kapitano alvenas kun nomlisto en la mano kaj komencas alvoki la soldatojn, kiuj kolektiĝas vice antaŭ li, kaj kun ĝenerala surprizo, la nomo de Vilĉjo, kiu ne havas batalūniformon, sin trovas en la listo, sed mankas en ĝi la nomo de Tomĉjo. Vilĉjo enviciĝas kun radia vizaĝo, lia rideto similis al la ruza rideto de sukcesa trompisto. Lia sinofero kaj la sekreta interparolado kun la kapitano trafis la celon!

Kiam la afero finiĝis, Tomĉjo prezentis sin al la kapitano, petante klarigojn, sed li akceptis lin kun senesprima rigardo kaj respondis:

"Draroj ja povas okazi ĉie, eĉ en la staboficejo, kaj, memoru, oni ne diskutas ordonojn en la armeo!"

---

STRANGA SONĜO. (Otto Jespersen)

Antaŭ ol kuŝiĝi, mi estis dum duonhoro foliuminta la lastan numeron de 'Progreso', kun diskuto pri la finaĵoj ABIS aŭ AVIS por kunmetataj tempoj de la verbo. Mi estis ridetinta kiam mi legis la rimarkon ke AB estas pli bona ol AV, ĉar multaj, precipe la nigruloj, ne povas prononci V; mi sciis ja tre bone ke en ĉiuj Amerikaj rakont-

oj oni prezentis ilin dirantaj LIB kaj LUB anstataŭ LIVE kaj LOVE; sed male mi aŭdis en Usono multajn nigrulojn prononci tiujn vortojn korekte, kaj mi sciis ke la sono V ekzistas en multaj afrikaj lingvoj. Tiam mi subite vidis ke alia faris la rimarkon ke, ĉar multaj prononcas pli facile AV ol AB, oni devus ne plu heziti por adopti AV por la kunmetataj tempoj. Tiam mi ne plu ridetis, mi vere ridis; mi kuŝiĝis kaj ekdormis.

En sonĝo mi vidis iun grandas tribunalon internacian. Sur majesta trono sidis Lia Moŝto Sinjoro Akademio, vestita en belaj roboj d e juĝisto. Antaŭ li staris multekolora amaso, kiuj evidente venis el ĉiuj mondpartoj. La juĝisto petis silenton kaj parolis.

"Mi kunvokis vin, karaj amikoj, por aŭdi viajn opiniojn kaj konsilojn, laŭ la principo ke mi ne volas decidi pri ĉi-tia afero antaŭ ol aŭdi ĉion kion oni povas diri por kaj kontraŭ. Mi mem opinias ke la formo SKRIBAR estas tre bona kaj jam estas internacie konata por esti akceptata en nian lingvon. Sed eble kelkaj el vi havas aliajn proponojn kaj mi invitas vin d iskuti la aferon, tiam mi provos, se estos eble, kontentigi vin ĉiujn. Do, parolu libere."

Don Ranudo de Colibrados parolis unue. Malgraŭ liaj iom uzitaj kaj ne tre modaj vestajoj, lia aspekto estis vere aŭtokrata kaj inspiris respekton. Li diris--

Sinjoro Juĝisto, mi estas el granda nobilia familio de Kastiljo kaj nia lingvo estas parolata de multaj milionoj kaj en Eŭropo kaj en Ameriko. Nu, en mia lingvo la vorto kiun mi devas pridiskuti estas 'Escribir', sed ni havas grandan malfacilon prononci B. en la sama maniero kiel ekzemple la Angloj kaj Francoj; ni diras preskaŭ "Escrivir'. Vi scias ke antaŭe oni faris ŝercon kontraŭ ni en latina pro la prononco de B: 'Felices quibus bibere est vivere' (Feliĉaj tiuj por kiuj drinki estas vivi) sed mi volas nur aserti ke laŭ mia opinio estus multe pli facile kaj bone aboli la malfacilan sonon B kaj anstataŭigi ĉie V."

Tuj Onklo Sam kuris antaŭen kaj kun grandaj gestoj de brakoj kaj manoj, kio faris grandan kontraston al la trankvila digno de Don Ranudo, li kriis--

"Ne, Mastro 'Kademi', mi protestas. V ne estas facila; B multe pli facila por la plejmulto, tio estas por la neblankuloj. Vi devas esti senpartia, Mastro 'Kademi', kaj ne fari ĉion por la blankuloj sole. Mi ne pobas prononci tiun literaĉon kaj mi ne deziras lerni ĝin, hej!" La juĝisto leviĝis kaj diris--

"Feliĉe mi havas simplan rimedon por kontentigi la du honorindajn parolintojn: mi tute eligis la literon kaj diras SKRIAR anstataŭ SKRIBAR."

Tiam juna finlandano klinis sin profunde kaj diris:

"Mi havas grandan admiron por via saĝeco, Sinjoro Juĝisto, kaj aprobas vian decidon, tiom pli volonte ĉar en mia patra lingvo ni ne B kaj pro tio la formo provizore elektita nun tute plaĉas al mi. Sed mi kredas ke vi devas iri pluen. Mia lingvo estas juste konsiderata kiel unu el la plej sonoraj kaj harmoniaj, kaj la kialo estas simple ke ni havas pli malmulte da konsonant-grupojn ol la plimulto

de aliaj lingvoj. Ni ne toleras tian barbaran kombinon kian SKR en la komenco de vortoj; kiel el la sveda vorto 'skräddare' ni faras 'räätäri'. Ĉu tio ne estas grava simpligo? La hungaroj certe subtenas mian proponon por aboli ĉiujn tiajn nefacilajn grupojn."

"Bonege! Ĉiuj simpligoj restu! Tial ni ne diru RIAR anstataŭ SKRIAR anstataŭ SKRIBAR."

Ĉino provis kelkfoje kapti la okulon de la juĝisto. Nun li sukcesis kaj diris--

"Certe ni ĉiuj devas esti dankemaj pro la granda afablo kaj justeco de Sinjoro Akdemio. Mi vidis kun granda ĝojo ke sub aliaj manoj la lingvo proksimiĝis al la mallongeco kiu karakterizas la plej bonajn el la naturaj lingvoj, nome la unusilabaj orient-aziaj lingvoj. Sed via lingvo havas ankoraŭ unu grandan difekton, kiu estas pli surpriziga ĉar Sinjoro Schleyer, aŭ pli bone Schleyel---benu lian memoron pro la L---jam montris la bonan vojon kiun ni devas sekvi. Li aŭdis ke ni Ĉinoj ne povas prononci la literon R, do li anstataŭis regule R per L. Ĉar, por esti vera mondlingvo, la lingvo devas ankaŭ plaĉi al la flavaj rasoj."

"Ni ĉiuj respektas vian malnovan civilizon," diris la juĝisto, "kaj ni estas feliĉaj por konsideri vian deziron, tial ni diros LIAL. La justeco devas esti blinda."

"Jes, vi devas esti blinda," interrompis senpacience juna, vigla Japano, "se vi ne vidas ke mi ankaŭ apartenas al flava raso kaj ke mia juna civilizo estas almenaŭ tiel bona kiel la lia. Ni Japanoj ne havas L en nia lingvo. Se vi volas esti senpartia, vi ne devas preferi lin al mi. La L estas abolenda!" La juĝisto diris--

"Malgraŭ la ne tute ĝentila formo de la lasta rimarko, mi sentas ke en la nomo de egaleco kiel juĝisto, mi devas konsideri ankaŭ la argumentojn de nia juna amiko. Tial mi proklamas kiel rezulto de ĉi-tiuj tre interesaj diskutoj ke la sola formo adoptenda anstataŭ SKRIBAR estas la tre simpla kaj facila IA. Per ĉi-tiu decido mi certas ke vi ĉiuj kontentiĝas."

Jes, ĉiuj azenoj! Neniu povis aŭdi el kie la vortoj venis. Sed tuj oni aŭdis teruran bruon de milvoĉa ĥoro de azenoj, dum ĉiuj kriis: "IA,IA,IA,IA," tiel laŭte ke mi subite vekiĝis el mia dormo.

---------------------------------------F.A.PITT (trad.)

## ASOCIAJ AFEROJ.

ESP-O EN PERTH LERNEJO. Rezulte de la penoj de nia fervora samideano en Perth, D-ro C.J.Caldera, kaj la membroj de Western Aust. League la estroj de edukado en Perth donis permeson por Esp. kurso en Perth Technical College. La kurson gvidos S-ro David Miller B.A., D.B.E.A., membro de W.A.E.L. La tieaj samideanoj faros ĉion eblan por disvastigi la novaĵon pri la kurso en Perth kaj sukcesigi ĝin. Niajn elkorajn gratulojn al la gefratoj en la okcidenta--ilia lampo estu signallumo al la esperantistaro en ĉiu landparto. Ni esperas ricevi temp-al-tempan novaĵon pri la progreso kaj sukceso de la kurso.

PROPAGANDO. Pli kaj pli oni rimarkas kaj akceptas la okazojn por antaŭenigi nian aferon, kiuj muntempe sin prezentas. Estas grave, ke ĉiu membro klopodu pri propagando, kaj permesu eĉ ne unu okazon forgliti senuzita. Sed eĉ tio ne sufiĉos. Ni devos studi la metodojn de la reklamistoj, lerni la propagandan arton, kaj certigi al ni, ke niaj laboroj plej bone efikos. En lastatempa numero de "British Esp." aperis artikolo pri propagandaj metodoj, kaj ni esperas prezenti al niaj legantoj en baldaŭa numero valorajn eltirajojn el ĝi.

EKZAMENOJ. Ni denove memorigas legantojn pri la ebleco partopreni ekzamenojn kaj per tio pruvi la kapablecon, altigi la stilon. Estas ekzamenoj por la nove-lerninto, kiel ankaŭ por la progresinto. Plenaj detaloj en la Jarlibro. Ĉiu membro prenu al si la personan celon diplomiĝi antaŭ ol la militfino. Kiam la laboro de propagandistoj altiros interesitojn, ni estu pretaj por instrui ilin.

KOTIZO. La kotizo estas 6/-, kiu sumo enhavas la abonprezon al la oficiala organo, LA RONDO. Bonvolu renovigi vian kotizon frue kaj malŝpari al la kasistino la tedan laboron resendi avizon pri kotizo ŝuldita sed ne pagita. Ni admonas ĉiun leganton, kies cirkonstancoj permesos, subteni la movadon per individua membreco.

STATISTIKA CELO. Memoru nian tujan celon---200 individuajn membrojn en 1945. Se ĉiu grupo povus varbi 10 membrojn, ni tuj atingos kaj pasos la celon.

-----------------------------------G.H.HILLERMEN (Sek.)
15 Morrice St., Lane Cove, N.S.W.

KASO DE LA RONDO.
S-ino Mumford don. 10/-; F-ino Curtis 6/-; S-ro H.Byatt 6/-; S-ino Hales 5/-; S-ino Freeman 6/-; S-ro V.B.Moore 6/-; Ges-roj Couche 12/-; Deaconess Magarey 6/-; Lieut. Towsey, 6/-; S-ro T.Porter 6/-; S-ro M.Noske 6/-; F-ino A Hollow 6/-; Syd.Esp.Soc. 6/-; D-ro Caldera 2/-;......£4-9-0. Al la Generala Kaso £1-4-0. Al LA RONDO £3-5-0, Elspezoj £3-18-4. Cash in hand £3-16-11

W.ADDIS, (Kasistino) 25 Greville Ave., Flinders Park, S.AUS.

Adress wanted. Does anyone know the present address of S-ro L.R. Roberts, late of the 41st. Batt., also Pte Allmand of the 4th Aus. Field Amd., and Pte Hatfield, A.I.F. Please write to the cashier if you can give any information concerning these samideanoj.

-------------------------------------------

KVINSLANDO. Lastatempe s-ro E.G.Littleton kaj s-ro Fred Gillespie demonstraciis en dialogo la valoron de brodkastado kiel ilo por dissemi konojn pri Esperanto. S-ro Littleton, unu el la propagandaj sekretarioj de A.E.A., estas ankaŭ bonekonata radiisto, ĉar li iam oficis en la komerca stacio 4QG Brisbano kaj ofte paroladas je la naciaj stacioj. La temo estis: Internacia Lingvo por la Postmilita Mondo. S-ro L. Diris, ke en Esperanto, lingvo elteninta ĉiajn pruvojn, li korespondis kun homoj en preskaŭ ĉiu lando de Eŭropo. Post

la dialogo s-ro L. ricevis demandojn kaj gratulojn el ĉiu Aŭstralia Ŝtato, inkluzive de Tasmanio. Iuj petis informojn pri tio: kiel lerni la lingvon; iu sciigis, ke estas grupo en Southport (Kv.) deziranta formi klason de lernantoj. Inter la letersendintoj estis ankaŭ Esp-istoj; s-ro M.A.Collier, de Binntabily, Millmerran, unu tre frua membro de B.E.A., jam de longe ne uzis la lingvon, sed per du frazoj klare vidigis, ke kun la paso de la tempo li ne tre "rustiĝis" en ĝia uzado.

S.WANMER.

Sgt.R.Robbins, N.Z.--Y .M.C.A., 2NZEF, Middle East Forces, bezonas Korespondantojn por kelke da klubanoj Esp-aj. Interesatoj bonvole skribu al li.

B .E.A. Exam Success. Mrs. E. DOUGAN (Corrigin, W.Aus. Elementary.

MORTO. Je Oktobro 17, 76 jara, E.L.OSMOND, Ealing. Fervora kaj mondkonata Verkistino. E-isto de 1917, multe korespondis kaj verkis ĉirkaŭ 250 artikolojn en diversaj E. kaj A. gazetoj.

Plej milda kaj kompata larmo,
Pri homa sorto malfacila.
En Old Vic, la Shakespeare-azila,
Inter la tragedia svarmo
Ŝi ne altiras murd-alarmo,
Sed saĝa fraz' virinsubtila.
(Kalocsay.)

RADIO. Je la Dec. 16 Swiss Radio Corporation dissendis Esperanton je la 8a horo. Ĉiu Esp-isto, ĉu li aŭdis ĝin aŭ ne, sendu dankesprimon al la stacio, petante regulajn programojn en Esp-o. Letero al Svisujo estas 3p., p.k. 2p. Ne enmetu prosaĵon. Adresu al urbo Beromuenster, Svisujo.

El "BRIRISH ESP." Jan-Feb. Esperanto progresas en ĉiu lando kontaktebla de I.E.L. Ekz., en Maroko kaj Islando ĝi havas jam pli ol 50 anojn en ĉiu el ili; antaŭ la milito la du landoj havis po kvin. La unua post-okupada numero de "Franca Esp-isto" estas surpresile.

N ova eldono de "Esperanto for All" (4p.) baldaŭ preta. En la 1920-oj tiu kompilaĵo estis treege populara kiel propagand ilo. Ĝi estas aktuale reviziita.

Leŭt. Simon renkontis Generalon Bastien, F-inon Royer, S-ron Archdeacon en Francujo, kaj tre multajn aliajn Esp-istojn. (Cetere, "Worker Esp-ist" informas ke S-roj Glode, Bannier kaj Chilland, konataj SAT-anoj, estas bonfartaj en Parizo.)

The London Quarterly of World Affairs (Okt.1944) enhavas kvinpaĝon artikolon pri International Auxiliary Language. Verkis ĝin BEAano, Profesoro C.B.Fawcett.

"I switched to-day from the Hertogenbosch area to the Tilburg sector....on the road we found a bearded Dutch civilian on a bicycle We asked him if he spoke English, and, of all things, he said "No---Esperanto." (London "Daily Herald," 27 Okt.)

---

## TRADUK-KONKURSOJ.

Traduko de Konkurso 19: (Kompilita el 3 tradukoj.)

Ĉar homo estas ĉiopova. Ne ekzistas iu celo, imagebla al li en la sfero de spirito, kiun li ne kapablas, atingi pli-malpli frue en la sfero de materio. Ne ekzistas iu potenco, ĝis nun eltrovita, kiu estas sufiĉe forta, por malsukcesigi lin; pere de siaj infanoj li povas venki eĉ la ŝajnan finalecon de morto. Ne ekzistas iu timo tiom potenca, ke ĝi d etenus li por ĉiam, nek iu sufero tiom granda, ke li ne povus toleri ĝin pro sia spiritforto. En li estas ĉiu kvalito, kiun li atribuas al siaj dioj: beleco, saĝeco, ĉioscio, ĉiopovo, dieco; ja eĉ senmorteco.

Venkinta grupo: MELBOURNE ESPERANTO CLUB.

Tradukota teksto Konkurso 21.

But although we can name anything, our terminology does not, in fact, greatly outrun our needs, and in some regards lags behind them. We often encounter words in foreign languages for which there is no English equivalent. If we wish to convey the sense of one of them, we use the foreign word (if we know it) or have to fall back upon a circumlocution. National habits of thought as well as of life are reflected in national languages, and differences between the thought of one age and that of another are indicated by the appearance of words for things which elsewhere are absent. There is no word in English for "a man who has the same ideas as oneself," though the Esperantists have the word "samideano." (Sir John Squire: Flowers of Speech.)

Tradukoj devas atingi la subskribinton antaŭ la 10.4.45.

P.E.SCHWERIN, 1 Carabella Flats, McDougall St., MILSONS POINT, N.S.W.

---

PRI MODERNA ARTO. Konversacio en Melburna Tramo. "Kiel oni povas kompreni tiun ĉi modernan arton, Vilĉjo?" "Nu, iras ĉi tiele. Vi elektas unu el viaj plej belaspektaj amikoj. Vi komencas pentri portreton. Vi pentras kaj pentras ĝis vi atingas ion kiu ne similas ion surtere aŭ surĉiele. Pro tio, povas esti ke vi gajnas famon, 500 funtojn kaj estros novan skolon. Sed se la verko similas eĉ iun parencon de la viktimo, ve al vi kaj via pentraĵo. Tiuokaze artisto povas doni dankon al Dio, ke li loĝas en libera lando. La "modernaj artuloj" kredas ke ekzistas ne plej grava krimo ol pentri ion ajn tiel ke ordinarulo povas diveni kion ĝi signifas."

K.THOMPSON.

EL MEKSIKIO. En letero s-ro Lanti informas el Meksiko, ke la elstara generalo Mangada, kiu defendis la Escorialon en la Hispana

intern-milito, jam simpatias kun la Kvakerismo, ĉeestante ties kunvenojn. Lanti, Redondo, Azorin kaj Mangada renkontiĝis en la Meksikia ĉefurbo kaj babiladis Esp-o. Lanti facile legas la Hispanan lingvon, sed jaroj da interhispanaja vivado ankoraŭ ne povigis al li skribi aŭ paroli ĝin alie ol Esp-o. Harold Cardozo en libro "March of the Nations" iom longe traktas la parton kiun Mangada ludis en la milito sialanda. Mangada jarojn redaktis "Hispana E-isto."

---

LITERATURECA TRADUKO. (2).

CANDIDE: Voltaire was a true man of action, a knight of the Holy Ghost. He plunged fiercely into the human arena and fought through a laborious life against obscurantism, stupidity and tyranny. He had a clear-cut, aristocratic mind. He hated mystical balderdash, clumsy barbarity and stupid hypocrisy. Candide is not only a complete refutation of optimism, it is a book full of that mischievous humour which has the power, more than anything else, of reconciling us to the business of enduring life.

Voltaire estis vera homo de la ago, kavaliro de la Sankta Spirito. Li puŝis sin mezen en la arenon de la homaro kaj batalis tra fortostreĉa vivo kontraŭ malprogresemon, stulto kaj tirhaeco. Li havis neto difinitan, aristokratan menson. Li malamis mistikajn malklarajojn, fuŝan kruelon kaj stultan hipokriton. Candide estas ne nur kompleta refuto kontraŭ la optimismo, sed ankaŭ verko plena de tia petola bonhumoro kia, pli ol io ajn alia, povas persistigi nin daŭre elteni la vivadon.

--------------------------------------- F.R.BANHAM.

BASIC ENGLISH . Se oni konsideras la pretendojn de Basic English plenumi la rolon de internacia lingvo, la demando pri spac-prenado estas grava. Fiucele mi kalkulis la nombron da vortoj en unu bone konata ĉapitro de la Nova Testamento en kvin diversaj lingvoj. La elektita ĉapitro estas 1 Kor. 13.

| | |
|---|---|
| Esperanta traduko | 155 vortoj. |
| Rusa | 190 |
| Greka originalo | 199 |
| Angla | 259 |
| Basic English | 313 |

--------------------------------------- H.E.BOORD.

---

Published by F.R.BANHAM, 2 Banchory St., Essendon, W5, VIC.

OFICIALA ORGANO DE LA AUSTRALIA ESPERANTO ASOCIO

# LA RONDO

THE AUSTRALIAN ESPERANTO MONTHLY

ELDONITA DE F.R. BANHAM.
2 BANCHORY ST. ESSENDON W.5
VICTORIA AUSTRALIA.

VOL. 5 No. 7 Apr. 1945.

REDAKTORO F.R.BANHAM, D.B.E.A.
2 Banchory St., Essendon, W5 VIC.

ooooo

Enhave aranĝas F-ino L.E.BAILEY, D.B.E.A.
Sherbourne Rd., Medindie Gdns., Adelaide, S.Aus.

oooooooooooo

## LINES ON THE DEATH OF ZAMENHOF.

## WARSAW, APRIL, 1917.

("The dead are not dismissed." Emerson)

With Slav and Teuton locked in death
On Poland's bloodstained, tortured earth,
A Jew obscure his final breath
Expired. And few men knew his worth.

"Was all my striving fruitless, vain---
"Life wasted for a world unmoved ?
"In face of sickness, want and pain,
"My best I gave for that I loved."

In death-sick minds doubt-phantoms rise
Exhaling grim despair and gloom:
"For nought frail man his strength applies
"To save a world from Babel-doom."

Perchance through fevered brain there scorched,
On this his final earthly day,
Such painful and corroding thought --
Sharp venom of a deep dismay.

Then lo, from out another sphere,
Some stage on Wisdom's widening way,
To those he left still struggling here
He firmly raised his voice to say:

"Not so, good friends. Those dismal guesses
"Bootless agitate your mind:
"Love Eternal ever blesses
"Those who fain would bless their kind.

"Before my eyes no victory rolled,
"Its unfurled banners you shall see.
"Mine was the duty, faith to hold ---
"The faith to set a mute world free.

"Such faith I never ceased to cherish,
"In e'en my last grey earthly hour:
"All true men's labors ne'er can perish ---
"Inbreathes them an exhaustless power.

"The cause we have shall triumph crown
"When this new epoch finds its birth ---
"Give place to trust throughout the earth."

........................

Benefactors live with sorrow,
Drink the gall and face the steel;
But through dimmed eyes glimpse To-morrow
And the Age of Human Weal.

Dr. Lazarus Zamenhof, the creator of ESPERANTO, was born in Bialystok, Poland, 15 December 1859, and died in Warsaw 14 April, 1917.

LA MORTO de ZAMENHOF. (VARSOVION, APRILO 1917.)

En milita temp' tortura,
Sur la Pola ter' dolora,
Mortis milda hom' obskura ---
Ĉesis streb' al celo fora!

"Ĉu mi senrezulte, vane,
Spezis min por mond' sendanka,
Laboradis san-, malsane,
Ofte manĝe, mone manka?"

En malsana cerb' sin movas
Sugestaĉoj malesperaj:
"Lingvajn barojn venki povas
Ne la homoj efemeraj."

Ĉu brulkuris tra la menso
Dum angora horo lia
Tia tre amara penso,
Frukt' de rekompenco fia?

Ne! El la Sfer' alia
Lia glora korpo bena
Amrigardis al la nia
Kotbuleto plagoplena:

Diris li: "Ho fantazie!
En vin timojn vi enlasas:
Dio nepre benas ĉie,
Kie la Bonvolo paŝas!

"Ne necesis ke mi, vidu
Finan venkon de l'Afero,
Sed ke firme mi plenfidu
Al la Justo kaj la Vero.

"Kaj mi kredon ĉiam tenis
Eĉ en griza horo morta:
Ĉiam la Kreinto benis
Verkojn de homamo forta.

"Venkon ja mi fine vidos
En la novepok' senarma ---
Suspektem' ne plu insidos,
Anstataŭe fido varma."

.................

Mondsavantoj al krucumo,
Maldankado, dorna krono.
Nur dolore venas lumo
Gvida al la Homa Bono.

-------------------------- Originale F.R.BANHAM.

CICERO: Se mi eraras, kredante ke la animoj de la homoj estas senmortaj, mi eraras volonte. Kaj mi ne deziras ke tiu ĉi eraro, kiu min ravas, estu deŝirita for de mi dum mia vivo. Sed se, mortinte,

mi jam ĉesos konscii, kiel iuj detalamantaj filozofoj supozas, mi ne timos ke mortintaj filozofoj min mokos.

---

KOMUNISMO KAJ ESPERANTO.

Kvinslanda samcelanino, kiu amas propagandi en diversaj medioj, lastatempe penis Esperantigi Komunistojn de sia loko. Sed la torĉo de ŝia fervoro flagretis nur malforte en la nesimpatia aero de tiuj mondsensaj politikuloj. Malabunde venis la aprobetoj. "Komunismo bone faris kaj faras sian vojon sen helpo de Esperanto. Vi pli saĝe agus, apostolante la ruĝan evangelion," kaj tielade plu. Belaj vortoj. Ni ne neas la progreson de Komunismo, sed ne tie ĉi volus diskuti la kaŭzojn por tio. Fakto restas, tamen, ke ankoraŭ la terura lingva obstaklo forte staras inter la homoj, inkluzive la Komunistojn, kaj sendube estas, ke komuna helplingvo faciligus al ili la precipan taskon interkompreniĝi kun siaj kolegoj-aktivuloj en cento da landoj. La ruĝaj k-doj asertas, ke ŝtataj aŭ kapitalistaj cenzuristoj pritranĉus eĉ Esperantajn kablodepeŝojn se iliaj mastroj ordonis ilin tion fari. Jes, povas esti. Sed tiel ne starus la afero ĉe libere organizitaj kunvenoj de ĉiulandaj k-doj, kiuj per Esperanto povus sencenzure paroli, kompreni, debati, refuti, anstataŭ kiel nun aspekti kiel langligitaj azenoj kiam alparolataj en lingvo ne ilia.

Sed ni prezentu al ni sopirindan situacion: En ĉiu Komunista urbgrupo tra la mondo troviĝas Esperanto-sekcio, ligita al la presa fako. Ĝi ricevas el ĉiu lando leterojn en Esperanto kiuj, ricevataj sen cenzura kontrolo, tradukiĝas en la koncernan lingvon nacian aŭ aperas en Esperanto, laŭ la tiama grado de Esperantouzo. Multe plifidindaj estus la Esperantaĵo de Rumanoj, Bulgaroj, Finnoj, Hungaroj ol la pene kompilita Anglaĵo, Francaĵo, aŭ Germanaĵo uzata de tiaj nacietuloj, kiuj certe scias, ke iliaj malvaste konataj idiomoj ne kompreniĝas ekster iliaj propraj teritorioj. Eĉ se ili uzas unu el la kvar ĉefaj Eŭropaj lingvoj, tiaj leteroj plejofte devas esti tradukitaj de homoj ne plene kompetentaj traduki el tia lingvo. Absurde, ke Bulgara Komunista grupo skribas al Hungara, ne en la Hungara (aŭ Bulgara) sed en la Franca, Angla aŭ Germana! La Finnoj devas trovi homon kun almenaŭ iom da kompetento en unu el tiuj lingvoj, sed malofte ili povas garantii ties perfektan scion---aŭ la scion de la malgrandlingvula sendinto! Juste estas, ke ĉiu homo uzu aŭ la propran lingvon aŭ Esperanton en la internaciaj rilatoj. Kiam venos la tago pri kiu Marks revis: tiu en kiu la laboruloj sente kaj lingve unuiĝos en frata harmonio?

Komprenebe, grave temas ankaŭ pri perfekteco en Esperantouzo. Nur konstanta zorgo ebligas nin eviti malĝustajn tradukojn de vortoj formo similaj sed sence nesamaj. Sed tio postulus alian artikolon.

Ĉu la Komunistoj povus formi al si Esperantajn sekciojn ĉe la urbgrupoj, aŭ ĉu devas ili atendi permeson, direktivon de landa aŭ monda centro? Ankoraŭ restas vualitaj la kaŭzoj kiuj neebligis Esp-

eranto en Sovietio kapti la bonegan okazon por masa akcepto ĉirkaŭ 1920j. Tiu historia tempo estis unike favora kaj la popolo tiam vaste aprobus ŝtatan patronadon de Esp-o. Ironie estas, ke la Cara registaro malpermesis "La Esperantisto" en 1895 eniri Rusujon pro artikolo de Tolstoj, sed la bolŝevikaj ĉefoj, frakasinte tiun Carismon, indiferentis nian aferon kaj rifuzis la du-tri vortojn per kiuj la difinitiva venko de nia lingvo estus certigita. Anstataŭe, sub la ruĝa registaro Esperanta korespondado estis kontrolata per speciala organizo, kaj U.E.A. perdis ekzistorajton sur Soveta teritorio.

N ia samcelanino demandis pri la sinteno de Stalin al interlingvo. Mi turnas ŝin al la Aŭstralia Esp-Gaz. Monata, Majo 1944."... naciaj lingvoj neeviteble kunfandiĝos en unu komunan lingvon, kiu, kompreneble, estos nek la Rusa, nek la Germana, sed io nova." Tiu sintezo natura iompostioma de la lingvoj tre kredeble neniam venos. Ĉiuokaze ĝi postulus milojn da jaroj tra kiuj la homaro ne povas atendi. La lingva ĥaoso estas nur unu indikaĵo de la ĝenerala malmatureco spirita, kultura, etika, ideala ĉe la homoj, kiuj tiom mirinde paŝas antaŭen en la kampo de la tekniko, ke, se ili ne ricevos sufiĉe da morala forto kaj sagaca sento, ili baldaŭ ŝiros sin en pecojn kaj pereos en marĉo da sango.

Libroj konsultindaj: Fundamentoj de Leninismo (Stalin)--La Vojoj de Fermiĝo kaj Disvastiĝo de la Lingvo Internacia (Drezen)---Al la Nova Etapo (Studoj de Rusaj Esp-aj lingvistoj)---Zamenhof (Drezen) ---Vortoj de Lanti---Leteroj de Lanti---Historio de la Mondolingvo (Drezen)---Esperanto-Enciklopedio (sub Rusujo)---Gazeto "Sur Posteno" (Nro 150: La Doktrino de Lenin en la Praktika Movado por Internacia Lingvo.)

------------------------------------ F.R.BANHAM.

## EL VERKO DE BERNARD DE MANDEVILLE.

(The Grumbling Hive: 1705j. Londono)

Tuj kiam la ideoj pri honoro kaj malhonoro estas enirintaj en socialan komunumon, ne estas malfacile, igi la homojn militi. Antaŭ ĉio prizorgu ke ili konvinkiĝas pro la justeco de sia propra afero, ĉar nenia homo inklinas militi se ŝajnas ke li malpravas. Poste aludu ke la propraĵoj, altaroj, virinoj kaj idoj kaj ĉio, kion ili ŝategas, estas envolvotaj en la proksimiĝa malpaco, aŭ almenaŭ eble kunsuferos pro ĝi. Poste alligu plumojn al iliaj ĉapoj, laŭdu ilin en la ĉeesto de aliaj, parolu pri la spirito de samsorteco, pri amo al la patrujo, pri maltimo renkonte la malamikon, pri malestimo al la morto, pri la kampo de la honoro kaj tiaj frazoj, kaj sekve de tio ĉiu fiera viro ekkaptos la armilojn kaj ĝismorte militos prefere ol forkuri, t.e. tiel longe kiel tagas. Ĉiu solulo en armeo estas ekzemplo por la aliaj, kaj cento da ili, kiuj solaj kaj sen atestantoj estus malkuraĝaj, devenas herooj per la kun-esto kaj pro timo esti malestimataj de la aliaj. Por konservi kaj plifortigi tian artefaritan kuraĝon, ĉiuj forkurantoj estu punitaj malglore;

tiuj, kiuj brave militis, ne grave ĉu venke aŭ male, ricevu flatojn kaj serenajn laŭdojn, kaj tiuj, kiuj perdis membrojn, ricevu kompenson. Sed tiuj, kiuj estis mortigitaj, antaŭ ĉio devas esti pripensataj, priĝemataj kun multo da lerteco, kaj prilaŭdataj per specialaj frazoj, ĉar honori la mortigitajn pruviĝas certa metodo enkapti la vivantajn.

------------------------------------K.HIRSCHEL. (Trad.)

## FERIOJ SUR LA MONTARO.

De S-ino T.B.Freeman, Kvinslanda Pyke-premiito.

"Ho ve! Kiel terure varmege estas!" ekĝemis S-ino Barton kiam ŝia edzo eniris la ĉambron. "Estas nur Decembro nun, kaj kiamaniere ni travivos la venontajn monatojn, mi ne scias. Se nur oni povus vekiĝi kaj trovi sin en malvarma klimato dum unu-du semajnoj!"

"Nu, Alicio, kion vi dirus se mi sciigus vin, ke jam aranĝis aferojn por ke ni baldaŭ feriu?" demandis la edzo.

"Kion vi diris? Baldaŭ? Ho Petro!" ekscitite ekkriis Alicio.

Li kapjesis. "Ankaŭ Johano kaj Betty Nelson venos en sia aŭtomobilo. Ĉu vi povus pretiĝi por ekiri post unu semajno?"

"Ho jes, sed kien ni iru por forkuri el tiu ĉi varmego?"

"Al la Montaro Bunya----oni diras, ke tie estas mirinde malvarmete tage kaj nokte tra la tuta somero. Mi opinias, ke dusemajna restado tie vigligos nin tiom, ke ni povos ekzisti ĝis la vintro venos," diris Petro ridetante.

"Ja, efektive, mi jam sentas min pli bona!"

Dum la venontaj malmultaj tagoj la veturontoj estis tre okupataj. Petro kontroligis la aŭtomobilon kaj plenigis la petrolujon dum li mem prizorgis la palisarojn, brutaron, ventmuelojn k.t.p. por lasi ĉion en ordo. Dume da pastecoj kaj kukoj Alicio bakis sufiĉe por dusemajno, pro tio, ke ne estas butikoj sur la montaro. Fine alvenis la grava tago. Frumatene ili ellitiĝis, enmetis la nutrajon kaj pakajon en la aŭtomobilon, matenmanĝis kaj poste ekveturis ĝuste je la sunleviĝo. Estis belega mateno, la arboj ĵetis longajn malvarmetajn ombrojn, la birdoj estis okupataj je sia matena diservo, kantantaj kaj fajfantaj ĝis oni pensus, ke iliaj etaj ĝorĝoj krevos. Irinte proksimume dek kvar mejlojn, la veturantoj atingis la ĉefurbon, kie ili renkontis la duan aŭtomobilon, kaj for iris la du veturiloj kun siaj feliĉaj gevojaĝantoj. Baldaŭ ili estis transirantaj vastan ebenaĵon "Darling Downs," kiu etendiĝis de unu flanko de la horizonto ĝis la alia. Estis tre malmultaj arboj, kun escepte de grupoj da ombrarboj plantitaj proksime al la ventmueloj kaj akvotrogoj por la brutaro, ankaŭ kelkaj babilonaj salikoj flanke de la riveretoj. Subite Alicio ekkriis:

"Ho Petro, estu singarda kiam ni alvenos al tiu akvo sur la vojo, eble ĝi estos profunda."

Ili daŭre veturis dum kelkaj minutoj, sed ankoraŭ ne atingis la akvon, kiu ŝajnis tiel malproksime for kiel ĉiam. Ili rigardegis ĝin silente, atendante ke ili baldaŭ traveturos ĝin, sed ne, ĝi ank-

oraŭ dancis kaj briletis antaŭ ili---poste ili konkludis ke ili rigardas miraĝon! Post nelonge la fora horizonto vidigis montaron, bluan kaj nebulatan.

"Jen estas la montaro Bunya," anoncis Petro, "kaj ni devos atingi la supron antaŭ la tria horo, ĉar veturiloj malsuprenirantaj havos la vojrajton post la tria. Da spaco estas sufiĉe tie kaj aliloke por du aŭtoj preterpasi unu alian, sed estas iom danĝere. Nu, mi malsatas, do ni piknikos sub tiuj ombraj arboj tuj kiam la aliaj alvenos. Mi scivolas kio estas al ili---ili estas tre malfruaj. Intertempe mi faros fajron kaj boligos iom da akvo por la teo." Konformigante siajn gestojn al la vortoj, li baldaŭ havis la akvon bolanta, kaj ĝuste tiam iliaj kunvojaĝantoj alvenis.

"Kio malfruigis vin? Ni maltrankviliĝis,"diris Petro.

"Mia maŝino ne bone funkcias, espereble oni povos ĝin fiksi en la urbo Dalby, kiu, mi kredas, estas nur trimejla veturo de tie ĉi. Ĉu estas la teo preta, Alicio?"

"Jes, jen estas iom por vi kaj Betty. Iaktukan sandviĉon?"

"Dankon--dekduon, ĉar mi neniom manĝis de kiam ni matenmanĝis, kaj la naturo abomenas vakuon!"

Tuj kiam ili forprenis la manĝilarojn, ĉiuj eniĝis en la aŭtojn kaj ree ekiris. Baldaŭ ili atingis Dalby-on, kie Johano lasis ripari la maŝinon. Forlasinte tiun urbon, ili vojiris norden ĉirkaŭ dek sep mejlojn, preterpasante survoje multajn tritikajn kampojn kaj ŝafbienojn, kaj atingis la urbeton Kaimkillenbun, la lastan lokon kie oni povas aĉeti petrolon kaj manĝeblaĵojn antaŭ ol supreniri la montaron. Ankoraŭ unu fojon ili replenigis la petrolujojn kaj post kiam ili veturis kvar-kvin mejlojn la lando iĝis montoplena kaj la vojo malglata kaj tiel kota, ke la radoj de unu aŭto preskaŭ ĝisakse enkotiĝis. Post tiu okazintaĵo la veturigistoj decidis, ke estos plibone dediĉi pli da atento al la vojo anstataŭ admiri tiom la pejzaĝaron! Ili trapasis kelkajn riveretojn kies mirinde travidebla akvo tintis muzike inter la ŝtonetoj dum ĝi fluis gaje survoje malsupren al la ebenaĵoj. Ili ĵus atingis la piedon de la unua monto kiam subite Betty ekkriis

"Haltu! Jen estas surskribaĵo." Ĝi avertis publikon, ke la vojo estas mallarĝa kaj danĝera, kaj ke oni supreniras proprariske.

"Ho ve!" diris Alicio, "tiu aĉa averto jam min timigis. Ĉu vi kredas, ke estas sendanĝere, Petro?"

"Jes, kompreneble, sed ni aŭskultu en la okazo se estas malsuprenvenantoj....Eĉ ne unu sono, kaj ankoraŭ ne estas la tria horo, do ni povas sendanĝere ekgrimpi."

Refoje la du aŭtoj ekiris kaj pro tio, ke la vojo estis treege kruta la maŝinoj absolute muĝis. Irinte duon da mejloj la gevojaĝantoj haltis kelkajn minutojn ĉe "Munro's Camp," kie ili ĝuis trinkon da akvo el fontano starigita memore al homo, kiu donacis tiun grandan terpecon kiel plezurejon por la publiko. Oni jam povis senti la diferencon je la temperaturo---malvarma kaj freŝa estis la aero, bonvena ŝanĝo post la varmegeco de la ebenaĵoj. Tre altkreskaj kaj rektaj estis la Bunya-aj pinoj, kaj tiel dikaj, ke la kvar gevojaĝantoj, prenante unu alian je la mano, nur streĉe povis ĉirkaŭi unu

el la trunkoj. Kiam ili fine atingis la colon, ĉiuj eliĝis el la aŭtomobiloj kaj enportis la pakajojn en la dometon kiun ili jam antaŭe luis de la "Queensland Countrywoman's Association."

La morgaŭan matenon ili ellitiĝis frue kaj grimpis la monton "Big Nowbullan," por admiri la mirindan panoramon de montoj kaj valetoj, kun kelke da solecaj domoj dismetitaj tien kaj aliloken.

------------------------------------------(daŭrigota)

## SKU-LAKTA TRINKAĴO.

(de Cole Turnley, en The MAIL, Adelaide, 10/3/45)

"Frag-maltita," diris la grandulo, sin ŝovante tra la amaso por brumeti sian sespencon sur la malsekan, verdan servtablon.

La nepura ruĝharulino ekspedis mendon de alia kliento dum ŝi babiladis kun la taŭzita blondulino kiu reveme lavis glasojn.

"Ĉu vi promenos kun Harry tiun ĉi vesperon?" demandis la blondulino.

"Mi ne scias," la nepura ruĝharulino respondis. "Li volas preni min al tiu danco pri kiu ni paroladis. Mi informis lin ke mi lasos lin scii pri ĝi tiun ĉi vesperon."

"Frag-maltita," diris la grandulo, dum la nepura ruĝharulino servis trinkaĵon al la alia kliento.

"Nenia malto," ŝi malĝentile ĵetis al li, kaj sonorigis la kontantkalkulilon.

"Frag-laktskuaĵo, do," li alvokis al ŝi.

"Mi pensas ke mi ne iros," ŝi diris, "mi abomenas la manieron laŭ kiu Harry dancas---kaj ĉiuokaze, li estas ratsako." (Aŭstralia: Kapricа strangemulo)

"Tamen, li estas serĉema."

"Jesja. La alian vesperon li estis komika. Ĉu mi diris al vi pri tio?"

"Mi diras, frag-laktskuaĵo taŭgas," diris la grandulo.

"Mi devis renkonti lin ĉe la angulo apud la apotekisto," diris la nepura ruĝharulino, "kaj mi malfruis ĉirkaŭ dekdu minutojn---kaj li staris tie, ronkanta kiel eble plej forte. Ho, mi ridis!"

"Kion vi volas diri---li ronkis? Ĉu li dormis aŭ io simila?"

"Ne! Li nur agaĉis stultule---ŝajnigante ke li ekdormis, min atendante. Sendube ĉiu kredis lin freneza," kaj ŝi ree ridis pro la penso.

"Frag-laktskuaĵo," diris la grandulo.

"Nenia fraga, ĉokolada kaj vanila ŝku aĵo," ŝi rebatis, kaj servis iun alian. "T io ne estis la fino," ŝi informis la taŭzitan blondulinon. "Kiam ni ekpromenadis li komencis brosi siajn vestaĵojn per sia mano. Li diris nenion, kaj mi demandis al mi 'Pesto! Kion li faras?' Tiam li diris---'La ĝeno estas, ke mi tiom longe staradis, ke mi dense implikiĝis en araneaĵoj!' Ho! Kia rido! Mi preskaŭ mortis!"

La grandulo komencis frapi sian sespencon sur la verda serv-

tablon. "Laktskuaĵo sufiĉos," li diris.

La nepura ruĝharulino prenis mendon de malgranda homo kiu portis malnovan ĉapelon kun kurba rando.

La taŭzita blondulino diris "Kie estas la ĉiŝtuko?"

"Ĝi estis ie tie," diris la nepura ruĝharulino.

"Laktskuaĵo," diris la grandulo.

Ŝi klinis sin sub la servtablo, kaj li aŭdis ŝian neklaran voĉon diri "Mi pensas ke mi vidis ĝin ĉi tie."

"Ho, tute ĝuste," diris la taŭzita blondulino, "Jen ĝi. Mi trovis ĝin."

"Laktskuaĵo," diris la grandulo.

"Laktskuaĵo?" eĥis la nepura ruĝharulino.

"Hej!" vokis la malgranda homo de sub sia kurbrando, "vi havigis al mi glacitan ananason!"

Ŝi donis al li velkigantan rigardegon, kaj li retiriĝis sub sia ĉapelrando.

"Laktskuaĵo," la grandulo rememorigis ŝin.

"Tute ĝuste!" ŝi malagrable rebatis.

"Mi atendis sufiĉe longe," diris la grandulo.

"Kien vi iros tiun ĉi vesperon?" ŝi demandis al la blondulino.

"Ho, mi ne scias, eble mi enlitĝos. Mi plezurekskursis ĉiun nokton en tiu ĉi semajno."

"Ĉu vi rapidiĝus kun tiu laktskuaĵo," diris la grandulo, "mi ne povas atendi multe pli longe. Estas io kion mi urĝe deziras fari."

"Do, kial vi ne iras kaj ĝin faras?" la nepura ruĝharulino ĵetis al li.

"Ĉar mi volas ĝin fari ĉi tie, kaj ĉar mi bezonas mian trinkaĵon"

"Jen via trinkaĵo!"

"Bone. Ĉu vi permesas ke mi nun ĝi faras?"

"Kia? Estas tute egale al mi kion vi faras!"

"Estas kontentige scii ke mi havas vian konsenton," diris la grandulo, kaj kiam ŝi antaŭen klinis sin por doni al li lian monrestaĵon, li zorge verŝis la ŝaŭmantan lakton sur ŝian kapon.

---------------------------------- L.E.BAILEY. (Trad.)

## ASOCIAJ AFEROJ.

PROPAGANDA. (Eltirita el artikolo en "The British Esperantist.")

"Certain qualities are necessary in the successful propagandist. He must avoid being a bore. He must be sincere and convince others of his sincerity. He must be tactful. He must try to acquire the most comprehensive knowledge of Esp-o that time and opportunity allow...People are definitely impressed when they find one can use the language..... He must temper his idealism with practical wisdom. Esp-o is a great idea, but it alone will not cure the ills of the world, unless accompanied by other reforms.

"The first aim should be to get Esp-o across as the name of The International Language, so that everyone at least knows what it is.

One of the most effective forms of publicity is through the press, which provides many opportunities for the alert Esp-ist.

"Letters to Editors stand a better chance of acceptance if they are brief, concise and topical. Many letters will not appear, yet they are not wasted, for they show the editor that the movement is alive. But we should not lay ourselves open to the complaint that Esp-ists are touchy....long-winded, hectoring letters are resented....".

Ni esperas ke ĉiu membro kaj leganto sin interesas en la propaganda Fako de la Asocio. Ne permesu propagandan ŝancon malaperi ne akceptita. Sendu eltranĉaĵojn al la Prez. de Propagandista Komitato S-ro Wanmer, 176 Jubilee Terrace, Bardon, W4 BRISBANE. Ni deziras havi plenan protokolon pri propagando en ĉiu landparto.

ASOCIA DEVIZO. Post ses-sep monatoj daŭra kliŝaĵo de la nova kovrilo fariĝos. Ni esperas, ke tiu kovrila desegno servos nian gazeton dum multaj jaroj kaj familiarigos nian Asocion al ĉiu parto de la mondo. F-ino Bailey proponis, ke la Estraro de la Asocio elektu devizon, kiu aperos sur la kovrilo. Por ke ni povu meti antaŭ la Estraron praktikan sugeston por devizo, kaj por ebligi al ĉiuj membroj helpi en la tasko ni nun petas vin elpensi kaj elekti taŭgan devizon por A.E.A. Sendu ĝin al la Sekretario por atingi lin ĝis la fino de Majo. ĈI TIO ESTAS GRAVA AFERO. Ni esperas ricevi almenaŭ unu sugeston de ĉiu membro. Nia estas Demokrata Asocio---faru vian demokratan devon nun. Eĉ ne unu membro evitu la taskon. Memoru sugeston por Devizo en April kaj Majo.

LIBRO SERVO. Plena provizaĵo de la libroj "Haveblaj de Perantoj" (vidu paĝon 12 de Jarlibro) estas en la manoj de niaj reprezentantoj, kiel ankaŭ provizaĵo de la populara lernolibro "Step by Step in Esp." (4/3 plus afranko) Ni ankoraŭ povas importi de Anglujo kontraŭ antaŭpagita mendo la multe bezonatajn vortarojn "Fulcher & Long" (Eng-Esp) 12/6, Millidge (Esp-Eng) 16/6. Vidu Jarlibron por listo de aliaj importeblaj libroj.

KOTIZOJ. (kiu enhavas abonprezon al LA RONDO) 6/-. Sendu kotizojn al la Kasistino tuj kiam ŝulditaj. Helpu malpliigi la Kasistinan laboron---ne atendu avizon, ke via kotizo ŝuldiĝas.

------------------------------ G.H. HILLERMAN (Sekretario)
15 Morrice St., Lane Cove, NSW.

KVITANCOJ RICEVITAJ dum MARTO 1945. S-roj S. Wanmer, H.N.Love, Ed. Pryke, K.G.Lees, P.Schwerin, J.King, N.Brodie, B.Cuvet, Bachman, E.Chamberlain, Rdv. Rymer, ĉiu 6/-. Gesroj Cassiet 12/-, F-ino V. Newnham 6/-, S-roj Westbrook, Langtree, Hopewell, 6/- ĉiu. F-ino Smith 1/-, F-ino Woolnough 6/-. Donaco de S-ro Allan Turner 10/- £5-9-0. Al ĝenerala kaso £1-7-0 Al La Rondo £4-2-0. Elspezoj £3-17-1. En la Kaso £4-11-10
Kasistino W.ADDIS, 25 Greville Avenue, Flinders Park, S.AUS.

AVIZOJ.

PRO NEINTENCA PRETERLASO ni ne atentigis pri la eraroj en la Februara numero. Ni NE donas la simplajn teknikajn eraretojn kompreneblajn por seajara Esperantista bubeto. Jen listo por la du monatoj :-

P. 60/17, subkovritan; 63/28, rondoj. Krom tio, ekster sia 364/7 de mals. esti; 70/19, efektiva; 71/2 de mals. ne venas pli 77/8, grandan; 77/22, nobela; 77/lasta lin. konsonant-grupoj; 78/14 de mals. certas; 82/14, malprogresemo.

ATENTU. S-ro Allan Turner elsendas---ĉe 3 S.R. Shepparton ondlongeco 238 m. ĉiun duan Sabaton je 6.30 p.m. Li diras "Mi dankas ĉiujn kiuj helpis per sendo de leteroj al la sendstacio. Tiujn oni deziras por ke la horetoj daŭru.

NI INFORMAS Redaktorojn de aliaj gazetoj Esperantaj, ke ili rajtas senkondiĉe represi niajn artikolojn. Per gazetsendo bonvolu informi nin pri represo.

LETERO EL FRANCUJO: Per s-ro PFAHL ni ricevis la unuan leteron el Francujo depost 1940j. Ĝi estas de s-ro GASTON RISTE,

21 Rue du Refuge
ROMANS (Drome)
Francujo.

Li organizis du kursojn en tiu malgranda urbo (60 kaj 25 anoj), kaj ege petas ke alilandaj Esp-istoj skribu al ili ĉe la supra adreso. Afranko estas 3/p. por letero; 2/p. por p.karto.

NIAJ AMIKOJ. Date Okt. 1944 el Parizo la Prez-o de la Internacia Esp.-Ligo (Gen L. Bastien) sendis inspiran vokon al la monda Espistaro. Ĝi aperas en la Nov.- Dec. "Esperanto Internacia." La sama n-ro informas ke bonsanas D-ro Kempeneers kaj S-ro Jaumptte (Belgujo) kaj S-ro Guillaume, Archdeacon, Petit (Francujo).

Rev. C.C.COWLING, Komisiito por Ekzamenoj skribas pri B.E.A. Ekzamenoj.

Laŭ rekomendo de la Komisiito por Ekzamenoj la Konsilantaro de la B.E.A. enoficigis kiel Specialajn Ekzamenistojn la jenajn samideanojn, s-inon A.Douglas, s-rojn F.Pitt, G.Millerman, C.J.Caldera, H.Byatt, R.R.Rawson.

Kandidatoj rimarku, ke nur Speciala Ekzamenisto rajtas konduki la parolan parton de la diploma ekzameno, kaj ke estas necese fari aranĝojn kun tia.

La ekzamenistoj mem rimarku, ke estas permesate al ili sendi siajn raportojn kaj pagojn al la B.E.A. pere de la Komisiito.

Pri aliaj detaloj vidu en la 1944 Jarlibro de A.E.A. Se duboj restos turnu vin al la subskribinto.

C.C.Cowling,
Komisiito por Ekzamenoj.

---

TRADUK-KONKURSO 20.

Kompilita el 3 tradukoj.

Li turnis sian vizaĝon al la ŝia kaj, rigardante en ŝiajn malsekajn okulojn, li karese kisis ŝiajn cedemajn lipojn. La kiso estis sakramento al ŝi. Ŝi klinis la kapon kaj restis en tiu sinteno. Li estis en la sorĉo de ŝia bela kaj pura ĉarmo. Ĉu ŝi klinis la kapon pro honto aŭ pro konsento aŭ pro ambaŭ? Ŝia animpureco timigis lin. Ŝi do havis nenjun aĝon; ŝi estis nek maljuna nek juna, nek matura nek kontraŭe. Ŝi simple estis tio, kio estis senmakula. Alekso forturnis siajn okulojn. Antaŭ ol li decidis, kion li faru unue, ŝi jam eklevi ĝis en histeria, instinktiva rapideco kaj malaperis. "Kiom bela kaj ekscitiga" li pensis, "estis la turniĝo de ŝia blanka jupo, dum ŝi fluge suprenkuris la krutan ŝtuparon, for al la malluma mondo de la sal'-marĉoj.

VENKINTA GRUPO. Western Australian Esperanto League.

TRADUKOTA TEKSTO KONKURSO 22.

The learned say that the intensities of color and fragrance in the far North are due to the power of the light which fills the air when the sun shines without interruption day and night. Therefore one cannot pick so aromatic strawberries and raspberries or so fragrant birch boughs in any other clime. If a fairy idyll has any home, it is certainly in the deep fjord valleys of N^ordland in the summer. It is as though the sun were kissing nature so much more tenderly because they have such a short time to be together and must soon part again. Hanna Astrup Larsen: Knut Hamsun!

Tradukoj devas atingi la subskribinton antaŭ la 10.5. 45.

P.E.SCHWERIN, 1 Carabella Flats, McDougal St., Milson's Point, N.S.W.

---

KVINSLANDO. La Brisbanaj sam-oj feliĉe komencis jaron 1945. Ili havas la plaĉan perspektivon de baldaŭa paco kun iombone kreskinta nombro da lernantoj, kiuj montras fortan intereson. Ĉe la unua kunveno s-ro Simon, nia malnova amiko, ekscitige rakontis pri propaganda laboro kiun li faris per "Wireless Weekly." La scienco de radia dissendo estis tiam tre nematura, do ĉian artikolon pri ĝi la amatoroj kaj profesiuloj avide legis. S-ro Simon tradukis Esp-en ĉion akireblan pri la afero kaj eldonigis ĝin en la gazeto kun rezulto ke tio mirinde pliigis la abonantaron, precipe transmare.

Samvespere s-ro B .Cuvet, ankaŭ veterana verdulo, trafe demonstraciis nigratabule pri la vokaloj de Esp-o, kiel enkonduko al kurso, kiun la lernantoj tre streĉe sekvas.

---

EXTRACT from the officially published (1944-45) "The Scout's Book of Rules" (Badges):-- "INTERPRETER. 470. Carry on a conversation, write a simple letter on a subject given by the Examiner, read and translate at sight a passage from a book or newspaper, in either Esperanto or any language that is not that of his own country. (Note: An additional badge is worn by an Interpreter on the right breast pocket or in a similar position on jersey showing the language or languages spoken)."

Pastro Long, en Anglujo, kiu sendis al ni la supran, komentas ke "ĝi ŝajnas pli favori nian karan lingvon ol la antaŭtempa regulo."

HUNGARUJO. Informoj voje de Lisabono asertas, ke la Esp-a movado "supersaltas ĉiajn obstaklojn, kaj eĉ propagandas en la najbaraj landoj. La oficiala organo "Hungara Heroldo" aperas ankoraŭ sen-interrompe. La Kultur-Komisiono de Budapeŝto organizis kursojn kun kreskanta sukceso. En Aŭgusto oni celebris la Esperantan "Tagon de l' Libro."

BULGARUJO. Esperanto radikiĝis, precipe en la vilaĝoj. Kvarpaĝa bulteno, eldonata en urbo Ruse, surogatas por la 3 antaŭmilitaj gazetoj. En 1943 aperis nova eldono de libreto pri Zamenhof, verkita de Rusa filologo Drezen, kaj en 1944 almanako Esperanta.

SVEDUJO. En Januaro 1944 en Stokholmo okazis konferenco organizita de la Federacio Esperanta kaj la Internacia Esperanta Ligo cele al pritrakto de aferoj rilatantaj al la postmilita vivo de la apud-Baltaj ŝtatoj. Ĉeestis 100 delegitoj de Svedujo, Finlando kaj Estonio, krom aliaj interesatoj. (Laŭ "Argentina Esperantisto," traduko.

EXTRACT from letter from Dr. McLurkin of Normanton (Q):-

Mi regule ricevas La Rondo, kiu estas bone kaj lerte redaktata. Por ni izolulojn kaj memlernantoj interesaj estas la notoj pri lingvo kaj gramatiko. Tre plaĉus al mi vidi pli da atento donata al tiaj demandoj. Mi perdas multajn el niaj vicoj pro la fakto, ke malmultaj Esp. gaz. etendas helpon al izolaj studantoj, kaj finfine ĉi tiuj malkuraĝiĝas kaj forlasas la movadon. La izoluloj kuras kontraŭ multajn malfacilaĵojn kiuj bezonas klarigon. S-ro Banham diras (Majo 44 Rondo) "La 16 reguloj ne ĵetas lumon sur mil aferoj pri kiuj devas scii E-isto celanta akiri fundan konon. Ekz. pri la ĝusta uzo de "po"...." En la sama n-ro p. 111, linio 18 de "Unu Mondo" mi vidas "de ok ĝis dek horoj potage." Sur p.119 estas klarigo de la uzo de PO prepozicio. Eĉ Homero (aŭ redaktoro) dormetas iufoje, ĉu ne? (end of quotation).

I would say that the note p.119 was inserted precisely because of Sch's error; I did that rather than alter his text. But in point of fact there is a difference of opinion as to PO even among the experts. Kalocsay calls it the (possibly) most difficult point in Esp-o. It should be rarely used and then only when it can be paraphrazed by "at the rate of". I believe its use will die out. Kal-

ocsay has no less than SIX densely packed pages of often abstruse argument on the little word, in his Plena Gramatiko.

------------------------------------------------F.R.B.

BAZA FRANCA, GERMANA kaj aliaj. Vaste aŭdata estas akuzo ke Basika Angla estas ilo por progresigi imperiismajn ambiciojn de la Angleparolaj nacioj. Ŝajne por refuti tion, s-ro C.K.Ogden kaj lia Ortologia Instituto laboras super aliaj lingvoj, penante doni al ili ankaŭ formojn laŭ la "basika" teorio. Laŭ "John o'London's"6.10.44 jam aperis "The Basic Essentials of"---Franca, Germana, Hispana, Ruse kaj Itala lingvoj. Similaj volumetoj prepariĝas pri la Portugala, Kimra, Ĉina kaj Hinda lingvoj. N i demandas: ĝuste por kio tiel agas la O.I.? Ĉu forvaporiĝis ĝia espero pri internacia uzo de Basika Angla?Certe, la titolo BASIKA (Brita-Amerika-Scienca-Internacia-Komerca) ne aplike taŭgas por lingvoj krom la Angla.

------------------------------------------------F.R.B.

"BASIKA ANGLA." La nova komizo obstine persistis skribi sole en Basika Angla. Vane la firmĉefo admonadis. Je la monatfino la komizo ricevis sian koverton kun salajro; malferminte ĝin, li mire ekskuiĝis, ĉar la sumo ne estis konforma kun la kontrakto. "Peston! Kio signifas tio!" li ekkriis. Respondis la ĉefo: "Tio estas la basika salajro." "La voĉo de Londono," bulteno de B.B.C. El la Hispana de "Argentina Esperantisto."

------------------------------------------------

ONI ERARE DISKUTAS ERARON EN ERARO.

"S-ro Komercisto! Mi volas informi vin ke en la presita eraro de via firmo estas eraro."

"Pardonu min, sinjoro, sed mia firmo dum la milito ne disdonis erarojn, kaj kiam ni tion refaros, certe ni priatentos ke estos nenia eraro en nia eraro. Bone estrata firmo, kia la nia, certe eldonos nur korektan eraron de niaj komercajoj."

"Tiuokaze, ŝajne, mi eraris pri la eraro. Se vere estas la eraro de alia firmo kiun mi tralegis, povas esti ke tiu estas tute sen eraro laŭ la komercaĵo havebla ĉe tiu firmo, kaj mi nun vidas ke la eraro pri la eraro estas nur mia eraro. Mi petas vian pardonon."

"Bonvolu forgesi ĝin, sinjoro. Sed kial ne uzi la vorton katalogo aŭ listo?"

"Ĉar er-ar-o egalas aro de eroj, do estas listo aŭ katalogo."

------------------------------------------- E.S.HANKS.

ĈU VI SCIAS?---Kiu estas la plej granda el ĉiuj hodiaŭ vivantaj animaloj? Sulfurventra baleno: proks. 150 tunojn.
Kiu estas la plej granda birdo en la mondo? Struto: pli ol 300 funtojn.

Published by F.R.BANHAM, 2 Banchory St., Essendon, W5, VIC.

OFICIALA ORGANO DE LA AUSTRALIA ESPERANTO AS

# LA RONDO

## THE AUSTRALIAN ESPERANTO MONTHLY

ELDONITA DE F.R. BANHAM.
2 BANCHORY ST. ESSENDON W.5
VICTORIA AUSTRALIA.

VOL. 5 No. 8

May 1945

# L A R O N D O.

REDAKTORO, F.R.BANHAM, D.B.E.A.
2 Banchory St., Essendon, W5 VIC.

ooooo

Enhave aranĝas F-ino L.E.BAILEY, D.B.E.A.
13 Sherbourne Rd., Medindie Gdns., Adelaide, S.Aus.

ooooooooooooooo


## LILA MARLENE.

Plej populara marŝkanto de l' dua mondmilito

Sub la lampobrilo, kara rememoro,
Staris ci atende ĉe la kazern-pordo.
Tie, ŝi flustris fide pri
La amo al mi;
Ke restos ci
Lila, de la lampo!
La mia, Lila Marlene!

Dum la adiaŭo, ĉe malfrua horo,
Cin mi kareseme premis al la koro.
Malfacilege, karulin',
Disiĝi nin
Ĉe l' tempo-fin',
Lila, de la lampo!
La mia, Lila Marlene!

Jon alvokis urĝe tamburo kaj fajfilo;
Devis mi formarŝi for de l' lampo-brilo.
Kiel kruela, sen kompat',
La sorto-bat'
Por la soldat',
Lila, de la lampo!
La mia, Lila Marlene!

Poste, mi enŝipe por nekonata celo,
Kaj, la lampo-brilo forega kiel stelo.
Devis formarŝi, pafilo en la man',
Kaj en la koro, flam'
De mia brula am',
Lila, de la lampo!
La mia, Lila Marlene!

Ie ĉe la fronto, inter la teruro,
Revas mi pri pordo ĉe la kazern-muro.
Ĉu min atendas tie for
Kun sopir-plor'
Kaj esper-kor'
Lila, de la lampo?
La mia, Lila Marlene!

Esperantigis JOEDIKO.

("ne tradukon mi faris, sed esperantigon." J.R.)

---

## THE WORLD LANGUAGE PROBLEM.

By Dr. Björn Collinder, Professor of Finn-Ugrian languages at Upsala Univ.

(Professor Collinder is one of the most famous linguists of the present day. His article, part of which is translated below, appeared in a Swedish educational gazette in July, 1944.)

---

.....Humanity is still under the curse of Babel. Many have not noticed how hurtful to us and unworthy of us is that confusion. They have not sufficient imagination to visualise a better state of things.

In Sweden the idea is widespread that the question of international comprehension could be solved by everybody's learning English. I believe, however, that this notion is less widespread in the English-speaking world itself. When the question was raised years ago in the League of Nations, only the representatives of Sweden and Norway proposed English; the English representative proposed Esperanto.

At first sight the notion that English should serve as a common language in international relations seems well-based. In some ways English is already a world-language, or, if one wishes it, the world language before all others. As the language of diplomacy it is ready to force out the French. It is spoken by 200 million and studied in the higher schools throughout the globe. After the present war it will occupy a stronger position than before.

Those who proffer these arguments usually assert further that English is easy to learn. There is some truth in it. The so-called "sailor" English by which one may imperfectly find one's way in foreign ports is quickly learnt, but if one wishes to read English books one sooner or later---possibly only after several years of study---will become aware that the English word treasure is inexhaustible. To speak English well enough to validate one's opinions in debate with Englishmen or Americans is an art mastered

by only a very few Swedes and such others who proclaim so dogmatically that English must become the world language. And very few Swedes can write anything in English so well that it can be printed. Even specialists who have devoted their whole life to the study of English must leave to the Englishman the checking and correcting of their work before the risk of sending it to a printer. English is very difficult to learn; in practice it is impossible for anyone to learn it thoroughly who has not lived for years in an English speaking medium.

Obsequious pleaders for English reply that it isn't necessary to learn it perfectly; it is enough that people learn it to the point that they may make themselves understood. But note here! A great part of international relations consists of conferences and debates in which interest is opposed to interest, opinion to opinion. Even those for whom international congresses have little practical significance may observe that in the home field one prefers to appoint as representatives such men as do not hesitate, stutter os mishandle their language, but who have the ready tongue straightway to refute or defend without slow and unimpressive reference to notes or prepared manuscript. Every one knows that such pleaders have little chance against opponents who can facilely employ their tongues in the language.

The Swedish advocates of English would, for the most part, find themselves in deep water if they tried to put their doctrines into effect, and this despite the fact that many of them have studied English for tens of years....

The correct pronunciation of English, choice of words and correct word order are full of subtleties almost unattainable by the foreigner, yet so saturated in sense-values for the Englishman or American that every deviation from them either painfully impresses him or tempts him to laugh ..... The thought that the English language could, as an interlanguage, be misused by the world's peoples has little attraction for the English themselves, even though they are pleased to see it studied universally. For other reasons, the thought is no more attractive to French, German, or Russian. To these great nations it would be intolerable if their languages were thrust aside in favour of English. Such a "solution" would be unjust in the extreme.
........

The world needs a simplified Latin, a language rationally devised which conserves the Latin-Greek word treasure already international, and which is so regular and simple that anyone can learn it in the People's schools. Happily there is just such a language. It has been used ny its adepts for 57 years in almost every country and has a wide literature both original and translated. It has abundantly proved its practicability and power to live. Tests have been made that prove its power to reflect all the nuances of thought necessary to international relations. In numerous congresses lively discussions and impassioned debates have been carried on in that

language and many people have used it with impressive eloquence.

If the world were not governed with such a little wisdom Esperanto would by now have been introduced into the schools of the world, and the problem would have been solved in practice and in fact. That such has not been so is due not so much to lack of knowledge as to lack of good will. When the question of Esperanto as international language was raised in the League of Nations the French government sabotaged a positive solution because it feared that Esperanto would successfully oppose French as the language of diplomacy.

Most of the opposition to Esperanto, however, is based on ignorance and prejudice, and it is to be regretted that many linguists---not all, by any means---have had a hurtful influence. Some of them have asserted that a language of the type of Esperanto could not satisfactorily function in all respects. Such assertions, of course, fall to earth in the face of the resounding facts of practical experience. Nobody who has attended an Esperanto Congress could seriously insist that Esperanto does not function.

There are linguists who approve of Esperanto on principle but are inclined to think that it suffers from defects of detail and should be reconstructed. I have carefully examined such criticisms and must with regret mark them down as simple prejudice, regarding them as negative and in effect hurtful, though they are, for the most part, given in good faith.

All languages have imperfections and defects, Esperanto is not excepted. But those who regard Esperanto as a failure and the work of a dilettante are wide of the truth. Esperanto is---a fact attested early by competent linguists---the work of genius by a richly endowed philologist, who offered the better part of his life to the inventing, forming and perfecting of it. After a close examination of Ido, Occid ental, Novial and Latino sine flexione, the outstanding rivals of Esperanto, I am justified in asserting that they are all inferior. Ido is only a dialect of Esperanto, Occidental is more easily understood <u>without study</u> than Esperanto by those who have mastered French, English and German, but it is certainly very much more difficult to speak and write. Novial was constructed by a world-famous linguist (Jespersen), but if either Esperanto or Novial must be branded as a dilettante work, it will not be Esperanto.

If one asks how the world-language question should be solved, I reply:-- "It is already solved. The problem henceforth is to get the solution accepted by those in the seats of the mighty."

"Esperanto Internacia," (Jan-Feb.1945)

---------------------------------<u>F.R.BANHAM.</u> (Trad.)

NI PETAS REDAKTOROJN LAŬELEKTE REPRESI KION AJN ILI VOLUS EL NIAJ PAĜOJ. ILI N UR SENDU AVIZE AL NI EKZEMPLERON DE LA GAZETO EN KIU APERAS LA REPRESO.

LA MUSO-TURO.

Tradukis S-ino Schwerin.

Hatto, episkopo de Mainz (Mayen) estis same riĉa kiel avara kaj pasigis sian tempon, ne preĝante kaj farante bonon al la malriĉuloj, sed ĉiam pligrandigante sian posedajon. Liaj farmbienoj estis la plej belaj de la tuta lando, liaj grenejoj estis plenplenaj de la plej bona greno, kaj liaj trezorejoj enhavis grandan kvanton de belaspektaj ormoneroj, kiujn la episkopo nombris ĉiutage.

La aliaj homoj ne estis same feliĉaj kiel li. En tiu tempo ekzistis multaj malriĉuloj, kiuj neniam havis sufiĉe da manĝajoj. Fine ekvenis malbona jaro; subakvigo detruis la tutan rikolton, kaj malsat-mizero terura rezultiĝis. La malriĉuloj, ne posedante iujn provizojn, suferis kruele, kaj ili estis tiom malsategaj, ke fine ili iris al la episkopo, por peti lin pri helpo.

"Sinjoro, vi, kiu havas tiom da greno en viaj ejoj, bonvolu doni iom da ĝi por niaj edzinoj kaj etaj infanoj malsatmortantaj!" ili diris.

Sed la malmolkora klerikulo aŭskultis iliajn petojn sen emocio kaj resendis la virojn, ne donante al ili eĉ la plej malgrandan donacon. Tagon post tago la malfeliĉuloj revenis, kaj tagon post tago Hatto forsendis ilin kun manoj malplenaj, dirante, ke lia bona greno estus multe tro valora, por servi kiel nutraĵo al homoj malsategaj kiel ratoj.

Malgraŭ la ĉiutagaj rifuzoj de la eklezíulo, la malriĉuloj revenis. Ili ja sciis, ke li havus sufiĉe da greno, por provizi ilin ĉiujn je pano, kaj tage kaj nokte ili petegis lin, havi kompaton al ili. Tedataj per tiuj bru-petegoj, kiuj ne lasis lin dormi en paco, Hatto fine ordonis, ke ili ĉiuj iru al malplena grenejo, kiu troviĝis ekster la urbo, kaj li promesis veni tien je certa horo kaj doni al ili ĉion, nur por kontentigi ilin kaj ĉesigi la plendojn. La bedaŭrinduloj imagis, ke fine ili ricevus manĝajojn. Ili rapidis al la malnova grenejo kaj eniris ĝin plengaje: viroj, virinoj kaj infanoj tie priatendis la alvenon de l' episkopo, kiun ili benis anticipe.

Je la horo fiksita Hatto alvenis, akompanita de ĉiuj siaj servistoj. Li haltis antaŭ la grenejo, sed anstataŭ eniri ĝin, li ordonis al siaj subuloj, fermi ĉiujn pordojn kaj fenestrojn kaj ekbruligi la konstruaĵon. La homoj, kiuj ne aŭdis ĉi tiujn vortojn, imagis, ke la klerikulo envenus ĉiumomente, kaj kiam li ekvidiĝis ĉe la lasta malformita fenestro, ili ĉiuj ekriis: "Vivu la episkopa moŝto!"

Sed kiom granda estis ilia seniluziiĝo kaj ilia terurego, kiam ili aŭdis jenajn vortojn parolataj de voĉo same forta kiel kruela: "Vi estas kiel ratoj, kaj kiel ratoj vi nun mortos, ĉar mi igis ekbruli la grenejon, por liberigi min de vi kaj por ne plu aŭdi viajn ĉiamajn lamentojn!"

Kelkajn minutojn poste la tuta konstruaĵo ekflamiĝis; la fajro leviĝis pli kaj pli alten, kaj aŭdiĝis la kriegoj de la homoj, kiuj

estis vive bruligitaj. La servistoj de l' episkopo estis palaj kaj tremis pro terurego, sed Hatto stoike rigardis la masakron de li ordonitan, kaj kiam la tegmento estis falinta, li trankvile revenis hejmen kaj vespermanĝis kun samo bona apetito kiel kutime.

Dum la nokto, tamen, lia dormo estis malhelpita kelkfoje per strangaj bruoj kvazaŭ de ratoj aŭ musoj, kiuj kuris en la manĝoĉambrego kaj mord etis ion tie. La sekvantan matenon li kolere rimarkis, ke lia portreto kuŝis surtere ĉifonita. Laŭŝajne ĝi estis pecigita per ratoj, ĉar oni povis ekkoni markojn de iliaj dentoj.

Kelkajn momentojn poste servisto alrapid is, por sciigi al li, ke li estis vidinta amason da musoj kaj ratoj, eliĝi el la ankoraŭ varmaj cindroj de la brulita grenejo, kaj ke tiuj etaj bestoj sekvis lin ĝis la palaco, sendube, por engluti lin. La episkopo Hatto sciis, ke li estis farinta krimon abomenan, kaj ke la ratoj kaj musoj estis animitaj per la spiritoj de la malfeliĉuloj perfide mortigitaj. Nun li ektimis kaj volis elŝteliĝi. Do li suriris ĉevalon kaj forrajdis galope; sed malgraŭ la rapideco de l'kurado li baldaŭ rimarkis, turnante la kapon, ka l'armeo de ratoj pli kaj pli alproksimiĝis, kaj ke ĝi atingus lin post nelonge.

Freneza pro teruro li malsuprenrajdis al la rivero, lasis sian ĉevalon, kaj ĵetante sin en malgrandan boaton li komencis remi. Li remis per ĉiuj siaj fortoj kontraŭ turo ŝtona konstruita sur roko meze de la akvo. Tie li baldaŭ alvenis, enŝlosis sin kaj ĝojis en la penso, ke li fine eskapis la akrajn dentojn de la ratoj. Sed lia ĝojo baldaŭ ŝanĝiĝis en teruregon, ĉar li rimarkis, ke la ratoj post formanĝado de la ĉevalo tranaĝis la Rejnon, kaj ke ĉiuj direktis sin kontraŭ lia turo, lia rifuĝejo.

Spite de la profundo de la akvo kaj la forto de l'fluo tiuj etaj bestoj naĝis tiel kuraĝe, ke baldaŭ ili alvenis ĉe la turo. La episkopo fermis la fenestro-kovrilojn kaj rifuĝis al la centro de la turo, sed eĉ tie li povis aŭdi la bruon de la musoj kaj ratoj, kiuj suprengrimpis de ĉiuj flankoj. Kelkajn sekundojn poste li aŭdis iliin ekmordeti la lignon de la pordoj kaj fenestroj, kaj post nelonge ili sukcesis trapasi kaj ĵeti sin sur lin---ĉiuj kune. Malgraŭ liaj krioj, malgraŭ liaj petegoj l'episkopo de Mainz estis vive manĝita de la musoj kaj ratoj, kaj baldaŭ ne plu restis io de tiu pekulo krom la ostoj.

Tia estis la puno de „Hatto, kaj, se vi ne kredas ĉi tiun historion, vi faru vojaĝon al Germanujo kaj vizitu la Rejnon. Proksime al Bingen oni montros al vi, ĝuste en la centro de la rivero,turon ŝtonan, kiu ankoraŭ nuntempe nomiĝas "La Muso-Turo de Bingen."

....................................

T radukinte la supran anekdoton el la franca lingvo mi ekpensis ke certe ne ekzistus sufiĉe da ratoj sur tero, por venĝi sammaniere la terurajn krimojn faritajn dum la nuna milito.

(Kathe Schwerin)

---

## NENIAM LA AMO PERDIĜAS.

Verkis Maud Helm.

Ĉe sia fenestro la koketulino
Tralegis leteron de amo sincera;
"Alia," ŝi ridis, "ha! ha! belulino
Ja regas la virojn kun ĉio cetera.

"Nu, ĉu mi elektos ĉi tiun ameman?
Ne, ne," ŝi ridetis, "ankoraŭ mi ludos;
Trapiki mi volas la koron cedeman,
Kaj kiel la sango elfluos mi studos."

" 'Ho, mia plej kara,' " ŝi legis," 'memoru
Per ĉiam la vortojn de amo mi diras' " --
"Jes, ja," ŝi mokridis,"mi ilin adoru
Tiele, kaj ĉiun en pecojn mi ŝiras."

Malfermis fenestron la manoj beletaj,
Al vento sovaĝa la pecojn ŝi jetis;
"Ĝis lacaj, do!" diris la lipoj ridetaj,
Kaj moke la manon sur koron ŝi metis.

La vento disigis la pecojn kaj pelis
En cent' da direktoj la blankan paperon,
Sed tiam Anĝelo de l' Amo ĝin celis,
Samtempe bridante la ventan koleron.

Subite ekblovis dolĉeta venteto,
Kaj jen papilioj belegaj kaj blankaj
Aperis por ĉiu papera peceto,
Farita de manoj kruelaj, sendankaj.

En cent' da direktoj la aro ekiris;
La aron de ampapilioj faritaj
El ama letero l' anĝelo amtiris
Al homoj sur vojoj malĝoje baritaj.

La ampapilioj la barojn transflugis,
Ŝarĝitaj de pensoj de ama sincero,
Kaj, kie la korojn malĝojo jam plugis,
Dissŝutis la semojn de ĝoj' kaj espero.

Neniam la amo perdiĝas, sed ĉiam
Ĉirkaŭe la suno de ĝia potenco
La bonon eternan radias eĉ kiam
Elpuŝas ĝin moke la malbonintenco.

---

Eraroj en la Aprila numero:- p.85 Aldonu "When hate, suspicion, anger's frown" post linio 6. p.86 lasta l: neobligis al; 87/7 definitiva; 91/29, nun ĝin faras? 94/12 kaj 32 ekscita.93/22

3½p;2½ p.

## FERIOJ SUR LA MONTETOJ.

(Verkis S-ino T.B.Freeman. Pyke-Premiito.)

Unu tagon ili vizitis la Akvofalon Festonan (Festoon Falls), belegan lokon kun tre altkreskaj arboj de kiuj amaso da belaj lianoj pendas malsupren en longaj, graciaj festonoj preskaŭ ĝis la tero, kiu kovriĝis per diverspecaj filikoj ĝis la vidlimo. La solaj sonoj kiuj rompis la silenton estis la pepado kaj fajfado de la birdoj, la babilado de la rivereto kaj la plaŭdado de la akvo dum ĝi falis sur la rokojn sube.

Ĉiutage ili esploris la arbare kovritajn montojn, jen grimpante al la montaj suproj, jen malsupren en la intermontojn, kie pli kaj pli mallumiĝis sub foliriĉaj arboj kaj grimpantaj kreskaĵoj. Foje aŭskultante streĉe, ili aŭdis sonon kvazaŭ homo krakus vipon--estis "vipobirdo"--kaj poste penetris la aeron korŝirantaj ekkrioj, kiuj grade formortis ĝis maldolĉaj plorĝemoj, poste---silento.

"Kiel terure! Estas kompatinda eta infaneto," ekkriis Alicio. "Rapidu! Sendube ĝi perdiĝas."

Ŝi kuris en direkto al la sono, sed trovis neniun.

"Mi kredas, ke ĝi estas malsupre tie," diris Petro.

"Mi ne," asertis Betty, akcente. "La krio venis de supre tie."

Tiumomente la plorado rekomenciĝis, sed tiun ĉi fojon en alia direkto. Serĉante denove, Petro kaj la knabinoj aŭdis subridon, poste ridegon al Johano.

"Kio estas al vi?" demandis Betty indigne. "Mi ne opinias tre konvena ridi je plorkrianta infano."

"Ŝajnas al mi ke tiu laŭbobirdo (bowerbird) kiu ĵus forflugis estas la 'infaneto', diris Johano. "Ofte mi ilin aŭdis imiti miaŭantan katon kaj bojantan hundon, sed ĝis nun, neniam kriantan infanon."

Iufoje kiam la gejunuloj promenadis inter la arboj, ili rimarkis, ke multaj arboj Bunja ŝajnas havi en la ŝelo nombron da malgrandaj eltranĉoj kondukantaj supren.

"Mi scivolas kio faris tiujn eltranĉojn," diris Alicio.

"Mi ne scias kun certeco," respondis Petro, "sed iuj diras, ke la eltranĉoj estas la lokoj kie branĉoj falis de sur la trunko. Ankaŭ estas dirate, ke antaŭ multe da jaroj la indiĝenoj tranĉis ilin por plifaciligi supreniri la arbojn por havigi al si la nuksojn. Ĉiam ili sciis kiam tiuj estos maturaj kaj ili venadis--multaj el ili de tre malproksimaj regionoj--por festeni je la nuksoj. Kelkaj gentoj, ĝismortaj malamikoj, renkontis tie ĉi, kaj vivis amike ĝis la nuksoj konsumiĝis, poste grasaj kaj glataj, ili disiĝis, pretaj ankoraŭ unu fojon daŭrigi sian malpacegon kiel antaŭe."

Tiu konversacio okazis en loko, kiun la knabinoj nomis "La Katedralo," pro tio, ke la altkreskaj, rektaj, kolonsimilaj arbtrunkoj la milda, verda lumo kiu trafiltriĝis tra la densa foliaĵo superkape, kaj la sentaĵo de dimanĉa paco kaj kvieto ĉiuj rememorigas al ili grandan, majestan katedralon. Ofte ili prenis librojn tien por legi kaj ripozi, sed estis tiel malvarme en la ombraĵo, ke post kelke da minutoj ili ĝojis trovi senombran anguleton kaj varmiĝi sub la suno.

Fine venis la lasta tago antaŭ ol hejmiri, do ili decidis, ke ili vizitos la Akvofalon Grandan (The Big Falls). Forlasinte la aŭton ĉe la vojflanko, ili piediris vaden al rivereto, kiu, fluinte al la krutegaĵa rando, sin ĵetis centojn da futoj vertikale malsupren ĝis la valego sube.

"Tre impona vidaĵo,". diris Betty, "sed mi preferas la Akvofalon Festonan, kiu, mi opinias, estas pli bela---krom tio, rigardu tiun krutan monteton kiun ni devas grimpi por returne iri! Kiam mi rigardas tien supren---!"

"Nu ni ekiru," diris Johano. "Ne parolu! Ni bezonas nian tutan energion por la grimpado!" Post multaj _spirhaltoj ili atingis la supron, elĉerpite.

"Nu, terure piedlaca mi estas, sed estis peninde," diris Alicio. "Mi nenien plu iros hodiaŭ, ĉar ni devos bonordigi la domoton antaŭ ol enlitiĝi."

Frue la morgaŭan matenon ili ekveturis hejmen, pasiginte tre feliĉan kaj ĝuoriĉan dusemajnon en la malvarmeta, refreŝiga aero de la montaro Bunja.

---

## TRADUK -- KONKURSOJ.

TRADUKO de KONKURSO 21: (Kompilita el 3 tradukoj).

Sed, kvankam ni povas nomi ion ajn, nia terminaro fakte ne multe transpasas niajn bezonojn kaj en kelkaj rilatoj restas malantaŭ ili. Ni ofte renkontas vortojn en fremdaj lingvoj, por kiuj ne ekzistas ekvivalento en la angla. Se oni deziras komuniki la signifon de unu el ili, oni uzas la fremdan vorton (se oni konas ĝin) aŭ devas rifuĝi al ĉirkaŭfrazo. Naciaj kutimoj---kaj de penso kaj de vivado---respeguliĝas en naciaj lingvoj; kaj diferencoj inter la pensmaniero de unu epoko kaj tiu de alia montriĝas per la apero de vortoj por objektoj, kiuj mankas aliloke. Ne ekzistas en la angla lingvo vorto por "Homo, kiu havas la samajn ideojn kiel oni mem," kvankam la Esperantistoj havas la vorton "Samideano."

VENKINTA GRUPO: Sydney Esperanto Society.

Tradukota teksto KONKURSO 23:

The sea was smooth as a watered-silk banner, and no wind lifted the white edges. Hot and calm was the water on that summer day. The growing detail of the harbour approached us swiftly, veering in its position from time to time. Lighthouses, piers, quays, trolleys and cranes, dividing up the horizon with angular but rhythmic precision, were imprisoned in the tawdry blue, in the transparent ball, of sky and sea, as in crystal. Every sound seemed struggling to escape from the hard material globe that contained it. Porters cried nasally, old women hawked oranges and chocolates, while small boys cried ecstatically the French versions of English newspapers. All round us was the usual disorderly bustle that masks the deadly, eff-

iciency of the French people. We were discharged over small bridges into this throng. (Osbert Sitwell: His Ship Comes Home.)

Tradukoj devas atingi la subskrintaon antaŭ la 10.6.45.

(S-ro)Paul E.SCHWERIN,
1 Carabella Flats, McDougall St., Milsons Point, N.S.W.

---

## LITERATURECA TRADUKO.

"JEAN CHRISTOPHE."

Romain Rolland's "Christophe" is without doubt the most rimarkable book that has appeared in Europe since Nietzsche's "Ecce H omo." It is a profoundly suggestive treatise upon the relation between art and life. It contains a deep and herioc philosophy---the philosophy of the worship of the mysterious life-force as God; and of the reaching out beyond the turmoil of good and evil towards some vast and dimly articulated reconciliation. Since "Wilhelm Meister" no book has been written more valuable as an intellectual ladder to the higher levels of aesthetic thought and feeling. Massive and dramatic, powerful and suggestive, it magnetizes us into an acceptance of its daring and optimistid hopes for the world; of its noble suggestions of a spiritual synthesis of the opposing race traditions of Europe.

"JEAN CHRISTOPHE" (Johano Kristoforo)

El ĉiuj libroj aperintaj en Eŭropo de post la "Ecce Homo" (Jen la Homo) de N ., la "Christophe" de Romain estas ekster dube la plej rimarkinda. Ĝi estas profunde sugestriĉa traktato pri la rilatoj intla arto kaj vivo. Ĝi enhavas fundan kaj heroecan filozofion---la filozofion adoradi la misteran vivoforton kiel Dion, kaj streĉe strebadi, super la tumulto de la bono kaj la malbono, al ia vasta kaj nebule konceptata repaciĝo. De post "Wilhelm Meister" aperis neniu libro pli valora kiel intelekta ŝtuparo al la pli-altaj niveloj de estetika penso kaj sento.. Grandproporcia kaj drameca, potenca kaj sugesta, ĝi magnete tiras nin akcepti ĝiajn aŭdacajn kaj alteflugajn esperojn pri la mondo, ĝiajn noblajn aludojn al finfina spirita sintezo de la inter si kontraŭantaj rastradicioj de Eŭropo.

Tradukis F.R.BANHAM el "The Hundred Best Books," (John Cowper Powys, Little Blue Books, No. 435.)

---

## PRI VIRINAJ NOMOJ.

(La sekvanta estas la esenco de artikolo de S-ro Carriere al la Redakcio date 14/1/45)

En cirkulero al ni S-ro Carriere nekontente rigardas la teorion de Kalocsay pri la virinaj nomoj. Li do elpensis novan sufikson, kiu "neniel rompas la Fundamenton." Li petas de ĉiuj E-istoj laboremaj amplekasajn listojn de antaŭnomoj kun E-a traduko, indikantajn kiel oni cignas virinan nomon apud la vira. Huĝe subotreku la nomojn

uzitejn sen ŝanĝo por ambaŭ seksoj.

Lia nova sufikso (kiun, cetere, li ne prezentas al ni) estas nun aprovata, kaj "multaj personoj opinias ĝin belsona." Jen tri demandoj pri kiuj li petas komentojn:-

1. Ĉu la sufikso "-in" taŭgas por ĉiuj propraj nomoj?
2. Ĉu oni devas akcepti nur la a-sufikson por virinoj nomoj?
3. Ĉu estas dezirinda nova sufikso obliganta laŭbezone uzadon de ĉiuj propraj nomoj senescepte, vire kaj virine?

Interesatoj skribu al Pierre Carriere (Norma Instrua Diplomito) Ciklamenpark', KERRATA, Algerio; aŭ M.George, 3 rue de Chaudanne, Besancon, Francujo.

RESPONDO de la REDAKTORO: Mi ne dividas kun vi la maltrankvilecon kiun vi evidente sentas pri la "virina sufikso." Diri ke "post eltrovo de tia sufikso, la lingvo estos definitive preta kaj glata kaj povos evolui facile," similas al diro de homo menciita de Zamenhof en "Lingvaj Respondoj." Tiu maniulo skribis ke la lingvo estas tre bona sed nur la vorto "kaj" forte malplaĉas al li; li ellernos Esperanton kun la kondiĉo ke ni elĵetu la vorton "kaj!"

Kion vi asertas pri la virina sufikso, tion aliaj asertas pri la akuzativo, akordo de la adjektivo kun substantivo k.t.p. Esp-o jam preskaŭ 60 jarojn bone funkciis sen troa ĝeno rilate la virinnomojn. Ŝajnas al mi ke Zamenhof ne rigardis la aferon kiel gravan. Li ne donis aŭ indikis solvon. En lia Biblia traduko ne regas tiurilata reguleco. La demando estas pli vasta ol la nomado de homoj; ankaŭ la loknomoj postulas iom da reguligo. Ĉu iu ajn projekto de interlingvo sukcesis perfekte solvi la enigmon de propraj nomoj, precipe de viroj kaj virinoj? Certe en la naciaj lingvoj regas ĥaoso (en la Angla oni literumas Tchekov laŭ ses malsamaj manieroj), kaj la Germanoj hezitas pri la genitivo de Diana (Dianens, Dianas?).

Ĉiuokaze, indiki solvon estas tasko por la rekonstruita Lingva Akademio kiu certe formiĝos post la milito. Sub ties aŭtoritato aŭ gvido ni pretigu nin labori laŭ la direktivoj de ĝi donataj. Ni atendu ĝian renaskon, dume propagandante, organizante kaj eldonante prosaĵojn por nia lingvo. La teoriajn demandojn ni provizore lasu.

Finvorte, mi spirite premas al vi la manon, kamarado, gratulante vin pro tio ke, post ĉiaj danĝeroj de la okupada tempo, vi havas reo la eblon interŝanĝi kun la cetera mondo la pensojn kaj aspirojn en Esperanto. Ĝi ĉie floru!

NEPRE ATENTU KE POŜTKARTOJ EKSTERLANDAJ DEVAS PORTI AFRANKON 2½p. KAJ LETEROJ 3½p.

ESPERANTO EN FRANCUJO. En "Esperanto Internacia" (Jan.-Feb, 1945) estas bona artikolo de P.Petit pri la 50-monata agado de la Francaj E-istoj sub la okupado. Malgraŭ ĉio la movado ankoraŭ vivas, kaj per la sindediĉaj penoj de la fideluloj ili faris al si novan konstitucion de 18 punktoj, kiu espereble formos la bazon de firma landorganizo. Liberigitoj denove komencas laboron, ankoraŭkarceruloj

formis kursojn en la "viktimejoj." Sed la morto forprenis doloreige: Charles Verax, Rollet de l'Isle, Rene de Lajarte, Andre Baudet kaj multe da aliaj. Yelland, el Aspremont, malliberigita ĉe St. Denis, eldonis gazeton, krom instrui inter siaj kunhomoj!

NI KAJ OCCIDENTAL. Niaj bonkoraj kontraŭuloj en Svisujo, la Occidentalistoj, ĝentile avizas nin pri ricevo de la Julia 1944 numero de La Rondo, kaj samtempe permasas al si baton al la akuzativo per la jenaj vortoj (tradukitaj):---

"Tre instrua estas la kurso por komencantoj, en kiu estas pritraktate la subtilaĵoj de la akuzativo. La gvidanto klarigas ke la numeraloj ne prenas la akuzativon; tamen miliono kaj mulo prenas ĝin kaj oni devas diri: Mi vidis du milionojn, se oni deziras skribi bonan Esp-om."

Skribante en mia propra nomo kaj respondeco, mi konsentas ke, precipe en iaj tekstoj, la ofte ripetataj formoj "miliono(jn) da" aspektas pezaj kaj necesigas efektive troan, ĝenan elspezon de pacienco kaj skriba forto. Bedaŭrinde, "miliono" estas substantivo, ne kardinala numeralo. Salutinde estus, se la Lingva Akademio post la milito esprimus sin favore al enkonduko de milionkaj milliard (same bilion, biliard k.t.p.) ankaŭ kiel kardinalaj numeraloj, por ke ili prenu lokon apud unu, du, tri, k.c. P.Stojan en "Esperanto" Aprilo 1925 skribis: "...dek milion' homoj aliĝos al Esperanto."

Mi prenas la okazon rimarki ke inspirige estis ricevadi el Svisujo dum la tuta milita tempo la revuon de tiuj ĉi mondlingvanoj. Per ilia gazeto mi sciiĝas ke la interlingva demando en Svisujo estas vive diskutata kaj ke ĉie en tiu lando estas evidenta kontraŭemo al la Basika Angla. ---F.R.B.

WEDE. (Weltdeŭtsch). Tiun proponis D-ro Baŭmann en 1915 "por la lingva unuigo de la centreŭropaj kaj al ili amikaj ŝtatoj." WEDE estas simpligita Germana lingvo kun simpligita gramatiko, simpligita ortografio kaj kun la vortoj, kiuj malbonigas kaj kripligas la formojn de la viva Germana lingvo. Por personoj ne konantaj la lingvon Germanan, la sistemo WEDE restas fremda kaj nekomprenebla. Por la Germanoj ĝi estas nenion-rememoriganta karikaturo de ilia propra gepatra lingvo. (El la ĉapitro "Simpligitaj Vivantaj Lingvoj"---Historio de la Mondo-lingvo, de Drezen).

PRI FAMA FRAZO. La Francoj penas traduki elegante kaj klare la faman diron de Churchill en lia laŭdo de la Brita Aerarmeo:- Never was so much owed by so many to so few. Ilia plej bona ĝis nun estas:- Jamais autant n'a été du par autant d'hommes à aussi peu. Ni modeste sugestas la jenan en Esperanto, atendante pli bonan. "Neniam estis tiomege ŝuldita de tiom multaj al tiom malmultaj." F.R.B.

USONA MILITŜIPARO KAJ ESPERANTO. Por kontroli marfluojn la Usona "Naval Hydrographic Office" eldonas oficialajn "botelpaperojn" sur kiuj maristoj markas la datojn kaj poziciojn en kiuj ili ĵetas la

botelojn en la maron. Sur la paperoj estas petoj, ke iu trovanto informu la aŭtoritaton pri tio, kie kaj kiam la botelo] estis trovitaj. La petoj estas presataj en ok lingvoj, inkluzive ESPERANTO.
("National Geographic Magazine,"p133)

A.HENRY writes to John o'London's Weekly (London) "....before the war radio broadcasts in Esperanto were becoming widespread over Europe, but not in Britain. A program of 1930 indicates that there were 14 stations broadcasting Esperanto in Germany, 8 in Russia, 6 in Austria, 2 in Czecho-Slovakia, 5 in France, 4 in Switzerland, as well as Holland, Belgium, Italy, Jugoslavia, Estonia, Lithuania, Norway and Sweden.

"An interesting example of radio use of Esperanto occurred four years ago. During air raids over England and Germany August 1940 both the B.B.C. and German stations were off the air, and I stumbled on a little-heard Bulgarian station. A voice from Sofia was calling on the people of Rumania and Hungary to solve their dispute without war. A peaceful settlement was much more desirable. The language of this appeal to sanity was appropriately Esperanto."(6.10.44)

POOR OLD BASIC! A story is going round about a Czech soldier in London, who had been studying Basic English. Approaching a policeman, he said: "Please, Bobby, which watch?" By and by the policeman got it and held out his wrist watch for the other to see. "Six watch? Such much?" said the soldier and hastened on his way.
(New Zealand Esperantist Feb. 1945)

---

ASOCIAJ AFEROJ.

LA KORESPONDA KURSO jam trafis iom da sukceso, kaj de ĝia komenco en Aŭst. ni vendis pli ol 35 ekzemplerojn. Ĝis nun la sola reklamado konsistis el anoncoj de ĵurnaloj, kiam la kurso establiĝis. Ni jam havas £9 por reklamadi en gazetoj tutlande legataj kaj oni arangos tuj kiam eble. Ni esperas, ke ĉiu individuo kaj grupo daŭre faros ĉion eblan por sukcesigi ĉi tiun kurson, kiu povas alporti nian lingvon al la multaj personoj kiuj ne povas viziti klubĉambron. En nia lando estas grupoj en nur 7-8 lokoj. Ĝis ni povos disvastigi la lingvon al ĉio urbo ni ne povas atendi gravan publikan subtenon al niaj penoj. Kie ajn vi loĝas laboru por la koresponda kurso----ĝi estas unu el niaj pli akraj bataloj en la lukto. La prezo, 10/-, rajtigas lernanton al la helpo de instruisto, kiu korektos kaj konsilos pri lecionoj. Aliĝpetojn kaj informpetojn sendu al S-ro F. A. PITT, c/- KOORNONG SCHOOL, WARRANDYTE, VIC.

LIBROJ. Tre povas esti, ke nenio helpas lernanton pliboniĝi la stilon kaj plivastigi la kapablon uzi vortojn, ol legado de interesa historio. Multaj personoj studas Esp-on dum jaroj, eĉ ne trarigardante legolibron. Tia studmetodo limigas la esprimkapablon al stilo spegulata en lernolibro, kaj al tiuj frazoj, kiuj ial venas libere en la propra menso. Se ni volas akiri la

esprimvastecon de altgrada beletristkulo ni devas nin turni al la verkoj de tiuj aŭtoroj kaj tradukistoj, kies plumo jam allogis tutmondan laŭdon. Legado de interesaj romanoj, misteroj, aventuroj aŭ vojaĝoj ne nur grave influas la stilon de leganto sed ankaŭ alportas intereson al la lernado, kion sola legolibro ofte mortigas. Ĉiu samideano devus posedi kelkajn bonstilajn librojn, kiujn li povas legi kaj studi, kiam ajn li volas. Tiujn malmulte kostajn librojn de la Epoko Servo oni povas aĉeti de la Perantoj de nia Libroservo (Prezo 2/3 plus afranko). Sed estas multaj aliaj legindaj libroj kiujn la Sekretario povas importi. Sur paĝo 12 de Jarlibro aperas listo de kelkaj el la importeblaj legolibroj, kaj inter la Anglolingvanaj verkistoj estas Edna Ferber, G.K.Chesterton, E.P.Oppenheim, H.G.Wells Agantha Christie, Sir H.R. Haggard kaj P.C.Wodehouse. Ankaŭ estas bone konataj alilandaj verkistoj, kiel P.Merimee, Molnar, C.Collodi, Ivans kaj K.Aszlanyi. Al ĉiu lernanto kaj progresinto ni sendas inviton uzi la Libroservon pli altigante la stilon kaj pliriĉigante la konon de Esp-o.

KOTIZOJ. Individua Membro kun nia Oficiala Organo, LA RONDO, 6/-. Pagu al la Kasistino, F-ino W.ADDIS (Ne al la Sekretario.)

G.H.HILLERMAN (Sekretario)
15 Morrice St., Lane Cove, N.S.W.

---

NEKROLOGO :- Majoro Kurt Walther, mortfalis ĉe la orienta fronto; li estis la lasta Ĉefo de la Germana Esperanto-Asocio.

---

EL PALESTINO. De s-ro N.B.Ĥavkin, Givat Shaul, Jerusalemo, ni ricevis tri dense skribitajn foliojn pri sociordo proponita de hebrea verkisto Poper-Linkeus. Ĝi estas kontrastata kun la Beveriĝ-plano. Ĉiu serioza studanto de la homara organizado petu ĝin ĉe supra adreso.

---

VERA SERPENT-RAKONTO. Verkis S-ro Ajnulo.

Dum mi kamploĝis antaŭ unu semajno, mi vekiĝis noktomeze kaj pensis, ke estas io sur mia piedo, tamen mi ne multe atentis, ĉar ĉe tiu kamploĝejo la didelfoj estas malsovaĝiĝintaj kaj manĝadas de mi lasitajn panpecojn, kaj mi pensis, ke unu el ili transiras mian piedon por havigi al si panpecon. Duondorme mi movis la piedon, kaj jen! io frapis ĝin (aŭ pli ĝuste, frapis la litkovrilon sur la piedo). Mi tuj vekiĝis kaj direktis torĉo-radion pieden, kie troviĝis granda tapiŝa serpento (carpet snake) svinganta sian aĉaspektan kapon dekstren-maldekstren. Dume en dufut-fora panujo sidas didelfo facilanime manĝanta, eĉ ne rimarkinte la manĝonton! Verŝajne la serpento elektis rampi trans mian piedon por atingi sian viktimon, kaj tiel vekis min. Nu, mi tuj pafis la serpenton dufoje tra ĝia kapo.
La postan matenon mi senhaŭtigis ĝin; ĝi estis longa naŭ futojn.

Ĉu vi scias kiel oni senhaŭtigas serpenton? Oni najlas ĝian kapon al arbo kaj poste trančas ĉirkaŭ ĝia kolo per akra trancilo, tiam estas tute facila afero detiri la haŭton intern-eksteren. Tion farinte, oni plenigas la (kvazaŭ-kolbasan) haŭton per seka sablo kaj pendigas ĝin en la sunvarmo, por ke ĝi sekiĝu.

Nu, mi ĝuste tion faris, kaj hodiaŭ mi opiniis la haŭton seka, tial mi trančis laŭ la ventro por ellasi la sablon, kaj kion vi pensas? Kiam mi denove mezuris ĝin, mi trovis, ke ĝi nun estas longa dekunu futojn! La solvo estas tute facila: la pezo de la sablo longigis la haŭton ankoraŭ du futojn.

Ordinare me ne senhaŭtigas serpenton, sed mi sciis, ke neniu kredos min, se mi ne havos la haŭton kiel atestajon. Nun anstataŭ naŭfutan serpentan haŭton, mi havas dekunufutan!

---

KVITANCOJ ricevataj dum Aprilo 1945.

S-ro Kidd 28/4; S-roj F.A.W, Thomas, Maddern, Onn, Cowleym M.Cassidy J,Coulstock, R.Lechmere, Charles Thompson 48/-; S-inoj Groeneweg, Dunn, E.Cadell,Sainsbury, 24/-,; S-ino Jones 10/-; S-ro Cohen 6/5; F-ino Carrick 8, F.Strempel 6/-; Dr.F.Williams 6/-; Bris. Esp.Soc. 4/6. £7.1.4. Al A.E.A. £1.7.0. Al La Rondo £5.14.4. Elspezoj por La Rondo £3.19.1 En la Kaso £6.7.1.

Frino W.ADDIS, (Kasistino), 25 Greville Ave., Flinders Park, Adelaido, S.Aus.

---

La Rondo, La Rondo,
De Post sia fondo
Tre multe utilis
Por ĉies plezuro,
Sciigo, instruo,
Tra Antipodio.
Abonu! Abonu!
Subtenon aldonu!
Ĉar kiel ni revas,
Ja kreskas ĝi devas
Ĝis povi formeti
Je l' ŝablon-ĉemizo,
Por taŭge sin vesti
Per linotip-kliŝo.
Laŭ voĉo el tondro,
Do..."Vivu La Rondo!"

De JoE. El Eta Heroldeto, No44 Apr. 1945.

Konata verkisto diris al sia edzino-"Ĉu ne mirinde! Mi ĵus aŭdis per telefono, ke la eldonistoj donos min multe pli altan prezon por mia nova libro. Ĉu ne mirinde?"
Respondis la edzino--
"Rigardu la koton sur viaj ŝuoj." L.E.B.

Pastro mendis ĉe pentristo grandan bildon por sia preĝejo. Post kelke da semajnoj la verko estis preta. Bela ĝi estis.
La pastro estis unue ravita, kaj ĝin alte laŭdis. "Sed," subite li diris, "kion vi faris tie? La anĝelo portas ŝuojn!"
"Certe," respondis la pentristo, kial ne?"
"Sed ĉu vi iam vidis anĝelon kun ŝuoj?"
"Kaj ĉu vi iam vidis anĝelon sen ŝuoj?"

Kiu estas la plej granda el la cervoj?
Alko: ĝis 1400 funtoj.

---

Published by F.R.BANHAM, 2 Banchory St., Essendon, W5 VIC.

OFICIALA ORGANO DE LA AUSTRALIA ESPERANTO ASOCIO

# LA RONDO




## THE AUSTRALIAN ESPERANTO MONTHLY

ELDONITA DE F.R. BANHAM.
2 BANCHORY ST. ESSENDON W.5
VICTORIA AUSTRALIA.

VOL. 5 No. 9 June 1945

# L A R O N D O.

REDAKTORO, F.R.BANHAM, D.B.E.A.
2 Banchory St., Essendon, W5 VIC. AUS.

ooooooo

Enhave aranĝas F-ino L.E.BAILEY., D.B.E.A.
18 Sherbourne Rd., Medindie Gdns., Adelaide, S.AUS.

-------------

Ni petas Redaktorojn laŭelekte represi kion ajn ili volus el niaj paĝoj. Ili nur sendu avize al ni ekzempleron de la gazeto en kiu aperas la represo.

----------------------------------------

## PAROLANTE KATOLIKE EN ESPERANTO.

De Pastro Gabriel N. Pausback (O.Carm.) en "Our Australian Sunday Visitor," Brisbano, 13/2/45.

En la Angla lingvo la vorto "catholic" literita per malgranda "c" signifas "universala." Jen kial Katolikoj (kun granda "K")kaj ĉiuj homoj kiuj sopiras mondunuecon pli kaj pli proksimiĝas al Esperanto, la "katolika" (universaleca) interlingvo, por helpi interkomunikadon de nacioj kaj popoloj, neniel sugestante ke ili malŝatu siajn naciajn lingvojn.

Skribis redaktoro de "New York Times":- "Ĝis nun komuna idealo kune-tenis la demokratajn naciojn. Se ili havus komunan lingvon la amalgo estus eĉ pli firma ol ĝi efektive estas nun, ĉar tia lingvo starus super la necesoj de milito ..... En la lasta sescento da jaroj ni vidis dudekon (1) da tiaj projektoj. Ĉiuj pereis, kun escepto de Esperanto, kiu estas de temp' al tempo parolata kaj skribata de supozindo 1½ milionoj da homoj, kaj aprobita de ses sciencaj kaj filozofia societoj, ankaŭ de la Naciara Ligo, Internacia Ruĝ-Kruco kaj Internacia Labor-Oficejo. Ĝi estas lernobjekto en la letera kurso de la Eduk Servo de la Brita Armeo kaj kelk-dudekoj da Britaj lernejoj."

Kian sintenon havas la Sankta Eklezio rilate al tiu mondlingvo; kiajn eblojn de fruktoriĉa utilo Esp-o proponas por Katolikaj celoj?

Multaj ankoraŭ ne scias ke Esperanto ricevis la benon de tri papo Pio X, krom sendi sian papan benon pli ol unufoje al la Internaciaj Kongresoj de Katolikaj Esperantistoj, esprimis jenon:- "Mi agnoskas (rekonas) la utilon de Esperanto por konservi unuecon ĉe Katolikoj tra la mondo. Esperanto ja havas antaŭ si grandan perspektivon." Benedikto XV, kiam, arĥiepiskopo de Bologna, publike esprimis deziron ke kelkaj el siaj pastroj helpu propagandon de helplingvo kia Esperanto kaj, poste, li benis almenaŭ unu Katolikan Esperanto-Kongreson. Pio XI, letere al la Itala Ligo de Katolikaj Esperantistoj esprimis laŭdon kaj plezuron pro mesaĝo de lojaleco kiun sendis al li la Ligo, kaj kun aĝigis ĝin en ĝia laboro. Tiurilate mi aldonas la nomojn de Kardinaloj Gasparri, Corretti kaj Fiffl, kaj aliaj princoj kaj pontifikoj de

la eklezio.

Kial Esperanto devus esti elektita kiel mondlingvo prefere el ekzemple la Angla aŭ Hispana? La Angla estas relative facila, laŭ gramatiko, kaj multego da homoj ĝin uzas, sed ĝia prononco igas ĝin unu el la plej malfacilaj de la Eŭropaj lingvoj. Aliflanke, ĉu la Angleparolantoj volonte akceptus la Hispanan kiel helplingvon universalan? La sperto de la aŭtoro pri diversaj modernaj lingvoj opiniigas lin al tio ke la Hispana estus la plej akceptinda el ili por tia rolo, pro ĝia relativa facileco, sonbeleco kaj esprimpovo. Sed ĉe ĉia nacia lingvo stariĝus naciaj kaj religiaj bariloj.

Kial nacia lingvo ricevu tian honoron? Kial unu popolo ricevu tian avantaĝon super la aliaj? Krome, prezentu al vi la malfacilojn kiuj estiĝus se nacia lingvo tiel uziĝus de la tuta mondo! Rimarku la drastajn liberojn kiujn prenis kun la Angla la Basikistoj en ĉia provo fari sian projekton internacia!

Latino estas neŭtrala kaj hodiaŭ ĝi restas la oficiala lingvo de la Eklezio. Sed ĝi estas tro malfacila por ĝenerala uzo. Ĝi ne havas vortojn por la aĵoj kaj ideoj de la nuntempo. Ĝi estas bonega lingvo por la filozofio kaj teologio, sed ne por la hodiaŭa mondo, kiu parolas pri poŝoj, horloĝoj, alumetoj, cigaredoj.

Esperanto ankaŭ estas neŭtrala---kaj facila. F-ino Doris Tappan, kundirektoro de la Tut-Amerika Interlingva Asocio (Esperantista) en "The Pan-American" (Julio-Sep. 1942):- "La baza vortprovizo de Esperanto devenas de la ĉefaj Eŭropaj lingvoj. La Latinaj lingvogrupoj povas tuj rekoni ĝis 80% de la radikoj. La Anglaj kaj Germanaj grupoj 60 ĝis 70%."

Esperanto povas riĉe servi al niaj soldatoj. La armepastroj povus paroli ne nur al siaj propraj homoj sed ankaŭ al homoj de ĉiu nacio, se Esperanto ĝeneraliĝus. Ili povus prediki kaj konfesprení en lingvo komprenata de ĉiuj. Pastro Csech (Esp-e: Ĉe) dum la lasta milito gvidis diverslingvajn malliberulojn. Ne povante paroli tiom da lingvoj, li arigis ĉirkaŭ si la militkaptitojn kaj instruis al ili Esperanton. Lia "rekta metodo" tiele populariĝis ke li donis sian nomon al internacia instituto de Esp-o (en Nederlando. Trad.)

En Manitoba (Kanado) pastro konfesprenis, kateĥizis, predikis kaj alimaniere donis spiritan helpon en Esperanto al homoj parolantaj inter si 17 lingvojn. Simile ĉe aliaj fervoraj misiistoj.

Vere, la Eklezio uzas Latinon kiel sian erudician kaj oficialan lingvon, sed ankaŭ vere estas ke por ordinaraj celoj la Vatican Curia uzas la Italan kaj la Francan, kaj, neoficiale, kiun ajn alian modernan lingvon. Multe pli simplaj estus tiuj interrilatoj por vizitantoj al la Eterna Civito se ĉiuj Katolikoj lernus Esperanton. Tiam, sen ĝeno, ili sentus sin perfekte "hejmece" ne nur en Romo sed ĉie kie troviĝas iliaj kunreligianoj.

(Sekvas paragrafo pri la movado en Aŭstralio.)

(1) Tiu cifero estas komprenebie maltrotakso. Trad.)

--------------------------(Resume tradukis F.R.BANHAM.)

# KRIPLULOJ EN LA ESTONTECA SOCIO.

(C.J.CALDERA.)

Dum la pasinteco, kaj bedaŭrinde ankoraŭ nuntempe, oni rigardas al la kriplulo j kun kompata okulo kaj, samtempe, ilin konsideras ne kapablaj zorgi pri siaj propraj bezonoj kaj tute ne taŭgaj por gajni la vivrimedojn. Kutime oni pensas pri senkruraj kriplulo j kiel lifto funkciistoj; pri blind uloj kiel korbofaristoj k.t.p., tiel limigante al ili la laborsferon laŭ netolerebla malliberaleco. Mi havas amikon, juna blindulo, kiu dum la lasta jaro sukcesis kun honoro en la abituriento okzameno kaj nun sekvas la kursojn ĉe la Okcidenta Aŭstralia Universitato; parolante kun mi en Esperanto, li plurfoje plendis pri la sintenο de la homoj rilate al la blinduloj. Li diris, ke la blinduloj ĝenerale tute ne ŝatas la publikan kompaton; ili deziras, ke la homoj proponus al ili malplian kompaton kaj plian helpon por trovi taŭgajn oficojn, kiujn ili povus plenumi tiel lerte, kiel la personoj, kiuj ĝuas la bonon de perfekta vidpovo. La kriplulo j hodiaŭ ne plu estas pretaj ricevi almozon de la bonkoruloj, kiel en la Mezepoko; ili rajtas, ke la moderna socio organizu la aferojn kun pli praktikaj konceptoj, tiel ke la malfavoratoj de la sorto ne plu sentu sin, ĉiumomente, ofenditaj en la persona fiereco pro nekapablo labori kiel la aliaj anoj de la socio. Ili volas perlabori la vivrimedojn kaj havi senton de kompleta egaleco kun la ordinaraj homoj. Rusujo, dum la milito, jam adoptis tiun vidpunkton, kaj la kriplulo j en tiu lando estas tiaj nur nome, ĉar fakte ili donas al la nacio tiom da laborrezulto, kiom tute sanaj laboristoj, se nur ili estas okupitaj laŭ taŭga maniero.

En urbo Chicago, ekzistas firmo starigita de krurperdinto (S-ro George Barr) por la komercado de medicinaj provizaĵoj kaj medikamfizikaj malhelpoj, kiaj en la pasinteco ne permesis al persono labori, pro malfavoro de la dungistoj. S-ro Barr spertis persone la stultecon de la socia ordo, kiam, laborante por firmo en St.Paul, li vundiĝis kaj fine oni amputis al li kruron. Krom la kruro, li ankaŭ perdis la oficon! Kaj ricevis kompaton! Tia socia maljustaĵo lin stimulis krei al si sendependan pozicion. Li inventis specialan recepton por fiksi la ondforman hararanĝon de virinoj; li ĝin protektis dum ŝekto, kaj kolportis la produktaĵon tage, ĝin vendante al la frizistaj butikoj.

Tio estis la komenco; laŭgrade li disvolvis la negocon kaj lia unua dungito estis surdmutulo; post multaj jaroj li atingis la prosperecon en la aferoj. Sed rememorante sian personan kruelan sperton, li decidis, ke la firmo kiun li kreis per sia laboro, estos la haveno de la kriplulo j. Uzante la scion akiritan en la ĉiutaga fabrikeja laboro, li taŭge elektis por ĉiu malfeliĉulo kiu petis lian helpon, la ĝustan okupon, tiel ke la laboristo povu kontentige fari laboron; per tiu metodo, li redonis al la kriplulo j la fidon en la persona povo, la memrespekton, kaj kiel dungisto li ricevis de siaj kunlaborantoj rezultojn pli bonajn ol kutime oni ricevas de laboristoj.

Pro tio li povis pagi al ili malavarajn salajrojn kaj ofte superpagojn. S-ro Barr atestas, ke personoj kun fizikaj malhelpoj disvolvas apartajn kapablojn; tial, se taŭge okupitaj, ili donas pli kontentigajn rezultojn ol normalaj homoj.

Ĉiuj scias, ke la blinduloj, kiuj uzas tuŝon anstataŭ vidon, akiras tre delikatan kapablon por laboroj, kiuj bezonas tiun econ; surdmutulo kutime havas treegan lertecon en la fingromovo, kaj precipe taŭgas en laboroj bezonantaj rapidmovon de la fingroj; kriplulo, kiu uzas ĉiam lambastonojn, disvolvas fortikajn muskolojn de la brakoj kaj ŝultroj, kaj kapablas pli ol ĉiu alia en laboro bezonanta la streĉon de tiaj muskoloj.

La ekzemplo de tiu Usona firmo estas sendube granda instruo al la homaro kaj mi esperas, ke ankaŭ en Aŭstralio oni povus sekvi la vojon difinitan de S-ro Barr por la valorigo de la kriplulej kies laborpovo, sub specialaj kondiĉoj, estas tute egala al tiu de sendifektaj homoj.

---

## ĈU VI PERMESUS UZI TELEFONON......?

(P.McK. en "Sun," Melb. Trad F.R.B.)

Mi estas la ĉefa sencerbulo en la strato. Mi ne nur pagas la lu-monon por la telefono, kiun uzadas la plimulto de miaj najbaroj, sed ankaŭ la koston de ĉiuj misvokoj kiujn ili naskas per sia malkompetento. En la plej glaciecaj noktoj mi trenas min de lito por servi kiel paĝio al tiuj parazitoj kaj mi preskaŭ neniam ĝuas neinterrompitan manĝon. Mi estas publika bonfaranto, kies servado al la socio estas tiom granda, kiom sendanka.

La teorio, ke la hejmo de Anglo estas lia propra privatejo, estas nereala senĝajo kiom koncernas mian. En kiu ajn horo de tagonokto aplombe envenas homoj kiuj uzas ĉiam la saman signaldiron:- "Mi nur volas uzi vian telefonon." Antaŭ ol mi povas atentigi ilin pri publika telefono ĉe la apuda stratangulo, ili jam manipulas sian unuan malĝustan ciferon.

Foje, kun mensoga ridetaĉo, ili diras:- "Mi scias ke mi estas ĝenulo," kaj mi sentas tenton rebati:- "Tio vi efektive estas," sed ĝis nun mankis al mi kuraĝo voĉi la vortojn. Iam mi kolektos sufiĉon da animfirmeco---eble.

Iuokaze mi preskaŭ ribelis. Viro telefonis min por babili kun la ĉi-loka koketulino. Mi informis lin ke iri laŭ la strato por venigi ŝin estus por mi malagrable neoportune. Li certigis min ke gravega estas la afero. Mi kredis lin, sed post ŝiaj komencaj vortoj mi konstatis ke li volis nur aranĝi plezurrenkonton. Tio estis tro, eĉ por azeno kia mi. La aŭdilon mi ekprenis de ŝia mano kaj parlis al li:- "Haltu! Vi diris ke la afero estas grava!" Lia fora voĉo respondis:- "Jes, ja vere! Mi volas paroli kun ŝi pri la amo. Ĉu ankoraŭ vi ne scias ke la amo estas el ĉiuj la plej grava?"

"Vi...! " mi indigne balbutis, kaj dum mi kolere vortkraĉis en

la ilon ŝi ŝovis foton sub mian nazon en maniero kiu enhavis rektan minacon, dirante:- "Jen li, rigardu!" Li estis fortmuskola sesfutulo en uniformo invadtrupa. Mi fieras pri rapida komprenpovo, do telefonis:- "Ĉio bona, kamarado. Telfonu min kiam ajn vi volos."

Kaj tiaj ulaĉoj havas impertinenton skribi al ĵurnaloj, plendante ke ili estas priŝtelataj ĉar foje ili tri pencojn pagas por telefonvoko.

Alexander Graham Bell tre kulpe respondecas.

---

## BONŜANCO KAJ MALBONŜANCO.

Resumo de ĵurnala artikolo. L.E.BAILEY.

Imagu la enhavon de grandega magazeno ie en Okcidenta Aŭstralio. Imagu ke troviĝas vestaĵoj por la plej eta infano ĝis la plej granda plenkreskulo. Ankaŭ ke troviĝas bareloj da viŝtukoj, litotukoj, kapkusenkovriloj. Por virinoj kosmetikoj, vizaĝkremoj, lavsanigiloj lipŝminko, silkecaj subvestaĵoj, ŝapoj. Por la petrol-malsata bienisto kaj muelisto grandaj ujoj da altpreza benzolo kaj vastaj pecoj da ledo. Skribmaŝinoj, medicin-provizaĵoj, malvarmigiloj, koviloj, elektro-fornoj, kaj, kiel diras Sinjoro Aŭkciisto, vasta amaso da diversaĵoj tro multaj por mencii. Nu, ĉiajn tiujn mense vidu montratajn, nete kaj loge sternitajn laŭ la marbordo kvin aŭ ses mejlojn longe. Tie ili kuŝas, kaj postuliĝas neniaj kuponoj, nenia mono, ĉeestas neniaj butikestroj, neniaj komercistoj rigardas---vi nur promenadas kaj prenas kion al vi plaĉas.

Kia nekredebla bonŝanco por la nuna tempo!

Tamen tiu estis la vidaĵo kiu frapis la okulojn de malmultaj tendo-loĝantoj unu matenon sur la marbordo "ie en Aŭstralio", kiam ili eliris por ĝui la matenan marbanon aŭ fiŝkapti por la tagmanĝo.

Nenecesas diri ke ekscitego regnis. Patrinoj kuregis tien kaj reen, elektante familiajn bezonaĵojn, dum la viroj luktis kun pezaj bareloj kiujn ili klakrulis sur la sablaĵo kaj montetoj, kaj la juna generacio, plene ekipitaj por basbal-ludiloj, trovis superi siajn film-heroojn. Ĉiu estis feliĉa.

La novaĵo rapide disvastiĝis. Antaŭ ol pasis dudek kvar horoj, la marbordo estis plenplena de familioj kiuj alvenis por partopreni la bonaĵojn, alportante manveturilojn, ĉevalveturilojn, glitilojn, puŝĉaretojn kaj anstataŭaĵojn eltiritajn el malluma kaj polvecaj anguloj de budoj.

Ĉio ĝojege progresis, ĝis la malgaja novaĵo cirkulis, ke oni rompas la leĝon, ke tuta la laboro estas malŝparita, kaj ke oni devas liveri la aĵojn al la estraro.

Sed dum la tempo kiu jam forpasis multaj vendoj kaj interŝanĝoj okazis. Komercistoj de la regiono estas farintaj aĉetaĵojn, kaj bienistoj, fabrikistoj kaj aliaj estas uzintaj la benzolon---kun preskaŭ ruiniĝo al certaj antikvaj aŭtoj. Malgraŭ tiuj ĉi malhelp-

oj, konstanta rivero de savitaĵoj komencis enflui en la apudajn policejojn, ĝis iliaj muroj preskaŭ elkrevis pro manko da spaco. Multaj homoj rapidis por deklari aĉetaĵojn faritajn aŭ aĵojn kiujn ili ne povis redoni ĉar ili jam uzis ilin. Du homoj estis arestitaj, kaj peza malĝojo nun anstataŭis la antaŭan gajecon.

Tamen du faktoj elstaras. La homoj ne sciis ke ili Dompas la leĝon---ke ŝipsavaĵoj apartenas al la registaro, kaj ili neniel kaŝis sian eltrovon, kaj sekvan agadon. Ankaŭ sen tiu agado la tuto estus perdita ĉar la maro estus forglutinta ĝin per sia venonta tajdo. Vere, evidentiĝas ke la popolo pro sia laboro savis por la registaro centojn da funtoj.

Kio do, okazos? Kompreneble, ekzistas multa konjektado en la regiono rilate al kio estas en la oficiala menso pri estontecaj procesoj pro la fakto ke Naciaj Porciumaj Oficistoj (Commonwealth Rationing Officials), Doganaj Oficistoj kaj oficistoj de la Krim-Esplorada Fako entreprenas la aferon. Tiu pruvas ke la registaro rigardas tre seriose certajn flankojn de la stranga afero. Sed kial la aŭtoritatuloj ne pli frue agis? Ĉu ili ne aŭdis pri ĝi tiam, kiam aŭdis pri ĝi la najbaraj loĝantaroj?

Certe estas, ke se ĝi malliberigos ĉiun "kulpulon" kiu partoprenis, la bovinoj ne estus melkataj, la porkoj vane blekus ĉe siaj malplenaj trogoj, ligno-fabrikejoj ne laboriĝus, butikoj fermiĝus, kaj la patrinoj ne estus ĉehejme por nutri la infanojn!

---

NOVA MONDO.

Verkis KAROLO THOMPSON .

"Satano malsana Sanktulo volus esti;
Resaniĝinta diablo, nenia sanktulo li!"

Estas multe da parolado flanke de politikistoj kaj pensemuloj pri Nova Mondo. Ili konfidence asertas ke ni devas havi pli bonan sistemon en kiu troviĝos komforto kaj sekureco, sed neniu havas ian ideon kiel tion fari.

Fur la Esperantistoj faras ion pratikon tiudirekte, ĉar certe la uzo de universala helplingvo havus konsiderindan influon en la postmilita tempo, kiam homoj el la kvar anguloj de la terglobo intervojaĝos kaj intermiksiĝos en maniero kiun ni ne povas imagi hodiaŭ.

---

ERAROJ en la Majo:- 105/10 de la malsupro: renkontis sin; 108/28 literumas; 110/10 de mals., bataliloj; 111/7 tuj; 111/1 beletristikulo.

---

AŬDITA en lifto ĉe Adelaide: La liftisto-"Zorgu vin, Sinjorino! rigardu la ŝtupeton!" La sinjorino--"Nu! Kia stulta loko por ŝtupeto!"

---

## LA EDZINETO.

"Kien la edzo, ho ĉarmulino,
   Kien la edzo do vaĝis for?"
"En Nederlandon li militiris;
   Kaptito fariĝis en nuna hor'."

"En Nederlandon li militoris;
   Tio nun kuŝas mia sinjor!?"
"Por revenigi, ho ĉarmulino,
   Kiom vi donus da pura or'?"

"La oran kronon de Ludoviko
   Kune kun la reĝa trezor',
Por revenigi lin, mi ja donus,
   Lin la juvelon de mia kor'!"

"Kiom eĉ pli, ho ĉarmulino,
   Kiom eĉ pli da granda valor'?"
"Versajon, Luvron, Sankta-Donison,
   Tion ĉion mi donus for!"

"Fontanebloon mi donus, Vincenson,
   Kune kun la reĝa trezor';
La perlon mirindan, Notre-Damon;
   La tutan Parizon por mia sinjor'!"

-----------------------Adaptis, el la franca, JORDIKO.

## TRADUK-KONKURSOJ.

Traduko de Konkurso 22: (Kompilita el 3 tradukoj).

La kleruloj diras, ke la intenseco de koloro kaj bonodoro en la fora Nordo rezultas el la forto de l' lumo, kiu plenigas la aeron, kiam la suno brilas tage kaj nokte sen interrompo. Tial oni ne povas ŝirpreni fragojn kaj frambojn samo aromajn aŭ betulbranĉojn samo bonodorajn en iu alia klimatejo. Se feina idilio havas iun ajn hejmon, ĝi certe troviĝas en la profundaj fjordvaloj de Nordlando dumsomera. Estas, kvazaŭ la suno estus kisanta N aturon tiom pli karese, ĉar ili havas tiel mallongan tempon de kunesto kaj devas baldaŭ disiĝi denove.

VENKINTA GRUPO: Melbourne Esperanto Club.

Tradukota Teksto Konkurso 24:

We didn't catch up with the great army of refugees until we passed the city limits. From then on we were a member of this army. It is one thing to see thousands of weary refugees in the newsreels; it is something quite different to be one of them. We moved slowly, sometimes we would be held up for as long as three hours without moving. The road stretched from Paris to Bordeaux

four hundred miles away, and it was packed solid that entire distance. Thousands of these people had come from the north, many had been on the road for two weeks. They had only one thought: move south. Move away from terror that swooped down from the skies. Move away from the serfdom that would be theirs under German rule. Few had any money. Few knew where they were going.
(Quentin Reynolds: The Wounded Don't Cry.)

Tradukaĵoj devas atingi la subskribinton antaŭ la 10.7.45.

P.E.SCHWERIN, 1 Carabella Flats, McDougall St., Milsons Point, NSW.

---

LITERATURECA TRADUKO. de F.R.BANHAM.

HEINE. Heine's genius remains unique. Full of dreamy attachment to Germany, he lived and died in Paris, but his heart was always with the exiles of Israel. Mocker and ribald, he touched depths of sentimental tenderness sounded by none other. He fooled the philosophers, provoked the pious, and confused the minds of his free-thinking friends by outbursts of wilful reaction. He sticks the horns of satyrish "diablerie" on the lovely forehead of the most delicate romance; and he flings into his magical poems of love and the sea the naughty mud-pellets of an outrageous capriciousness.

. La genio de Heine restas unika. Plena de reva sinaldoniteco al Germanujo, li vivis kaj mortis en Parizo, sed lia koro estis ĉiam kun la ekziluloj de Izrael. Mokanto kaj maldecemulo, li tamen tuŝis fundojn de sentimenta kormoleco neniam sonditajn de alia homo. Li mistifikis la filozofojn, kolerincitis la piulojn, kaj konfuzis siajn liberpensajn amikojn pro eksplodoj de obstina (1) reakcio. Li metas la kornojn de satirusa diabloruzo (2) sur la bela frunto de la plej delikata amidilio, kaj en siajn magiajn poemojn de l'amo kaj la maro li ŝovetis (3) la maldecajn pipraĵojn de pudoronskua (4) kaprico.

(1) aŭ pikpetola. (2) Grosjean-Maupin donas sorĉaĵo, ruzega artifiko, ruzegaĵo. Ili ne kontentigas. (3) fuŝmetaforo: pellets in poems? (4) pudoro: sekshontemo, modesteco.

---

de JOEDIKO. Pri la esperantigo de tiu "fama frazo" (La Rondo, p.109) mi sugestas: Neniam tiomaj tiom ŝuldis al tiom malmultaj. Tamen, eĉ tiel la frazo restas "angla idiotismaĵo" pro manko je la sencdona vorto. Efektive, la frazo en Esperanto devus skribiĝi: Neniam antaŭe, tiomaj tiom ŝuldis, ktp.

TRADUKU! (1) What do you know, that we don't know? (2) Live as you will have wished to have lived when you die.

## ASOCIAJ AFEROJ.

KORESPONDA KURSO. La unua reklamo de la kurso aperis en "ABC Weekly" datita Majo 13-19a. N i esperas, ke provizajoj de la kursa materialo permesos oftajn reaperojn de la reklamo kaj en tiu gazeto kaj en aliaj. Ni denove admonas membrojn fari ĉion eblan por reklami kaj popularigi ĝin inter tiuj personoj kiuj ne povas viziti klubĉambron. Regas la kursaferojn S-ro Pitt, C/o Kurnong School, Warrandyte, VIC.

La "advanced" koresponda kurso de la British Esperanto Association estas importebla por tiuj legantoj kiuj volas atingi la lingvonivelon de Diplomito. Multaj samideanoj baldaŭ volos rekomenci internacian korespondadon per ĉi tiu kurso ili povas certigi al si, ke la Esperanto uzota estas senerara kaj bonstila. Nia movado pli kaj pli bezonas esperantistojn kiuj uzas la lingvon flue kaj bele. La prezo de la "advanced" kurso jus plimalaltiĝis al 21/-. Mendu ĉe la Sekretario.

PROPAGANDO. En la pasinta monato la milito en Eŭropo finiĝis kaj tiu en la Pacifiko malrapide sed certe alvenas al la ĝojiga tago, kiu alportos pacon al la mondo. En tiu monato ni ankaŭ legis pri la kunveno en San Francisco, kie delegitoj de multaj landoj diskutis la starigon de mondorganizo por certigi pacon daŭran.

Al la Esp-istoj la signifo devus esti klara---nia ŝanco antaŭenigi niaj ideojn por internacia helplingvo estas ĉe ni. Ni petegas ĉiun grupon en la lando diskuti en la klubĉambro metodojn por certigi, ke la nunaj kaj baldaŭvenontaj tagoj ne estos perditaj. Memoru ke eta propagando en ĝusta tempo estus pli efika ol granda peno, kiam la spirito de malintereso denove tenas la publikan menson. Ankaŭ memoru, ke se nia propagando sukcesos ni bezonos kiel eble plej multe da spertaj uzantoj de Espo. Diskutu, laboru, propagandu kaj studu nun, ĉar la tagoj de pacamantoj estas nun ĉe ni.

KOTIZOJ. Membro (kun nia oficiala organo) 6/-. Sendu kotizojn al la kasistino. Ne atendu avizon ke ĝi ŝuldiĝas. Sur poŝtbileto NE enskribu nomon de la urbo en kiu oni kontentos ĝin. La gazeta kaso ĉiam bonvenigas donacojn.

G.H.HILLERMAN, (Sekretario), 15 Morrice St., Lane Cove, N.S.W.

---

## MOTOJ.

KORESPONDANTOJ bonvole notu, ke Propaganda skribiĝas PropAganda kaj NE PropOganda!

AL NIAJ ITALLINGVAJ AMIKOJ! Ni havas jarkolektojn de "L'Esperanto" de 1932 ĝis 1934 (tri jaroj), kiujn ni volonte sendus senpage, kontraŭ simpla kosto de la afranko. Petu ĉe la Redaktoro. Ĝi eldoniĝis en Torino kaj estas plejparte en la Itala lingvo.

INTERESA BALOTO. La Minnesota Poll of Public Opinion, patronita de The Minneapolis Tribune, demandis reprezentecajn sekciojn de la Ŝtatanaro pri la sekvantaj:- "Ĉu vi kredas ke universala aŭ komuna lingvo, ĉiulande komprenata, estas efektivigebla, kaj ke ĝi meritas subtenon?" Ŝtatvasta rezulto: JES 74 %, NE 18 % NEDECIDA 8%. Al la jesuloj estis plue demandite: "Se tia lingvo ne estus la Angla, ĉu vi volus lerni ĝin?" RESPONDE:- JES 76%, NE 18%, NEDECIDA 6%.

Eksperimente la Internacia Statistika Instituto sendis al E-istoj en la okcidenta duonsfero demandojn en Esperanto, laŭ la konata metodo. Ĝi serĉas adresojn de Esp-istoj. Ĝia ejo: 329 East 37th Street, New York 16.

"LANGUAGE in War and Peace," de D-ro Mario Pei havas pri Esp-o kromĉapitron, en kiu legiĝas laŭda linio: "the only spoken international language" (la solnura parolata internacia lingvo).

(Supro estis tirita el The Pacifist-Esperantist Bulletin. Harold Ewen, Civilian Public Service, Pownal, Maine, U.S.A.

Konsciaj Esp-istoj atendas vastskalan propagandon de Basic pere de perpoŝtaj glumarkoj kaj stampiloj. Ni devas kontraŭagi tion per simila metodo. Kial ne vi, ĉiu unuopa Esp-isto, ne uzadas tiun malkaran sed tre okultrafan rimedon montri al la mondo ke nia afero vere vivas? Nur relative malmultaj el ni aĉetis kaŭĉukan stampilon; eĉ kelkaj grupoj ankoraŭ vegetas sen ĝi. Agu nun!

GEKORESPONDANTOJ wanted for group. Write to Miny Celestin,
39 Rue Marsilly, Denain (Nord) France.

MUZIKA TERMINARO:- Aĉetebla ĉe B.E.A., naŭ pencoj.

El la 2929 membroj de la B.E.A. je la fino de Decembro 1945, 1257 estas anoj individuaj de la I.E.L.

LA JENAJN malnovajn numerojn ricevus danke la I.E.L., Heronsgate, Rickmansworth (Herts): Esperanto Internacia 1941 Sept. kaj Dec.; ĉiuj numeroj 1942 kaj 1943; 1944 Jan.; kaj la unuaj partoj de la 1942 kaj 1943 Jarlibroj.

JAMES LEAKEY FUND. In 1936 the children of Mr. Leakey gave to B.E.A. nine shares in Spirella International Incorporated. The revenue is divided between the Scouts' Esperanto League, S.A.T. in Britain, B .E.A. B ooks for Schoolchild ren and B.E.A. Teachers' Holiday Fund.

---

PENSIGA DIRO:- Ĉu ĉiuj Francaj geknaboj devas lerni la Anglan lingvon, patrino?---Komprenoble, kara.---Do, kial mi devas lerni la Francan? ("Punch," 31.1.45.)

MORTO. Je 8 Januaro, Amy Louise Briggs, amata kaj agema pioniro. Ŝi aliĝis al B.E.A. en 1918, tradukis plurajn dramojn de Shakespeare, el kiuj Sonĝo de Somermeza Nokto eldoniĝis en 1920. Aliaj restas en MS.

HISTORIO de la ESPERANTO-MOVADO en OKCIDENTA AŬSTRALIO: Jen kvin folioj dense pakitaj per interesa kaj utila informo pri la movado en la okcidenta ŝtato de 1911 ĝis 1945. Ĝi estas frukto de laonga serĉlaboro kaj pacienca kompilo fare de nia fervora D-ro C.CALDERA. Jen imitinda entrepreno, kiu espereble instigos homojn en aliaj ŝtatoj fari similan. FRB.

"D.B.E.A." Venis al ni la penso, ke bone estos meti "D.B.E.A." post la nomoj de tiuj el niaj verkajaj kontribuantoj, kiuj rajtas ĝin uzi. Per tio ni aldonos informon pri la Esperantisteco de la personoj kaj eble vekos inter legantoj intereson pri la diplomo de la B.E.A., eĉ stimulos kelkajn fari provon ĝin akiri. Se, pro ia motivo, verkanto ne volos, ke la literoj aperu post nomo, li aŭ ŝi bonvole indiku tion skribe sur la manuskripto.---La Administracio.

MISKOMPRENO, PARDONON! S-ro E.Hanks rimarkigas al ni, ke en nia Marta numero, p.82, troviĝas misinformo. Laŭ lia kalkulo la nombro da vortoj en la Esperanta traduko de 1 Korintanoj 13 estas ne 155 sed 226, do pli ol la Rusa kaj la Greka. La peco aperis en The British Esperantist (Jan.-Feb. 1945). Ni represis la eltiraĵon ne kontrolinte ĝin, sed preninte ĝin en bona fido, firme supozante, ke la redakcio de tiu bone kompilita organo certe ne povas erari en tia afero. Ankoraŭ restas eblo, ke oni citas malĝustan ĉapitron. Ni atendas klarigon el Londono. FRB.

S-ro F.A.PITT ĵus ricevis:- 2-Viroj el Francujo po 6/6; 2-Vivo de Zamenhof po 6/6 ; 2-Aventuroj de M.Drake po 6/6; 2-Naiveco de P. Brown po 6/6; 2-Ŝi po 6/6; Epoko serio po 2/3.
Li havas ankaŭ plenan stokon de Edinburgh, Step by Step kaj Home Student.

ERARO. La disaŭdigo el 3SR de s-ro Turner okazas la DUAN SABATON en ĉiu monato je la 6.30 p.t., NE ĉiun duan sabaton.

LA ESPERANTA RENDEVUO anoncis novan LITERATURAN KONKURSON por la nuna jaro, 1945; por originala proza verko en Esperanto. Ni esperas ricevi provojn el ĉiuj ŝtatoj.

KONDIĈOJ. Ne estos enirpago. (La premio estos Esp-a libro.)
Sugestita longeco: 500 ĝis 1500 vortoj.
Skribu nur plum-nomon sur la verko. (En la lasta konkurso anoj ne bone atentis tiun informon.)
Nepre lasu spacojn inter la linioj kaj marĝenon de almenaŭ unu colo ĉe ĉiu flanko de la paĝo.

Sendi kune vian nomon, adreson, kaj plumnomon, en sigelita koverto.

La decido de la juĝanto estos fina. "La Rondo" rajtas presi la tuton aŭ parton de iu ajn de la verkoj, laŭ elekto de la Redakcio.

Ĉiu provo devas esti, antaŭ la fino de la jaro, en la manoj de S-ro E.S.HANKS, 736 Sydney Rd., Coburg, N 14, Melbourne, VIC.

LA VENONTA PAROLO pri Esp-o okazos ĉe 3 SR Shepperton, la duan Sabaton je 6.30 p.m. kiel kutime.

S To Turner tre dankas tiujn kiuj s endis gratul-leterojn al 3 SR, precipe tiuj de aliaj Ŝtatoj. Tio tre interesigis la estron de la sendstacio.

---

la 26an de Feb-o 1945.

En Chalons-sur-Marne
55 rue du Gal. Compére.

S-ro Frank Banham,

Mia kara Amiko,

De longa tempo mi ne povis skribi al vi kaj scias nenion pri vi. Kio okazis ĉe vi kaj al vi depost 1940? Espereble vi kaj la viaj ĝuas ĉiam bonan sanon. Miaj familianoj kaj mi mem fartas bone, kvankam mi trapasis terurajn momentojn, ĉefe en 1940 kaj 1944. En Junio 1940 mia domo kaj ĝia tuta enhavo estis detruita fare de la germanoj. Espereble nia helplingvo Esperanto ĉiam vivas en Aŭstralio. En Franclando ĝi ne mortis dum la milito. Mi ĉiam interrilatiĝis kun la Esp. centro en Parizo kaj propagandis (eĉ sen permeso) en mia urbo. Mi sukcesis renkontiĝi kun KELI-anoj en Nederlando kaj Svedlando dum 1942. Nune la Esp-ista vivo reviviĝas kaj Esp-organizoj renoviĝas. Ĉu F.Kemp bonfartas ankaŭ? Mi skribis p.k. al ŝi antaŭ kelkaj tagoj. Esperante bonajn novaĵojn el vi, mi premas kore vian manon.

Amike via
Rene Janson.

(K.E.L.I.---Kristana Esperantista Ligo Internacia.)

---

OBSERVO-SERVO. (Trad. E.S.HANKS)

Pro peto de la Brita Ornitologia Societo, registara departemento ordonis ke flug-lernantoj raportu pri migradoj de birdoj observitaj dum deĵoro en la aero. Post longa tempo la d epartemento iom akre atentigis la estrojn de ĉiu loko pri manko de informo.

"Estas necese ke vi kontentigu tiun malbenitan societon," diris la kapitano de grupo en Hindujo. Poste, de tiu loko, la Ornitologia

Societo ricevis la jenan raporton sub dato:-

"Mi havas la honoron informi vian societon ke hodiaŭ ĉe la dekaboro matene dum ekzercado ĉirkaŭ du mil futojn miaj subuloj kaj mi vidis aron de sep strutoj flugantaj sud-orienten.

---

KOMPARU KAJ ŜPARU! (Trad. F.R.B.)

Mi havis sep jarojn---rakontis la fama Benjamin Franklin---kiam iuj parencoj okaze de festotago donacis al mi kelke da moneroj. Tuj mi iris al butiko, kie oni vendis ludilojn. Sed la sono de fajfilo, kiun mi ekvidis en la mano de preterpasanta knabo, tiel bele plaĉis al mi, ke por ĝi mi volonte proponis al li ĉiom de mia mono. Li konsentis. Feliĉa pro mia komercato, rapidis mi hejmen, kie mi, fajfante, tramarŝadis ĉiun domangulon, ĉar mia fajfilo plezurigis min santiome kiel ĝi la tutan familion ĝenis. Kiam miaj gefratoj sciiĝis pri tio, en kian interŝanĝon mi trafis, ili certigis min, ke mi fordonis kvaroble pli ol ĝia efektiva valoro.

Mi nun ekpensis pri la belaj aĵoj, kiujn mi per la cetera mono povus esti aĉetinta, kaj la domanoj tiel tre ridis min pri mia naiveco ke mi komencis plori. La bedaŭro nun faris al mi pli da aflikto ol la fajfilo antaŭe faris da ĝojo. Sed ĉar tiu okazaĵo impresis min tiel neforviŝeble, ĝiaj sekvoj estis por mi tre utilaj. Ofte, kiam mi sentis tenton aĉeti propraplaĉe ion nenecesan, diris mi en mi: "Ne donu tro multe por la fajfilo!" kaj tiel ŝparis mian monon.

---

HOMA HONESTECO. (Boston Post. Trad. F.R.B.)

Iu viro decidis ne plu uzi sian aŭtomobilon. Li do ĉiaŭre starigis ĝin en la garaĝo kaj prenis al si biciklon. Unu tagon, farante la lastan butikviziton, li restigis ĝin ĉe pavimrando. Veninte el la ejo, li forgesis la biciklon kaj iris hejmen. Lia edzino rimarkigis al li tion, ke matene li ja uzis la biciklon. Febre li aŭtobuse reiris la lokon, kie li lasis ĝin, kaj je sia granda plezuro trovis ĝin ankoraŭ sur ĝia starloko. Plena de danko pro la honesteco de siaj kunburĝoj, li volis fari monoferon al la malriĉuloj de la urbeto. Irinte en preĝejon, li enpuŝis monerojn en la almozskatolon. Ardante pro ĝojo kaj sento de bonfaro, li elpaŝis el la diservejo kaj trovis---ke iu jam ŝtelis la biciklon.

---

Kiu loko sur la Franca marbordo estas la plej apuda al Angla? Cap Gris-Nez, 18½ Anglajn mejlojn.

---

Published by F.R.BANHAM, 2 Banchory St., Essendon, W5 VIC.

OFICIALA ORGANO DE LA AUSTRALIA ESPERANTO ASOCIO

# LA RONDO



## THE AUSTRALIAN ESPERANTO MONTHLY

ELDONITA DE F.R. BANHAM.
2 BANCHORY ST. ESSENDON W.5
VICTORIA AUSTRALIA.

VOL. 5 No. 10 July 1945

L A R O N D O.

L A R E D A K C I O .

S-ro F.R.BANHAM, D.B.R.A., REDAKTORO,
2 Danebury St., Essendon, W5, VIC.

F-no L.E.BAILEY, D.B.E.A.
19 Sherbourne Rd., Medindie Gdns., Adelaide, S.AUS.

F-ino M.A.ADDIS, KASISTINO,
25 Greville Ave., Flinders Park, Adelaide, S.AUS.

---

## RUSUJO MALFROSTIGAS SIAJN ARKTAJN TERITORIOJN.

de J.B.DAVIES. Tradukis (Mrs.) K.SCHWERIN, D.B.E.A.

Scienculoj sovjetaj sukcesis, malfrostigi la glaciiĝintan Nordon. Oni transformis vastegajn areojn de Siberia govaĝejo en riĉe produktivajn farmojn. Grandaj industriaj urboj, ŝtal-centroj kaj minejdistriktoj leviĝas, kie en 1939 ekzistis nur dezertaj kampoj de neĝo kaj glacio.

Tiu kolosa sukceso de la Rusoj estis unu el la plej strikte gardataj sekretoj de la milito. La historio de la obstina batalo, igi kultureblaj la arktajn dezertojn, estis jus publikita de la "Instituto de Eterne Glaciiĝinta grundo."

Tiu scienca korporacio, unu el la plej strangaj en la mondo, estas sub la direktado de profesoro Vladimir Obruchew, kiu estis la gvidanta geniulo de la projekto. La sukcesoj de la instituto en Siberio savis Rusujon de minacanta malsatego dum la krizaj tagoj de la nuna milito.

Kiam paco ekestos, ĉiaj eltrovaĵoj eble malfermos vastajn regionojn de la Arkto kaj Antarkto al industria kaj agrikultura evoluado.

Dum generacioj Siberio, balaita de neĝ-ventegoj, estis rigardata kun timego. Ekzistis rakontoj pri domoj kaj tutaj urboj, kiujn glacio subite englutis. Fabrikoj kaj fervoj-stacioj estis atomigitaj de misteraj eksplodoj subteraj.

Caraj inĝenieroj konfirmis tiujn okazaĵojn kaj nenio estis farita, por ekspluati la grandan mineral-riĉecon de Siberio. Sed antaŭ nelonge sciencaj ekspedicioj eltrovis la veran kaŭzon de la teruraj "glaci-malfeliĉegoj" en la frosta Nordo.

Ili trovis, ke arktaj regionoj estas milojn da jaroj malantaŭ la evoluo de l' klimato en la cetero de la mondo. Malproksim-nordaj areoj estas multe pli malvarmaj, ol ili devus esti, ĉar ili konservas sin malvarmaj. La "eterne glaciiĝinta grundo" firmfrostiĝis dum jarcentoj ĝis profundo de pli ol kvarona mejlo.

Nun scienculoj faris la mirigan eltrovon, ke profunde sub la glaciiĝinta tero estas fluoj da akvo. Eksterordinara premo konservis akvon fluida en tiuj subgrundaj riveroj kaj lasis ilin fluadi eĉ spite de malvarmigo ĝis multe sub Nulo. Super-malvarmigita akvo sub ĉi tiuj kondiĉoj havas la detruan forton de T.N.T.

Esplor-laboristoj spertis: kiam domo aŭ fabriko estas konstruita sur "eterne glaciiĝinta grundo," ĝia varmego iom post iom malfrostigas la suban teron. Jaron post jaro la grundo degelas malsupren, ĝis kiam unutage la varmeco atingas la subteran riveron. La malvarma, malliberigita akvo nun eksplodas rekte supren per nerezistebla fortego. Ĝi kreve trapenetras la teron kaj subakvigas la domon, poste preskaŭ sammomente ĝi firmglaciiĝas rezulte al liberiĝo de la granda premo, kiu konservis ĝin fluida. La konstruaĵo kaj ties enloĝantoj fariĝas solida glaci-bloko, nelasante iun postsignon pri la kaŭzo de la katastrofo.

Sovjet-inĝenieroj elpensis simplan metodon por protekti konstruaĵon en la glaciiĝinta Nordo kontraŭ la danĝero de tiaj erupcioj. Ili malaltigas palisojn profunden en la frostan teron, kiuj estas sufiĉe fortaj por subteni la plej altajn nubskrapulojn de la mondo. Sub la fundamenton de la konstruaĵo ili metas tavolon de materialo izoliga, kiu malhelpas la varmecon de la konstruaĵo malglaciigi la grundon.

Rusaj scienculoj poste solvis la problemon, malfrostigi la plej supran teron kaj varmigi la klimaton sufiĉe por ebligi terkulturon. Ili konkludis, ke la musko, kiu kovras vastajn teritoriojn en Siberio, ne estas simpla "izolilo," sed kontraŭe estas kovrilo, kiu faras la froston eterna. Aroj da fortoplenaj lokomobiloj estis transportitaj norden kaj forigis la muskokovraĵon de miloj da akreoj de glaciiĝinta tero.

Dum la unua somero post ĉi tiu eksperimento, la tero, de kiu la musko estis forigita, malglaciiĝis ĝis profundo de futo aŭ pli. Dum la sekvinta vintro, kiam estis la kutima kovraĵo de neĝo---kiu funkcias kiel izolilo kaj ne estas kondukilo kiel la musko---la grundo restis multe pli varma, kaj en printempo la malfrostiĝo progresis eĉ pli rapide.

Specialaj variaĵoj de cerealoj estis plantitaj tiujare kun bonaj rezultoj. Kun ekstrema sekreteco, miloj da akreoj de frostiĝinta tundro estis faritaj kultureblaj kaj uzitaj en la lastaj "tridekoj." Kaj sovjeta malsatego, je kiu la germana generalstabo kalkulis, estis deturnita.

La Instituto de Eterne Glaciiĝinta Grundo nun malkaŝas, ke kelkaj rehavigitaj terenoj en Siberio produktas pli bonajn gren-rikoltojn ol la fekundaj stepoj de la Ukraine. Scienculoj antaŭ nelonge faris la interesan eltrovon, ke ne valoras malfrostigi la glaciiĝintan grundon ĝis pli ol du futoj. La malgranda arkta pluvo-kvanto sufiĉas, por subteni rikoltojn en ĉi tiu profundo de la tero sen irigacio. La scienculoj frontis la malsimplan problemon, eltrovi

metodon, por kontroli la degel-proceson. Ili sukcesis kun rimarkinda heroaĵo inĝeniera. Komplikita reto de fosaĵoj kaj kanaloj estis farita. Trafluas ilin ne akvo, sed glaci-malvarma aero.

La "irigaci"-kanaloj estas purigitaj de musko en somero kaj de neĝo en vintro. Ili ensorbas varmegon de la suno kaj ellasas ĝin al la malvarma vintro-aero en kontroleblaj proporcioj, tiel ke kampoj povas esti malglaciigitaj ĝis antaŭdifinitaj profundoj.

---

## LA ENIGMO DE KONNERSREUTH.

De Pastro Gabrielo Pausback, O.Carm.

"Kion mi povas plu skribi por La Rondo?" Jen mia penso dum kelke da semajnoj. Tiam venis en menson la jena: La vundmarkulino de Konnersreuth (Bavarujo), kiun mi mem vidis antaŭ dek ok jaroj kaj kiu ŝajne vivas ankoraŭ hodiaŭ....ĉar ŝia morto ne estis anoncita.

Kio estas vundmarkulo (stigmatic aŭ stigmatist en la Angla)? En la vera senco ĝi estas homo kiu portas supernature la signojn de la vundoj de Jesuo Kristo. Tamen, en la afero priskribata la virino ne nur portas la vundsignojn sed ĉiun Vendredon---kun tremaloftaj esceptoj---ŝi suferas en ekstazo la tutan pasion kaj morton de Kristo.....krom aliaj mirindaĵoj, ekzemple, de la jaro 1923 ŝi ne prenis manĝon kaj de 1926 ne trinkis ion! Plue, ĉiun Vendredon ŝi perdas sep ĝis naŭ funtojn dum la pasio-ekstazo, sed en la semajno sekvanta ŝi regajnas la ordinaran pezon! Certege ŝi estas objekto de intereso almenaŭ psikologia: do, en ĉi tiu artikolo mi tenos min al tio kion mi mem vidis, aldonante nur tiajn aliajn faktojn kiaj necesos.

Ĵaŭdon, la 22 Septembro 1927, mi vidis je la unua fojo la dudeknaŭjaran fraŭlinon Terezo Neŭmann. Ŝi sidis, nigre vestita kaj perfekta modelo de pacienco, sur seĝo en la ricevĉambro de Pastro Naber de Konnersreuth---kampara vilaĝo de ĉ. mil homoj. Je peto de juna diakono (unu el la popolamaso kiu vizitis ŝin ĉiusemajne tiutempe) ŝi montris al ni la vundojn en la manoj. En la interna parto aperis vera vundo, kiel de granda najlo. Ĝi ĵus komenciĝis resaniĝi; je la ekstera estis vundkrusto.

La tagon sekvantan mi vidis Terezon en ekstazo (almenaŭ laŭ mia opinio kaj tiu de multaj aliaj multe pli lertaj ol mi). Estis la naŭa matene, sed Terezo jam de la noktomezo kaj vidis kaj suferis la dolorojn de la Filo de l'Homo. Kiam mi vidis ŝin---duone sidanta duone kuŝanta en lito blankkovrita (ŝi estis ankaŭ en blankaj vestoj)---la kaptukoj jam estis ruĝetigitaj de la sango kiu venis de la "krono el dornoj" kaj el la okuloj eliris larmoj de sango ankaŭ. Ne dum unu minuto povis Terezo resti trankvila: ĉiam en la vizaĝo, en la manoj, en la tuta korpo, oni vidis kiel ŝi suferas por la vidado al Kristo suferanta.

Je la dekdua mi reiris kaj vidis la mortagonion de Kristo spegulita en la vizaĝo de la markitino; je la unua kaj kvaronoj ŝi estis "mortinta", kaj neniam en la vivo mi vidis alian personon tiel tute lacigita.

Sabaton matene Terezo mem iris en la preĝejon---inter du linioj de multlandaj personoj kiuj ankoraŭ restis en la vilaĝo. Sed Terezo ne promenis kiel ni: la vundoj en la piedoj devigis ŝin iri surkalkane, sin apogante sur alia fraŭlino. Fine, antaŭ nia foriro je la unua, ni povis viziti ŝin ankoraŭfoje---sidis ŝi nigrevestita surseĝe en la ricevĉambro de la pastro, paciencmodelo kiel antaŭe.

Oni komprenos, ke mi povus skribi multe plue pri mia vizito al Konnersreuth kaj pri la markulino. Sed jam estas skribitaj multaj libroj pri la afero, el kiuj ĉiu interesata povos lerni kiom li volos. Tie li povos legi ankaŭ pri la provoj faritaj rilate al la malmanĝo kaj maltrinko k.t.p. Ĉi tie mi volus nur voki atenton al mirindulino, kiu laŭ freŝdata anonco el Germanujo vivas ankoraŭ hodiaŭ.

RIMARKOJ de la REDAKTORO: "Stigmata": Greka vorto uzata en la Romkatolika Eklezio por nomi markojn de la suferoj de Kristo, kiuj neklarigeble aperas sur la korpoj de iuj sanktuloj kaj aliaj piuloj. La radiko Stigm' en Esp-o signifas "supra parto de la pistilo (bot)". Aparta zorgo do estas necesa, taŭge vesti la nocion en Esp-o. Vundoj pensigas pri ago vundi , kio kompreneble ne estas ĝusta. Cikatroj ankaŭ ne ĉi-kaze taŭgas, ĉar foje la markoj estas malfermaj, sangantaj. La Esperanta Nova Testamento ĉ. Gal.6/17 havas "signojn" por la Greka "stigmata."

Ne ĉiu tia fenomeno estas religia. Pastro Thomas Cook en sia "Boston Monday Lectures" citas el "Physiology," verko de D-ro Carpenter: "Patrino staras ĉe fenestro. Ŝi ekvidas la vitrokadron de alia fenestro fali sur la fingrojn de la propra infano. Venas ĥirurgo. Li kuracas la infanon, bandaĝas la maneton. Poste li turnas sin al la patrino, kiu plendas pro doloro en la mano. En malpli ol 24 horoj komencis ŝveli, inflami tri el ŝia fingroj konforme kun tiuj tranĉitaj for de la infana mano. La dolorajn fingrojn la kuracisto lancetis. Ili trairis la tutan proceson de vundoj sed, krom per la imago, neniel estis vunditaj."

---

## LA MURDO.

Originale de FRANK PITT, D.B.E.A.

Mild . homo estis Vilhelmo Morel, tre ŝatata, sukcesa en komerco, kaj havis multajn amikojn. Li adoris sian edzinon kaj siajn du infanojn kaj vivis modelan vivon kaj en sia hejmo kaj en la ekstera mondo.

Lia vera amiko estis lia samklasulo de la malnovaj lernejaj tagoj. Li kaj Jakobo estis kiel fratoj---neniuj kaŝitajoj en ambaŭ

animoj, vera kunsento, vera interhelpo, tuta interfido. Ofte kaj ofte venis Jakobo al lia hejmo, kiel membro de la familio---"Onklo Jaĉjo" al la infanoj. Muzikisto li estis, kaj Vilhelmo tre ĝuis aŭdi kiel bele interharmoniis lia violono kaj la pianludo de sia edzino.

Ofte kaj ofte venis Jakobo. Jes, li estas mia plej bona amiko, la frato de mia koro, diris al si Vilhelmo. Foje kiam li venis hejmen, Jakobo jam atendis lin. Komprenebla lia edzino ŝatus havi Jakobon tie, ili havas multon por priparoli. Foje kiam li kromlaboris ĉe la oficejo, li trovis Jakobon ĉe la edzino kiam li revenis. Estis bone: li rajtas fari tion---ĉu li ne estas mia amiko?

"Jakobo estis ĉi tie hodiaŭ," diris al li la edzino iun vesperon. "Kial li ne atendis min?" li demandis.

"Ho, li diris ke lia tempo mankas." Estis bone, certe. Certe estis bone ke lia bona amiko Jaĉjo venu tiel.

"Onklo Jaĉjo venis hodiaŭ," diris lia knabeto iun vesperon. Kial lia edzino diris nenion pri tio?

"Jakobo venis hodiaŭ, ĉu ne?" li demandis al ŝi kvazaŭ senzorge.

"Jes, jes jaj ŝi respondis. "Li estas tre afabla, ĉu ne, kaj bone muzikas kun mi. Kaj li---"

"Kial li venis?" li interrompis.

"Ho, kiel ordinare. Tio estas, por---kiel amiko, por paroli al mi. Sed vi ne devus demandi tiel, li---"

Sed ŝi aŭdis la pordon fermiĝi malantaŭ ŝi. La edzo estis foririnta; li estis vidinta la ruĝiĝon, eĉ kvankam ŝi trovis necese daŭrigi la laboron dum ŝi respondis, kaj ne havis la tempon rekte rigardi lin dum li parolis.

Dum la sekvantaj semajnoj, Vilhelmo pli kaj pli maltrankviliĝis. Li diris nenion al iu, kaj penis ŝajni kiel ordinare en la familio, eĉ pli afabla, sed la edzino ne povis ne rimarki ian streĉon en lia vizaĝo, lia voĉo, lia maniero. Li pensis kaj pensadis, kaj kiel ofte okazis pro trea pensado, la ideo fiksiĝis kaj kreskis ĝis freneza graveco.

Estis vintro. La vesperoj mallumiĝis frue. Li kalkulis tre zorge. Li venis hejmen iun vesperon iom frue, diris nenion al iu, sed iris rekte al sia studejo. Post kelkaj minutoj oni aŭdis la eksteran pordon frapfermiĝi.

Li marŝis rapide. Li havis dudek-kvin minutojn por atingi la straton Ramon. La vento blovis lian surtuton kontraŭ liaj kruroj, sed li tenis la manojn en la poŝoj. Li devis ne lasi ĝin el la mano. Kio okazus se li lasus ĝin fali, kaj policisto trovu ĝin! Estis tre grave teni ĝin nun, sed ne tre gravos poste. Kiom da tempo necesos? Jakobo ĉiam venis hejmen ĝuste je la sepa. Li ĉiam eltramiĝis ĉe la sama loko, marŝis du stratojn kaj turnis en la straton Ramon. Vilhelmo devis atendi en la pordo de ŝtofmagazeno. Ne necesus atendi longan tempon. Li alproksimiĝus, la ilo estus preta, eĉ ne necesus diri ion.....

Li aŭdis la horon de fora horloĝo. Li estas preta, jes, baldaŭ venos la tempo. Ah, li iom malfruas hodiaŭ! Sed li venos, mi atendos....Denove sonis la horloĝo. Duonhoron malfrua! Liaj nervoj komencis streĉiĝi. Jen du viroj marŝis kune laŭ la alia flanko de la strato. La horloĝo denove?! La du viroj revenis, rigardis lin rekte, pasis. Oni suspektas lin, ŝajne. Li ne povis fari ion plu. Li paŝis el la pordo kaj iris hejmen.

Apenaŭ li estis malferminta la pordon kiam alkuris lia edzino, tremanta kaj preskaŭ al larmoj.

"Vilĉjo, oni telefonas vin. Vi devas iri tuj. Kiel eble plej rapide iru por trankviligi ŝin, lia patrino. Jakobo estis mortigita per aŭto hodiaŭ vespero. Oni prenis lin ĉe lia patrino. Iru, iru tuj!"

Li iris, kvazaŭ en revo. Jakoba morta?---lia amiko, kun kiu oni ne povis kvereli, li estis tiel ŝatinda kaj bonkora!

La patrino sidis apud fenestro, rigardante eksteron, vidante nenion. Ŝi tenis naztukon en la mano, sed nun ŝi ne povis plori. Ŝi rimarkis nenion, nek respondis al iu. Vilhelmo metis la manon sur ŝian-ŝultron, kaj kiam ŝi diris ŝian nomon, ŝi turnis sin kaj rekonante lin, prenis lian manon kaj returnis sin al la fenestro. Ŝia "dua filo!" Li devas kompreni, eĉ sen ke ŝi diru ion! Ĉu li ankaŭ ne amis lin?

Jakobo estis en apuda ĉambro. Li kuŝis kvazaŭ trankvile, ripozante, atendante. Li ja estis bela viro---eĉ en la duonlumo de la kandeloj oni povis rimarki la freŝan vizaĝon, la rektan nazon, la rideteman buŝon, la belan buklan hararon. Longe Vilhelmo rigardadis lin, pensante.

Li estis morta, lia amiko, lia bela amiko, tiel bela ke estis nemirinde ke la virinoj amu lin. Sed kial li kuŝu tie tiel trankvile? Ĉu li ne hontis pri sia boleco, pri sia detrupovo? Ĉu li indis morti? Li pensis kaj pensadis, kaj kiel ofte okazas pro tros pensado, la ideo fiksiĝis kaj kreskis ĝis freneza graveco.

"NE-RESPONDENDA AGO PRO NERV-STREĈO" oni poste nomis ĝin, sed Vilhelmo ne bezonis ilian ekskulpigon. Kiam oni alkuris post la eksplodoj, estis du kugloj en la kapo de Jakobo kaj unu en la kapo de Vilhelmo.

---

ERAROJ en la Junia:---p.114/20 amalgamo; lasta linio, Piffl; 118/14 de mals., provis; 120/6, militiris; 122/10 de mals., kontantos; 125/11, interesis; 126/11, komerceto.

---

KIU .ANIMALO havas havas la plej valoran felon? Ĉinĉilo: eĉ malgranda felo valoras 150 dolarojn pogrande.

---

La sekvanta tradukl̂aboro estu dediĝita al J.E., kiu instigis ĝin per la mencio de sia restado en la Rejnlando kaj sia sperto kun la tieaj amindaj ĉarmulinoj.

## REJNA SORĈO.

En Rejno profunda ripozas kron'
Forĝita el oro kaj gema ŝton',
Kaj kiu sukcesos ĝin levi for,
Kroniĝos li rajte en sama hor'!
De l' Rejn' ĝis Danubo la reĝ' estos li.
La princo estonta en Rejn'-imperi'!

En Rejno profunda ripozas lir'
Forĝita el or' kaj eburo---laŭ dir',
Kaj kiu sukcesos ĝin levi for,
La kantojn ĉarmdolĉajn inspiros la kor'!
La kron' sensorteca atendas por li,
La rejna kantisto, amato de Di'!

Mi konas dometon ĉe verda Rejn',
Fenestrojn borderas la reba tren';
En ĝi loĝas kara, anĝela ŝi
Malriĉa je oro, sed virta des pli---
Se estus ĉe l'Rejno por mi ŝia kor',
La kronon aŭ liron---mi donus ĝin for.

Trad. K.J.H.. bonvole revizita F.R.B.

.....................................

## HO! KARULINET.

Originale verkita de MAUD HELM. D.B.E.A.

Ĉe la monto,
Sur la ponto,
Trans la riveret',
Tage suno,
Nokte luno,
Ho! karulinet' !
Birdoj, floroj,
Niaj koroj,
Kaj la flubruet',
Ora suno, Perla luno,
Ho! karulinet'!
Dolĉe via,
Amo nia,
Laŭdo de l' ondet',
Scia fonto

Sub la ponto,
Ho! karulinet'!
Ama tago,
Nokta pago
De la promeset',
Ma, plenumo,
Incensfumo,
Ho! karulinet'!
Kiso via,
Ravo mia,
Ĝoja la plaŭdet',
Sciis ponto,
Benis monto,
Nia promenet',
Preĝo nia

Fido dia,
   Ho! ĉarulinet'!
Ho, memoro
Pri la horo,
   Pri la amridet',
Pri la ponto,
Pri la monto,
   Ho! karulinet!
Multaj jaroj
De l'amfaroj,
   Vivo nur vivet'!

Dolĉa sorto,
Sed la morto---
   Ho! karulinet!
Ho, espero
Ke la tero
   Eĉ per harĉenet'
Min ne tiros,
Se vi iros,
   Ho! karulinet'!

---

TRADUK-KONKURSOJ

Traduko de Konkurso 23: (Kompilita el 3 tradukoj.)

La maro estis glata kiel muar-silka standardo, kaj neniu vento altigis blankajn randojn. Varmega kaj trankvila estis la akvo en tiu somera tago. La grandiĝanta detalaro de l' haveno proksimiĝis al ni rapide, turnŝanĝante sian pozicion de tempo al tempo. Lumturoj, mar,ontoj, kajoj, rulportiloj kaj arganoj---dividantaj la horizonton kun angula sed ritma precizeco---estis malliberigitaj en la ornamaĉa bluo, en la diafana globo, de ĉielo al maro, kvazaŭ en kristalo. Ĉiu sono ŝajnis barakti, por eskapi el la malmola, materia globo, kiu entenis ĝin. Portistoj kriis nazale, maljunaj virinoj kolportis oranĝojn kaj ĉokoladon, dum knabetoj kriis ekstaze la francajn tradukojn de anglaj gazetoj. Ĉie ĉirkaŭ ni estis la kutima malordo brunovado, kiu maskas la neman efikecon de la franca popolo. Ni estis elŝipigitaj trans malgrandaj pontoj en ĉi tiun homamason.

Venkinta grupo: MELBOURNE ESPERANTO CLUB.

T radukota teksto Konkurso 25.

One of the major problems in the Far East has been due to the Malayans' complete indifference to the responsibilities of government. When prosperity came to Malaja in the form of the riches of rubber and tin, the various State governments benefited from land taxes and export taxes, but the ordinary Malays did not benefit; they were content to pursue their simple lives as jungle dwellers and fishing folk. They did not enter into trade or commerce; they simply tilled their fields, and occasionally cultivated the rubber, which they sold to satisfy their needs. They did not control large rubber estates, nor did they mine tin, just as they did not found large companies to export the wealth of Malaya and with the exporting grow wealthy themselves.

The solution in Malaya lies in our ability to find a "bridgehead" which will enable the East and the West to absorb the benefits

## PRI FAMA FRAZO. (Paĝo 109)

Redaktoro, La Rondo: Unu el miaj amikoj diras ke por si mem la frazo estas ne informa: oni bezonas la kuntekston. Li proponas: "La sekureco de Granda Britujo neniam antaŭe tiel multe ŝuldis de tiom multaj al tiel malmultaj de siaj anoj."

Laŭ parolo de s-ro Churchill (13.5.45): "Never before in the history of human conflict was so much owed by so many to so few." Mia traduko estas: "Neniam estis en historio de homa konflikto tiel multe ŝuldita de tiom multaj al tiom malmultaj."

C.W.BALLARD.

KIEL TRADUKI...? (vidu piedon de p. 191.)

De Kvinslanda amiko kiu preferas nomi sin "Ajnulo" ni ricevis la sekvantajn tradukojn de la provfrazoj:

What do you know that we don't know?
Kio sciata de vi estas nesciata de ni?

Live as you will have wished to have lived when you die.
Vivadu tiamaniere, kiamaniere, mortante, vi deziros estis vivinta.

Ŝercema impulso instigis lin aldoni tiun ĉi spritaĵon: Post kiam vi estos mortinta, kondutu vin laŭ tiu maniero, laŭ kiu vi antaŭe deziris.

Dankon, sinjoro! Nu, ni donu la tradukon de Zamenhof (Ijob 15/9) Kion vi scias tian, kion ni ne scias? Ni krome sugestas Kion vi scias nesciatan de ni?

---

## ASOCIAJ AFEROJ.

DEVIZO la jenaj sugestoj por Asocia Devizo sur la kovrilo de nia oficiala organo atingis nin:-

(1) Nia celo---mondfrateco.
(2) Pere de Esperanto al Internacia Interkompreniĝo.
(3) Esperanto interkomprenigas la popolojn.
(4) Ĉeno de Amikeco. (5) Neniam laciĝu. (6) Ni estu foraj.
(7) Plibeligu nian stelon. (8) Daŭrigu la laboron. (9) Interkomprenado. (10) Eĉ guto malgranda konstante frapanta, traboras la monton granitan. (11) Al Eterna Paco. (12) A common tongue gives a common cause. (13) Man's greatest need---to be understood. (14) Esperanto---The tongue of man. I speak. (15) By ignorance held; by knowledge dispelled. (16) The tongue of the people: the voice of humanity. (17) Voĉo de la Homaro. (18). Vera frateco: vera amikeco. (19) Dua lingvo por ĉiu homo. (20) Esperanto lives in every land. (21) World Brotherhood through common language. (22) Ni gardos la sankton flamon. (23) Ni gardu la sankton flamon.

Estraranoj de A.E.A. bonvolu tuj sendi al la Sekretario la supran liston aranĝita en preferata ordo kaj ankaŭ indiku ĉu aŭ ne vi volas, ke la elektita devizo aperu kaj en la angla kaj en esp-o

LIBROSERVO. Nia Peranto de la Libroservo en W.Aus., S-ro Chamberlain eksiĝis. La nova Peranto en tiu landparto estas F-ino E.CHANDLER, 5 Todd Avenue, South Perth W.Aus. Bonvolu noti la nom-adreson sur la 11a paĝo de via ekzemplero de la Libro-servo.

Ni deziras publike danki S-ron CHAMBERLAIN pro lia sindona laboro ek de la komenco de la servo.

Bonvolu noti, ke la vortaro Pulcher and Long ne plu estas havebla. Oni atendas, ke ĝi reaperos post iom pli ol jaro.

LETERFOLIOJ. D-ro C.J.CALDERA W. Aus., Afabla donacis 3 funtojn por presi taŭgajn leterfoliojn kun la Asocia Nomo. Kiam pretaj ni sendos provizaĵon al ĉiu oficistenanto. Ili estos aparte helpemaj por uzi de propagandistoj. Mil dankojn, Doktoro!

PROPAGANDA SEK EN N.S.W. Vakas tiu ofico pro eksiĝo de S-ro A.C. Boyle. Ĉu Sydney Esp. Societo bonvolu proponi novan oficistenanton?

B.E.A. volas sciiĝi pri la nuna adreso de F-ino M.HINDE. La lasta konata adreso estis C/o Mrs. G.Scott, 26 Harris St., Broadway, East Glenelg S.Aus. Se iu leganto konas la nunan adreson de F-ino Hinde, li bonvolu tuj avizi la subskribinton, kiu siavice avizos al B.E.A. per aergrafo.

B.E.S. ADRESO. Bonvolu noti sur paĝo 24 de la Jarlibro ke la adreso de Brisbane Esp. Society ŝanĝiĝis de Room 36 al Room 43.

KOTIZOJ. Membro (kun La Rondo) 6/-. Pagu al la Kasistino. Sur poŝtbileto: NE enskribu nomon de la urbo en kiu oni kontantos ĝin. Se via kotizo ŝuldiĝas, pagu nun, ne atendu avizon de la Kasistino.

G.H.HILLERMAN, (Sekretario) 15 Morrice St., Lane Cove, N.S.W.

---

LEGANTOJ! B ONVOLE RIMARKU.

Ŝajnas, ke ankoraŭ ekzistas konfuzo pri la roloj de la anoj de la Redakcio.

S-ro BANHAM estas la REDAKTORO.

F-ino BAILEY helpas lin, ankaŭ presas kaj kunpinglas la foliojn.

F-ino ADDIS estas la KASISTINO kaj disdonas la gazeton.

DO, NE SENDU al S-ro Banham aŭ al F-ino Bailey kotizojn kaj demandojn pri la disdono de la gazeto, sed al F-ino Addis.

NE SENDU al F-ino Addis verkajojn aŭ demandojn pri la preso de la gazeto.

## KASO DE LA RONDO.

KVITANCOJ ricevataj dum Majo kaj Junio 1945.

S-roj Banham, Pfahl, E.Hart, Hooke, E.Peck, Rehtz, A.Boyle, £2/2/-
S-roj J.Corderoj, Hudson, Ballard, Chatterton, K.Linton, J.Butler
36/-. Sin-oj V.Baker, Dollahan, Douglas, E.M.Hill, E.M.Wallis,
F-ino Bird 36/-; S-ro Craige 6/-, F-ino Jarvis 6/-, S-ino A.C.Hintze
2/3, S-ino E.Hill £1; S-ro F.H.Cave 10/-, S-ro Gill (Eng.) 4/4, S-ro
A.Saar 7/-, S-ino G.Smith 5/-, £8..14..7

Al la Rondo £6..17..1 Al Aus. Esp. Asocio £1..17..6
Elspezoj de la Rondo £8..5..3 En la Kaso £4..18..11

Please leave postal notes blank, and make all cheques payable to the cashier, adding exchange. We do not hold ourselves responsible for Rondoj lost through change of address when we have not been notified. B acjnumbers will be supplied if available only when postage is included with request for same. Distributing office and cashier:-

F-ino W.E.ADDIS, 25 Greville Avenue, Flinders Park, S.Aus.

---

## LETEROJ KAJ NOVAĴOJ.

Al S-ro MORAY McKAY. Ni tre dankas vin pro via letero. Rilate al tio bonvole rigardu p. 13 de la Jarlibro de A.E.A.

S-ro LESLIE PFAHL sendas nin du adresojn: Patrick J.Armstrong, 10 Fourth Street, Bow Hill, Cardenden, Fife, Scotland, U.K. and William G.Philip, 3 second Street, Bow H ill, Cardenden, Fife, Scotland,U.K, "would like correspondents in Australia, especially young folk."

DEZIRAS korespondantojn---Frans Van Dooron, Langstraat, No 40, Borgerhout, Antwerp, Belgium. Ankaŭ Miny Celestin, 39 Rue Marsilly, Denain (NORD) France.

Skribas al S-ro L.E.Pfahl, S-ro Van Dooron "Please try to publish an announcement in your National Esp-gazeto, that I wish to regain contact with fellow Esp-ists in your country. They can write in English, French or Dutch. I am in very close relationship with all our Esp-Associations here, and am at your and their disposal to translate and forward any news to any club, organisation or individual Esp-ist.

Everyone is naturally very eager to get news from our movement. Do not forget that we have been cut off from the rest of the world for more than 4 years. We are here now feverishly reorganizing our clubs and classes. There is a very keen interest in Esp-o. Please help! "(S-ro Van Dooron is a member of IEL and Editor of the Flandua Esperantisto.)

PRI NOVAJ ESPERANTO-LIBROJ.

Svisa Esp-Societo prilaboras eldonon de broŝuro "Pensoj de Zamenhof." Ĝi enhavos citatojn el lia tuta verkaro, tradukitajn en Franca, Germana, Itala kaj Angla por montri ke li estis ne nur genia lingvisto sed ankaŭ profunda pensulo. D-ro Alfred Bader estas la kompilanto.

"Egipta Esp-isto" (8/44) informas ke Esperanto Publishing Co. eldonos la Koranon en Esperanto post la milito.

"Vies Heroiques" de Alice Descoeudres (Svislando) entenas tre bonan biografion de Zamenhof. Akirebla por 2.50fr. ĉe "Svisa Espero," Neuveville, Berne, post la militĥaoso.

"LA FARAONO." Aperis Germana traduko de tiu fama verko de Boleslaw Prus. "Der Pharao," 818 p., 18 sv. fr., Verlag Otto Walter, Olten. "Unua Germanlingva traduko" diras la titolpaĝo. Tamen la Germanoj fiere parolas pri la "Germana mondliteraturo"... la Esperantaj eldonoj de tiu majstraĵo aperis en 1912 kaj 1925. Ili estas ne plu aĉetablaj, ĉar elĉerpitaj. Ni demandas al ni, ĉu D-ro Loepfe la tradukinto en la Germanan, konsultis la Esperantan tradukon de nia plejbona stilisto de lia tempo---Kazimierz Bein ("Kabe")?

SPLITOJ. S-ro Winberg testamentis 10,000 kronojn por Esp-a instruado ĉe la popollernejoj en Uddevalla (Svedujo.)

La mondfama Romain Rolland, kiu ĵus mortis, aprobis Esp-on per entuziasmaj kaj pensigaj artikoloj. Li diris: "Kio faras la grandecon de la kreinto de Esperanto, tio estas ke, kiel ĉiu vera geniulo, Zamenhof ne estis la eltrovinto de artefarita lingvo kaj movado, sed la klarvida kaj perfekta interpretisto de potenca nova bezono...... Esperanto redonu la aŭdokapablon al tiuj surduloj kiuj jam de jarcentoj estas enkarceritaj en siaj idiomoj....Esperanto devus esti instruata en ĉiuj lernejoj de la mondo."

"Heroldo de Ĉinio" ankoraŭ eldoniĝas en Chungking.

Post peto d e publika kunveno, la estraro de la popollernejoj de Goteborg (Svedujo) decidis proponi al la ĉefinstruistoj de ĉiuj popollernejoj ke ili rekomendu Esp-on kiel bonan temon por la libertempo instruado. En ĉiuj lernejoj, kie ekzistas Esp-osciantaj instruistoj, tiuj havas rajton inviti la infanojn studi Esp-on. Por tia instruado la instruistoj ricevos saman pagon kiel por aliaj temoj en la libertempaj kursoj. Jam komenciĝas kurso.

Einar Adamson gvidas kurson ĉe la Aergarda Korpuso kaj ĉe laboristoj kaj kontoristinoj en Goteborg. Li petas korespondantojn por tiuj kaj la lernejanoj. Redaktoro Einar Adamson, Varmlandsgatan 18, Goteburg (Svedujo).

RADIO. La 16 Dec. 44 okazis ĉe Radio Beromünster sesminuta dialogo en la Germana kaj Esp-a lingvoj pri la vivo kaj verko de Zamenhof. Dankesprimoj al la stacio estis grandnombraj. Unu estro diris mire, ke "venis tiel multege da skribaĵoj pri nur 6-minuta program-

ero, kaj eĉ du leteroj el Anglujo!"

Pierre Bovet, Edmond Privat (Svisujo) kaj Andreo Cseh, Julia Isbrucker (Nederlando) bone fartas.

"IRLANDO VOKAS" bezonas reprezentantojn ĉiulande, por konigi Irlandon al la mondo. Sciigu Lorcan O hUiginn, Sonas, Cnoc na hinneona, Dundroma-Dublin, Irlando. (Jes, ĝuste tiel!)

En la lasta tempo venis el Svisujo "Svisa Espero" (Neuveville, Berne). El ĝi ni prenis novajojn, pri kiuj ni aparte dankas.

La semajna gazeto "Il Partigiano" (Romo, 9.10.44), organo de la Partizanoj, vokas: "Esperantistoj en Romo, ĉu izolaj aŭ organizitaj en asocioj, bonvole sendu adresojn al ĉi tiu gazeto!"

M.Justin Godart, fervora Esp-isto, estas provizora urbestro de Lyon ĝis reveno de M. Edouard Herriot el karcero en Germanujo. Ankaŭ tiu ĉi estas konata amiko de Esp-o.

---

## VERDAJ APOSTOLOJ.

Ni tuŝas tiklan temon. Tio pri la kvalitoj kiujn ideale devas devas havi ĉiu homo deziranta propagandi E-on. Kiel konate, estas en la mondo multe da animoj bonvolaj al nia afero. Kun vera plezuro ili vidus la tempon en kiu E-o ĝenerale adoptiĝos, de la ŝtatviroj kaj de la popolmasoj. El ili ne malmultaj prenas aktivan rolon en laŭpova dissemo de la internacilingva ideo, kaj elverŝas da tempo, mono kaj laboro tre riĉe. Ili skribas al eminentuloj, intervjuas tiujn, parolas senĉese de la konatoj, abonas E-ajn gazetojn aniĝas al kluboj, sed---ne scias E-on, almenaŭ ĝis la grado nepre necesa por ĉiu celkonscia verdulo.

Unco da E-a uzado valoras tunon da parolaĵo pri E-a statis tiko negrave kiom impone la ciferoj signifas por la jam-konvinkito. Ke la Franca Ĉambro de la Komerco en 1939 favoris E-on ne impresas al multaj kapoj tiom, kiom impresas aŭdo de pura E-a parolo de la koncerna propagandanto. Ke Romain Roland kaj Henri Barbusse amike sintenis al E-o pezis malmulte kontraŭ tio, ke nek unu nek la alia povis eĉ uzeti ĝin. Jen tragedio en la propaganda kampo. Tro tro da niaj agemaj amikoj malfaras sian pene suferan laboron por la embarasa montro ke ili ne povas uzi la lingvon buŝe aŭ skribe en maniero postulata de siaj alteflugaj pretendoj---ke E-o estas simpla, facile lernebla kaj ĉiamaniere taŭga en la homaj rilatoj.

Skta. Paŭlo, en siaj iroj apostolaj, ne portis kun si imponan statistikon pri flora membreco de la kristanaj grupoj, no apogis sur la akcepto fare de tiu aŭ alia ŝtataŭtoritato. Li prezentis la miraklan efikon de Kristanismo sur sin mem kaj uzis la ekzemplon de la propra vivo por pruvi kiom ĝi povas fari ankaŭ al aliaj homoj. Simile kun E-o. Ĉiu homo vere konscia pri la bezono de internacia lingvo kaj konfesanta fidon kaj amon al E-o, devas esti ajna prokras-

to certigi ke li aŭ ŝi jam faris la plejeblon atingi ke la uzado de E-o estas persone "dua naturo", tio estas: ke la praktika utiligo de tiu lingvo povas esti tuje kaj frapefike demonstrata al skeptikuloj. En miaj fruaj tagoj de Es-isteco mi vizitis kuracistom. Rimarkinte la stelon sur mia jako, li demandis: "Ĉu vi parolas E-on?" Je mia eterna bedaŭro mi balbutis "Iomete," kaj lin adiaŭis. Por mi jam pasis bela neniamrevena oportuno, kiun mi devis perdi pro malbona ekipo. Tio, mi timas, estas ofta okazo en ĉiu lando. Sana koncepto de nia ĉefgrava devo, kaj firma persisto plenumi ĝin, povus forigi tiun teruran mankon kaj krei kredantojn, eĉ adeptojn al nia glora misio.

Uzu E-on kiam kaj kiel plej eble! Ne nur portu stelon kaj reklamigu leterkovertojn, sed ankaŭ kompetentigu vin mem en la praktika uzado de la lingvo, buŝe, skribe. Armu vin per argumentoj defendaj por ĝia gramatika strukturo kaj por povo pruvi ĝian superecon super naciaj lingvoj rilate la rolon de internacia. Tre ofte, preskaŭ ĉiam, ni perdas la fortojn, propagandante E-on sen la kapablo doni nerefuteblajn demonstrojn de ĝia praktika uzeblo. E-o estas vivanta lingvo kaj postulas vivantajn animojn kiel siajn porbatalantojn---ne homojn kun ciferoj pri la akiroj de aliaj. Ĝi ne povas vivi per la pli-malpli gravaj venkoj de la pasinteco, sed per la praktika valoro de ĉiam nove faritaj adeptoj, kiuj uzas sian scion por montri varbefike ke, efektive forigante la barojn de lingva ĥaoso, ĝi taŭgas en ĉiaj rilatoj de la homa vivo.

---------------------------- verkis F.R.BANHAM.

NEKROLOGOJ.

MAX JOSEPH METZEGER. Germanoj en Dachaŭ torture mortigis Pas tron Max Joseph Metzger, Superulo Generala de la Katolika Societo de Kristo la Reĝo, ĉar li protestis kontraŭ vipado al Protestanta pastro. laŭ raporto de Svisa gazeto. Li fondis revuon "Blanka Kruco," kunlaboris je "Espero Katolika," redaktis "Katolika Mondo", eldonis (kun "La Juna Batalanto") ĉirkaŭ 20 librojn en kaj pri E-o. La Gestapo forigis lian religian gazeton en la Germana lingvo, ĉar li en ĝi aperigis proĝon "por ĉiuj Judoj, por ĉiuj Komunistoj, por ĉiuj subpremitaj." De tiam (1936?) li en- kaj eliris karcerojn, ĝis fine li mortis, viktimo de la Faŝismo. Li estis influa Esperantisto, kaj la movado perdis multon pro lia kruela murdo. (Laŭ "American Esperantist" Jan.-Feb.1945. ankaŭ en la Esp. Enciklopedio sub "Katolika Movado.)

WILLIAM BROWN. Profesoro W.Brown mortis en Dublin. Li tradukis kun S-ro McCormick "Pri la Origino de l'Homo" (Prof-o Keith).

---

Published by F.R.BANHAM, 8 Branchory St., Essendon, W5 VIC.

OFICIALA ORGANO DE LA AUSTRALIA ESPERANTO ASOCIO

# LA RONDO

THE AUSTRALIAN ESPERANTO MONTHLY

ELDONITA DE F.R. BANHAM.
2 BANCHORY ST. ESSENDON W.5
VICTORIA AUSTRALIA.

VOL. 5 No. 11

Aug., 1945

# L A R O N D O

## LA REDAKCIO.

S-ro F.R.BANHAM, D.B.E.A., REDAKTORO,
2 Banchory St., Essendon, W5 VIC.
F-no L.E.BAILEY, D.B.E.A.
18 Sherbourne Rd., Medindie Gdns., Adelaide, S.AUS.
F-no W.A.ADDIS, KASISTINO,
25 Greville Ave., Flinders Park, Adelaide, S.AUS.

---

## ESPERANTO AND THE LEAGUE OF NATIONS.

Dr. Wilhelm Solzbacher is a German linguist and writer, and a fervent Esperantist. Now living in New York, in 16.12.44 he spoke before the Esperanto Interlanguage Institute in that city on A Common Language for World Organisation. This address was printed in "Vital Speeches," a 2-weekly publication. He has an intimate knowledge of the difficulties of language that characterised the proceedings of the League. He says inter alia:-

"Linguistic difficulties were so obvious that from the beginning there was a lively interest in the problem of adopting one, practical, neutral and easy language. In the Assembly several resolutions were introduced in favour of Esperanto, signed by a dozen delegations (South Africa, Persia, China, Czechoslovakia, Bulgaria, Brazil Chile &c.). They were referred to the League Secretariat with the request to "study" the problem and the Esperanto movement. The Under-Secretary of the League (one of the few truly liberal statesmen Japna has produced), attended in 1921 as an official observer of the 13th World Esperanto Congress in Prague, with 2561 delegates present. H e knew little Esperanto when he arrived in the Czechoslovak capital; a few days later, however, he was able to follow all discussions, and he grew very enthusiastic about Esperanto.

"A year later a report entitled 'Esperanto as an International Auxiliary Language' was published in English and French by the League Secretariat. Compiled in a thorough way by an impartial international authority, this report, strongly recommending Esperanto, has remained ever since one of the most importent documents of the interlanguage problem. Its conclusions can be summarised as follows:

1. Leaving aside the question of a diplomatic language, the need for an interlanguage for direct international relations appears to be keenly felt everywhere.

2. The majority of the eminent scientific and commercial organisations, which have studied the problem, declare themselves in fa-

vor of a neutral and simplified language, which would in no way threaten the prestige of the national literary languages, and they generally recommend Esperanto.

3. Esperanto appears to be effectively the most perfect, apparently the simplest, and in any case the most widespread of the languages proposed for agreement.

4. Esperanto fulfils the role of an interlanguage, and abundant usage for writing and speaking has given it the qualities of a living and flexible language, already developed and capable of further enrichment.

5. The use of Esperanto appears to spread the spirit of international solidarity, entirely in harmony with the aims of the League of Nations.

This report should be carefully studied by those engaged in working out details of the new world organisation."

The International Labor Office went one step further than the League. It experimented in the practical use of Esperanto by mailing news items in that language, and the reprint translation results were so good that I.L.O. then issued a regular bulletin in Esperanto. Ten thousand copies were sent monthly free through the world, mainly by means of the gazette "Esperanto" (Geneva).

"When I visited the I.L.O. for the first time I was escorted to an Englishman who spoke excellent Esperanto and gave me all the information I wanted. There were a great many Esperantists among the employes of the League, as well as among those of I.L.O. In the correspondence of I.L.O. Esperanto ranked sixth or seventh.

"Great efforts were made in the League to obtain further results in the direction of the practical use of Esperanto in international life, and of an international agreement concerning its introduction into the schools. The results were not entirely satisfactory for a variety reasons, one of them being the reluctance of the "big" nations, in particular France, to engage on a road which they feared might lead to consequences harmful to the worldwide importance of their national tongues. For a long time the Persian Delegation at the League was the headquarters for work in favour of Esperanto, and the strongest support came from other "small" nations. It is not unlikely that in the United N ations matters will will be similar. Efforts will be in vain unless the representatives of the United States, Great Britain, Russia, France and China are well-informed on the Interlanguage problem and sympathetic to its only practical solution: Esperanto. The Esperanto movement in those "key countries" will therefore have a special responsibility in the crucial years to come."

----------------------------------------F. R. B.

## HOMOJ KIUJ KONSTRUIS AŬSTRALION.

Fedora Andersoh en A.B.C. Weekly, 17.3.45.

En la antaŭa tempo la domfaranta Aŭstralia blankulo en la sovaĝejo ne konstruis al si barakaĉon de unu ĉambreto. Kun nemulta aŭ neniom da mono, sed riĉe rimedoplena, li trasegis kavan arbegon en provinco Gippsland kaj fiksis tegmenton sur la stumpon. Tia arbodomo bele servis kiel loĝejo, precipe se du aŭ tri etaĝoj estis interne konstruitaj en la trunko, kun konformaj fenestroj. Poste ĝi povus servi kiel budo por kortbirdoj aŭ provizaĵoj. Iuj loksidantoj faris trunkkabanojn simile al tiuj de Usonaj arbaruloj. Antaŭvidemaj pioniroj konstruis kotdomojn por kontraŭi superakvojn. La muroj estis el firma argilo, kun herbo enmiksita por ĝin kunteni, kaj sebo por fari ilin nepenetreblaj por akvo. Poste aperis la kruda ligna domo kun tegmento el ŝindoj, fronta verando kaj kuirejeto malantaŭe. Sakoj, kanguruaj feloj, fojo bovaj, utiliĝis kiel matoj sur la planko, kaj ĵurnaloj, sakaĵoj, aŭ stanaj pecoj kovris la murojn.

Vintre la infanoj sidis ĉirkaŭ granda fajro kaj mortigis skolopendrojn kaj similajn rampulojn kiuj kuris el la brulaj ŝtipoj. Apuda rivereto donis banon kaj trinkakvon, kaj sardenskatolo tenis sapon. Por forteni formikojn, la kruroj de tabloj kaj ŝrankoj staris en ujoj da akvo. Nenia polurvakso aŭ lako ornamis la hejmfaritan meblaĵon, kaj la familio sidadis sur benketoj, kestoj, ŝtipoj kaj olebareloj.

La bovvagonistoj. kun krakantaj vipoj kaj alttonaj voĉoj, lerte veturigis ĉarojn laŭ vojoj, kie nun kuŝas la ĉefaj stratoj de Melburno kaj Sidnejo. "Bill Bullock" (Vilĉjo Bovo), kiel genre nomis tiun tipon Henry Kendall (poeto), neniam estis pli feliĉa ol kiam li posedis viglan aron de dek ses bovoj. Li fanfaronadis pri ilia purraseco aŭ iliaj aliaj bonaj kvalitoj, la modoj de jugoj, ĉenoj, ŝnurigoj, la avantaĝoj de nigra mirto aŭ aliaj lignoj por vipteniloj, kaj pri siaj propraj fierindaĵoj je la vip-uzo.

Unu tia majstro nutris siajn bovojn per pluvoj da folioj, kiujn li forvipis de arboj; naŭ fojojn el dek li povis eksasaltigi sespencan moneron per vipa bato. Kiam bov- kaj ĉevalistoj renkontis sin, ili diskutadis rimarkindajn farojn, efektivajn aŭ fikciajn, de siaj bestoj. Sur la ĉefaj vojoj, kvin- aŭ sesdek viroj iafoje kunveniĝis apud ŝtipa fajro kaj paroladis pri la ekscitaj spertoj de la vivo. Tiam kaj tiam ili ĉesis rakonti, por ke iu kantu, akompanate de akordiono kaj violono; kaj partoprenis eĉ arbarrabistoj. Unu rakonto temis pri ŝarĝportulo (1) kiu dishakis malnovan jugon por havigi al si lignopecojn por boligi la te-sitelon; jen elfalis el ĝi oraj funtoj, ĉar iu antaŭa posedanto, por ŝirmi sian monon kontraŭ rabistoj, kaŝis ĝin en boriltruo, kiun poste li ŝtopis kaj pentre kovris.

La societo de la vojoj konsistis el kastoj---la piedirulo kaj la ĉevalrajduloj. La vera ŝarĝportulo abomenis ricevi la epiteton "vagulo" (2), ĉar la nomo havis kriman sencon. Ili estis honestaj

ŝaftondistoj aŭ bovveturigistoj. Troviĝis ankaŭ homoj kiuj radpuŝadis sian havon de ŝtat' al ŝtato kaj sopirĝemis la grason de igvano (3) per kiu ili povus ŝmiri la aksojn. La sakulo estis homo surĉovala; li eble havis ses ĉevalojn kun ŝarĝo ligita antaŭe.

Arbarkuiristoj estis ja gravaj personoj, precipe je tondotempo. Ili elektiĝis per tondista baloto. Ili ne havis fornojn. Kvadrataj ujoj el fero, enkonstruitaj per koto kaj ŝtonoj, devis do servi kiel tiaj. Feraj potoj, sitteloj kaj te-sitelotoj pendis hoke super flagra fajro. La ĉefa kuiristo ricevis po 4 ŝilingoj ĉiuhome, ĉiusemajne, sed lia helpanto, se estis tia, ricevis 30-40 ŝil. en ĉiu semajno. Kuj el ili vojaĝis per ĉareto kaj ĉevalparo de tondejo al tondejo. Bovvagonisto rakontis pri ili:-

"Unu nokton por posttaglabora manĝo la kuiristo surtable metis kukon. Kiam ni tratranĉis la ŝelon el karbo kaj cindro la internaĵo elfluis, sternante sin sur la tablo. Ĝi rampis al ni kiel boao, kaj Maljuna Farunsako (moknomo por kuiristo) metis pladojn sur la planko por ricevi kion falis de la tablo. En la sekvinta vespero li porcie donis ĝin kiel panpudingon. Anstataŭ esti vaporboligita, ĝi nun estis fumsekigita. Vi povis flari ĝin venantan. La submastro provis ĝin krevi per hakilo sed la,hakilrando rompiĝis. Neniu volis plu tuŝi ĝin. Nu, dimanĉe li regalis nin per prunpudingo, kiu ne tro malbone kondutis. Tamen ni estis iom mirfrapitaj kiam li poste informis nin ke ĝi estas la malnova kuko-fumâita-pudingo kiu jam frekventis la tablon dum la tuta semajno. Li fine devis forjeti la restaĵon de ĝi---tro da historio ĝi havis!

Prizorgi akvujojn, akvotruojn, ripari limbarilojn estis la soleca tasko de limrajdistoj. Forege de civilizacio, nur malfacile li memoris tagojn kaj datojn. Unu havis strangan sunhorloĝon. Li faris ĝin el dikaj lignaj najloj ŝovitaj en la teron je radio de dek futoj ĉirkaŭ arbo. Staris dek tiaj precize unu horon de la alia, tiamaniere ke la ombro surkuŝis la unuan je la oka matene kaj la lasta je la kvina posttagmeze. Sed li plendis ke tiu aranĝo postulis tro da reguligado. Lia kalendaro estis same kurioza: lia kruda materialo estis du konfitaĵujoj kaj sep ŝtonetoj. Unu ujon li markis "Tiu ĉi Semajno" kaj la alian "La Antaŭa Semajno" kaj faligis ĝin en "Tiu ĉi Semajno", kaj tiel plu ĝis troviĝis sep en "Tiu ĉi Semajno". Tiam estis jam dimanĉo---li lavis sin kaj ŝanĝis la vestojn.

Aŭstralio grande ŝuldas al siaj pioniroj, esplorulojn, orministoj. Multaj el ili sukcesis, sed blankiĝintaj ostoj, kiuj tie kaj tie kuŝas, atestas ke ankaŭ multaj pagis la vivon por prosperigi la landon en kiu ni nun pli sekure vivas.

Malloniĝige tradukis <u>F.R.BANHAM,</u> D.B.E.A.

<u>Notoj de la Tradukinto:-</u> (1) Tekste "swagman". Aŭstralia vorto origine signifanta "laborulo" kiu surdorse portas la propraĵn vivnecesaĵojn, irante piede de lok' al loko por ricevi dungojn. Sed en la nunaj tagoj "swagman" povas ankaŭ signifi vagulon kiu, ofte

ne tre malproksime de la urboj, vivas pli-malpli vagabonde. (2) Tekste "tramp". Vojvagulo kiu aŭ serĉas mallongajn laborojn, aŭ, ĉe la nehonesta, sentaŭgula speco, almozpete kaj ŝtelete klopodas viv sen laboro. (3) Tekste "goahna." Aŭstralia fuŝaĵo por "iguana" Sed la Aŭstralia besto ne estas "iguana"; ĝi estas lacerto de la genro Monitoridae aŭ Varanidae, trovebla ankaŭ en **Afriko.**

---

## LA GLACIAĴISTO.

de Peggy Wright. El The News, Adelaide, 16/6/45.
Resume tradukita de L.E.BAILEY, D.B.E.A.

Nur Anne Barrett, la blindulino, sciis kial Jean-Marie Smith faris la strangan testamenton kiu kaŭzis babiladi la najbarojn trans palisaroj kaj ĉe stratanguloj. Kaj Anne, aŭskultanta demandojn kaj gratulojn en la polveca front-salono kun ĝia salikaĵaj seĝoj kaj velkintaj potkreskaĵoj, ridetis kaj ne klarigis.

Jean-Marie estis fierinta pri du aferoj---la ruĝeta, flava, kaj blanka glaciaĵo kiun li faris en sia bonorda, senmakula butiko en mallarĝa Brisbana strato, kaj sia tenora voĉo, neinstruita kaj iom sukereca, sed tre agreble aŭdata. Li elspezis multe da mono por diskoj, kiujn li ludis sur malnova gramofono en la familia ĉambro, kiu, por verda kurteno, disiĝis de la butiko, kaj ofte li iris al koncertoj, sola, sed ĉiam en la plej bonaj sidlokoj.

Kompreneble la najbaroj, respektindaj sed ne imagemaj, juĝis lin stranga, kaj rimarkis kun nedefinita malaprobo, ke li ŝatis sin teni for de aliuloj. Neniu multe sciis pri la dika malgranda glaciaĵ-faristo. Li kutimis mallaŭte kantadi la tutan tagon, sed plejparte homoj ne komprenis lian muzikon, kaj li ne parolis al ili pri io ajn krom la vetero kaj la plej lastaj novaĵoj.

Anne sciis lian historion ĉar ŝi estis lia sola vera amiko. Li donis al ŝi ujojn da glaciaĵo por porti hejmen al la infanoj, kaj placis al ŝi kurbiĝi en seĝo dum li laboradis, kaj aŭskulti al liaj kantoj. Tiuj ĉi estis la sola muziko kiun ŝi aŭdis ekster la raŭkaj arioj kiuj eliris el dekduo da radioj kiam ŝi paŝis laŭ la strato.

Ne troviĝis multa mono en la familio Barrett, kaj oni konstatus malpia malŝparado monon elspezitan por muziko, tiom pli ke Anne ne gajnis siajn proprajn vivrimedojn.

Jean-Marie ĉiam sentis iom da sia solceco foriĝi kiam li parolis al la blindulino pri sia alloga, sentimentala Franca patrino kaj sia malŝparema Angla patro, kiu venis al Aŭstralio serĉanta orarlunan riĉecon, kaj mortis subite dum li ankoraŭ atendis, kiel S-ro Micawber, por io bona aperi.

Jean-Marie estis tre juna kiam lia patrino, sopiranta sian naskiĝan landon, tamen decidis fari la plej bonan el okazintaĵoj kaj starigis malkaran pension en Suda Kvinslando.

Unu el la loĝantoj estis blonda, beleta knabino, kiu laboradis en konfitfabrikejo, kaj kutime aspektis laca kaj malnutrita ĝis S-ino Smith aparte interesiĝis pri ŝi, kaj certigis al ŝi amikojn kaj bonajn manĝajojn.

"Ŝi estis kiel feino sur Kristnaskarbo," Jean-Marie diris al Anne dum ŝi kudris butonon sur lia plejbona ĉemizo. "Ŝi havis okulojn kiel steloj kaj voĉo kiel birdo, kaj ŝi estis tre deteniĝema." Baldaŭ ili enamiĝis kaj geedziĝis, kaj faris belegajn projektojn por la estonteco. Kaj la feliĉo de Jean-Marie estis kompleta kiam naskiĝis ilia filino, kaj liaj malhelaj okuloj brilis dum li priskribis ŝin al Anne.

"Ni nomis ŝin Maria laŭ ŝia avino," li diris. "Ŝi havis hararojn molajn kaj lanugecajn kiel etan kokidon, kaj rondajn ruĝajn vangojn, kaj ŝi gargarsonis la tutan tagon. Ŝi kuŝadis en sia liteto aspektanta tiel bela kiel kerubo, kaj ridetis kiam mi kantis por ŝi. Sed estis la violono kiu plej donis al ŝi ĝojon. Ŝi amis muzikon. Ŝi estus farinta ĝin por si mem unu tagon," kaj Jean-Marie murmurkantis kanteton sub sia spiro, kaj troviĝis nenia alia sono en la ĉambro krom la kraketado de la fajro aŭ de Anne la klik-klik de ŝiaj trikiloj.

Li ne multe parolis pri sia edzino kaj etulino krom diri mallonge ke antaŭ jaroj ili estis mortigitaj en tram-akcidento.

Estis jus post la atako sur Pearl Harbour ke Jean-Marie diris al Anne ke li soldatiĝos. Ŝi memoris ke li balbutis la vortojn kaj ŝi povis aŭdi la sonon de siblanta graso dum li fritis kolbasojn por teo, kaj la zumadon de bolilo sur la forno.

"Antaŭe mi ĉiam diris al mi, ke tiu ĉi milito ne estas mia afero, kaj ke mi estas ne sufiĉe juna," li diris, "sed mi estas Aŭstraliano kaj nun mi vidas ke neniel alian mi povas fari. Do mi vendas la butik-komercon, kaj estas kelkaj juveletoj kiujn mi volas ke vi havu antaŭ ol mi foriros. Ili apartenis al mia edzino, sed nun mi ne plu bezonas ilin."

Anne saĝe kapjesis. "Mi komprenas, Jean-Marie," ŝi malrapide diris. "Sed en la tago vi revenos kaj ree faros muzikon por mi, ĉu ne?"

Do Jean-Marie varbiĝis, kaj li aspektis komika figuro en sia malbone formita "khaki", kun kurba ĉapelo balance sur siaj malhelaj bukloj kaj nova aplombo en sia paŝado.

Li trovis tre malfacila la komunan vivon de la Armeo, kaj li ridis kun Anne pri eraroj kiujn li faris, sed unu tagon li vizitis ŝin kun nova fiero en sia maniero kaj du strioj sur la dekstra maniko de sia uniformo. Ŝi tuŝis ilin dolĉanime per siaj sentemaj manoj dum li informis ŝin tre kviete, ke finfine li foriras.

"Sed ni havos muzikon ree kiam mi revenos," li diris.

Jean-Marie abomenis la koton kaj varmegon kaj lacegon de la ĝangalo kaj super ĉio la necesón mortigi, sed troviĝis neniaj plendoj en liaj leteroj al Anne.

Unu el liaj kunuloj skribis al Anne post lia morto.

Kiam nekonata homo alvenis kun la novaĵoj pri la testamento,

Ja mi iel sentas ke vere mi ŝatus ke vi prenu la lokon! Nu, ĉu vi venos de la naŭa ĝis la kvara, lundon ĝis vendredon, de la proksima semajno? Certe vi ŝatus renkonti Alan, ĉu ne? Li estas en la korto, plejeble lud ante kun la katido."

Do ili iris en la korton, kaj Alan kuris al la patrino kaj rigardis kun n iva scivolemo la vizitantinon. Ŝi estis sorĉata, kiel ĉiuj kiuj koni̇s lin, per la blonda har_ro, la viglaj okuloj kaj la senafekta amikeco, kio estis donaco de la patrino.

Poste Alan mire trovis ke la vizitantino ofte venis, kaj ke foje ŝi restis dum la patrino eliris. Estis bona aranĝo, tamen, ĉar Maj (kiel li kutimiĝis nomi ŝin) sciis ĝuste kiel plaĉi al li kaj kontentigi kaj amuzi lin, kiel patrino. Do, ne multe ĝenis lin kiam lia patrino foriris ĉiun tagon.

S-ino Adamson estis trovinta la lokon kiun ŝi deziris, dum la kelkaj tagoj en kiuj ŝi pretigis Alan por ŝia foresto, kaj nun ŝi sentis sin libera por doni sian tutan energion kaj bonecon al la laboro. Estis nova sfero por ŝi, esti patrino al dudeko da infanoj anstataŭ al unu, kaj ŝi amis ilin ĉiujn. Sed ŝi ne povis ne ami Johanon iom pli ol la aliaj. Neniu ne povis. Ili ĉiuj amis lin pro la gaja animo, la malhelaj okuloj, la dolĉa voĉo kaj la natura ĉarmo de kvarjarulo.

"Li venis antaŭ ĉirkaŭ du semajnoj," la estrino diris al ŝi, "kiam patrino prenis laborlokon. Ni ne multe scias pri ili---ne faras multajn demandojn pri infanoj kaj parencoj, precipe dum la milito. Multo da takto kaj toleremo ni bezonas nun, ja certe. Agrabla virino, la patrino, tamen. 'Havis pli bonajn tagojn iam,' mi diris al mi kiam mi renkontis ŝin ---ŝi ĉiam venas post via foriro. Ne povas lasi la laboron ĝis tiam, ŝi diras."

Johano ŝajnis ekŝati Soinon Adamson, ankaŭ, eble ĉar ŝi subkonscie donis al li pli multe da atento ol al la aliaj. Li rememorigis ŝin pri ŝia propra Johano---la ĉarmo kiu logis ĉiun, la bukla bruna hararo, la briletantaj okuloj, la vibra voĉo la natura gajeco. Ŝi amis lin profunde, kvankam ŝi tute konstatis ke lia ĉarmo devus gajni por li admirantojn, pleje inajn, pri kiuj ŝi sciis nenion . Sed ĉiam li estis aminda kaj bonkora al ŝi, kaj ŝi neniam tenis ion kontraŭ li. Precipe nun---li havis malmulte da ia plezuro malantaŭ pukdrato.

Iun tagon, letero atendis ŝin kiam ŝi hejmenvenis.

"Mia fratino venos morgaŭ, Maj. Vi povos iri frue, se vi tion deziras---ĉirkaŭ la tria, ŝi venos, me kredas. Alan estos bone kun ŝi, kaj vi havos la oportunon por marĉandi, se vi volas."

Ŝu jus estis pret pretiĝinta por forlasi la kindergartenon la sekvantan tagon, kaj ĵus venis el la vestejo kiam ŝi vidis antaŭ ŝi altan, blondan virinon kiu tenis permane malgrandan, brunokulan, ridetan knabon.

"S-ino Jonson!"

"Ho, S-ino Adamson!"

"Kaj Johano!"

"Li estas mia filo, sinjorino. Mi ne kred---"

"Sed vi diris ke via edzo mortis antaŭ sos jaroj!"
"Jes ja, sinjorino, sed---oh, mi ne kredis ke mi iam renkontos vin ĉi tie!"
"Estas bone, Maj, mi komprenas ĉi tie. Mi nur surpriziĝis dum momento. Sed kial vi ne diris tion al mi en la unua tempo, por alkonduki Johanon por esti kun Alan? Ili estus tiaj bonaj kamaradoj!"
"Ne, sed mi ne povus, vere, sinjorino! Mi renkontis patron de Johano en Armeo Kantino. Li estis Kapitano Johano Adamson."

---

(A.REJZIN)

KION MI DEZIRAS.

Kion mi deziras nun
Tuj---al vi ne diros---
Mi atendos ĝis la sun'
Post tagiĝ' suriros.

La unua sunradi'
Jam rakontos tiam,
En la koro kion mi
Tre forkaŝis iam.

Kaj la nova birdkantet'
Estos rememoro---
Pri la plor' de mi, homet'
Dum malluma horo.

KIAM FLORAS....

Kiam floras verdarbetoj,
Ŝvebas, flugas kantbirdetoj,
Kaj la sun' ridetas, lumas
Ĝi al ĉiu palpebrumas---
Mi demandas je la koro:
Ĉu somero estas horo?

Floroj velkas, se mi vidas,
Birdoj en la kaĝoj sidas
Kaj la sun' malofte estas,
Nur la ventoj fajfas, festas---
Mi jam konas tiam horon!

LA HOMOJ KAJ LA KORO.

Tre profundan vastas koron
Ofte havas la homet'---
Ĝi posedas ĉiam bonon
De plej alta epitet'.

Sed paroli kor' ne povas,
Kaj suferas ĉiam ĝi---
La plej bona bela restas
Sekretaĵo nur por mi.

---

TRADUK-KONKURSOJ.

TRADUKO de KONKURSO 24: (Kompilita el 3 tradukoj.)

Mi ne atingis la grandan armeon de rifuĝintoj ĝis kiam mi transpasis la urb-limojn. De tiam mi estis parto de tiu armeo. Estas unu afero, vidi milojn da lacegaj rifuĝintoj en novaj-filmo; estas io tute malsama, esti unu el ili. Ni moviĝis malrapide, kelkfoje ni estis haltigitaj senmove por la daŭro de tri horoj. La vojo etendiĝis de Parizo al B ourdeaux kvar-cent-mejlojn-fora, kaj ĝi estis prempakita laŭ la tuta distanco. Miloj de tiuj homoj venis el la Nordo, multaj estis survoje dum du semajnoj. Ili havis nur unu penson: moviĝi suden. Moviĝi for de la teruro, kiu flugfalegis sin de la ĉielo. Formoviĝi de la servuto, kiu estas ilia sorto sub germana regado. Malmultaj havis iun monon. Malmultaj sciis kiom ili iradis.

VENKINTA GRUPO:- MELBOURNE ESPERANTO CLUB.

Tradukota Teksto Konkurso 26:

For 4000 years, glass has been holding out on us. It is one of the strongest and hardest materials known to man, yet, because it has also been so brittle, we have not realised its possibilities. B ut to-day, as the result of wartime research, it is doing jobs no other material could do. And to-morrow it will add immeasurably to the conveniences and comfort of living.

In the laborities and shops of the big glass companies, I have seen glass that can be sawed and nailed like lumber; glass that will float; glass that bounces; glass that can be bent like rubber, twisted into yarn, tied into knots and woven like silk.

I saw experts flying an aeroplane partly made of glass---not window glass, you can't see through it. In fact, it looks just like any other trainer-plane. But the fuselage and tail section are made of glass-cloth---twice as strong and half as heavy as the conventional aluminium-skinned fuselage. Pound for pound, it is the toughest airplane ever built---faster, cheaper to produce and longer lived.

(Readers Digest: What won't they d o Next with Glass!)

Tradukoj d evas atingi la subskribinton antaŭ la 10.?.45.

REZULTO de la DUA JARO de la TRADUK-KONKURSO.

La jar-premion de A.E.A. gajnis Melbourne Esperanto Society; la premio estos sendita post sciigo al s-ro Hillerman pri la libro dezirata. Gratulon, kaj dankon al ĉiuj kunlaborantoj!

P.E.SCHWERIN, 1 Carabella Flats, McDougall St., Milsons Pt., N.S.W.

---

LITERATURECA TRADUKO. de F.R.BANHAM.

DON QUIXOTE: Cervantes' great, ironical, romantic story is written in a style so noble, so nervous, so humane, so branded with reality, that "the mere touch and impact of it puts courage into our vains." It is not necessary to read every word of this old book. There are tedious passages. But never to have opened it; not to have caught the tone, the temper, the terrible courage, the infinite sadness of it, is to have missed being present at one of the "great gestures" of the undying, unconquerable spirit of humanity.

La granda, ironia, romaneca rakonto de Cervantes estas verkita en stilo tiel nobla, tiel viglesprima, tiel homeca, kaj tiel klare karakterizita je la realeco(1) ke "la mura tuŝo kaj kontakto kun ĝi metas kuraĝon en niajn vejnojn." Ne estas necese, legi ĉiun vorton de tiu malnova libro. En ĝi trovas tedaj partoj. Sed ne malfermi ĝin, ne kapti ĝian tonon, humoron, teruran (2) maltimon kaj senlíman malĝojon--tio signifas malesti ĉe unu el la "grandaj faroj" (3) de la senmorta, nevenkebla spirito de la homaro.

(1) Pri kio estas "reality" la homoj eterne argumentas. (2), la senco

estas nur konjektebla. (3) "geste" en la Franca lingvo havas du sencojn; en Esperanto nur unu.

---

VIDU sur p.121. S-ro K.HIRSCHEL tradukas ilin jene:-

(1) Kion el via scio ni ne scias?
(2) Tiele vivu, ke ĉe la finiĝo vi deziros vivinta tiele.

LINGVAJ NOTOJ.

BIBLIA ERARO. En GENEZO 29/10 Laban estas nomita "la frato de la patrino de Jakobo;" en 12 Jakobo informas al Raĥel, ke li mem estas "la frato de ŝia patro." (do ŝia onklo). En 15 Laban diras al Jakobo: "Ĉu pro tio, ke vi estas mia frato...."

Lutero sekvas tiun eraron en sia Biblio; kaj---kio estas tre stranga---ankaŭ la Reviziita Eldono de 1882j. Sed mia Franca havas "neveu" (nevo) anstataŭ "frato" ĉe 12 kaj 15. La Esperanta Biblio donas "parenco" ambaŭloke. Kompreneble la Franca kaj Esperanta havas sencon.

IGNORI. La Franca "ignorer"---ne scii; la Germana "ignoriren"---intence ne atenti; la modernangla "to ignore" same kiel la Germana. Francoj Esperante ofte misuzas la verbon, erarigite de la patra lingvo. Oficiala Klasika Libro avertas Francojn:- IGNORI tute ne estas samsignifa kiel NESCII; signifas nur: "ne voli koni, intence ne atenti, ŝajnigi kvazaŭ oni ne scius."

TUKO KUN ĈELOJ? En la Fabeloj de Andersen p.1/2 mi legas "Mi donos al vi mian antaŭtukon kun bluaj ĉeloj." Angla traduko donas "I'll give you my blue-checked apron." Kiel konate, Zamenhof tradukis ne la Danan originalon sed ian Germanan tradukaĵon. Ĉu "Zellengewebe" (ĉela teksaĵo)? Kiel povas ĉeloj esti bluaj?

TO SPELL. Millidge donas "silabi", por "spell" kaj "syllabify", sed la dua ne signifas "spell". Fulcher donas "literi" por "to spell". Multaj homoj komprenas per "silabi" la voĉan prononcadon de silaboj, ekz., du-ob-le. Ĉu ne voĉliter(um)i, skribliter(um)i?

MODO POST "TIMI". Jen tikla problemo. Laŭ Zam. (British Esp. Aug. 1908) ekzistas diferenco inter "Mi timas, ke li ne venu," kaj "mi timas, ke li venu." En (a) estas deziro, ke la veno ne okazu (I fear lest he [illegible] come). En (b) la senco estas: I wish him to come, but fear the outcome of that coming. Jen la tabelo:-

(a) Mi timas (dezirante), ke li ne venu--I fear lest he may come.
(b) Mi timas (dezirante), ke li venu.-While deziring that he come, I fear the rezult.
(c) Mi timas, ke li venos (ne venos).--I fear that (as a matter of fact) he will come.

Iu skribis al Zam. pri la frazo en Hamleto, p.142, "Nun mi timas,

ke ĝi denove blinde ne eksplodu," proponante "...ke ĝi eksplodos;" Li respondis: "Vi estas prava; pli bone estus diri 'mi timas, ke ĝi eksplodos;' tamen ankaŭ la unua frazo estas bona, ĉar ĝi esprimas kaŝitan nedeziron."

Laŭ mia opinio estas danĝero, ke la plimulto de Esp-istoj rigardus (a) kaj (c) kiel samsencajn, kaj tial mi esperas, ke (a) kaj (b) formortiĝos el la lingvo, tiom pli, ke ne ĉiu frazekzemplo de (b) klare konformas kun la teorio de "kaŝita timo (aŭ deziro)". Vidu ĉe Georgo Dandin, p.6: "Mi timas, ke li ne rakontu al iu." Fundamenta Krest. 273/20. "Kvazaŭ la aŭtoroj timas, ke oni ne elmetu ilin al publika malhonoro;" Jeremia 38/19: "Mi timas....ke oni ne transdonu min..."

Ŝajnas al mi neutila Francismo, kiu kiu enkondukas la nenecesajn malfacilojn de la verbo "craindre."

------------------------------------ F.R.BANHAM.

## ASOCIAJ AFEROJ.

LIBRO-SERVO---PERANTO en S.Aŭs. La komisiito de la Libroservo enoficigis S-ron Harry W. Buswell, 80 Alfred St., Parkside (S.Aus.) kiel Peranton de tiu servo en South Australia. La movado en la suda ŝtato ankoraŭ estas malgranda sed ni esperas ke ĝi fariĝos pli agema en la estonteco. La facila havebleco de libroj ludas esencan rolon en la pligrandiĝo de nia movado.

La unuaj libroj tenotaj de la nova peranto atingos lin malfrue en Septembro, Plenajn detalojn ni avizos en La Rondo tuj kiam eble.

KORESPONDAJ KURSOJ. Ĉirkaŭ 50 ekzempleroj de la komenca kurso jam vendiĝis en la kvin ŝtatoj de la ĉeflando de Aŭstralio, kaj proksimume 10 studantoj aĉetis la progresintan kurson kies folioj altigas la lernanton ĝis la grado de Diploma ekzameno de B.E.A. Ankaŭ estas mezgrada kurso por tiuj , kiuj bezonas ĝin. Ĝis nun la komisiito por korespondaj kursoj tenas en provizo nur la komencan kurson sed la Sekretario povas importi la du aliajn je ricevo de antaŭpagita mendo. Ni ĉiam aranĝas, ke ĉiu lernanto havu la helpon de bona, kapabla instruisto. Ni esperas, ke baldaŭ ni povos anonci establon de korespondaj kursoj por plibonigi stilon kaj en tradukarto kaj en memesprimo.

Ni denove petas ĉiun membron disvastigi la konon pri niaj kursoj ĉar ili estas fortaj iloj en nia lukto alporti la lingvon al novaj distriktoj, kie nun esperantistoj ne sin trovas.

La kurso-kostoj estas:---Komenca kurso 10/-, Mezgrada kurso 8/-, Altgrada kurso 20/-. ciun demandon pri ili sendu al la Komisiito S-ro F.A.Pitt c/o Koornong School, Warrandyte (VIC.). Li aranĝos instruiston en la ŝtato de la lernanto.

EKZAMENOJ. Ni denove admonas ĉiun personon, kiu povas, mezuri sian

progresan kaj kompetencon per ekzameno. Por detaloj vidu la Jarlibron. En la postmilitaj tagoj ni bezonos la helpon de kompetentaj samideanoj en ĉiu landparto. Ne atendu la militfinon---ekzameniĝu nun.

KOTIZOJ. Membro (kun La Rondo) 6/-. Pagu rekte al la Kasistino tuj kiam Suldata.

G.H.HILLERMAN (Sekretario) 15 Morrice St., Lane Cove, NSW.

---

KASO de LA RONDO, JULY 1945.

Kvitancoj Ricevitaj:- S-inoj Moore, H intze 12/-; S-roj O.Davies, Drummond, D.Guilbert, 18/-; Rev.R.England 4/6; S-ino Wiltshire 2/3. F-ino Weickhart 3/3½, S-ino MacEvoj 3/3½. £2.3.4

Al La A.E.A. 7/6. Al La Rondo £1.15.10.

Elspezoj de la Rondo £4.3.2. En la Kaso £2.11.7.

Abonoj estas 6/- por la AEA kun La Rondo.

W.ADDIS, (Kasistino) 25 Greville Ave, Flinders Park, Adelaide, S.AUS.

---

KVINSLANDO Fraŭlino Carrick, sek-ino de Q.E.S., raportas al la jarkunveno, ke la laboro de la societo estis bona, kulture kaj feste. S-ro T.Suess, forta kolono de la societo, elekte rizevis oficon de prezidanto, S-roj J.McDonald kaj G.Littleton vic-prezoj, F-ino Carrick sek-ino, F-ino R.McPherson kasisto. La bilanco montras negrandan krediton. Dis kutate estis demando de S-ino Groeneweg (Toowoomba) pri havi instruiston el Brisbano en la okazo ke la Teknika Lernejo tiea aldonus Esp-on al sia lernobjektaro. Malfeliĉe, instruisto ne estas trovebla por eventuala servo en Toowoomba, kiu foras 100 mejlojn de Brisbano. La societo ne plu uzas la ĉambron en Albert House, King George Square; ĝi nun komforte kunvenas en N-ro 43 de la sama konstruo. S.WANNER.

(Rim. de Red.--Dankon sinjoro! Ni atentigas legantojn pri la supra ekzemplo de problemo, kiun ankaŭ ni Esp-istoj en Aŭstralio devus fronti---per starigo de asocio de Esp-istaj instruistoj, simile al tiu en Britujo. Tia paŝo valorus pli ol miljara tamburado pri "la neceso enkonduki Esperanton en la lernejojn.")

INDEKSO? Amiko sugestas, ke ni konsideru provizon de jara indekso de enhavo, por faciligi serĉon al artikoloj k.t.p. Dankante lin pro lia intereso, ni tamen rimarkigus, ke ni dubas pri la efektiva helprezulto de tia faro. Ĉu pli ol dudek elcentoj utiligus ĝin? Do tio estus fari indekson nur por relativa malmulto. Ni sugestus, ke la vere-interesatoj, aĉetu kontraŭ kelkaj pencoj indekslibron, kun literoj laŭrandaj, kaj monaton post monato enskribu la enhavaĵerojn en kribra maniero laŭ la persona kaj individueca elekto. Tiel agante, ili not-

us ĝuste pri tiuj, kiujn ili, pro propraj inklinoj, opinius precipe gravaj por siaj celoj---interesa kaj instrua laboro. LA REDAKCIO.

POR S.A.T.-EMULOJ. Dank' al S-ino Hintze ni povas citi kelkajn liniojn el letero al s-ro Lanti. Sendis ĝin s-ro Bannier (Francujo):

"Ĉe 'Arts Graphiques' (Belgio) kuŝas la tuta stoko de 'Leteroj de Lanti' . Espereble ni povos iam venigi tiun eldonaĵon, kiu estas nun tre mendata....Dum la tuta tempo la fidelaj SAT-anoj Paris-aj kunvenis ĉiusemajne kaj de tempo al tempo ekskursis dimanĉe.....En Oktobro 1944 naskiĝis la 'Bulteno de la SAT-Amikaro'....La efiko estas bonega; tian sukceson mi ne atendis. Mi ne supozis ke la sennaciismo trovus tiom da eĥo ĉe la Esp-istoj. La movado refloras; ĉie entuziasmo. Jam preskaŭ 300 k-doj pagis sian kotizon por 1945 (40 frankojn)....'La Plena Vortaro' elĉerpiĝis; bedaŭrinde ne eblas represigi ĝin en Francio; per k-do Sulski mi ankaŭ eksciis, ke en Britio same ne eblas....."

S-ro Lanti aldonas, ke tiaj novaĵoj forte emociis lin.

En la sama letero L. rimarkigas, ke S.A.T. ne povas morti, tial ke en sanskrito sat signifas la Reala Ekzistulo, la Universala Potenco psika kaj kosma. Unuvorte SAT estas Dio mem.... Li aldonas: "Sed eble konvenas, ke mi ne metafizikumu."

En letero al Bannier Lanti skribis: Mi havis viziton de la franca patrioto Ad am, kiu venis por kvazaŭ intervjui min pri la stato de la Esp-a movado. Lin tre indignas la konstato, ke ĉi tie pli kaj pli sentiĝas la usona influo kaj la enplantiĝo de la angla lingvo. Sekve de miaj informoj li verkis artikolon por grava revuo, kiun eldonas l'Institut Franssis d'Amerique Latine, kies sidejo estas ĉi tie....En sia artikolo Adam diras, ke estas patriota devo de ĉiu franco fariĝi Esp-isto. (Ad reso: E.Lanti, Ap.59 Meksiko D.F. Meksikio)

LETERO EL LIMOGÈS. Jen elĉerpaĵoj el letero de Marta Rameau, konata en S.A.T.-rondoj kiel "Branĉeto". Ne malofte ŝi antaŭmilite brodkastis el Stacio Limoges en Esp-o. La leteron ricevis ŝia amiko D-ro MacLarkin, de Normanton (Kv.).

Limoges, la 22an de Februaro 1945. "...terurega vintro, 10 eĉ 16 gradoj Centigrade sub la nulo! kaj nenion por meti en fornon...La Germana invado ne venis ĝis Limoges; pli precize ĝi lasis mian urbon kaj fluis laŭ ĉiuj flankoj. Estis terura vizio, infera vizio. Viziode la Lasta Juĝo. Neniam mi forgesos tion. Tago post tago, nokto post nokto aŭtoj kunportis direkte al sudo nederlandanojn, belgojn, fine francojn. Ĉiuj miksitaj kun soldatoj. Mi ne volis vagadi sur la vojoj, kaj preferis--ĉe devis--morti hejme. En tiu momento mi vidis nin ĉe la fundo de la malfeliĉo kaj kredis ke nia malvenko estis definitiva. Mi sciis nenion pri vi angloj. En nia urbo la radio estis tiom fuŝita, ke neniam mi povis kapti la radion de la Londonaj francoj.

Nia leĝa manĝporcio estis tiel maldika ke mi ofte revenis hejmen,

plorante ĉar post longa atendado oni disdonis du vicojn antaŭ mi la lastan eron da viando aŭ fromaĝo, k.t.p. Por havi legomojn oni devis atendi horojn la alveno de fantaziaj legomvendistoj. Post kelkaj monatoj de tia vivo mi prenis energian decidon: mi bicikle vagadis ĉiulund e tra la kamparo kaj iris ĉe la kamparanojn. Dum tri jaroj, laŭ la nombro de kilometroj, mi faris dufoje Le Tour de France. Kiam la germanoj ankaŭ la sudan parton okupis la vivo ne fariĝis rozkolora. En la komenco ili kond utis antaŭ ni kiel "gentlemen", sed poste ĉio ŝanĝiĝis. La Rezistado organiziĝis en niaj arbaroj montaraj. Sekve: batalo okazis ofte inter okupantoj kaj "maquisards". La vojoj, kiujn mi uzis ĉiulunde ne estis tre sekuraj kaj ofte frumatene mi trovis postsignojn de batalo....Ofte ankaŭ la aviadiloj venis nokte porti armilojn kaj ĉiuspecajn provizojn al la "arbaruloj", kaj la sirenes (fajfilegoj) muĝis pro alarmo. Ĥa kiomfoje mi vekiĝis je tiu hurlado. Neniam mi povis alkutimiĝi. Mi ne estas timema, s ed tiu morto kiu falas el la ĉielo teruris min. Fine ni suferis nur tri bombardojn, sufiĉas ĉu ne?

Nia regiono tre suferis pro la ĉeesto de S.S. Certe vi aŭdis pri la detruo de nia vilaĝo Oradour? Estas krimo de la "division S. S. das Reich." Dumil homoj trovis abomenan morton tie....Nun ni estas pli kvietaj, sed ankoraŭ materiale tre malfeliĉaj....ni ne plu havas vestojn, sapo mankas kaj estas tiom malbona ke ĝi difektas la ŝtofojn. ciuj ni deziras la finon de tiu inkubŝonĝo....Tre certe vi ne trovos la gramatikon de Kalocsay kaj Waringhien. La kutima eldonisto mortis en Parizo dum la invado...,Por forgesi ĉion malagrablan mi verkas poemojn kaj kanzonojn por infanoj. Mi mem verkas la muzikon.... (subskribo)

BERNARD ACKERMAN Inc. have published a "10 in 1 Pronouncing Dictionary of Basic Language." 50c.paper; 1.50 cloth. "This amazing booklet gives you at an amazingly low price ten languages, including Esperanto, in a nutshell," says Dr. Solzbacher in "American Esp-ist."

ERAROJ en nia LASTA. P.136 (ĉe piedo) Kial "Slavophil" tie ĉi? p.139, lasta linio, "Flandra;" p. 141, 9 de la malsupro, "ke E-to estas".

LASTMOMENTE. Important announcement!

S-ino HANKS is to give a talk on 3AR, on Wed. August 29, 5 p.m. (Eastern Standard time.) It will be on Victorian regional stations as well, but is not to be on in other states. The title of the talk is "300 YEARS QUEST for a UNIVERSAL LANGUAGE." It will be a brief survey of some of the many attempts, and the part dealing with Esperanto will be the concluding few pars.

---

Published by F.R.BANHAM, 2 Banchory St., Essendon, W5 VIC.

OFICIALA ORGANO DE LA AUSTRALIA ESPERANTO ASOCIO

# LA RONDO

THE AUSTRALIAN ESPERANTO MONTHLY

ELDONITA DE F.R. BANHAM.
2 BANCHORY ST. ESSENDON W.5
VICTORIA AUSTRALIA.

VOL. 5 No. 12 Sept. 1945.

# L A R O N D O.

## L A R E D A K C I O.

S-ro F.R.BANHAM, D.B.E.A. REDAKTORO
2 Banchory St., Essendon, W5, VIC.

F-no L.E.BAILEY, D.B.E.A.
18 Sherbourne Rd., Medindie Gdns., Adelaide, S.AUS.

F-no W.A.ADDIS, KASISTINO,
25 Greville Ave., Flinders Park, Adelaide, S.AUS

---

### PROVO AL TITOLTRADUKO.

Tradukadi titolojn estas ofte malfacile, foje eĉ tre, ankaŭ por homo de la sama lingvo kiel la aŭtoro. Mi havas en penso ekzemple "Jude the Obscure," de Thomas Hardy. Ĉu Jude la mistera, la malmulte konata, la malfacile komprenebla, la triviale naskita, aŭ miksaĵo de ĉiuj? Ankoraŭ: "Far from the Madding Crowd" (sama aŭtoro). La linio venis el tiu majstra belega poemo de Thomas Gray, "Elegio en Kampara Preĝejtombejo." Sed kion precize signifas la aktiva participo "madding"? Milton ankaŭ uzis ĝin. Mi dirus, "freneze bru(aĉ)anta---en la sencela, sensenca maniero de la baraktanta mondo de aferoj.

Estas okazoj, kiam estas necese legi libron eĉ tre zorge, por perfekte sciiĝi, kion la titolo vere volas komprenigi. Por doni perfektan tradukon de ĉiu titolo, necese estus havi ne nur mirinde evoluintan povon percepti la subtilajn nuancojn de vortoj kaj ties signifoj, sed ankaŭ esti kompreninta la enhavojn de la koncernaj verkoj. Tio eĉ pli validas en la nunaj tagoj, kiam la titoloj estas ofte iel-impresionismaj. Komparu: "Call it a Day."

Preterpase, ni rimarku "The Innocence of Father Brown (G.K.Chesterton). Naiveco, ne Senkulpeco. Homo ne leginta la verkon povus mistraduki. Franco donis "S-ro Britling travidas ĝin" por "Mr.B. sees it through" (S-ro B. eltenas ĝis la fino). Nu, ni konsideru kiel traduki titoloj de kelkaj verkoj de Charles Dickens:

Lasu proprajn nomojn stari senŝanĝe.

<u>LA HORLOĜO DE MASTRO HUMPHREY</u> . Master Humphrey's Clock. Franco: La horloĝo de Maître Humphrey. Master H. estas maljuna viro. Sed la Angloj ankaŭ uzas "master" ĉe nomo de knabo aŭ junulo ne viriĝinta. Ekz., "Here is a present for Master Braŭn" (por diferenciĝi de Mr., la patro). Sed Humphrey ŝajne estas la mastro de domo kluba.

<u>LA MALNOVA ANTIKVAĴBUTIKO:</u> The Old Curiosity Shop. Fr. La magazin de antiquites.

<u>RAKONTO PRI DU(ĈEF)URBOJ:</u> A Tale of Two Cities. Fr. Un Histoire de

doux Villes. En Esperanto troviĝas por "city" ankaŭ "civito" kaj "metropolo." Mi iom timas ke Anglo ne konanta la verkon retradukus erare per "capital" aŭ "capital cities."

LA SONORILADOJ: The Chimes. Rhodes kaj Millidge uzas tiun; Fulcher-Long "kunsonoroj."

LA OBSEDATA VIRO: The Haunted Man. La viron obsedas la konsciencomordoj de peko kaj la doloroj de malfeliĉa pasinteco.

BLEAK HOUSE: (lasu stari). Domo elmetita al la vento-pluvo, malvarma, senŝirma, tute malaloga, repuŝa.

MIZERAJ TEMPOJ: Hard Times. Fr. Le Temps Difficiles. En senco de ekonomie malfacilaj. Zamenhof uzas kaj "tempo" kaj "tempoj" en tiu senco. Kp.: kara tempo, tempo de kareco: time of scarcity.

NIA KOMUNA AMIKO: Our Mutual Friend. La Angla vorto precizece devus esti "common" ne "mutual". Dickens erare uzis. Mutual signifas reciproka. Fr. Notre Ami Mutuel.

GRANDIOZAJ (ESPER)ATENDOJ: Great Expectations. Expectations enhavas en si la duoblan nocion de atendi plus esperi, de nek atend(at)ajoj nek esper(at)ajoj plene respeguloas. H e had expectations: Li esperatendis, aŭ atendesperis ricevi heredaĵon. Mi proponas grandiozaj anstataŭ grandaj.

LA MISTERO PRI EDWIN DROOD. The Mystery of E.D. Ne "de", sed "pri".

KRISTNASKA RAKONTO: A Christmas Carol. Temas nek pri "carol" nek pri "chimes", sed Martyn Westcott (1905) tradukis per "sonorado"! Fr. Le Conte de Noel.

LA MALGRANDA DORRIT: Little Dorrit. Fr. La Petite Dorrit.

LA SKRIBAĴOJ, AŬ MEMUAROJ, DE LA KLUBO PICKWICK.

Rimarku eraron en "Batalo de l'Vivo" 6/16: "sabataj sonoriloj" (dimanĉaj...)

---------------------------------- F.H.BANHAM, D.B.E.A.

ESPERANTISTOJ FLUGAS de EŬROPO al AŬSTRALIO (20.-28.10.38).(Daŭrigo)

VII.Sepa Tago: Singapore-Palembang-Batavia-Sourabaya-Den Pasar. Distanco: 1170 mejloj; neta flugdaŭro 7 horoj.

Je la 6a matene ni forlasas Singapore kaj tuj troviĝas super la maro, la Malakka Strato kaj la insuloj de la Riouw-kaj Linga arkipelagoj. Baldaŭ ni vidas la marbordon de Sumatra kiel nigran linion en la matena sunlumo; poste troviĝas sub ni densa ĝangalo, kaj meze en ĝi vidiĝas spaca senarbejo, Talang Betutu, la aerdromo de Palembang. Dum ni ĝuas dunmatenmanĝon en la malfirma ripozejo, ni sentas tute apude la gigantan misteron de la ĝangalo. La urbo mem situas ĉe aŭ parte en

la rivero Musi. La domoj ambaŭflanke de la rivero estas konstruitaj sur bambuo-flosoj aŭ sur altaj fostoj; la butikoj malfermiĝas al la rivero, ĉar la indiĝenoj preferas butikumi en boatoj. La tereno inter urbo kaj maro estas preskaŭ ĉie marĉa kun rizkampoj kaj kokosplantejoj.

Forlasinte tiun idilian flughavenon, ni transpasas la ekvatoron sen ia ceremonio (ni eĉ ne povas vidi iun linion sur la tero) kaj primiras Pladjoe, unu el la plej grandaj petrol-rafinejoj kaj deponejoj de la Nederlanda Shell Kompanio. Estas vasta industri-centro kun multego da rezervujoj kaj propra haveno; ĝi speciale altiras nian




atenton, ĉar ties ĉef-direktoro estis nia kunpasaĝero ĝis nun. Denove ni troviĝas super nepenetrebla ĝangalo kun gigantaj amasoj da verda vegetaĵaro.

Ni forlasas la insulon Sumatra kaj en alteco de 11,000 futoj transflugas la Sunda-Straton, inter kies multaj rokaj insuletoj la plej interesa estas la Krakataŭ, la fama submara vulkano, kiu de tempo al tempo eligas grandajn kvantojn da vaporaĵoj. Ni alproksimiĝas al la insulo Java, la ejo de eterna somero, centro kaj koro de Nederlanda Hindujo, "kiu estas drapirita ĉirkaŭ la ekvatoro kvazaŭ smeralda zono."

Proksime al la marbordo multaj blankvelaj boatoj de la indiĝenoj ornamas la blu-verdan akvon, kaj jam kuŝas antaŭ ni Batavia. Ĝi aspektis ĉarma kun sia ŝipoplena haveno, blankaj domoj, arboj kaj multfloraj ĝardenoj. Iam fondita rekte ĉe la maro, ĝi nun situas kelkajn mejlojn for de ĝi, kaj nova haveno devis esti konstruata en 1883. Ni alvenas tie post la 10a matene; ni devas ĉi tie ŝanĝi la aeroplano, ĉar la K.L.M.-servo finiĝas tie kaj la daŭrigo de l'flugo okazos en K.N.I.L.M.-aviadilo Lockheed-tipo, kiu ne estas sama granda kaj komforta kiel la ĝisnuna. Ĉar ĝi forflugos nur post du horoj, la reprezentanto de la kompanio forkondukas nin aŭtomobile por interesa vizi-

to de la loko. Antaŭe ni danko adiaŭis de niaj ĝisnuna piloto kaj aviadistaro, kiuj tiel bone zorgis pri ni kaj nun ferios en malvarmeta loketo for de la urbo.

Estas ĝojo, en plena sunlumo veturi tra tiu fremda mondo. Unue la vojo serpentumas tra kaŭĉuk-, kafo- kaj rizo-plantejoj. Ambaŭflanke vidiĝas iam kaj iam malgrandaj bambuo-domoj kun indiĝenaj familioj sidantaj antaŭe; nun pli urbaj aspektoj, jen granda kazerno kun domoj por oficiroj kaj sub oficiroj; jen la malnova, indiĝena parto kun sia vigla moviĝo sur la stratoj; duradaj ĉaretoj tirataj de malgrandaj ĉevaloj kun tintiloj surdorse; tramo kun du alpendaj veturiloj, kies vandoj konsistas nur el drat-plektaĵoj kaj kiuj estas plen-plenaj de indiĝenoj; bazaroj, surstrataj vendejoj; Hindoj, Araboj, Ĉinoj, Japanoj en brilkoloraj vestoj, kontraŭ kiuj kontrastas la blankaj de la Eŭropanoj kaj Amerikanoj. Meze en la ĉefstrato mallarĝaj kanaloj, en kiuj virinoj puriĝas tolaĵon aŭ eĉ banas sin. Ni renkontas funebran procesion: la ĉerko, kovrita per koloraj tukoj, kuŝas sur stangoj, kiuj viroj portas surŝultre, la funebrantoj sekvas piede.



TEMPLETO • BALI

Nun ni envenas la centran parton kun ĝiaj noblaj, malnovaj konstruaĵoj laŭ kolonia stilo, kaj multaj bonaj ekzemploj de moderna nederlanda arkitekturo; elegantaj hoteloj, bankpalacoj. muzeoj, pordegoj, staci-domoj, oficejoj de internaciaj industri-koncernoj, sportejoj kaj ĉiuspecaj konstruaĵoj administraciaj. Ni haltas ĉe la mondfama "Hotel des Indes," unu el la plej luksaj gastejoj en la Malproksima Oriento, kies "Rijsttafel" (rizomanĝaro) havas internacian reputacion pro sia multnombro de manĝaĵoj kaj de servantaj kelneroj. Bedaŭrinde estas tro frue, por sperti tiun specialaĵon nun; do ni kontentiĝas je ordinaraj refreŝaĵoj, kies nomojn ni tamen ofte ne scias, en la agrabla komforto de la bele ornamitaj haloj. Daŭrigante nian veturon ni vidas novajn koloniojn de dometoj por ne-riĉuloj laŭ nederlanda tradicio kaj kvartalon de tre impresaj modernaj vilaoj, apartenantaj ofte al riĉaj ĉinaj komercistoj. La nomoj de stratoj kaj placoj estas nederlandaj, kaj la tuta urbo respeguliĝas la riĉecon, trankvila memfidon kaj purecon de la hejmlando.

Ni revenas al la flughaveno iom malfrue, estas tempo por la forflugo. Oni rapidiĝas nin al la aviadilo, kies motoroj jam zumas malpacience. Laŭdire niaj kofroj kaj havaĵoj jam estis transportitaj en specialan pakaĵejon de l'aeroplano---ĝis nun ili ĉiam staris je nia dispono en la flugkajuto. Oni ŝovas nin internen, la pordo fermiĝas kaj jam ni forlasas la teron. Daŭras kelkajn minutojn, ĝis kiam ni malkonfuziĝas post tiu trorapida adiaŭo; tiam ni devas konstati, ke

niaj pluv-mantelojn kaj unu manpoŝo restis en la vestejo de la flughaveno. Ni sciigas tion al la piloto, sed jam estas tro malfrue, por ree surteriĝi. La radio-telegrafisto kontaktas la flughavenon, kiu certigas, ke ili postsendos la postlasaĵojn en la sekva aeroplano al Sydney. Fakte ni re-ricevis ilin tie post ok tagoj---dum kiuj ofte pluvis en Sydnej---kaj post iuj malagrablaj formalaĵoj en la doganejo.




Kiam ni iom kvietiĝis post tiu akcidento ni jam estas de longe super la vastaj rizkampoj de Java, transflugas Samarang, kaj post du horoj atingas Sourabaya, la centron de la nederlanda-hinda sukerindustrio. Ĝi estas bela, moderna urbo, la haveno abundas de grandaj vaporŝipoj kaj aroj da indiĝenaj velboatoj, kiuj trafikas inter la insuloj.

Post mallonga paŭzo ni ree leviĝas kaj ŝvebas super densa praarbaro, ĝis ni transflugas la mallarĝan marstraton, kiu disigas Java de la insulo Bali. Indiĝenaj kanotoj kun ŝvelaj veloj vidiĝas kaj en la maro koralo-rifoj, kiuj longtempe protektis la insulon kontraŭ invado. La okcidenta parto de Bali, kiun nia maŝino nun transrapidas, estas sovaĝa senfrukta areo, ne multe konata eĉ al la indiĝenoj pro superstiĉa kredo, ke tie regas malbonaj fantomoj.

Iom post iom, la ĝangalo sube montras senarbajn pecetojn kaj rizkampojn sekajn; unuaj signoj de regulara hejmvivado evidentiĝas, sennombraj temploj inter la dometoj. Ni atingas la sudan duoninsulon kaj tie, meze de kampara simpleco, for de l' moderna bruo, troviĝas la aerodromo sur pentrinda altaĵo, kie ni nun malleviĝas, je la 6a vespero.

Dum pli ol duona horo ni veturas sur vojo, malleviĝanta al Den Pasar, tra imponaj densejoj, palm-arbaroj, kanejoj, rizkampoj....Kabanoj primitivaj de la indiĝenoj kun plekto-bariloj el palm-folioj, la alir-vojo trans la foso formita ofte nur el unu sola bambuo-trunko; zebuoj laŭiras la fosojn ambaŭflanke de la ŝoseo, birdoj kantas, aromaj strange flirtas en la aero. Ni venas al Den Pasar mem.

Viroj portas ŝarĝojn sur bambuo-stangoj, metitaj trans la brunaj ŝultroj: ambaŭflanke troviĝas grandega fasko da fojno, aŭ po kvar kaĝoj kun virkokoj (batalo de virkokoj kaj vetado estas la favora pasio de la Bali-anoj), aŭ korboj plenaj de frukto, aŭ akvujoj...; dum la virinoj, famaj pro siaj belformaj figuroj kaj gracia sintene, plejparte senvestaj ĝis la talio, en ritma paŝado portas balance sur la kapo ŝarĝojn, kiuj estas tiel pezaj, ke ili ne povas levi ilin sen helpo. Floroj en la hararo kaj koloraj tukoj, purpuraj, oranĝaj, brilverdaj aŭ violaj, aspektigas ilin, kvazaŭ ili iras al festeno, malgraŭ la peza ŝarĝo portata.

Ni atingas nian hotelon, kies aranĝo estas stranga. La tuto estas nur teretaĝa; ĉirkaŭ intimaj, flor-ornamitaj kortetoj, en kiuj ĉarmaj fontetoj plaŭdas, grupiĝas la unuopaj apartamentoj el po 3 ĉambretoj,

apartigitaj nur per malaltaj vandoj,de la kort-ĉirkaŭrejoj. En mia banejo ni trovas, anstataŭ banujon, grandan masonitan akvo-pelvon kun kupra kruĉo, por elĉerpi kaj superververŝi la refreŝigan malsekajon.

Kvankam sufiĉe lacaj post tiu impreso-riĉa tago, ni tamen, post la ĉefmanĝo, riskas mallongan promenadon en la strangan ĉarmon de tiu ĉi "lasta paradizo en la mondo." Tio kaj tie mun indiĝenoj kaŭras ripoze sur la tere en kvieta fumado kaj konversacio; estas kvazaŭ harmonia melodio kaj balzamaj odoroj plenigas la aeron. Pli kaj pli silentiĝas en la stratoj, homoj kaj naturo volas dormi. Alia bela tago forpasis. Mirinde klara ĉielo etendiĝas super ni kun miloj da brilegaj s teloj.

-------------daŭrigota--------------PAUL.E.SCHWERIN, DBEA.

## LA PLUVIOJ.

Okazis unu tagon ke Jesuo kaj liaj kamaradoj ludis en la brila sunlumo ĉe la pordo de la domo. Ĉio estis kvieta, ĉar estis sabato kaj en la domoj ĉiuj silentis kaj preĝis kaj fastis. Sed la geinfanoj ne ankoraŭ estis aĝplenaj, nek saĝplenaj, kaj al ili ŝajnis ke ĉiu tago estas por ludo kaj ĝojo, kaj ili ludis en la polvo de la strato ĉe la pordo de la domo.

Ili prenis la molan silkan polvon, kaj kun akvo, kiun etulo alportis de apuda putotrogo, ili faris bonan fleksoblan koton. Kaj jen unu komencis formi birdon, kaj li kriis ĝojo: Jen mi havas pasoron, jen rigardu! Ili rigardis kaj ĝi estis bona. Tiam komencis la aliaj fari aliajn birdojn, kaj Jesuo faris pluviojn, ĉar li ŝatas ilian graĉian formon. Kaj ĉiam li faris la plej bonajn, ĉar ĉe li estis Diafavoro; sed tiel aminda kaj mildmaniere li estis ke la aliaj ne plendis pri tio, nek provis superi la liajn. Ĉar ĉu li ne estis la saĝa, aminda pensanto?

Kaj ili metis la diversajn birdojn sur la malaltan muron en la brila sunlumo por sekiĝi, kaj formis plurajn, grandaj kaj malgrandaj; la grandaj infanoj faris laŭ sia kapablo, kaj la malgrabdaj kopiis la modelojn de la pli aĝaj, kiel ili ja devus.

Kaj jen el la silento de la brila sunlumo sonis paŝo. Alvenis Fariseo laŭ la malplena strato, ĝis la pordo kie ludis la naivaj infanoj kiuj pekis kontraŭ la sankta leĝo. Li, la studento de la leĝo, sciis pli bone ol ili kion ili faras, tiun brilan sabaton, kaj li halstis kaj okulevis la okulojn ĝis la iliaj. Silentis la infanoj kaj sentoviĝis la fingretoj, sub la solena influo de la malhela vizaĝo kaj la malhelaj okuloj. Kaj la etuloj kaŭris al la pli grandaj, ĉar jen ili eksciis ke ili pekis kontraŭ Dio kaj la leĝo.

Lia voĉo sonis, solene kaj akuze.

'Ĉu vi ne scias ke estas sabato?' kaj eĉ al infanoj li ne povis moligi la voĉon. Teruraj estis liaj vortoj pro lia maniero. 'Ĉu ne estas skribite: la sepan tagon vi ne laboru?'

Kaj ili respondis nenion. Tiel li certis ke ili komprenas la gravecon de la peko.

Kaj li prenis la medolojn en siajn manojn. La infanoj tremis interne, sed kion fari?---Ĉu li estas la sanktulo, kiu konas la leĝon? Li prenis la birdojn en siajn manojn, unu post la alia, kaj rompis ilin, kaj lasis fali la pecojn ĉe iliajn piedojn. Kaj ili silentis.

Eĉ ne unu vorto ili parolis dum li forpaŝis, la Fariseo, kvankam en la okuloj de la etulinoj brilis larmoj, ĉar ili komprenis sian pekon.

Kaj Jesuo staris kaj rigardis post la Fariseo, kaj diris nenion, nek movis sin dum li pensis pri la peko kaj la bela brila sunlumo kaj la ĝojo de la vivo kaj la amo de Dio kaj pri la Fariseo kaj la leĝo. Kaj dum ili staris kaj silentis, ne sciante kion fari, li turnis sin kaj rigardis ilin per siaj amimplenaj okuloj, ĝis ili komprenis kiom li estas bona kaj kiom lia amo kaj boneco superas la leĝon.

Kaj ili ĝojis.

Jesuo prenis la pecojn de la pluvioj kiujn li formis, kunmetis ilin kaj starigis ilin sur la muro, kaj dolĉe parolante al ili, li donis al ili iom de lia propra sankta spirito de vivo kaj ĝojo, kaj ili vivis. Tiam li flirtis la manon kaj la pluvioj forflugis kriante per sia ora voĉo, Glor-i, glori!

La geinfanoj ĝojis kaj plezurkriis, eĉ en la sabata silento, ĉar ili eksciis ke super la leĝo de Dio regas la Boneco de Dio kaj Liaj donacoj al ili.

Kaj la pluvioj prosperis kaj vivis en paco dum la jaroj. Ilia voĉo ŝajnas plenda, sed nur se oni ne havas la ĝustan senton en la propra koro, ĉar vere ili ĉiam laŭdas la bonecon de tiu kiu donis al ili vivon, kaj himnas eterne kaj eterne: GLOR-I, GLOR-I, GLOR--I!

-------------------------------F.PITT, D.B.B.A.

## RAKONTO de HUMANA INTERESO.

de Arthur G.Kunge, for the "Digest."

Antaŭ ĉirkaŭ duonjarcento juna Angla knabo, vizitanta en la kamparo, ekiris por ĝui naĝadon en malgranda lago. Spasmoj atakis lin dum li estis jam for de la lagbordo. Liajn kriojn por helpo aŭdis juna kampula knabo kiu laboris en proksima kampo.

La kampara knabo sin jetis en la lagon, kaj donis al li provizoran kuracon. Post nelonge la vizitanto resaniĝis kaj povis reiri al sia hejmo en Londono.

Pasis jaroj antaŭ ol la du knaboj ree sin renkontis. Tiun ĉi fojon la urba junulo venis al la kamparo por demandi al la kampula knabo, kiu antaŭe savis lian vivon, kiajn intencojn li havas por la estonteco. Kiam la junulo nekaŝeme konfidis ke lia ambicio ĉiam estis studi kuracarton, la junulo de Londono informis ke liaj gepatroj estas pretaj, fakte tre dezirantaj dediĉi al la helpo de la juna kampula knabo tutan la monon bezonatan por lia edukado.

Ankoraŭ jaroj pasis. La bienknabo ĉeestis kuraclernejon, gradatingis kun altaj honoroj, kaj ekentreprenis karieron de kuracresercado. Fine, en 1928, li faris eltrovon kiu destiniĝis savi miliononojn da vivoj. En sia laboratorio li trovis ke ĝermoj ne povas ekzisti en kelkaj vegetŝimaĵoj. Li eltrovis penicilon.

La iama bienknabo iĝis D-ro Alexander Fleming, internacia konata sciencisto kaj bonfaranto al la homaro.

Sed kio pri tiu Londona junulo kies vivon Fleming savis kaj per kies financa helpo Fleming povis suprenrampi la altaĵojn kiujn li iam rigardis kiel neeblaĵojn?

Nu, jen interesa, necesa parto de la rakonto.

Lastan vintron pneumonio atakis tiun Londonanon dum epokfara vojaĝo al la Proksima Oriento. Li iris tien por renkonti kun Roosevelt kaj Stalin por serio de gravaj konferencoj.

La sanstato de la Brita ŝtatisto iĝis timige kriza. En Anglujo oni pretigis la drogon elpensitan de la iama kampula knabo, poste akcelis ĝin al la litflanko de la malsanulo. Post malmultaj horoj la miraklo-produkanta penicilo faris sian laboron, kaj aldonis alian gloran nomon al la longa listo de tiuj kies vivoj estas savitaj de ĝiaj mirigaj proprecoj. Jam duan fojon Alexander Fleming savis la vivon de la juna Londonano.

Jes, Winston Churchill estas la malgranda knabo kiu iris naĝi en tiu kampara lageto antaŭ duonjarcento.

-------------------------------(Trad.) L.E.BAILEY, DBEA.

## ANKAŬ VI DEVAS LUDI.

Alan Marshall, en The Argus, Melburno.

Meritas ekstermon gastigantoj kiuj penas elseĝigi vin por ludi, kiam vi ne deziras tion. "Venu, surplandon!" ili gaje instigas. "Staru tiulokon!" "Sed tion mi ne povas ludi," vi protestas. "Sensenco!" ili forgestas tiujn fuŝajn praviĝojn. "Baldaŭ vi lernos. Staru apud fraŭlino Plasid. Prenu ŝian brakon."

Nu, mi tute ne malamas preni knabinon perbrake, se temas pri bela promeno, sed staradi kiel azeno kaj atendi ion okaziĝi estas afero terure embarasa. Kion diri al ŝi vi ne povas trovi. Vi maltrankvile staras, konjektante pri kio okazos. Eble vi devos kisi ŝin. Eble transflugi tri seĝojn aŭ salteti por unu kruro aŭ kuregi tri fojojn ronde la ĉambron.

El tiuj vi povas neniun fari bone. Vi havas penson ke saĝe se vi ne venis la ludvesperon. Sed la gastigantino denove ekpepas vin:- "Puŝu la alumetujan kovrilon sur vian nazon. Bone! Puŝu ĝin sur la nazon de fraŭlino Plasid, ne mane tuŝante la kovrilon."

Do jen kio temas. Guste por sporti tion vi trafis tri tramojn kaj unu buson. Por tio la edzino admonis: "Rapid u, ni ne malfruiĝu!" Por tio vi portas la paradan veston kaj helnovan kravaton. Tamen, havu kuraĝon. Post iom ili petos vin solkanti. "Sed mi ne povas kanti." Ha, ha! Ĉu vi pensas ke vi povos elteni kontraŭ

gastigantino kiu sukcesis ludigi vin je la alumetujo-sur-nazoj? Post duonhoro vi estos kantanta "Trees" (Arboj).

-----------------------------(Trad). F.R.BANHAM, D.B.E.A.

## TRADUK-KONKURSOJ.

### TRADUKO de KONKURSO 25:

Unu el la pli gravaj problemoj en la Malproksima Oriento rezultis el la kompleta indiferenteco de la Malajoj rilate la respondecojn de regado. Kiam prospero venis al Malajujo en formo de la riĉajoj de kaŭĉuko kaj stano, la diversaj ŝtat-registaroj profitis el teren-kaj eksport-impostoj, sed la ordinaraj Malajoj ne profitis; ili estis kontentaj, sekvi sian simplan vivadon kiel ĝangal-enloĝantoj kaj fiŝistoj. Ili ne partoprenis en negoco aŭ komerco; ili simple prilaboris siajn kampojn kaj okaze kulturis la kaŭĉukon, kiun ili vendis, por satigi siajn bezonojn. Ili ne estris vastajn kaŭĉuk-posedaĵojn, nek minis stanon, samkiel ili ne fondis grandajn kompaniojn, por eksporti la riĉaĵojn de Malajujo kaj dume riĉiĝi mem.

La solvo en Malajujo kuŝas en nia kapablo, trovi "ponto-kapon," kiu obligus al Oriento kaj Okcidento, reciproke ensorbi siajn avantaĝojn sen malakordo.

Venkinta grupo: Sydney Esperanto Society.

### TRADUKOTA TEKSTO KONKURSO 27:

"H ave you ever met an Indian?"

This startling question was put to me by a friend when I had been in India for nearly a year, and had travelled thoudands of miles. Met an Indian? What did the man mean? I had, of course, met many. To speak to...at least a thousand. But supposing we looked at India from a more general viewpoint? First, the 180 million caste Hindus. They were Indians all right, the very core of India. But wait a minute...were they? What about the 60 million noncaste Hindus who were grovelling in their dust? Were they Indians too? According to the caste Hindus, they were not even men and women! They were "untouchable". To drink from the same cup would be spiritual poison; their very shade was polution. Could these 60 million---regarded by their own brethren as a good deal lower than the animals---be described, by a Westerner, as "Indians"?

(Beverley Nichols: Verdict on India.)

Tradukoj devas atingi la subskribinton antaŭ la 10.10.45.

P.E.SCHWERIN, 1 Carabella Flats, McDougall St., Milsons Point, NSW.

---

ERAROJ en nia lasta: 147/23 fumaĵita; 148/13 ĉiaj salikaĵoj; 18 agrable; 149/7, voĉon; 149/13, hararon molan..lanugecan;150/17, apartamento; 32 helpa, 26 tempon; 152/4 de la malsː flugfaligis sin (aŭ

flugfalogis al la ĉielo). 153/8 de la mals. troviĝas tedaj.

---

LITERATURECA TRADUKO. de F.R.BANHAM.

WUTHERING HEIGHTS: Of all the books of all the Brontes, this one is the supreme masterpiece. Charlotte has genious and imagination. She has passion too. But there is a certain demonic violence about Emily which carried her work into a region of high and desperate beauty forbidden to the gentler spirit of her sister. The love of Heathcliff and Catherine breaks the bonds of ordinary sensual or sentimental relationship and hurls itself into that darker, stranger, more unearthly air wherein one hears the voices of the great lovers; and where Sappho and Michaelangelo and Swift and Shelley and Nietzsche gasp forth their imprecations and their terrible ecstasies. Crude and rough and jagged and pitiless, the style of this astounding book seems to rend and tear, like a broken saw, at the very roots of existence. The smell of rain-drenched moor, the crying of the wind in the Scotch firs, the long lines of black rooks drifting across the twilight---those things become, in the savage style of this extraordinary girl, the very symbols and tokens of the power that rends her spirit.

(John Cowper Powys.)

El ĉiuj libroj, kiujn verkis la fratinoj Bronte, tiu estas la plej-supera majstraĵo. Charlotte havis genion kaj imagon. Ankaŭ pasion. Sed en Emily estas ia demona perforto kiu portas ŝian verkadon en sferon de alta kaj malesperanta (7) beleco neebla por la milda spirito de ŝia fratino. La amo de Heathcliff kaj Catherine rompas la ligilojn de ordinara volupta aŭ sentimenta rilato kaj ĵetas sin en tiun pli malluman, pli strangan, pli eksternondecan aeron en kiu ni aŭdas la voĉojn de la grandaj amantoj---kie Sappho, Michaelangelo, Swift, Shelley kaj Nietzsche stertore elpuŝas siajn blasfemojn kaj terurajn ekstazojn. Kruda, malglata, akra kaj senindulga, la stilo (4) de tiu miriga libro, kvazaŭ rompdenta segilo, ŝajnas ŝiri je la efektivaj radikoj de la vivo. La odoro de pluvsaturita erikejoj, la hurlado de la vento en la Skotaj abioj, la longaj linioj de nigraj frugilegoj pasantaj trans la krepuskan ĉielon ---tiuj fariĝas, en la sovaĝa stilo (4) de tiu ĉi eksterordinara knabino, la efektivaj simboloj kaj indikaĵoj de tiu potenco kiu ŝiras al ŝi la animon.

(7) La senco estas nur konjektebla. (4) Powys iom neprecize uzas la vorton "stilo". Verkpovo, verkformo?

---

## LINGVAJ NOTOJ.

UNU RADIKO UNU SIGNIFO? Ne estas regulo de Esp-o, ke ĉiu vorto havas ununuran signifon. TINO signifas (1) Granda nekovrita kuvo el ligno. Angle, "tub", kaj (2) Marfiŝo granda kun bongusta karno iom similanta la bovidan viandon. Angle, "tunny". Iom riĉe troviĝas en Esp-o tiaspecaj radikoj havantaj pli ol unu sencon. Tio ne estas danĝero ĉe nocioj tute malparencaj; tamen konsilinde estas uzi alian radikon se eble (ekzemple ĉe "atlaso"). Ankaŭ ne estas danĝero fari figurajn uzojn aŭ sencetendaĵojn de la radiko, ekzemple ĉe esenco, kadro, radiko; estingi, ami, algluiĝi; mola, glata. Sed ĉe kolegio, doktoro, akademio, studento; ignori, kontroli, insulti, ŝati, konkuri, konkursi, konkurenci; eventuale; triviala, kuŝas efektiva danĝero de miskomprено de la ekzakta senco, ĉar tiuj vortoj (kaj aliaj), kvankam similaj en formo, pli-malpli diferencas inter si en la koncernaj lingvoj. La tielnomitaj "internaciaj" vortoj (ofte "falsaj amikoj") bezonas precipan zorgon ĉe la uzado.

Finvorte, ekzistas certa kategorio de vortoj, kiuj estas etimologie parencaj sed jam akirintaj al si diversajn, eĉ specifajn sencojn. Inter tiuj estas RADIO, kiu signifas wireless, ray of light, radius, a facial expression, a spoke of wheel or similar; KONSULO: a Roman magistrate, a diplomatic agent; TRIBUNALO: a court of justice, a bench of justices; KAPELO, kun kvar signifoj. En "bombo falis sur la tribunalon" (aŭ kapelon) oni ne scius, ĉu ĝi trafis la lokon aŭ la homojn en ĝi! Tiu evolua flanko de nia lingvo, pro ĝia neprecizeco, povos finfine veki maltrankvilon ĉe la pli pensemaj el la Esp-istoj. Ne lasu la liberecon de nia vivanta lingvo forpuŝi la disciplinon!

MORTA AŬ MORTINTA? Sur p. 133 troviĝas "Li estis morta...." Leganto demandas, ĉu tio estas korekta. Laŭ Plena Vortaro (sub nuanco 4) morta egalas mortinta ("enĉerkigi la mortan korpon"), sed William Bailey en "Heroldo de Esp-o" 23.5.37 skribis: "Laŭ la Zamenhofa uzado morta ne signifas mortinta; en la Ekzercaro paragrafo 31,6 ĝi signifas mortema (komparu la korpo estas mortema en la Dua Libro 25/23). Aliloke ĝi montras diversajn rilatojn al morto......Krom la ofte uzita mortinta ni havas ankaŭ senviva kaj malviva; la unua estas pli ofta, precipe en la lasta tempo, ekzemple en la Malnova Testamento malviva troviĝas en kvar lokoj, senviva en dek lokoj." Laŭ Millidge morta signifas "of death, mortal, fatal." Vidu en Lingva Kritiko No, 12, Jan. 1933, mian artikolon pri "mortema." (F.R.BANHAM)

---

KASO de la RONDO.

KVITANCOJ RICEVITAJ. S-inoj V.Ray, 6/-, Rawson 3/- don., Johanson 8/-. S-ro A. Kirstukas 6/-. F-ino M.Savage 6/-, Dr. C. Sandoj 6/-, A.Nisson 6/-, E.Hearne 6/-, G.LeCoultre 5/-, S-roj Dornbusch 6/-, E.Walker 12/6, I.Maddern don. 10/-. £4..5..6.
Al LA RONDO £3.5.6, Al A.E.A. 15/-. Elspezoj de LA Rondo £4.3.- En La Kaso £1.14.1. Abonoj al LA RONDO kaj AUS. ESP. ASOC. 6/-.
KASISTINO W.ADDIS, 25 Greville Avenue, Flinders Oark, South Aus.

NAINI TAL, British Evacuee Homes. HINDUJO.

Melbourne Esperanto Club. Karaj samideanoj,

Hodiaŭ mi ricevis vian leteron, la unuan leteron en Esp-o dum kvar jaroj. Tio estas okazo de granda graveco. Leginte vian leteron, rigardante viajn subskribojn, karaj geamikoj, mi ĝojis en la tuta mia spirito.....

Mi naskiĝis en 1910 en malgranda terkultura bieno en Litovujo. En mia infaneco mi vizitis la komenclernejon, kaj post iom da tempo mi lernis aviadon en urbo Kaunas, sed aviado ne estis mia sola profesio. La lastajn jarojn antaŭ la Rus-Germana milito mi laboris en tipografio kiel mekanisto en urba Vilno.

En la sekvanta tago de tiu milito mi kun granda doloro en la koro forlasis la amatan urbon ruinigitan per la germanaj bomboj. Tio estis 24.6.41. Mi kun multaj samlandanoj, por ne en germanaj manoj, veturis al Sovetio, sed tie neniu atendis nin. Ili ĉiuj havis sian propran mizeron, siajn proprajn klopodojn. Mi vojaĝis al Vitebsk, Veliki Luki, Jaroslavl, Gorkij, Taŝkend, Aŝkabad....En neniu urbo mi trovis ian laboron aŭ permeson ekloĝi tie. La rusoj rigardis al mi kiel al tiuj kiuj alportas militan malfacilajon, kio pligrandigis ilian antaŭe-mizeron. Sed ĉu mi forkurantoj el la germana faŝismo estis kulpaj? Mi elspezis ĉiujn miajn monerojn kaj ĉiujn objektojn por-ricevi iom da nigra pano. Sed kiam finiĝis la somero kaj malvarma gutuno ploretis, mi havis nenion, nek varman ĉambron nek iom por manĝi. Dum la noktoj mi dormis kun aliaj sur pavimo de stratoj, en tagoj mi rigardis serĉe al la pano.

La rusa registaro neniel helpis nin. Ili proponis nur koncentrejojn al mi. Kiam tie restis nenio plu esperinda krom morto de malsato kaj malvarmo, mi forlasis tiun teruran landon kaj 27.11.41. trapasis la landlimon de Afganujo. En urbo Kabul mi estis en malliberejo ok monatojn. Post tio mi laboris kiel aŭtomekanikisto en garaĝo de unu ministerio en Kabul. 28.11.44 mi alvenis en Hindujon. Nun mi estas en la "camp de British Evacuee."

Tie ĉi, en Hindujo mi trovis nenian laboron. La Brita registaro donis al mi eblon vivi en la "camp de B.E." kaj mi estas tre kontenta kaj dankema al tiu ĉi registaro. Antaŭ iom da tempo mi esperas reiri al mia patrujo sed nun tio estas la fixio (? in a fix, malfacilo?). Mia patrujo estas okupata de la rusoj kaj mia vojo returne estas barata per malliberejoj.

Mi skribis leteron al The Director General (UNRRA), petis lin helpi min sed mi ankoraŭ ricevis nenian respondon. Mi lernis anglan lingvon kaj iomete povas paroli kaj legi libron. Mi estas ne edziĝita. Post du tagoj mi sendos al vi dek rupiojn kaj mi deziras ricevi de vi iom da Esperanta literaturo.

"....cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas, ni semas kaj semas konstante" skribis la Majstro. Jes, ni devas semi kaj semi. Post la milito nia kampo pligrandiĝos, kaj la semoj elkreskados plantoj.

Karaj samideanoj, akceptu mian saluton al tuta M.E.K. Skribu pri via laboro en Aŭstralio. Mi restas, esperante vian leteron, A.KIRSTUKAS.

La Redaktoro de La Rondo varme salutas nian Litovan sambatalanton. Li ricevu de nu pli grandan porcion de la feliĉo! Liaj rimarkoj pri lia traktado en Sovetio aparte interesos al multaj legantoj. Mi rimarkigus ke ankaŭ en aliaj Aliancaj landoj oni havas la belan kutimon enpuŝi antfaŝistojn post pikdraton. Jen el la granda taggazeto Melbourne Herald 21.7.45:- La Brita registaro (Foreign Office) enketas kazojn de 80 Hispanojn, kiuj estas karceritaj ĉe urbo Kirkham, Anglujo). Unu el ili sin mortigis, kaj tio devigis la enketon. Ili estas plejparte respublikanoj, kiuj fuginte en Francujon el Hispanujo post la venko de Franco, fine kaptiĝis de la Germanoj kaj devis sklaviĝi en la Todt-organizo. Ili fine trovis vojon al Anglujo post la militĉeso en Germanujo. Antaŭ du semajnoj ili malsatstrikis, plendante pro la manĝoporcioj. Antaŭ en aliaj lokoj oni metas demokratojn post pikdraton. En Nord-Afriko la Brita aŭtoritato tenas koncentrejŝe pli ol 4000 Grekajn kontraŭreĝulojn, laŭ Grekpresagenteja raporto.

TOMMY BURNS SENNACIEMA. "The Argus" Melbourne 14.7.45 informas ke en San Francisco S-ro Hardy, pressekretario de S-ro Forde (ŝtatministro) ricevis viziton de Tommy Burns, iama pezula boksĉampiono. En 26.12.08 en Sidnejo li perdis la tâtolon al la negro Johnson. Burns diris al Hardy ke li vizitis lin nur por "iom babili kun iu el Aŭstralio kaj esprimi admiron al nia lando." Li cedis ke Johnson estis por li tro bona, sed ke, se li havus tiam pli da pezo li pli bone batalus. La eksĉampiono estas fervora ano de nova religia sekto kiu interalie kredas ke ĉiuj ekzistantaj nacioj fandiĝu en unu solan mondnacion.

Jen homo spirite preta por ricevi varbinviton de niaj Sennaciecaj amikoj. Se, fariĝinte membro de tiu asocio, li batalus por ties ideoj tiel persiste kiel por la boksvenkoj, ĝi posedus valoran adepton. F.R.B.

---

## ASOCIAJ AFEROJ.

KOMISIITO POR EKZAMENOJ. Bonvolu noti en via ekzemplero de la Jarlibro ke la nova adreso de P-ro C.C.Cowling, Komisiito por Ekzamenoj, estas "The Rectory, Queenstown, TAS." Niajn gratulojn kaj bondezirojn al vi, Pastro Cowling, en via nova paŝo.

RADIO-PAROLADOJ. La Prezidantino de W.A.E.L., F-ino Stremple, denove parolis dum Aŭgusto de radio-stacio 6WN. Niajn gratulojn al ŝi kaj al D-ro C.J.Caldera, kiu organizis la okazon. 6WN estas unu el naciaj stacioj en Okcidenta Aŭstralio.

S-ino Hanks faros paroladon de 3SR (alia stacio de la Aŭst. Broadcasting Commission) je la 5a horo (E.S.T.) P.T.M. la 29an de Aŭgusto. La temo estos "300 years quest for an international language." Niajn elkorajn gratulojn kaj bondezirojn al vi, S-ino Hanks, pro la bonega laboro kiun vi faros. Viaj penoj estu modeloj al ni ĉie.

S-ro A. Turner ankoraŭ brodkastas de 3SR de tempo al tempo. Gratulojn kaj bondezirojn al vi ankaŭ.

M.E.K. kaj W.A.E.L. Tiuj du kluboj ne permesos la herbon kreski sub la piedoj. Ambaŭ havas tutajn planojn por la progreso de la movado en siaj landpartoj. Nun en la longe sopiritaj pacotagoj, ĉiu grupo kaj klubo devus senprokraste aranĝi propagandon, novajn kursojn k.t.p.

I.E.L. La sekretario de Internacia Esperanto-Ligo informas nin ke ĉi tiu lando nun havas sufiĉe da membroj de la Ligo por permesi en-oficigon de I.E.L. Komitatano. Komitatanoj de A.E.A. bonvolu noti ĉi tion. Se vu havas iun proponon pri tia elektado bonvolu sendi ĝin al la Prezidantino de A.E.A. Sed antaŭ ol sendi vian proponon, trarigardu la Statuton de I.E.L., kiu aperis en parto dua de I.E.L. Jarlibro.

La unua parto de 1945a eldono de la Liga Jarlibro jam atingis Aŭstralion. Ĝi montras delegitojn en 24 urboj de Aŭstralio. Laŭlandaj raportoj klarigas la staton de la movado en libraj landoj kaj estas klare, ke daŭra forta laboro baldaŭ faros la movadon pli forta ol iam antaŭe.

Tiuj individuaj membroj de I.E.L. kiuj volas seninterrompe ricevi la Ligan gazeton saĝe sendu la 1946an kotizon por atingi la ĉefdelegiton, s-ron Pfahl, 64 Brighton St., Croydon, N.S.W. antaŭ la fino de Novembro.

DEVIZO. La Estraro elektis la jenan kiel la Devizon de la Asocio:- "Ni gardu la Sanktan Flamon." Kiel niaj membroj bone scias, la AEA establiĝis, kaj kreskis dumsilite por certigi ke la eta flamo de Esp. ne estingiĝu sed brile lumu la nacian teron. Ĝi daŭre lumu al la movado la vojon kiu irigos nin al tutmonda, frateca interkomprenado.

KORESPONDAJ KURSOJ. S-ro F. PITT, c/- Koornong School, Warrandyte, VIC., nia komisiito por korespondaj kursoj, nun povas havigi al vi kursojn de diversaj gradoj. Reklamoj aperis en "ABC Weekly," "Common Cause," "Aŭstralasian," kaj "Weekly Times." Bonvolu fari vian plej eblon por helpi lin en la laboro. Ju pli da kursoj venditaj, des pli da reklamado estos farebla. Sendu ĉiujn reklamado pri kursoj rekte al s-ro Pitt.

G.H. HILLERMAN, Sekretario, 15 Morrice St., Lane Cove, N.S.W.

---

La plej granda animalo iam ajn vivanta estas la Sulfurventra baleno.
La plej granda teranimalo de Nordameriko estas la bizono. Pli ol 300 funtojn.
La plej longa serpento en la mondo estas la rethaŭta pitono: pli ol 30 futojn.

TAKTA INSTRUO.

Hindujo estas lando gastama---ankaŭ amike taktoplena. Ĉe festeno en Kalkuto Angla fraŭlino fiere dismontris kelke da fotetoj de ŝi faritaj. Unu gasto jetis rapidan rigardon de malaprobo al Hinda amiko ĵus reveninta ferie el Oksfordo. Ĝi certigis min ke tre nekonvenaj estas tiaj fotoj, kiuj tenis pri intimaj scenoj de iu memoriga ceremonio, al kiu la fraŭlino ĉeestis kiel gasta invitito.

Govind, la Oksford/a studento, milde admonis ŝin per la sekvantaj vortoj:-

"Ĉu vi memoras Moti Lal? Li pasigis Paskan ferion kun bona Diotima Metodista familio en Kimrujo. Li pensis ke bone estas uzi por sia libro la spertojn akireblajn en tiu medio. Cele al tio li volonte akceptis inviton ĉeesti Diservon en preĝejeto. Li postrestis ankoraŭ pro la rito de komunio. Malfeliĉe, li ne ĝuste sciis kion fari, kiam la sankta pokalo prezentiĝis al li ĉe la altara tablo. Ĉiom de la vino li eltrinkis.

"Sed lia plej krianta erarpaŝo okazis ĉe enteriga soleno. Ies amita onklo mortis. Al Moti parencoj invitis ĉeesti la funebran solenon. Surmetinte nigran frakon, li iris. Kiam la ĉerko estis mallevota en la tombon, li alpaŝe ekceligis kameraton kaj akiris bonegan bildon."

La bonmaniere Angla fraŭlino sensone, gracie ridetis. Ŝi sciis kiel la ceteraj, ke Moti Lal nur mito estas. Sed ŝi sagace akceptis la riproĉon. "John o' London's Wkly" recenze "India in Outline" (Lady Hartog.(

------------------------------F.R.B.----

JUDA HUMORO. Du Judoj promenis en tombejo. Preterpasante multekostajn tombŝtonojn unu el ili rimarkis: "Rigardu! Mendelo! Kiel lukse vivas tiuj-ĉi riĉuloj!" (El la"Readers Digest".)

-----------------------------(Trad.) C.THOMPSON, D.B.E.A.

SPERTETO. Mi iam marŝis laŭ kvieta urba strato dum frua vespero. Mi subite vidis viron kuŝanta en la kanaleto. Mi haltis kaj rigardis lin. Iom maljuna viro kun biciklo ankaŭ haltis. kaj demandis, "Ĉu li estas malsana aŭ ebria?"

Mi respondis, "Mi ne scias, sed mi opinias ke li estas ebria."

"Mi devas esplori lin," diris la maljunulo. Li starigis la biciklon en la kanaleto, surgenuiĝis, kaj levis la kapon de la senpova nekonato. Mi klinis min super li por certiĝi se li ankoraŭ spiras.

La okuloj de la nekonato malfermis; li vidis min kaj fervore diris: "Kiel mi amas vin!"

La helpulo, iom surda diris "Parolu laŭte, kunulĉjo, ripetu!"

"Kiel mi amas vin!"

Mi rapide decidis ke tio ĉi ne estas la loko por mi. Mi remarŝis laŭ la strato, kaj ree aŭdis "Parolu laŭte!" kaj ree la nekonato "Kiel mi amas vin!" (Vork.) Deaconess M.Magarey.

Published by F.H.BANHAM, 2 Banchory St., Essendon, W5 VIC.

OFICIALA ORGANO DE LA AUSTRALIA ESPERANTO ASOCIO

# LA RONDO

## THE AUSTRALIAN ESPERANTO MONTHLY

ELDONITA DE F.R. BANHAM.
2 BANCHORY ST. ESSENDON W.5
VICTORIA AUSTRALIA.

VOL. 5 No. 1

Oct. 1945

NI GARDU LA SANKTAN FLAMON.

# L A R O N D O.

## L A R E D A K C I O.

S-ro F.R.BANHAM, D.B.E.A., REDAKTORO,
2 Banchory St., Essendon, W5 VIC.

F-no L.E.BAILEY, D.B.E.A.,
18 Sherbourne Rd., Medindie Gdns., Adelaide, S.AUS.

F-no W.A.ADDIS, KASISTINO,
25 Greville Av., Flinders Park, S.AUS.

---

VOLUMO SES, NUMERO UNUA.

## VIVU "LA RONDO" !

Tra temp' da multa malfacilo,
Tra jaroj de la mondmilito,
Por la Ideo batalanta
Kaj la anaron kunliganta
  Fide "La Rondo" eldoniĝis;
Ĉiam kun bela, digna ardo,
Taŭga laŭ Verdastel-standardo,
Por Justo, Homa Egaleco,
Interkompreno kaj Frateco,
  Kore "La Rondo" sin dediĉis.

Jen do okazo por saluto,
Por bondeziroj kaj gratulo,
Por toasttinto kaj festeno,
La sesa naska datreveno ....
  Vivu "La Rondo"! Vivu! Floru!
Ne nur por distro, nek utilo,
Ne kiel nura informilo,
Sed ideale, laŭ la Celo
De nia luma verda Stelo
  Ĝi floru daŭre, kaj laboru!

VIVU "LA RONDO" !

Kun koraj respektoj de JoE.

Jen la unua pastempa numero de nia gazeto, kiu ekvidis la lumon de l' vivo en Oktobro 1940.

Malgraŭ ĉiaj malfaciloj pro la plej detrua milito en la historio, ni sukcesis atingi la nunan mejlŝtonon de nia modestas vivo sen morta vundo, kaj nun, kun spiro de faciliĝo, preparas nin por enpaŝi la novan epokon. Ni rajtas ja fieri pri nia atingitaĵo, sed por bridi eble tro ferveran singratuladon, ni ĵetu la penson transmaren al niaj kuraĝaj kaj nesubpremeblaj kolegoj, kiuj en la malliberejo de Eŭropo spitis la cirkonstancojn kaj, sub, pafiloj de lakeoj de la tyranio, dissemis vortojn de l' espero sub formo de gazetoj en nia kara lingvo. Nian admiron kaj dankon al tiuj fideluloj! Se ni, vivantaj en lando netuŝita de malamika plando, ne povas eldoni gazeton, ni ja hontus antaŭ ilia heroa laboro.

Tamen, eĉ kontraste kun tiu glora ekzemplo, ni havas kaŭzon esti

kontenta pro nia farado. Ne unu monaton ni devis rezigni pri eldono de nia organo. Prezentu al vi, kion tio ĝuste signifas! En la tempoj, kiam niaj gvidantoj rajte formetis la ilojn por ĝui mallongan libertempon, aŭ foje sentis sin en ne tre bona viglo, la laboraĵo neniel suferis. Pro akcelita apliko, aŭ kontraŭvola sinpelo, ili anticipe faris al si rezervojn kaj tiel garantiis, ke ĉiu monato portos sian nomon sur la fronta paĝo. Dekoj da aprobaj leteroj kaj dankesprimoj rekompencis tiun sindonemon kaj kuraĝis la administracion al plua penado.

La A.E.A. solide progresis dum la jaro kaj ricevis belan ĉapitron en la Jarlibro de I.E.L. Ni urĝe petas ĉiun aliĝi al ĝi kiel individua membro, por ke nia filirajto kun la Brita organizo restu ekster nevalidiĝeblo.

La horo jam batis! La homaro denove staras libera por ĉiel uzadi la internacian lingvon. Sed la venko de la Anglosaksoj donas al ties lingvo almenaŭ provizoran intereson, kaj multaj penos lerni ĝin. Kun kia sukceso? Turnu vin al la milmiloj da geknaboj "lernintaj" la Francan en niaj altlernejoj..... kaj al Japano, kiu "legis la verkaron de Flaubert, de France, de Maupassant k.t.p." sed ne povis kompreni leteron de Lanti skribitan Francolingvo. Sur postenoj! Ĉie ni sentu la armilojn akraj por paŝi al komuna lukto kontraŭ la indiferenteco. Studu, sinekzercu, subtenu, por ke tra la tero estu montrate ke nia lingvo, pro siaj propraj bonecoj, povas servi tiel, kiel povas nenia idiomo nacia.

Ho amikoj, hajtu vi la fajron de l'fervoro;
Ardu viaj koroj en la sankta paclaboro.

----------------------------------------F.R.BANHAM, D B.E.A.

## BATALO PRI LA POLUSOJ.

La sekva peco estas tradukita el la franclingva libro de Rogel Vercel "A l'Assaut des Poles," el ĉapitro pri la ekspedicio de la "Jeanette," ŝipo elirinta de San Francisko en 1879, por trovi la nord-orientan travetur-vojon. Post dufoja trapaso de sesmonata nokto polusa, la ŝipo devis esti forlasita kaj la anoj de la ekspedicio spertis terurajn suferojn (1881). La kapitano estis De Long, oficiro de la Usona ŝiparo.

Kaj De Long ĉirkaŭbrakis siajn du maristojn, la plej fortikajn kaj la plej bravajn inter siaj kamaradoj, Nindemann kaj Noros, kiuj ekmarŝos sudon, por serĉi helpon. Oni fordonis al ili la lastajn manĝaĵojn, la lastan municion; ili kunprenis 40 kartuĉojn kaj kiel nutraĵon 40 gramojn da alkoholo.

La du viroj marŝas laŭ la rivero Lena en morda neĝventego. Ili kuŝas en truoj de neĝo, trinkas teon el salikfolioj kaj formanĝegas siajn pantalonojn el foko-feloj. Sed ili atingas vilaĝon tunguzan: jen la savo por ili kaj iliaj kamaradoj! Ili rapidegas al la felaj tendoj....Nur por subiĝi tie al terura torturo morala, la malnova

malbeno de Babelo: la konfuzo de la lingvoj! Dum unu nokto kaj unu tago ili provas, per gestoj, per desegnoj faritaj sur la grundo, komprenigi la indiĝenojn, ke homoj mortas en la nordo, ke necesas, sendi helpon al ili: vane! La tunguzoj restas inertaj, stultaj......Nun, tiuj krudaj maristoj, kiuj eltenis firme mizerojn, antaŭ kiuj la fantazio retiriĝas, kolapsas kaj ekploras dum horoj kiel infanoj, dum iu maljunulino de la tribo provas konsoli ilin, nesciante pri kia tragika doloro....

Ili ne povis fari alian ol marŝi kun la indiĝenoj internen, kaj tiuj kondukis ilin al inĝeniero Melville, en Boulcour, 150 mejlojn de la marbordo. Kvankam estis meze en la vintro, tiu tuj formarŝis norden, sed ne povis trovi la kamaradojn. Nur en la sekva printempo, kiam Nindemann kaj li laŭmarŝis la Lena, ili puŝiĝis kontraŭ pafilo, poste kontraŭ mano de kadavro enfosita sub la neĝo, la mano de De Long, el kiu estis falinta la krajono kaj la lasta folio de la taglibro.....

De Long mortis mem la 31.10.1881 kiel la lasta, same kiel li forlasis la "Jeanette" kiel la lasta, kiam la glaci-premo rompis ĝin. Li kuŝigis sin al morto tiel rezigna kaj tiel pura, ke nur la morto de Scott, ĉe la alia poluso de la tero, meritas esti komparita kun ĝi.

------------------------------Trad. PAUL E.SCHWERIN, DBEA.

## LA TABAKO.

En "Fundamenta Krestomatio" oni legas araban legendon pri la naskiĝo de la tabako. Laŭ tiu rakonto Mahometo, kiam mordita de serpento, kiun li zorge varmigis en maniko de la vesto, suĉis la vundon kaj kraĉis la venenon surteren. En tiu loko naskiĝis la tabakplanto! De tiam la homoj uzas laŭ diversaj metodoj la foliojn de la tabako, kiu preskaŭ senrimarke venenas kaj malsanigas. La akra odoro de tabakfumo rezultas pro ĉeesto en la tabako de speciala alkaloido, la nikotino. Tiu alkaloido estas tre venena, kaj ĉiu, kiu unuafoje fumas, sportas la malfavoran efikon de ĝi sur la organismon. Kapdoloro, kapturniĝo, naŭzo kaj fine vomemo kaj sveno estas la plej oftaj simptomoj de tia veneniĝo. Sed, oni respondus min, tio okazas nur komence; poste, pro alkutimiĝo, oni ne plu suferas tian turmenton. Konsentite; tamen la veneno estas tie, kaj daŭre eniras nian korpon kaj laŭgrade malfavore agas, ankaŭ se tute nerimarkata de ni!

Nikotino estas nerva veneno kaj influas ĉiujn nervojn, precipe tiujn de la koro kaj iufoje la optikan nervon. Oni legas, ke armerekrutoj, kiuj volas ŝajnigi malsanon por eviti devigan servon, sin turnas al tabako por ruze havigi al si rapidan korbatadon, kiu trompu la kuraciston. Nur necesas, ke oni ekscese uzas la substancon kaj tiu rezulto sekvos. Ofte oni ricevas la saman rezulton sen trouzo, nur per daŭra uzo, ĉar nikotino ne estas, kiel alkholo, facile, rapide forigita el la korpo; ĝi restas en la histoj dum semajnoj; pro tio oni havas simptomojn de veneniĝo pro amasiĝo de la veneno. En ĉi

tiu okazo oni ne plu havas la akutajn signojn de la unua fumado; la afero estas tute malsama; temas jam pri doloroj en diversaj partoj de la korpo, zumado de oreloj, pli-kaj-plia malakreco de vidpovo ktp. Sendube la alkaloido ne agas samaniere sur ĉio homo; kelkaj estas pli reagemaj al ĝi kaj aliaj male, sed ĉiuj pli-malpli frue ricevas malbonan rezulton. La homoj diras, ke oni bone toleras trinkaĵon, kiam signoj de ebrieco ne sekvas la uzon de ĝi; tamen la homo, kiu bone toleras alkoholon, fariĝas malsana ankoraŭ junaĝa, pro lezo de la arterioj, de la hepato, de la renoj. La manko de evidentaj akutaj signoj de alkohola venoniĝo, alivorte ebrieco, ne malhelpas la malutilon kronikan de la alkoholo. Tutsame okazas pri la tabako. La daŭra uzo de tabako malfavore efikas sur la nervojn ĝenerale, kaj speciale sur la vidpovon, sur funkciadon de la stomako, kaŭzante malinklinon al manĝado, ofte matenan vomemon; ofte la nazo kaj gorĝo suferas kaj kataro estiĝas, kun tuso kaj ĝenerala malbonfarto. Ĝis la komenciĝo de ĉi tiu milito, preskaŭ ĉiu viro estis fumanto, sed en la plej multaj oficejoj la Direktantoj ne ŝatis vidi la dungitojn fumi, kaj tio limigis la horojn, dum kiuj oni povis libere sin veneni. Precipe endome, tre ofte la edzino malŝatis, ke oni fumu pro la malbonodoro, kiu enpenetris la moblaron. Ankaŭ tio malhelpis la troan longecon de la fumperiodo. Sed nuntempe la tabakomanio fariĝis ĝenerala kaj ankaŭ la virinoj infektiĝis de ĝi. Pro tio, endome ĉiuj fumas la tutan tempon, kaj eĉ tra la stratoj vidiĝas malplaĉega sceno tia, kia virino kun cigaredo inter la lipoj, zorgante suĉinfanon! La malbonŝanca infaneto veneniĝas dum nutrado per la patrina lakto, kaj estos tute malebla, ke li havu normalajn nervojn, kiam plenkreska. Kutime oni komencas uzi tabakon por esti laŭmodaj aŭ por imiti la plenkreskulojn, kaj la unua sento estas malagrabla. Nur volpovo katenas la uzanton al la nova ago; laŭgrade sekvas alkutimiĝo kaj, kiel ĉiuj nervaj venenoj, ankaŭ la nikotino kaŭzas nervan malforton, per kiu la uzanto fariĝas vera viktimo de la kutimo: li ne plu povas sin deteni de tabakuzo, kiel la drinkemulo ne povas vivi sen alkoholo. Tro malfrue ĉi tiuj malfortuloj komprenas la malutilon de sia kutimo; ili volus ĝin liberigi sin el ĝi, sed pro manko de volpovo kaj malsana nervsistemo ili refalas daŭre, cedante al la pasion kiu regas ilin kaj detruas.

Krom la jam diritaj rezultoj de tabakveneniĝo, oni devas ankoraŭ prezenti al si, kiel malfavore influas la uzo de tabako sur protigadon de vojo por la disvolviĝo de kancero! La kancero, kiu lokiĝas en la lango, lipoj, gorĝo, ĉiam estas helpata de tabako, kiu agas kiel daŭra stimulo sur la histojn kaj, ju pli delikataj la histoj des pli granda la malfavora rezulto. Pro tio, la virinoj, kies histoj estas sendube pli delikataj ol tiuj de la viroj, devas atendi plej malfavorajn rezultojn de tia fikutimo.

Sinceraj bonvolantoj propagandas kontraŭ la troa uzo de alkoholo, penante konvinki la karaktere malfortajn, por ke ili ne fariĝu viktimoj de ebrieco; tre konsilinde, ke la sama propagando estu farata pri la malbonoj, kiuj sekvas tabakuzadon. Sed tre tre da homoj fumas, eĉ

se multaj nur modere; kaj neniu kiu montras sin publike kun fumatajo ĉe la lipoj kuraĝus predikadi kontraŭ kutimo, eĉ malutila, kiun li amotas!

------------------------------C.J.CALDERA, D.B.E.A.

## LA AŬSTRALIA INDIĜENO.

el "Wide Horizons" de R.H .Croll.

Ofte oni priskribe supozas ke la Aŭstralia indiĝeno estas manka laŭ inteligento, "la plej malalta tipo de la homaro."

"Inter aliaj aferoj nia koncerno estis provi la inteligenton," diris Prof-o Porteus ĉe la Universitato en Havajo, kiam li raportis la sciencajn rezultojn en sia libro. "La ĝenerale supozo ke la nigrulo havas malaltan intelekton estas, miaopinio, tute malprave." "Ilia intelekta evoluo jam atingas altajn lokojn, kiujn komprenas nur malmultaj blankaj Aŭstralianoj," aldone diris la fidinda aŭtoritato Pastro J.R.B.Love.

La indiĝeno estas juĝata plejparte laŭ sia malkapablo kompreni la demandojn de blankuloj. Tiuj ĉi, tute certaj pri sia supereco, tro ofte forgesas ke ili estus en multe pli malbona situacio se ĝuste ilin indiĝeno pridemandus en stranga lingvo. La Eŭropano inklinas malatenti ĉiujn normojn krom la proprajn; indiĝeno, se li pensus laŭ la sama vidpunkto, devus tute malestimi plenaĝan homon kiu mortmalsatas en la mezo de sufiĉego, ne havante sufiĉe da inteligento por rimarki la nutrajon kiu lin ĉirkaŭas.

En Meza Aŭstralio, senakva ĝis la lasta suko estas for, la fremdulo kiu estas devigata havigi por si mem, estus aŭ mortinta aŭ frenez en tri tagoj, sed la triboj povas transvivadi malgraŭ la malfaci-

La karakto tra nekalkuleblaj generacioj, kontraŭ malfacilaj (oj. sortoj, estigis rason de observantoj kredeble nesuperataj en la tuta mondo. Ili devas aŭ lerni kiel sekvi la postsignojn de ĉasajo aŭ perei.... Rememorante la reputacion gajnitan de la Aŭstralia indiĝeno kiel postsekvanto de signoj, ni aranĝis provon. Ni ebenigis parton de la sabla tero kaj petis ke iu indiĝeno premmarku la sablon per la piedo kaj poste reiru al la vico apud la maro. Dume ni tenis Tapina parolo ĉe la alia flanko de la konstruajo (mi sciis neniom el lia lingvo krom "balalingo" (tre bone); li ne parolis Anglo, do nia parolo estis per ridetoj kaj gestoj). Kiam oni vokis, mi kondukis Tapinan al la alia flanko kaj indikis la solan piedsignon. Unu ekrigardo kaj li sin turnis fingromontre al la ĝusta viro. Ok fojojn mi provis kaj sep fojojn li estis prava sen hezito aŭ ŝajna konsidero, kvankam unu viro dufoje premmarkis por konfuzi lin. La okan fojon Tapina rigardis al la signo, sin turnis al la vico kaj faris nenian signon. "Tiu viro? Tiu viro?" petis Prof-o Porteus, fingromontrante laŭvice, sed Tapina staris mute. Fine la profesoro sin turnis kaj indikis al juna blankulo. "Tiu viro?" li petis, kaj la vizaĝo de Tapina fariĝis unu granda rido de ĝojo. Ja estis tiu viro kiu formetis la boton kaj faris la piedsignon. "Balalingo!" ni ĥore vokis kaj Tapina ridegis tiom

pro la laŭdo, kiom pro la tabako kiun ni donis kiel rekompencon.

-----------------------------------(Trad.) E.HEARNE.

**FRUA VERMO**, de R.M. el Punch 18/11/36.

Dimanĉ-matene S-ro Mohikan vekiĝis sentanta ke ĉio estas bona ĉe la mondo kaj li mem ankaŭ, kaj la sento ne lasis lin dum kelkaj minutoj. Tio estis parte ĉar li havis tre bonan nokton, kaj parte ĉar li ankoraŭ estis nur duonvekiĝinta, kaj komence ne rememoris ke la servistino ne estas en la domo kaj sekve neniu enportos teon. La servistino jam foriris por ĉeesti la edziĝon de sia fratino.

Tiel pasis ankoraŭ unu minuto aŭ pli longe antaŭ ol li rememoris la plej malbonan aspekton de la situacio: ke li, en momento de fanfarono promisis la edzinon ke li ellitiĝos kaj mem faros teon. Jen terura penso. Kutime la proksimeco de taso da teo necesiĝis por instigi lin eĉ sin sidlevi en la lito, kaj nun li devas tute ellitiĝi kaj ĉirkaŭ-aferetadi multe da minutoj en la malvarmo sen la ajn stimulilo.

Tamen li elrampis el la lito senvorte kaj stumblis malsupren la ŝtuparon, ĝemanta al si. Ĉar lia promeso la antaŭan nokton estis incitita de diskutado: lia edzino diris ke li ne povus fari teon sen fari ankaŭ tumulteton, kaj li diris, ke male, nenio pli facila estos.

"Estos farite tiel rapide kiel terno de infaneto," li diris, ne ĉar tiu estis aparte ĝusta similaĵo, sed ĉar ĝi estis lia propra, kaj la tutan tagon li antaŭe provis ekpafi ĝin sur iun.

En tiu momento, tamen, la penso de infaneta terno nur faris lin deziri mem terni. Sufokante la impulson, ĉar li sciis ke ternadon oni kredeble tradukus kiel tumulteton, li eniris la manĝĉambron kaj forŝiris folion de kalendaro.

"Ĉiuj estas tuŝitaj de Melankolio," (Thomas Hood.)

Tion legante, S-ro Mohikan profunde kapjesis kaj eniris la kuirejon, kie li trovis ke plej parte la aĵojn, enkalkulante la pleton kaj ŝajne la bolilon, oni pretigis por li la antaŭan nokton. Dum kelkaj minutoj li debatis kun si ĉu li ofendiĝu de tio. Sed forpelis la ideon el lia kapo la eltrovo, ke li ne povas trovi alumetojn.

Li trenpaŝis en la manĝĉambron kaj streĉe rigardis en la telermeblon. Troviĝis neniaj alumetoj tie. Li rememoris, fakte, ke li tion rimarkis la antaŭan matenon kiam li provis (laŭ kutimo) ŝteleti skatolon antaŭ ol ekiri al la oficejo. Li ankaŭ rememoris ke la edzino diris ke ŝi devas ne forgesi mendi kelkajn ĉe la spicisto.

Tio signifis ke verŝajne kelkaj alvenis de la spicisto hieraŭ posttagmeze. La demando estis: Kie ŝi lokis ilin?

"Jen mi," diris S-ro Mohikan al si, "respektinda civitano, zorgema veturigisto, bona edzo kaj neplendema manĝanto okaze eĉ de spinaco, staranta en mia propra manĝĉambro kun trablovoj siflantaj ĉirkaŭ miaj tibioj dum mi provas dedukti, komencanta de nenio, kie metis mia edzino alumetojn." La afero aspektis ridinda. "Ha," li aldonis malgaje, "ha, ha, ha!"

Pripensanta pri la antaŭa tago, li rememoris ke li ne uzis eĉ unu alumeton el siaj propraj. Do troviĝus neniaj sur la tualeta tablo supren, eĉ se li tien sekrete rampus por akiri kelkajn.

Halgaje li molpaŝe reiris la kuirejon, kaj paŭzis en la pordejo de la manĝajejo por ĉirkaŭrigardi. Tiu ĉi nebulespere ŝajnis alumethava loko. Li palpe serĉis sur la polveca breto, sed sukcesis trovi nenion pli utila ol alta botelo da olivoleo, kiun li batfaligis.

"Mi komprenas kial servistinoj malduniĝas," li pensis, sorbviŝanta la oleon. "Ili ne povas toleri la teruran respondecon scii kie estas ĉio. Ili malsuprenrampas en la malvarma tagiĝlumo, kun siaj mensoj ŝargitaj de amaso da unika kaj senkuraĝiga informo. Nenio kaŝiĝas de ili. Ili scias ĉion pri la rasklingoj sub la bano kaj la polvo post la elektra mezurilo, kaj en la libroŝrankola kaŝejo de pakajoj de lavendo, venditaj de homoj ĉe la pordo.

"Ili povus kuŝigi manon," S-ro Mohikan meditis, prenante la olesaturiĝinta tuko al la pladejo, tamen ne antaŭ ol ĝi gutfaligis multon sur liaj litĉambro-pantofloj, "je avizo de momento, sen la demando, sur alumeto, dum kontraŭe mi----"

En tiu momento okazis ke, pro la miraklo, unu ne-sendanĝera alumeto kuŝis sola sur la pladeja breto. Ankoraŭ pli, kiam li prenis ĝin al la kuirejo kaj zorge skrapis ĝin kontraŭ la forno, ĝi ekbruligis la gason.

Dek minutojn poste li fiere portis la pleton supren. Kiomege da grandaj kaj malagrablaj malhelpoj senplende kaj sen tumulteto li venkis!

"Teon!" li ekkriis, enirante la litĉambron.

La edzino sin turnis dormece. "Tute bone, karulo," ŝi diris, "Sendube la bolilo preskaŭ bolas: mi komutis antaŭ minutoj."

S-ro Mohikan kuŝigis la pleton, sentanta sin svenema. Li tute forgesis ke en la litĉambro sidas elektra bolilo.

--------------------------------(Trad.) L.E.BAILEY, DBEA.

## RAGATTOTAGO.

Por sia regattotago la aeroklubanoj ĝuas belan sunluman veteron. La flugkampo estas ĉirkaŭita de multkolore vestita, feliĉaspekta hommaso. Ilia gajhumoreco estas ne sen bona kaŭzo, ĉar multaj lertaj aviadilistoj jam horojn regalis la ekscitavidajn homojn per ĉia ebla aerobatiko.

Okazas nun paŭzeto en la programo. La viroj pasigas la tempon per neniodira babilado; la virinoj "pud ras la nazon," la infanoj faras la eblon malsanigi sin englutante montojn da glaciaĵo. Unuj bubaĉoj, ne havantaj sufiĉe da mono aĉeti frandaĵojn, amuzas sin, turmentante hundon---bele distra tempopasigilo!

Ĉe la flugkampo mem, vidiĝas aviadiloj dise starigitaj laŭ la manovra spaco.

La stranga irado de lama maljunulo kun nigreta vestaro, larĝranda ĉapelo, kaj malhelaj okulvitroj, atentigas ne malmulte da ĉirkaŭstarantoj. Apogante sin peze sur bastono. dum la blanka barbo flirt-

as en la venteto, li vagiras laŭ la manovra spaco, kritikeme rigardante ĉiun aeroplanon.

Inter la aviadiloj estas nur unu kun funkcianta motoro. Mekanikisto verŝajne alĝustigas ion, sed momente forestas. La maljunulo aliras tiun maŝinon, kaj pasas la zumantan helicon tiel proksime, ke li estas preskaŭ frapita de la helica alo. Evidentiĝas de lia regresa eksalto, ke, malgraŭ sia maljuneca aspekto, li estas ankoraŭ iom "saltema sur la paŝiloj." Serĉemulo alkrias lin, "Gardu vin, vi maljuna zoologia kuriozajo! Tio mordos!" La homamaso jam ĉesis la banalajojn, kaj plene atentas la scivolemulon. Ĉiu estas plue konsternita, kiam, retirinte sin iomete for de la aeroplano, kvazaŭ time, li denove apudiras ĝin, kaj provas grimpi en la sidlokon; li sukcesas enmeti unu kruron, je kio lia genuo ekfrapas la akcelilon; tio puŝas la ilon ĝis la pleja eblo; tuj la aeroplano ekmovas antaŭen, kaj la ekskuo firme faligas lin sur la sidlokon; li petege gestadas per la brakoj, ekkriante "H elpu! Helpu!" La revenanta mekanikisto alkuras kiel eble plej rapide por kapti la aeroplanan alon, tamen li malsukcesas kaj kaptas nur la forblovitan ĉapelon de la maljuna viro, kiu jam ne kriegas sed sin antaŭenklinas kvazaŭ malespere. Dume la aeroplano zigzagas pli kaj pli rapide sur la kampo.

"Haltigu lin!" krias iu, "Haltigu lin!" papage ripetas aliaj.

Facila konsilo! Brulestinga veturilo, kaj savaŭto ekiras je nukrompa rapideco post la flugmaŝino, por dejori je la tuj atendata kraŝo. Virinoj svenas, viroj blasfemas pro la stulteco de la fluganto jam preter helpo. Atingante preskaŭ al la kontraŭa aerodroma perimetro, la ĉiam pli rapide kuranta aeroplano finfine leviĝas je transventa ekflugo. Kiam ĝi nur plurcole maltrafas la barilon, evitante kraŝon je nura harlarĝo, la homomaso elspiregas de ekscitiĝo, kaj ankoraŭfoje dum la aeroplano ŝancele ascendas inter la arboj ĉirkaŭ la aerodromo. Ĝi daŭre suprenflugas ĝis proksimume mil futoj. La rigardantoj iĝas iom malpli nervozaj. Junulo voĉe esprimas la penson de preskaŭ ĉiu vidanto: "La maljuna kapro ŝajne daŭros iri supren, sciante, ke la aero neniam kraŝigis aeroplanon---nur la tero tion faras."

Jen la ŝvebanta aeroplano ekstaŭlas, plongas, poste falspiralas. La ne certeco de la jam ne ekscitavidaj homoj estas preskaŭ neelporteebla, sed la falanta maŝino, je ĉirkaŭ 100 futoj super la tero, mirakle platumas kaj zomas je kruta angulo supren. Sekvas nun tia elmontro de nenormala flugado (kvazaŭ la diablo mem gvid as!) kian neniam antaŭe vid is la nun kvazaŭ ŝtonigitaj homoj.

Ŝajne estas laŭhome neeble, ke la aeroplano senkraŝe surteriĝu. Juna raportisto krias, "Baldaŭ nun ĉio finiĝos!".

Ties eldiritaĵo estas ĝusta! La glitfluge descendanta aeroplano alteriĝas al la suriĝa kurejo, platumas, poste malrapide sinkas sur la kurejon je perfekta trikontakta surterigo. Ĝi haltas ĉe ĝuste tiu sama loko, de kiu ĝe antaŭ ne longe ekiris!

Deiĝas de la aeroplano, ne timigita maljunulo, sed gajmiena, ridetanta junulo, facilanime tenanta en mano blankan imitaĵan barbon kaj malbelajn okulvitrojn.

Aŭdiĝas voĉo pere de laŭtparolilo:-

"Gesinjoroj! La neatendita elmontro, en kiu nia plej juna piloto regalis vin per sia lerta flug-kapableco, finas la hodiaŭan programon. La klubanoj dankas vin pro via atenteco. Flarsaloj kaj stimuliloj haveblaj ĉe la elirejo."

-------------------------------------------E.PECK.

## TRADUK-KONKURSOJ.

Traduko de Konkurso 26:

Dum 4000 jaroj vitro rezistis nin. Ĝi estas unu el la plej fortaj kaj malmolaj materialoj konataj al la homoj; tamen, ĉar ĝi ankaŭ estis tiel rompiĝema, ni ne tute konstatis ĝiajn eblecojn. Sed nuntempe, rezulte de dummilitaj esploroj, ĝi plenumas taskojn, kiujn neniu alia materialo povus fari. Kaj tre baldaŭ, ĝi senmezure aldonos al la oportunaĵoj kaj komforto de l' vivado.

En la laboratorioj kaj fabrikoj de la grandaj vitro-kompanioj mi vidis vitron, kiu povas esti segita kaj najlita kiel ligno; vitron, kiu flosas; vitron, kiu resaltas; vitron, kiu povas esti fleksita kiel kaŭĉuko, tordita en fadenon, ligita en nodojn kaj teksita kiel silko.

Mi vidis fakulojn direkti aeroplanon faritan parte el vitro---ne fenestra vitro, ĝi ne estas travidebla. Sed ĝi aspektas tutsame kiel iu alia lerna aviadilo. Tamen la fuzelo kaj vosto estas faritaj el vitro-ŝtofo; ili havas duoblan fortecon kaj duonon pezon de la konvencia alumini-lamena fuzelo. Laŭ pez-unuo, ĝi estas la plej rezista flugmaŝino iam konstruita---pli rapida, pli malkare produktebla kaj pli longedaŭra.

Venkinta Grupo: WESTERN AŬSTRALIAN ESPERANTO LEAGUE.

Tradukota Teksto Konkurso 28.

National virtues follow the fashions and change with the times. There was once a complacent chief justice who pointed to the depredations of English malefactors (and English gallows) as a proof that his countrymen were braver than the French; but Englishmen now pride themselves above all things on their respect of law. There was a time when the English loved to be thought rollicking and boisterous people; but nowadays it seems proper for the rich to be "detached" and the poor docile. The English are still lovers of themselves, but they no longer show it by ranting about their full bellies. In truth, they no longer have the best-filled bellies in the world. Their own emigrants boast that they fare better than the stay-at-homes.

Australians who grumble in their country become exuberant about its "standard of living" when they first see real poverty in England.

(W.K.H ancock: Australia. -Standard of living.)

Tradukoj devas atingi la subskribinton antaŭ la 10.11.45.

P.E.SCHWERIN, 1 Carabella Flats, McDougall St., Milsons Point. NSW.

---

## DU TRADUKOJ.

PREĜO (Ed.Moricke) "Herr: Schicke was du willt..."

Ho sendu, mia Di',
Laŭvole bonon, malon;
Gajeme ĉian skalon
Akceptas mi de vi.

Nek ĝojon abundan
Nek multan turmenton
Elverŝu sur mi.
Kvantete ja ili
Produktas kontenton.

(Trad.) KURT HIRSCHEL.

Sendu, Dio, se Vi volas,
Bonon aŭ malbonon;
Ĝojos mi, ĉar ĉiun donon
Viaj manoj ja kontrolas.

Troan benon da feliĉo,
Troan plenon da doloro,
Ne pri mi elspezu.
Scias Vi, ke meza kvanto
Taŭgas al la homa koro.

(Trad.) F.R.BANHAM.

Sentencoj 30/8: Malriĉecon kaj riĉecon ne donu al mi; nutru min per tiom da pano, kiom vi bezonas.

---

## LINGVAJ NOTOJ.

Card from Mr. M.C.BUTLER, 5.7.45.

Dear Mr. Banham, I am delighted as always to receive your brilliantly edited Rondo. I don't agree with your note on page 95. It seems to me that the word "PO" is useful and needed. Nor do I see any difficulty. Simply remember that it is a preposition, and never followed by the accusative; it means "at the rate of," and you are in conformity with Zamenhof"s invariable usage.

The difficulties raised by Kalocsay and other writers come from the fact that they give the word another meaning, quote sentences where it is musused (even misquoting Zamenhof), and then find it foggy. The fog is in their own brain. The "abstruse argument" in Plena Gramatiko is simply wasted paper.

GRAFLANDO. Jen la kutima tradukajero por la Angla "county". Jam de longe ne plu administras tiujn landpartojn Anglaj grafoj, sed la nomo ankoraŭ restas. En Usonaj "counties" grafoj neniam regis, kaj iu Usona sam-o, ne volante uzi la formon "graflando", enkondukas "konteo" por nomi la administran kaj politikan parton de sialanda "Ŝtato" (Maine, Missouri aŭ alia. Sed ankaŭ "konteo" enhavas la nocion de grafeco, ĉar ĝi devenas el Lat. comes, de kiu Itala conte, Fr. comte,

A. count. La Plena Vortaro SAT donas nur "grafo".

LUKO 19/8: "The half of my goods, Lord, I give to the poor &c." Tio signifas ne "Mi kutime donadas la duonon..." sed "Mi tuj donos...." Bedaŭrinde la Esperanto Biblio, kiu sekvas tie ĉi la Jakoban kaj la Revizion de 1882, ne ĝuste redonas la sencon, malgraŭ ke Samuel Green en sia "Handbook to the Greek N.T." antaŭ pli ol duonjarcento klarigis la aferon. Weymouth, Moffatt kaj aliaj pli-malpli bone kaptas la sencon. La prezenca verbtempo estas uzata Greke ankaŭ por indiki certan futuron. Kp. Mat. 26/2, Joh. 21/23, kaj "Tomorrow is Sunday", "Next Monday I am going." FRB.

SECURE (adj.) laŭ Edinburgh egalas "sendanĝera", sed mi pensas ke "sendanĝera" povas signifi (1) safe, kaj (2) harmless, innocuous, ĉar ĝi signifas simple nur: estanta sen danĝero. "Eksterdanĝera" estas klara en (1) kaj "nemalutila" en (2). Kalocsay en Parnasa Gvidlibro uzas "noci" (malutili), el Lat. nocere; Itala nociva, Hispana nocente, Latina nocens adjektive.

FARMI signifas lue preni laŭ kontrakto por difinita tempo teron, bienon por ĝin kulturi kaj uzi je sia propra risko kaj profito. Farmo: farma prenado; la ago farmi. Farmbieno: Angle, a farm(of tenant farm-er.

THERE'S THE MEAT TO GET and the boy to visit. (1) Aĉetota (Aĉetenda) estas la viando kaj vizitota (vizitenda) la knabo. (2) (Iu devas aĉeti la viandon kaj viziti la knabon. La (1) pli bone spegulas la spiriton de la Angla frazo. Plue provu ĉe: "There's the world to conquer."

CONVOY . Oni povas uzi "eskortata ŝiparo." D-ro Solzbacher uzus "konvojo", ĉar la vorto estas internacia konata. F. convoi, Hisp. convoj, Port. comboio, It. convoglio, Nederl. konvooi, Dana Konvoi, Rusa konvoj, Pola konwoj etc. Vere estas, ke la Germanoj diras Geleitzug kaj la Japanoj goso, sed eĉ en Garmanujo kaj Japanujo la vorto "convoy" estas bone konata de ĉiuj kiuj havas koncernon kun ŝipaferoj. (laŭ art. de Solzbacher.) FRB.

---

## ASOCIAJ AFEROJ.

EKSIĜO. Kun bedaŭro ni devas anonci, ke post la eldono de la Februara numero de La Rondo, F-ino Bailey eloficiĝos. Ni fieras ke La Rondo, naskiĝinte dummilite, de Oktobro 1940 ĝis la nuno, eldoniĝis seninterrompe tra la nigraj tagoj de malespero. Ni ne scias pri alia Esp-a gazeto en la mondo kiu povas tiele prifieri.

La Rond o ludis fortan rolon en la starigo kaj progreso de nia Asocio. Nenia Asocio povas flori sen oficiala organo kaj nia bone servas al A.E.A. Pro la supremenciita eksiĝo la Asocio nun devas plani presadon de la gazeto aliloke, kaj ni esperas ke samideanoj en Melbourno sin proponos por la laboro.

LIBROSERVO. Pro la malpli longa tempo bezonita por libroj atingi Aus-

tralion de Anglujo, ni povas plibonigi la libroservon. Provizajon de lernolibroj, vortaroj, propagandiloj, kaj legolibroj kiel ankaŭ de la 3 korespondaj kursoj ni pligrandigis. Viro el Francujo, Ŝi, Vivo de Zamenhof, Aventuroj de Marteno Drake, Naiveco de Pastro Brown (ĉiu 6/6), Sep Vangofrapoj (5/-), la 6 Libroj de Epoko Serio, (ĉiu 2/3), estas en la Provizajo de niaj perantoj en Vic. kaj W.Aus.

La klubo en Perth aranĝis en la klubĉambro montroŝrankon por la Libro-servo. Dum kunvenoj ĝi estas malferma por ke membroj povu vidi kaj librojn kaj prezojn. Ni esperas ke aliaj grupoj simile faros. Necesas ke la montroŝranko havu bonan ŝ loŝilon por malhelpi difekton aŭ malaperon dum neesperantistoj uzas la klubĉambron. Iun perdon la libroservo volonte portus. Ni esperas ke, ĉiu grupo baldaŭ avizos la Sekretarion, ke li aranĝos tian montroŝrankon en la klubĉambro. En tiuj grupoj, kie ne sin trovas peranto de la Servo, ni povas vidigi karton kun la nom-adreso de la plejapuda Peranto. Ni esperas, ke baldaŭ la prezoj de ĉiuj libroj povos esti iom malaltigitaj.

ELEKTO de OFICISTOJ EN 1946. En la venonta jaro A.E.A. Grupoj denove devos elekti Komitatanojn. Ĉi ties devoj estos fiksi longedaŭran programon por nia laboro en la nuna paco. La Komitato de A.E.A. havas la gravan devon elekti el sia propra nombro la Estraron de la Asocio. La Estraro konsistas el Prezidanto, Vic-Prezidanto, Sekretario, Kasisto kaj plia Estrarano por helpi la aliajn. Ĉi tiuj elportas la planojn de la Komitato.
Tre atentinde estas, ke grupoj, kiam ili nomas siajn komitatanojn, zorge elektu samideanojn kiuj estas pretaj kaj kapablaj servi kiel Estraranoj. Pro la uzo de aerpoŝto ne gravas en kiu landparto Estrarano loĝas; ja estas grave ke li estu kapabla, sindonema kaj energia. Grupoj memoru, ke la venontaj du jaroj tre povos esti tempo eĉ decidiga por la sorto de nia movado. Elektu viajn reprezentantojn zorge. Ni faras ĉi tiun fruan anoncon por ke grupoj, kiuj ne kunvenas dum Decembro kaj Januaro, povas nomi siajn reprezentantojn antaŭ la jarfino. Bonvolu legi paragrafon 12-17 de la Statuto en la Jarlibro kaj sendu la nomojn de elektitaj komitatanoj por 1946-47 al la Prezidantino, S-ino F.Rawson. La Prezidanto kaj Sekretario devas subskribi la avizon kaj certigi la nombron de kotizpagitaj membroj jene:- "Ni certigas, ke S-ro Ajnulo kaj F-ino Ajnulo estis laŭ statute elektitaj kiel niaj Reprezentantoj en A.E.A. komitato. La nombro de kotizpagintaj membroj de ĉi tiu grupo estas 70.
(subskribita).......Grupo Prezidanto......Grupa Sekretario."

GRUPAJ KOTIZOJ. Ĉi tiuj nun estas ŝulditaj. Grupoj pagas 6/- plus unu pencon por ĉiu membro pli ol 72.
I.E.L. Kotizoj. Individuaj membroj de I.E.L. bonvole pagu siajn kotizojn antaŭ la 15a de Decembro al la Ĉefdeligito S-ro L.E.PFAHL, 64 B righton St., Crotdon, NSW. La kotizo estas 11/3, kun jurnalo kaj Jarlibro de I.E.L.

G.H.WILLIAMS,H(Sekretario) 15 Morrice St., Lane Cove, N.S.W.

---

........

......

LA DEVIZO elektita por la A.Z.A. estas MI GARDU LA SANKTAN FLAMON.

"RIDGE": Ŝajnas al mi grava manko en Esperanto, ke ni ne havas ĝustan vorton por la Angla "ridge" en la senco de ripa strio sur kampo, tablotuko k.c. "Corrugated iron" montras la eblon, uzi la Latinan radikon RUG, ĉar "ripstriata" apenaŭ taŭgas. Intersulko, elstara linio, malsulko, eĉeto ankaŭ ne kontentigas. La Majstro mem en Psalmo 65/10 uzas bulojn, sed tio estas "clods", ne same kiel "ridge"; kaj la sulko estas inter la "rugoj", tute malsimila afero. (Pastro Long, Dereham, Anglujo.)

Rim. de la Red.---Mi konsiderus "malsulko." Ĉu ne vere, ke "a pimple is a dimple turned inside out? (Akneto estas kaveto fiide renversita)

VOĈO EL GREKLANDO. La sekvanta letero venis de F-ino V.COX, vicdel. de I.E.L., kun la peto ke La Rondo donu kiom eble plej da informo pri la afero, celo al helpo al tiu nefeliĉa familio. Eĉ se troviĝus neeble sendi pakaĵojn, iuj povus sendi almenaŭ leteron de saluto kaj kuraĝigo.

Eresos (insulo Lesvos) Greklando. 18 Marto, /45.

Estimata F-ino, Mi kuraĝas skribi al vi ĉi tiun leteron el multsopira Greklando. Vi certe konas kiajn malfacilaĵojn ni Greklandanoj suferis je sovaĝa kvinjara posedado de nia lando. Mi petegas vin ke vi havu afablecon sendi al mi per poŝt-paketoj kelkajn metrojn da teksaĵoj por fari internajn virinvestojn por mia edzino kaj mia filineto, same kelkajn parojn de virinŝtrumpoj por mia edzino, kaj, se vi povas, aliajn familiajn objektojn aŭ virinvestaĵojn laŭ via percepto.

Bedaŭrinde tutajn mazagenojn en Greki. la bestaj malamikoj rabakiris, kaj hodiaŭ ne estas fabrikoj ĉe ni kiuj povas fari teksaĵojn. Kontraŭ viaj s upre-sendaĵoj mi sendos al vi tre frue kelkajn vicojn de nestampitaj belaj Grek-poŝtmarkoj eldonitaj dum nuna Eŭropa milito samvalore de viaj sendaĵoj. Esperante ke mi havos vian respondon,

Salutas vin tutkore via GREGORIO PAPAKONSTANTINOU
(Del. UEA 1935 Jarlibro.)

Adreso:- D-ktoro P.T.T. oficejo
ERESSOS (insulo Lesvos) GREECE.

GENERALO EISENHOWER & ESPERANTO. Laŭ N.Z.E.A. Official Bulletin en la "North Wairarapa Herald" Julio 4 aperas raporto 22-collonga pri parolado de Kaporala Bailey, Esperantisto, al Rotarianoj. En ĝi li asertis, ke Gen. Eisenhower brodkastis en 14 lingvoj pri la kapitulacio de Germanujo. Inter ili estis Esperanto.

Tio estas bona novaĵo, sed ĝi estus pli bona se nia sam-o nomus firman fonton de aŭtoritato, el kiu li prenis la informon. Gen Eisenhower estas eminenta militiato, sed ni rajtas dubi lian kompetenton voĉlogi en 14 lingvoj, laŭ maniero kiu komprenigus lian dirvolon al la koncernatoj. Ververe, estus granda signifaĵo tio, ke tia famulo radio sonigis Esp-on tra tuta Eŭropo, en cirkonstancoj tre dramecaj. Tiom pli strange, ke ni en Aŭstralio legis neniom pri lia langa admirinsaĵo. Ŝajnas al ni miraklo de preterlasemo, ke la gazetoj forgesis rimarkigi pri fakto de tiel tre alta valoro al ĵurnalisma vidpunkto. F.R.B.

NEKROLOGO. CHAPMAN-TAYLOR. Ĉe New Plymouth (N.Z.), s-ino Ada Chapman-Taylor, preskaŭ 97 jara. Ŝi naskiĝis en Anglujo, kie ŝi fariĝis instruisto. Parolis kelkajn lingvojn; Esperantistiĝis en 1903 kaj kun Esp-a edzo fidele laboris por la lingvo, precipe en Christchurch. Fonda membro de la N.Z.E.A.

INTERNACIA BALOTADO:- La Internacia Statistika Instituto, 329 East 50th St., New York 15., U.S.A., uzas Esperanton ekskluzive sur eksperimenta bazo. El la unuaj raportoj por Usono kaj Kanada sole, evidentiĝas ke granda plimulto konsentus pagi malgrandan parton de siaj enspezoj por ricevi medicinan kuracadon de nacia sanecservo. Per malgranda plimulto la grupo de Esperantistoj malaprobas la mortpunon por murdo kaj dividiĝis preskaŭ egale pri la demando malfermi-fermi la pordon de sia lando al enmigrado de ĉiuj rasoj, kredoj.
(Laŭ "Worker Esp-ist")

ELEMENTARY EXAMINATION B.E.A. Sukcesis G.E.HANNAH, Nedlands, W.Aus; C.F.KENNY, Kalgoorlie, W.Aus. H.W.BUSWELL, S.Aus. (Honours).

ADVANCED EXAMINATION, Written part:- N.V.D.BRODIE, Wembley, W.Aus.

DIPLOMA, Miss O.E.STREMPEL, Wembley Park, W.Aus.

ERAROJ en la Sept:- P.160/3 de mals. magasin; 10 de mals. titolojn. 159/10 neebla; 172/14 Ankaŭ; 174/22 bonmaniera; 167/6 internacie.

---

VIZITO al DENTISTO.

Post nokto plena de la turmentoj de dentdoloro mi ellitiĝis pli frue ol kutime, kaj, nemanĝinte, eliris el la domo por trovi dentiston. Tra la preskaŭ senhomaj stratoj blovis malvarma vento kaj nur malofte preterrapidis veturiloj. Ankoraŭ montris la butikaj fermitajn pordojn, kaj sole aretoj de pasero j aspektis gajaj kaj viglaj en la malforta sunlumo. Trans kelkaj stratoj mi paŝadis, serĉrigardante la domojn. Kaj jen subite je la kontraŭa flanko de la vojo mi ekvidis brilan platon el latuno. Tuj transirante la straton, kun kortremo mi legis sur la plato la vortojn "A.Tiranto, Dentisto," Kun naŭzo mi marŝis plu, sed post iom da tempo returnis min kaj denove troviĝis staranta antaŭ la loĝejo de la dentisto. Kun tremanta koro hezite mi aliris la pordon kaj sonorigis. Mi atendis. Post kelkajn minutojn la pordo malfermiĝis kaj servistino mire rigardis min. "Ĉu hejme estas la dentisto?" mi demandis. "Jes, sed nun li matenmanĝas," sonis iom abrupta respondo. "Ĉu vi deziras lin?" "Jes, mi havas dolorantan denton." La servistino kun severa rigardo informis min, ke se mi volus , mi povas eniri kaj atendi la dentiston.

Sidante en la atendejo, mi provis legi la malnovajn kaj ĉifonitajn gazetojn dise kuŝantaj sur malgranda tablo, sed bedaŭrinde mi povis pensi nur pri la apuda ĉambro, kie la tiristo de dentoj faris sian ĉiutagon laboron, kaj kies pordo portis la devizon 'Kirugejo,' Post longa kaj streĉa atendado, dum kiam mi ofte konsideris forkuron, la pordo malfermiĝis kaj viro blankvestita staris antaŭ mi kun sci-

volema vizaĝo.

"Ĉu dento ĝenas vin? Do, eniru," estis la maltrankviliga saluto. Sekvante lin, mi sidiĝis tremanta en granda brakseĝo, kaj la dentisto eklumigis lampon pendantan super mia kapo, kiu ĝenis la okulojn pro ĝia forta brilo. "Malfermegu la buŝon," li ordonis. Enrigardante momente li nur ekkriis "Ha," en iom minaca tono kaj ekserĉis en tirkesto, kiu estis plena de malbelaj iloj. Tuj li revenis, tenante enmane enŝprucigilon, kiun li enirigis en la dentokarno tiel energie, ke mi preskaŭ kredis, esti pikita de vespo.

"Mi atendu iomete," li diris, kaj reo malrapide serĉis en sia ilaro. Elektante apartan timigan pinĉilon li diris "Nun," kaj firme staranto kaj metante manon ĉe mia makzelo, li premtenis la denton per la pinĉilo kaj forte tiris. Post momento li triumfe montris kaj svingis ĝin antaŭ mia vizaĝo dirante "Facila afero. Kvin ŝilingojn, mi petas." Saldante la kalkulon, mi ne perdis tempon kaj tuj eskapis en la straton, kie nun bele brilas la suno kaj en la ĝardenoj kantis birdoj.

Revenante hejmen ĉirkaŭite de babilemaj promenantoj, mi ne povis ne kompati tiujn malkuraĝulojn, kiuj semajnon post semajno toleras dentdoloron, ĉar ili tiom timas denttiron, ke ili senfine prokrastas tian agrablan aferon, kie estas vizito al dentisto.

---------------------------------------W.LANGHAM.

YARRALUMLA. En La Rondo (Jan.1945) sidas artiklo pri la legendo de Yarralumla. Tiun problemon ŝajne solvas letero en "Sydney Morning Herald" (Aug.2). Kate Newman skribas:- Ke ŝi naskiĝis ĉe Yarralumla. Tie dum junuleco, helpate de amikino, ŝi verkis rakonton pri nigrulo kaj diamanto. En ĝi la diamanton donis al la nigrulo lia mastro, kiu estis mortanta post bataleto; la nigrulo, siavice ĉe la perdo de l' morto, glutis la gemon kaj enteriĝis sub la maljuna deodararbo. "El la skribmeblo de mia patro mi prenis dikan pergamenan paperon, sur kiun mi skribis la rakonton; poste ni zorge priŝmiris ĝin per aranea retaĵo polva, kaj kaŝis ĝin en la kripto de kolonelo Gibbes ĉe la okcidenta parto de la ĝardeno. Mia patrino (s-ino Campbell) kolerte riproĉis nin, dirante ke tia ago povus instigi scivolulojn forigi la arbon serĉe al la gemo."

-----------------------------------------

KASO de LA RONDO. Kvitancoj riceviтaj dum Sept: S-ro I.Slavoff 10/- S-ro F.V.Taylor 10/-; F-inoj Smith, Bramall, 12/-; S-roj W.Langham, H.Calwell, Masel, H.Leighton, D.Gray, 30/-; S-inoj Klussendorf, Glenie Trundle 15/-; S-ro Lamb 2/-; S-ro F.Sons 3/-; S-ro K.Walker 6/-; S-ro K.Hirschel 5/6; ....£5.6.6.
Al la Aus. Esp. Asocio £1/2/6; Al la Rondo £4.4.0
Elspezoj de La Rondo £4.3.2. En la kaso £1.15.9.

W.ADDIS, (Kasistino), 25 Greville Ave., Flinders Park, S.AUS.

Published by F.R.BANHAM, 2 Banchory St., Essendin, W5. VIC.

OFICIALA ORGANO DE LA AUSTRALIA ESPERANTO ASOCIO

# LA RONDO

## THE AUSTRALIAN ESPERANTO MONTHLY

ELDONITA DE F.R. BANHAM.
2 BANCHORY ST. ESSENDON W.5
VICTORIA AUSTRALIA.

VOL. 6 No. 2

nov 1945

# L A R O N D O.

## L A R E D A K C I O.

S-ro F R BANHAM, D.B.E.A., REDAKTORO,
2 Banchory St., Essendon, W5 VIC.

F-no L.E.BAILEY, D.B.E.A.,
13 Sherbourne Rd ., Medindie Gdns., Adelaide, S.AUS.

F-no W.A.ADDIS, KASISTINO,
25 G reville Ave., Flinders. Park, S.AUS.

---

## MORTINTOJ REVIVIĜAS.

J.B.DAVIES, en "Aegus," Melburno, 2.3.45.

Rusaj scienciistoj revivigas mortintojn. Revivigo de kadavroj ne plu estas frape izola sukceso de l' scienco; en dekduo da kazoj ĝi efektiviĝis ĉe mortintaj soldatoj virinoj, suĉinfanoj kaj bestoj.

Jam sesdek jarojn Rusaj kuracistoj en tiu sensacia esplorkampo eksperimentas pri revivigo al kadavroj, kaj estas multe pli progresintaj ol tiuj en la cetera mondo. Unu metodo, kiun ili perfektigis dum la nuna milito, prezentas mirindegajn eblecojn. Tuja , lerta kuraco povas redoni vivon al viktimoj de drono, sufoko, elektra skuo, malinterna sangado kaj pneumonio.

Unuaj detaloj pri la Rusa epokfara eltrovo estas en la "American Review of Soviet Medicine." Oni redonas vivon al kadavro per tio, ke oni renversigas la procedon de la mortado, diras V.A.Negovski. "La morto (1) nur tre malofte estas subita eleeso de la vivo. Ĝi estas ĝustadire procedo enhavanta multajn interajn etapojn de vivo ĝis morto." La mortado normale enhavas tri fazojn:- (1) Stato en kiu organizo aktiva lukto kontraŭ ĝi; (2) klinika morto, en kiu la korpo fariĝas komplete pasiva; (3) biologia morto. En (3) ekzistas nenia ŝanco reviviĝi, sed en la fruaj fazoj de klinika morto estas eble revenigi ĉiujn funkciojn de la vivo, malgraŭ ke vivo estas tute foriĝiinta el la korpo.

La metodo de Negovski estas plibona formo de eksperimentoj, kiujn faris Pavlov kaj Christovish en 1887. Li samtempe: pumpas per pulmom otoro oksigenon rekte en la pulmojn de la kadavro; injektas puran (tutelementan?) sangon en vejnon je malalta premo, kaj injektas puran sangon en brakan arterion direkte la koron. Tiun procedon oni faris al 52 Sovetaj armeoficiroj, kiuj estis mortintaj pro vundoj. Dek du

el ili reviviĝis kaj fine komplete resaniĝis.

Kazo d e V. Cherapnov, simpla soldato. Morte pafita, li senviviĝis pro sangoperdo,d um kuracis toj serĉis ŝrapnelajon. Ili nomis lin mortinta, kaj 3½ minutojn poste nombro da specialistoj-sciencistoj eklaboris s uper la kad avro. Ili uzis vivd onajn oksigenon kaj sangon . La koro komencis bateti post unu minuto; tri minutojn poste spirado komencis . Post malpli ol horo C. malfermis la okulojn, respondis demandojn, petis akvon. Li vivas hodiaŭ, ĉirkaŭ jaron post la "miraklo."

La unua Rusa reserĉo estis kun bestoj antaŭ preskaŭ 60 jaroj. La unua homa koro reviviĝis per la manoj d e sciencis to Kuljabko en 1902. Li portis vivon al trimonata infano per artefarita spirigo kaj sangodono tuj post ĝia morto pro pneumonio.

Negovski listas 284 kazojn de provita revivigo al kadavroj ĝis 1942. Li diras. ke pli ol duono sukcesis. Kompletan kaj daŭran revivigon oni ricevis en 151 kazoj (52 elcentoj), portempa en 72 kazoj (27 elc.) kaj malsukcesis en 61 (21).

Negovski frue eksperimentis ĉe 250 grandaj hundoj antaŭ ol revivigi homon. La bestojn li metis sub eteron kaj ĉiun guton da sango li drenis el iliaj korpoj. La procedo de revivigo komencis je 5 ĝis 8 minutoj post klinika morto. Sango estis injektita sub meza premo kaj artefarata spirigo estis aplikita per ia blovilo. La sciencisto perfektigis sian metodon ĝis tio, ke sukceso en revivigo al hundoj estas nun preskaŭ certa. La Rus-Germana milito provizis al Negovski bonokazon uzi lian teknikon je dekduoj da "mortintaj" homoj, kaj akcelis perfektiĝon de lia viv-redona "miraklo."

(Trad.) F.R.BANHAM, D.B.E.A.

(1) Kie tiu procedo efektive okazas , la fenomenon pliĝuste oni nomus "mortado" (la procedo mortadi). De logu konprene: "la mortado.... estas procedo...."

---

MIA PATRINO ROMPAS SIAJN PERLOJN.

de Marion Sturges-Jones, Readers' Digest May 45.

Dum unu el tiuj periodoj, kiam ni estis tute senhavaj post la morto de patro, panjo akceptis oficon kiel akompanintino de maljuna sinjorino en Philad elphia. Panjo laŭtlegis brilege kaj bone sukcesis ĉe la riĉa kaj reŭmatisma sinjorino Effingham.

Tiu reŭmatismo fine kaŭzis, ke s-ino Effingham volis provi la metodon de Novjorka kuracisto. Panjo ne estis en Novjorko dum jaroj, kaj kiam s-ino Effingham diris al ŝi, ke ŝi tion akompanu ŝin kaj ke ili loĝos en Hotelo Plaza dum unu semajno, la ekscitiĝo de panjo estis senlima.

Ŝi jus estis rakontinta al mi la novajon, kiam ŝia vizaĝo nubo kovriĝis. "Mi ne estis pensinta pri vestajoj!" ŝi pensspiris. "Kion

do mi surhavu? Kompreneble mi havos miajn perlojn," ŝi aldiris en-pense. "Nigra robo surhavota kun ili solvos la problemon."

Mi estis doninta al panjo ŝnur-vicon da perloj por la pasinta Kristfest o, bonan vicon kostintan 3.98 dolerojn ĉe John Wanaker, kaj ŝi estis parolinta ĉiam poste, ke ŝi devus elĉavi nur la ĝustan nigran veston, por surhavi ĝin kun la perloj. Do nun ni iris al butiko de s-ro Solomon, kaj por iu mirakle li elportis nigran veston kiu ŝajne estis farita por ŝnur-vico da (bonaj) perloj. La efiko estis iu d e kvieta nobleco, sugestanta pri la Placa dum te-manĝa tempo.

Estis nur post kiam panjo sekure hejmenvenis al Philadelphia, ke mi ekscIis ŝiajn aventurojn pri la perloj. Ili disfalis en la vestiblo de la Placa, kiam panjo kaj s-ino Effingham trapasis ĝin iun vesperon venante de ĉefmanĝo.

"Dio mia! Miaj perloj!" panjo aŭdigis etan ve-krion. Ekestis momenta sensacio kaj brava ŝipar-oficiro helpe venis kaj komencis kolekti ilin. Tiam la estro de la hotel-paĝioj aperis, firme flank-en ŝovante la kapitanon. "Mi pardonpetas, sinjoro," li diris, "sed mi transprenos tiun aferon, ĝis kiam la ĉef-detektivo alvenos. Ĉiu bonvolu flankeniri, tiel ke ni formu arkon ĉirkaŭ la sinjorino kaj vidu, ke neniuj perloj estu maltrovataj."

"Ho, dankon!" diris panjo. Ŝi pensis rave la fakton, ke la hot-elo tiel nelacigeble volis helpi ŝin, kaj ŝi flirtis ĉirkaŭe murmur-ante ĝian ŝaton, ĝis kiam la lasta perlo estis rericevita.

"Ĉu mi sigelu ilin en koverton kaj metu ilin en la hotelan seku-rejon, ĝis kiam vi povos ree surŝnurigi ilin, sinjorino?" demandis la ĉef-detektivo. "Mi pensas, ke tio estas grandioza ideo!" diris panjo kaj atendis feliĉe ĉe la tablo por la kvitanco.

La postan tagon, panjo promenis en Kvina Avenuo kaj haltis, por rigardi la elmontrojn de eleganta juvelisto. Subite ŝi ekrimarkis, ke la sorto venigis ŝin ĝuste al la ejo por revicigo de la perloj. Ŝi eniris. Alta sinjoro en frako salutis ŝin.

"Ĉu mi povas havi miajn perlojn re-surŝnurigitaj en la venontaj du tagoj?" panjo demandis. "Mi estas ĉi-tie de Philadelphia kaj ŝatus ilin faritaj tuje, se eble." La sinjoro estis eksterordinare ĝentila. "Mi informos min," li diris. "Ĉu via moŝto havas la perl-ojn ĉi tie?" "Ne," diris panjo, "mi lasis ilin en la sekurejo de la Placa."

La sinjoro levprenis eran telefonon kaj faris ĝentilan konversa-cion kun alia parto de la konstruaĵo. "Nia s-ro De Witt povus veni al la Placa hodiaŭ posttagmeze kaj ricevi ilin, se la sinjorino ne estos alie okupata," li diris. "Ni ŝatus, se via moŝto akompanus s-ron De Witt kaj la perlojn ĉi tien, por ke vi povu ĉeesti la sur-ŝnurigon."

Panjo estis iomete kapturniĝema pro tiom da atento. Kiel perfe-kte ĉarma ĉiu estis estinta pri ŝiaj perloj!" "Mi amus, observi la envicigon!" ŝi d iris dankeme. "Miaj perloj estas mia plej-plej kara posedaĵo!" "Precize," diris la alta sinjoro. "Ĉu ni diru je la tria horo?"

manpoŝo, kiam s-ro De Witt aperis en la Placa. Li estis bela viro aspektanta kiel Usona Senatano, kaj panjo sentis sin enviita, kiam ŝi pasis tra la vestiblo kun li. Estis tre ekscite ankaŭ, reveni al la juvelejo en la privata aŭto disponigita.

Kiam ili alvenis en la juvelejo, s-ro De Witt movigis ŝin preter ĉiuj montrotabloj de diamantoj kaj rubenoj, preter la malfalsaj arĝentaĵoj kaj la ravegaj kristalaĵoj en bela meblitan salonon de la malproksima parto. Tie panjo estis sidigita ĉe tablo, kaj kovrilo de peza, nigra veluro estis metita antaŭ ŝi. "Nia s-ro Duprez faros la survicigon, sinjorino, kaj li ĉeestos en momento," diris s-ro De Witt.

S-ro Duprez, malgranda franco kun akraj trajtoj kaj fantaziaj lipharoj, baldaŭ riverence movis sin en la ĉambron. Eksidante, li metis ujon de ilaro sur la tablon, glatigis la veluron kaj elprenis la koverton de la Placa. Ili ĉiuj atentis, kiam li malfermis ĝin per maldikaj, zorgaj fingroj kaj elruligis la perlojn. Li ĵus volis surmeti okulvitrojn, kiam li subite rigidiĝis. Lia mano tremis, li hezitis, kaj poste li rapid e surmetis la okulvitrojn. Li ĵetis malrapidan, kontinuan rigardon al la perloj, kaj jen li ekspiris subite kun akra, sibla tono.

"La sinjorino estas prirabita!" li kriis. "Oni devas alvoki la policon! Tiuj ne estas perloj!" Panjo palpebrumis. "Ho, mi estas certa, ke mi ne estas prirabita!" ŝi diris. "Ĉiu ajn en la Placa estis tiom afabla---mi---mi ne povas imagi ion tian de ili!" Ŝi klinis sin transen kaj fiksrigardis la perlojn. "Ne," ŝi diris kaj eligis sopiron de liberiĝo. "Tiuj estas miaj perloj, tutcerte---mi m emoras la agrafon tute bone. Vidu, ĝi estas lilioforma desegno en oro kaj diamantoj---ne veraj diamantoj komprenenble---sed estas ĉarma agrafo, ĉu ne?"

Panjo sin turnis al s-ro Duprez kaj de li al s-ro De Witt. La lasta estis skarlata enviziĝe kaj aspektis proksima al apopleksio, dum la eta franco fariĝis griz-blanka kaj firmprenis la brakon de la seĝo. Lia buŝo malfermiĝis, sed neniu sono eliĝis.

"Ĉu io okazis?" panjo demandis alarmita. S-ro De Witt estis la unua, kiu ree disponis pri la povo paroli. "Sinjorino," li diris, "vi sidas en privata salono de la plej eminenta gemo-vendisto en la mondo. Sur tio sama seĝo, kiun vi okupas, la Aga Khan sidis, dum novaj desegnoj estis farataj por liaj valoregaj smeraldoj. La princo de Kimrujo alportis famili-juvelojn al tiu sama salono, por diskuti remuntadon. Spite de tio, ni ne estas tro fieraj, por re-surŝnurigi la perlojn de iu Usona ŝtatano. Sed, sinjorino, ni ne enviciĝas perlojn, kiuj kostis 98 cendojn!"

Panjo rektigis sin. "Mi pensas, ke vi estas tre malĝentila," ŝi diris malvarme. "Tiuj certe ne estas 98-cendo-perloj. Mia filino donacis ilin al mi por Kristfesto. Mi neniam demandis pri la prezo---io, kion vi certe ne povus kompreni---sed mi scias, ke ili estas bonaj perloj, kvankam ili ne estas veraj perloj. Se vi ne volas surŝnurigi ilin, vi havas la liberecon, rifuzi tion, sed mi devas diri, ke laŭ mia opinio via maniero estas tute ne ĝentila."

Kiam panjo finis, s-ro De Witt jam ekregis sin denove kaj estis ekstarinta. "La sinjorina moŝto pravas," li diris, aspektanta roo kiel Senatano, "la oraro estas nia! Mi petas pardonon, ke mi transiris la linojn---estis nur pro tio, ke dum la 30 jaroj, kiujn mi jam estas en la firmo......, sed ne pensu pri tio! La oraro estas nia! Duprez, vi reŝnurigos la sinjorinajn---er---sinjorinajn porlojn senprokraste!"

"Ho, dankon!" diris panjo, ree en plena ridetado.

"Kaj ĝi kostos nenion!" s-ro De Witt aldiris. Lia vizaĝesprimo estis iu de doloro, sed estis doloro tolerita noble.

----------------------------(Trad.) PAUL E.SCHWERIN, DBEA.

## LA AKCIDENTO DE MONICA MARY.

de Jean E.Turnley. El Adelaide MAIL, 13. Oct. 1945.

La sesan fojon la bakisto frapetis ĉe la malantaŭa pordo de la domo de la familio Monahan, kaj kriis sian nekompreneblan alvokon. S-ino Mohanan, eklevante la infaneton el la bano, responde vokis, kaj post kvin minutoj aperis kun la infaneto en la brakoj, la kalkulo de la bakisto, kaj ĉemane sia monujo.

Tuj kiam ŝi pagis lin kaj li sin turnis por foriri, la lakto en kaserolo sur la forno bolis kaj superfluis sur la fornon. S-ino Mohanan rapidis por ĝin forlevi, kaj sidigis la infaneton sur la sofon, apogante ŝin per kusenoj.

"Nu, restu tie minuton dum mi ordigas vian veturileton," ŝi petis.

Estis estinta ĉagrena mateno. Kvazaŭ ne estus sufiĉe ke ŝi devas pretigi siajn proprajn kvin por iri al la lernejo, ŝi devas ankaŭ varti la trijaran Petron de sia fratino. Feliĉe, Avino vizitas ŝin kaj tempospace senŝarĝas ŝin de li.

Dum ŝi pufigis la matracon, la infaneto ekploretis. S-ino Mohanan kaptis la unuan ludilon kiu estis ĉemane, kaj svingpendis ĝin antaŭ ŝi.

"Jen, ludu kun la vagoneto de Petro," ŝi petegis la infaneton, "mi nun estos nur duonminuton."

Monica havis ses monatojn kaj dentopuŝadis. Ŝi afable ricevis la ludan vagonon, antaŭen kliniĝis de sia eta talio, kaj absorbe ĝin renversis. Ŝi levis ĝin en malgranda dika mano. "Ahaaaah," ŝi anoncis pro plezuro.

S-ino Mohanan starigis la infanĉaron eldome en la suno, revenis por eklevi la infaneton kaj trovis ke Monica Mary havas la ludilon plejparte en la buŝo.

"Ha, ne manĝu la maljunan aĉajon! La kolorajo deiros de ĝi!"

"Grrrrh," diris Monica Mary, sed ŝ ia patrino firme forpuŝis la etajn malsekajn fingrojn.

Tiam, kiam ŝi kuŝigis la ludilon sur la sofon, ŝi haltspiris pro teruro.

"Sankta Maria, Patrino de Dio," ĝemis S-ino Mohanan pro tio, ke la vagono havas nur tri radojn.

Febre ŝi serĉis inter la infanvolvaĵoj kaj ankaŭ ĉiun colon de la planko. Ŝi eĉ renversis Monica Mary supre malsupren, sed elvenis el la infano nur gargarsono.

Ŝi rapidigis la infaneton en ŝalon kaj elflugis el la domo, lasante la pladpurigon, la viandaĵon sur la forno, la fenestrojn malfermaj, kaj la malantaŭan pordon gapanta, kaj kuregis laŭ la vojo al la Infansanejo.

"Trankviliĝu," S-ino Mohanan," serene diris la Flegistino, "ĝi estas el kaŭĉuko, tre malgranda, ronda kaj mola. Ĝi trapasos. Donu al ŝi iom da oleo, kaj ĉio estos tute ĝusta. Ŝi ne aspektas kvazaŭ ŝi suferas."

S-ino Mohanan leviĝis kun profunda sopiro. Ŝi fikse rigardis Monica Mary kvazaŭ ja la fervorego de ŝia observado perforte eltirus la radon el tiu keruba vizaĝo.

Ŝi pripense puŝetis la infaneton en la ventro. "Ah---mi esperas ke vi estas tute prava, Flegistino, tamen mi maltrankviliĝas. Mi maltrankviliĝos de timo ke ĝi ruliĝos kaj volvos sin ĉirkaŭ en la malgrandan maŝinaĵon de ŝia interno."

La Flegistino iomete ridetis. "Mi opinias ke ĝi ne faros tion," ŝi diris. "Nu, certe ne maltrankviliĝu, S-ino Mohanan. Informu min kiel ŝi fartos."

"Tion mi ja faros. Ĝis revido, Flegistino."

La patrino de S-ino Mohanan estis en la kuirejo kiam ŝi hejmon atingis.

"Mi reportis Petron," diris la maljuna sinjorino. "Kie nom' de Dio vi estis? La domo estis tute malferma, kaj la manĝaĵo brulanta sur la forno! Kio estas al vi?"

"Ho, panjo!" S-ino Mohanan peze sid iĝis. "Monica Mary englutis radon de la vagoneto de Petro, kaj treeble ŝi mortos!"

"La sanktuloj s avu nin! Ho, la benita etulo! Rado? Ĝi turniĝos rondrende en ŝia interno kaj donos al ŝi spasmojn! Jen! Donu ŝin al Avin'.'"

Monica Mary elportis la transdonon al la genuoj de sia avino kun sia kutima trankvileco. Granda nigra butono kaptis ŝian ŝaton kaj ŝi avide kurbigis la buŝon al ĝi.

La du virinoj sidadis kaj sin balancis pro veo, rigardante al Monica Marykvazaŭ ili atendus ke ŝi disfalos antaŭ iliaj okuloj.

Malgranda Petro eniris de la korto kaj staris rigardanta ilin ĝis la vidaĵo enuigis lin.

"Kie estas mia trirada?" li d emandis kolerete. "Kio estas mia kara eta trirada?"

"Via triciklo estas en la barako," lakone informis lin lia onklino.

"Sed al mi mankas mia vagono, mia trirada vagono."

Lia avino subite kaptis lin. "Ĉu vi aŭdis tion? Lia vagono! Kiom d a radoj havas via vagono? Ĉu nur tri?"

Petro solene palpebrumis. "Nur tri radojn. Kiam mi estis mal-

granda mi englutŝis unu."

-------------------------------------L.E.BAILEY, DBEA.

LA TRI DEZIROJ.(Malnova Germana Rakonto)

Malriĉa viro sidis unu vintran vesperon ĉe sia forno kaj babilis kun la edzino pri la feliĉo de najbaro. "Ah," li diris, "se mi havus iom da mono mi fondus negrandan komercon, kaj se mi diligente laborus mi baldaŭ havus sufiĉon por vivadi sen zorgoj."

"Tio min ne feliĉigus," respondis la edzino. "Mi dezirus esti rekte riĉa; mi volonte posedus grandan domon, kaj se mi malriĉajn homojn vidus, mi helpus al ili, tiel faciligante al ili la vivon. Sed ni paroladas vane; jam forpasis la tempo de la feoj. Se ekzistus ankoraŭ tiaj estajoj, kaj unu el ili mi trafus, ŝi baldaŭ min helpus. Mi scias bone kion mi petas de ŝi."

Sammomente ambaŭ ekvidis belan feinon en la ĉambro. Ŝi diris: "Mi promesas al vi plenumi la tri unuajn dezirojn, kiujn vi esprimos; sed gardu vin, ĉar mi ne permesos al vi ankoraŭ pli."

Kiam ŝi jam malaperis, la geedzoj parolis inter si tre embarasate. Diris fine la edzino: "Se mi sola devus decidi, mi scias kion mi dezirus. Miaopinie, nenio mankus al mi se mi estus riĉa kaj respektata."

La viro respondis: "Ne! Se ni simple estus riĉa, ankaŭ povus okazi al ni malsanoj, ĉagrenoj, eĉ frua morto. Pli bone estus saneco, feliĉo kaj longa vivo."

"Kiacele havi longan vivon se ni estus malriĉaj?" kriis la virino "Tio signifus nur plilongigi la mizeron. Se la feo efektive nian f el-iĉon volus, ŝi promesus al ni pli da dezirplenumoj, ĉar estas dekduoj da aferoj, kiujn ni bezonas."

"Vi estas prava," diris la viro, "sed ni havas ankoraŭ da tempo. Ni konsideru ĝis morgaŭ pri tio, kiujn tri aferojn ni plej deziras, kaj tiam ili postulu."

"Mi la tutan nokton pripensos la aferon," konsentis la virino. "Dume ni iom nin varmigu, ĉar estas ege malvarme." Dirante tion, ŝi dispuŝe instigis la fajrajon. Vidante la karbojn denove ekflagri, ŝi diris sen penso: "Nun bele bruligas la fajro; ho se ni nur havus pecon da kolbaso, longan je metro. Facile ni povus ĝin kuiri." Apenaŭ ŝi diris tion, jen falis al ŝi tra la kamentubo peco da kolbaso longan je metro.

"Al diablo kun via kolbaso!" blasfemis la viro. "Kia bela dezirajo! N un restas al ni nur d u. Ho mi estas tiel kolera, ke mi deziras, ke ĝi alfiksiĝu al via nazpinto!"

Sammomente li vidis, ke ankoraŭ pli malsaĝa estas lia propra deziro, ĉar la kolbaso saltis rekte al la nazo de la malfeliĉa edzino kaj teniĝis tie tiel firme, ke la kompatinda ne povis ĝin depreni.

"Ah, mi malfeliĉa! Kiel mi liberiĝos de la kolbaso?" ŝi ploris Kia malbona viro vi, ke vi ĝin sur la nazon deziris!"

"Mi ĵuras al vi, kara edzino, ke tion mi efektive ne deziras," respondis la viro. "Sed kion nun fari? Mi deziros la riĉecon, kaj aĉetos al vi oran ingon por sidi al vi sur la flarilo."

--------------------------(Trad.) F.R.BANHAM, DBEA.

LITERATURECA TRADUKO. de F.R.BANHAM.

JANE AUSTEN: Jane Austen's delicate and ironic art will remain unassailable through all changes of taste and variety of opinion. What she really possesses is nothing less than the power of giving expression to that undying ironic detachment, touched with a fine malice but full of tender understanding, which all women, to some degree or other, share, and which all men, to some degree or other, suffer from; in other words, the terrible and beautiful insight of the maternal instinct. The clear charm of her unequalled style--a style quite classical in its economy of material and its dignified reserve--is a charm frequently caught in the wit and fine malice of one's unmarried aunts; but it is, nobo the less, the very epitome of material humour. Without romance, without philosophy, without social theories, without pathological curiosity, without the remotest interest in "Nature", she has managed to achieve a triumphant artistic success; and to leave an impression of serene wisdom such as no ther woman writer has equalled or approached.

La delikata kaj ironia arto de J.A. restos firma dum ĉiuj ŝanĝoj de gusto kaj opinio. Kion ŝi efektive posedas, tio estas ĝuste la povo esprimi ironian mondrigardon sendependan de cirkonstancoj (7), pritušitan de delikata malico sed plenan de molkora kompreno. De eterne la virinoj havas ĝin, pli-malpligrade, kaj ĉiuj viroj pli-malpligrade suferas pro ĝi. Alivorte, ĝi estas la terura kaj bela klarvido de la patrineca instinkto. La facila ĉarmo de ŝia senegala stilo, stilo pure klasika en sia lingvaĵo ŝparema kaj digna sinretenemo, estas ĉarmo kiun oni ofte ekkaptas en la sprito kaj delikata malico de senedzaj onklinoj; sed, malgraŭ tio, ĝi estas la vera esenco (6) de humoro patrineca (8). Sen romaneco, sen filozofio, sen sociaj teorioj, sen scivolo patologia, sen la plej malgranda intereso en "la Naturo," ŝi tamen atingis triumfan artan sukceson kaj heredigis impreson de serena saĝo kian neniu alia virino egalis aŭ eĉ proksimvenis.

(6) NE "epitomo."
(7) "detachment" ŝajne sig. "a standing aloof from objects and circumstances."
(8) "adjektivo post substantivo plej bone altiras atenton," (Fruictier).

--------------------------------------------

DIOGENO serĉis honestulon. "Kia bonŝanco?" demandis preterpasanto. "Sufiĉe bona," respondis la saĝulo. "Mi ankoraŭ havas mian lanternon!"

## TRADUK-KONKURSOJ.

TRADUKO de KONKURSO 27.

"Ĉu vi iam renkontis Hindon?"

Ĉi tiun surprizan demandon direktis al mi amiko, kiam mi vivis en Hindujo de proksimume unu jaro kaj estis vojaĝinta milojn da mejloj. Ĉu mi renkontis Hindon? Kion la viro volis diri? Kompreneble mi estis renkontinta multajn. Por alparolo....minimume mil. Sed supozu, ke ni rigardus Hindujon de pli ĝenerala vidpunkto.

Unue, la 180 milionoj de kastaj hinduoj. Ili estas Hindoj tutcerte, la vera kerno de Hindujo. Sed atendu momenton....ĉu vere? Kiel statas la 60 milionoj de senkastaj hinduoj, kiuj rampas en ilia polvo? Ĉu ankaŭ ili estas Hindoj? Laŭ la kastaj hinduoj, ili eĉ ne estas viroj kaj virinoj! Ili estas "netuŝeblaj". Trinki el la sama taso signifus spiritan venenon; ilia nura ombro estus malpurigo. Ĉu tiuj 60 milionoj---de siaj propraj gefratoj taksitaj kiel multe pli malsuperaj ol la plej malaltaj bestoj---estu priskribitaj de Okcidentulo kiel "Hindoj"?

Venkinta Grupo: SYDNEY ESPERANTO SOCIETY.

Tradukota teksto Konkurso 29.

Woodview Road doesn't pretend . It is but part of South-Western Suburbia, and knows it. Many years ago, it must have had a different idea of its importance, because each house has a tradesman's entrance. Tradesmen now knock at the front doors. In each residence, a man and his wife with two or even three children can live quite comfortably, and space is left for one or two lodgers. The income derived from lettingenables the family to live in a moderately large house; there is also a back garden just big enough for domestic purposes, pet rabbits or pigeons, and even a few flowers. True, the matter of priority in the bathrooms is often a cause of embarrassment, but ingenious time schedules overcome even that problem.

(Eric Little: They Went Quickly).

Tradukoj devas atingi la subskribinton antaŭ la 10.12.45.

P.E.SCHWERIN, 1 Carabella Flats, McDougall St., Milsons Point, NSW.

---

## LINGVAJ NOTOJ.

LA KAZO POST "KIEL".

Zamenhof diris "Mi elektis lin kiel prezidanto" signifas "Mi elektis lin, ĉar mi estas prezidanto," aŭ "mi elektis lin, kvazaŭ mi estus prezidanto," aŭ "mi elektis lin, en tia maniero, en kia prezidanto elektas." "Mi elektis lin kiel prezidanton" signifas "Kiel

oni elektas prezidanton," aŭ "por havi en li prezidanton." Sekve se vi volas esprimi, ke la elektota estu prezidanto, ni povas diri: aŭ "mi elektis lin kiel prezidanton" aŭ "mi elektis lin prezidanto" (ke li estu prezidanto), sed ni ne povas diri, "mi elektis lin kiel prezidanto," ĉar tiam la senco estus tute alia.

Jen la majstra diro. Rimarku bone, ke oni povas ankaŭ diri, por la unua senco, "Estante prezidanto, mi elektis lin." Tial en tiu frazo de Zam. "kiel" havas sencon de "estante", ne la donitajn de Millidge. Klare estas, ke la tri interpretoj, kiujn donas Zam. ne estas samaj inter si. "Mi" povas esti la prezidanto, aŭ ne.

Komparu: Vi traktas min kiel infano. (....as if you were a child)
Vi traktas min kiel infanon. (...as if ~~you~~ were a child)

Simile: Mi amas vin kiel fratino (n). En la trio "kiel" egalas "kvazaŭ".

Genezo 13/16: Mi faros vian idaron kiel polvo de la tero (tiel multenombra kiel estas). Tie, ellasi "kiel" signifus, ke Dio polvigos la idaron.

Mateo 3/16 : Li vid is la Spiriton malsuprenirantan kiel kolombo (malsuprenirus). Aŭ, "kvazaŭ kolombo malsupreniras."

Habakuk 1/14: Vi faras homojn kiel fiŝoj (kvazaŭ ili estus fiŝoj?). En tiu ĉi ekzemplo klare vidiĝas, ke la Zamenhofa "Mi elektid lin kiel prezidanto" tute ne estas analogo, en lia unua interpreto. Lia klarigo, ke ĝi signifikas"....ĉar mi estas prezidanto" ne aplikiĝas al la samo gramatika frazo en Hab. Aliverte ni ne povas klarigi per la sensencaĵo, ke "Vi (Dio) faras homojn, ĉar Vi estas fiŝo(j)." Ĉu do ne estus bone uzi "fiŝojn" tie, kio obligus nin klarigi per: Vi faras homojn kiel Vi faras (aŭ farus) fiŝojn?"

Pri tiu problemo de Hab. ni konsid eru, ke kelkaj bonaj verkantoj uzas "kiel" elipse por "kiel se" (kiu egalas "kvazaŭ). Ĉu ne Zam. fojo ankaŭ uzis ĝin sence de "kvazaŭ". Tio rajtigus la akuzativon en Hab.

La duobla senco de "kiel" ("estante" kaj "simila al") estas bedaŭrinda, sed oni povas facile eviti miskomprenojn, uzante pli precizajn formojn.

La frazoj: Ŝi havis okulojn kiel steloj kaj voĉon kiel (estas tiu de) birdo, kaj ŝi havis hararon molan kiel (estas tiu de) eta kokido, estas analogaj al Mateo 3/16.

AL LEGANTO. "Smith, where Jones had had "had", had had "had had"; "had had" had had the approval of the examiners.

Traduku per: Smith, kie Jones estis havinta "havis", estis havinta "estis havinta"; "estas havinta" estis havinta la aprobon de la ekzamenistoj.

---

GRAVE. Ni petas ke samideanoj aligu al la I.E.L. Ankaŭ ke I.E.L. anoj kiel eble plej frue pagu siajn kotizojn por 1946.
Sendu tuj al la Ĉefdelegito, S-ro LESLIE E.PFAHL, 64 Brighton Street, Croydon, N.S.W. Ordinara membro 5/- kun Jarlibro. Membro Abonanto 11/3 kun Jarlibro kaj Ĵurnalo Esperanto Internacia.

NOVAĴOJ. El "The American Esperantist." Pastro Pausback verkis pri sia Aŭstralia vizito kaj laŭdas la Esp-an movadon tie ĉi. Li kunredaktas ĉe "The American Esperantist."
Komisiisto de la Knabskoltoj de Kubo rekomendas Esp-on.

Ĉinio: Esp-a kurso en Sud-Okcidenta Universitato de Kunming. Nova Esperanto-Ĉina Kompleta Vortaro.

En Okcidenta Aŭstralio, kurso de Esp-o ĉe Kolegio de Teknologio (Perth). Brazila Registaro eldonis 2 p.markojn kun Esp-a teksto okaze la dekan Brazilan Esp-an Kongreson en Aprilo.

El "ESPERANTO INTERNACIA" (oficiala organo de I.E.L.) S-ro Teo Jung, tie konata kiel redaktisto de "Heroldo de Esp-o" ankoraŭ vivas en Scheveningen, Nederlando, kaj li kaj lia familio estas sanaj. Por "E.I." li verkis poemon de espero kaj kuraĝigo.
S-ino W.Zamenhof kaj Ludviko (edzino kaj filo de Adam Zamenhof) ankoraŭ vivas en Varsovio, kiel ankaŭ F-ino Roma Zamenhof, filino de Felix Zamenhof.
Cseh, Pragano, Isbrucker-oj estas sufiĉe sanaj kaj anime fortaj, malgraŭ la torturo de Arnhem kaj aliloke. Timinde la Esperanto-Domo tie estas detruita, sed ankoraŭ restas duboj. Cseh verkis longan kaj tre interesan artikolon pri la afero.
"Romeo kaj Julieto," trad. Stephen Andrew, 2/6 Angle per AEA.

MORTO. Je 1 Aprilo Frank Milward, tradukinto de The Sleeper Awakes (La Dormanto Vekiĝas), de H.G.Wells.

El "AMERICAN ESPERANTIST." (Majo-Junio 1945).

"Common principles are certainly more important than a common language. But the lack of a common language is frequently a tremendous obstacle in reaching agreement on principles and, once such an agreement is reached, in implementing common principles in common action." (Dr.W.Solzbacher.)
"The unaccented Latin alphabet is inadequate for the representation of the sounds of any language. Either entirely new and strange characters must be introduced, or accents must be used, to achieve phonetic accuracy. The mind accepts accent marks more readily than entirely new symbols. Zamenhof chose wisely when he utilized the circumflex and breve for a few characters. By so doing he constructed a phonetic alphabet unsurpassed in phonetic science to this day... Linotype machines are supplied with matrices for Esperanto accents at a few cents each, a few dollars for a complete assortment...... There are no special difficulties in the mechanical requirements for

using Esperanto---less than Spanish." (G.Alan Connor.)

"Language learning is here to stay and may even be tremendously expanded in the future. Esperantists ought not to regret this. The need for an interlanguage for global intercourse will be felt ever more acutely, regardless of how many Americans may study Spanish, Russian or Chinese. The study of any one of these languages or of the basic characteristics of all of them will be extremely useful from many points of view; no one would claim, however, that it could solve the problem of an international auxiliary language. (Dr. Solzbacher).

Weekly Cseh-method course every Tuesday at the Sorbonne, Paris.

Very Rev. Kao, Chinese E-ist and staffman on "A.E.", tours 20 lands in South America, doing excellent work for Esperanto and Chinese relief.

Radio in Esperanto from Sofia every Wednesday night.

Highest mount in America carries Esp-o flag. Tibor Sekelj, an ardent Esperantist, planted it on Aconcagua (Argentine Andes). Of nine three reached the top; four died.

Dale Carnegie says Clara Barton, Red Cross pioneer, learned Esperanto at 98.

---

TO CELEBRATE Dr. ZAMENHOF'S BIRTHDAY. All Esperantists and friends are warmly invited to attend the annual social evening given in honour of Dr. Zamenhof. It will be held on Wednesday, December 12, at McEwan Buildings, Little Collins Street, Melbourne, at 8 o'clock. COME! Marshall Cohen, Hon. Sec.

ERAROJ en la OKTOBRA NUMERO. 5/25 hejtu, 3/8 rekompencis, kuraĝigis, 5/4 ĉiu homo, 5/10 de mals. lokiĝas, 8/16 saturiĝintan tukon, 8/18 sur alumeton, 14/2 de mals. valoro el, 14/..3 de mals. mirindaĵo, 14/8 de mals. militisto, 16/23 artikolo, 16/34 kolerete.

KASO DE LA RONDO. Oct. 1945.

S-ino Ford 6/-. S-ro A.Newman 10/-, F-ino J.Mitchelson 6/-, S-ro Kevin Smith 6/-, F-ino P.Worden 6/-, S-ro E.Belcher 6/-, Masktaga donaco £3.

Al la A.E.A. 9/-. Al La Rondo £4.11.0.
Elspezoj £4.3.0, En la Kaso, £2.2.11.

Eraroj en nia lasta:- After "Trundle" please read 18/-, also, and add Pastro Gabriel Pausback 10/- to list of subscribers.

W.ADDIS, Kasistino, 25 Greville Ave., Flinders Park, Adelaide, S.Aus.

---


Longa sportado en la ĵurnalismo instruis min, ke estas malfacile, eĉ neeble, skribi frazon, kiun neniu miskomprenos. James Agate.

BIFSTEKO. Septembron 1944 vi legos "Incidento en Varsovio." En ĝi mi erare aliigis "bifsteko" en "bifteko," Kiel mi povis fari tiun "kriantan erarpaĵon," tion mi ankoraŭ ne povas eĉ konjekti. Mi ŝuldas pardonpeton al s-ro Major kaj liaj eldonantoj, kies korektan tekston mi tiel neprevigeble ŝanĝis, Nur unu afero estas rimarkinda kaj eble ĵetas iometon da lumo sur mian strangan konduton......Nur unu leganto atentigas min pri la eraro.

Sendube mi estis malbone influita de la konata "bifteck" de la Francoj. Flankdire, Kabe difinas "bifsteko" per "rostita peco de fileo" (filro li ne difinas!) Ankaŭ la Plena Vortaro implicite informas, ke ŝi estas bifsteko nur se rostita---kaj maldika! Millidge estas malpli strikta. Por li ĝi estas beefsteak, steak. La radiko estas oficiala.

-----------------------------------------------F.R.B.

HOW TO DRAW A FIVE-POINTED STAR.




E.PECK.

---

Published by F.R.BANHAM, 2 Banchory St., Essenden, W5. VIC.

# LA RONDO

Kristnaskajn Salutojn al niaj Legantoj



OFICIALA ORGANO de la A.E.A., Dec. 1945, Vol.6, No.3.

NI GARDU LA SANKTON FLANON.

## L A R O N D O.

## L A R E D A K C I O.

S-ro F.R.BANHAM, D.B.E.A. REDAKTORO,
2 Banchory St., Essendon, W5 VIC.

F-no L.E.BAILEY, D.B.E.A.
18 Sherbourne Rd., Medindie Gdns., Adelaide, S.Aus.

F-no W.A.ADDIS, KASISTINO,
25 Greville Ave., Flinders Park, S.AUS.

---

## ANTON GRABOWSKI, POETO.

Mi sopozas ke Anton Grabowski kaj Kalomano estas la du plej grandaj verstornistoj en la kampo de la Esperanta poezio. La Hungaro forte admiris la Polon kaj praktike akseptis multajn el liaj teknikaĵoj.

Inter Grabowski kaj Zamenhof okazis la unua konversacio en Esperanto. Grabowski posedis pli ol tridek lingvojn, inter ili Volapuk. Dum la Germana okupado de Varsovio li konsolis sin, tradukante formfidele "Sinjoro Tadeo." En ĝi li montris sin kuraĝa (kelkaj dirus trokuraĝa) evoluiganto de la poezia lingvo Esp-a. Li ne timis neologismojn. El la 209 de "S.T." pli ol duone eniris la Plenan Vortaron de S.A.T. kaj 25 oficialiĝis.

Lastatempe mi legis kelkajn de liaj tradukoj. En "Kondukanto---Antologio" (dua eldono 1904) mi studis lian el la Pola de J.Slowacki, En Svisujo. Mi trovis ĝin malfacile komprenebla, eble pro trotordita vortordo. Ekzemple:

"Ĉielarkajn sin kie vestigas en zonojn
La Jungfraŭ ĉe l'ora de l'suno deklino;"

Mi vetus ke tre tre malmultaj aŭdantoj komprenus tiun frazon. Nur per zorga analizo mi sukcesis trovi la sencon, kiu ŝajne estas:

Kie la Jungfraŭ sin vestigas (vestas!) en ĉielarkajn zonojn ĉe l'ora deklino de l'suno. Plue:

"Ĉu prenos anĝeloj min loĝon ĉielan?"
Ĉu anĝeloj prenos min (en) ĉielan loĝejon?

"Sinjoro Tadeo" estas difektita pro tro multe da elipsoj, trokoncizeco, trokompakteco, dense kunpremitaj esprimformoj. Tio ĉio estas akre ĝena, precipe ĉe la aŭdado. "La tradukon," diris G., "mi faris

kun granda pietismo por la Pola originalo kaj la lingvo Esperanto, penante eble plej fidele transdoni la enhavon kaj ĝian formon. Kv ankam la Esperantaj vortoj estas ĝenerale pli longaj ol la Polaj, la fleksebleco kaj elasteco de Esperanto permesis al mi koncizigi la lingvon kaj konservi la formon de l'originalo sen pliigo de versoj." Ofte el tiu koncizigo rezultas harmoniaj versoj kun vera stileleco; iafoje ankaŭ ĝi malfaciligas tujan komprenon kaj ia alkutimiĝo de la leganto d evas antaŭi lian ĝuon. Tiu streĉeco postulis versliberaĵojn almenaŭ ne viditajn ĝis la tempo de Kalocsay. Verboj estas senpere eltirataj el substantivoj aŭ adjektivoj: patris, okulis,pliaĝis, palas, nigras k.t.p. Oni legas: mastro 'as fore; (anstataŭ estas fore). Li ofte forigas la finaĵon de la adjektivo: jun-homo, grand-mondo, fermit-okulo, bon-vojaĝon, belskribo. Cetere, Kalocsay ĉajne ne aprobas tion, nomante ĝin "maskita elizio de la adjektiva finaĵo," kaj rigardante ĝin kiel danĝeran. Grabowski sintezas la komplekajn verbtempojn: nomatas (estas nomata); ŝuldantas (estas ŝuldanta); fermitas (estas fermita); Vi laŭdatu, granda Dio! (estu laŭdata...) Li uzas "kiom" sen prepozicio, kiom ŝtonoj! tiom buŝoj! "Kelk" fariĝas nevaria numeralo: kelk infanoj. "Unu" kaj "ambaŭ" ricevas la akuzativon (ambaŭn, unun). Li uzas "je" por anstataŭigi la akuzativon: serĉi je, voki je. Li diras "reniri" anstataŭ "reeniri."

La Majstro, antaŭ sia morto, legis preskaŭ la unuajn kvar librojn, kaj urĝe petis lin traduki la tutan.

En liaj fruaj tradukoj G., kontraŭ regulo 16 de la Fundamento, eliziis -on: Mi volus...malkovri mian kor' en ĝi. Verŝi larmojn de kortuŝo vian etan blankan man'.

Malgraŭ lia reformemo en la frua tempo, eble pro la sincereco d e ĝi, Grabowski estis granda Esp-isto, kaj ni eterne ŝuldas al lia sinofera laboro.

<u>F.R.BANHAM,</u> D.B.E.A.

<u>PRI "SINJORO TADEO":</u> "....sufiĉe malsimpla kaj foje stranga; sed ĝi estas malgraŭ tio verko tre grava, kiuvere estas kreinta la grandan poezion Esperanran." (Prof. G. Waringhien, "Franca E-isto," Majo 1936.)

---

## <u>IO PRI ŜIMŜON.</u>

Rimarkinda estis afero, kiun mi iam travivis en Sumatra, ĉar en tiu okazo tute nova scio venis en la mondon. Subite mi ekscis ion, kion certe ne sciis eĉ unu homo en la mondo. Temas pri la hebrea heroo Ŝimŝon. Certe ni ĉiuj lernis pri li en la infana lernejo ke li kaptis 300 vulpojn, kunligis ilin <u>du kaj du</u> ĉe la vostoj, metante torĉon inter ilin, bruligis ĝin kaj <u>pelis la</u> bestojn en la filiŝtrajn kampojn por bruligi tiujn. Tiel la historio estas rakontita en ĉiuj eldonoj de la Malnova Testamento (Juĝistoj 15). Pri tiu historio mi certe ne pensis dum 40 jaroj. Sed oni devas supozi, ke iam, kiam mi estis ĉirkaŭ dekjara, komenciĝis subkonscia penslaboro, kiu

n ur post tiom da jaroj donis rezulton, kaj tio en plej neatendita kaj plej surpriza maniero. Iun matenon mi staris kaj razis min, sen pensoj pri io ajn. Subite, kvazaŭ fulme, en parteto de sekundo, aperis por mi la historio pri Ŝimŝon, kaj absolute samtempe, sen iom ajn da pensa laboro, mi sciis, ke la historio estas absurda, kaj ke nur freneza homo povas tiel idiote konduti (imagu, ke oni kunligas la vostojn de du hundoj kaj poste volas peli ilin en difinita direkto!), ke la historio tial devas esti miskomprenita kaj tute fuŝe tradukita, ke en la origina teksto certe estis io, kio kaŭzis la tradukon "du kaj du", ke la senco verŝajne estis tio ke Ŝimŝon metis la voston de ĉiu vulpo duoble, do faris maŝon en kiun li metis la brulantan torĉon, post kio ĉiuj bestoj estis forpelataj por kaŭzi brulon.---Fine mi volas ankoraŭfoje akcenti, ke ĉio tio ne venis kiel pensoĉeno, sed ke ĉio en unu momento aperis por mi kiel io, kion mi scias. Tiamaniere oni do povas s en faka scio kaj sen ia ajn laboro veni al scienca rezulto.

F.Th.JUSTESEN en "Malgranda Revuo," 1944, Svedujo.

---

FREMDULOJ.

Sur le ferdeko en la plivarmiĝanta sunlumo estis plezure. Rigardante trans la maron al la flava streko de sablo, la verdaĵo kaj la montetoj, Jakob sentis foriĝadi en si la maltrankvilon de la jusa nokto.

"Estas bele." Li parolis malrapide, kun la vortoj interspacitaj, zorge elektitaj.

"Estas tre bele," konsentis la virino ĉe lia kubuto. Sed ŝi parolis en sia patra lingvo, kaj Jakob elspiris ĝemeton.

"Sonja. Tiu ĉi lando."---li paŭzis, serĉe vortojn. "---ni devas ensorbiĝi en ĝin, por ke neniu diru, ke ni ne apartenas al ĝi." Zorge, sed kun tono de milda melankolio, li aldonis: "Tion ĉi ni devas fari; ni devas ĉiam paroli ilian lingvon."

Ni devas ĉiam paroli ilian lingvon. Tio estis kun li lastan nokton, dum li kuŝis en la mallumа kajuto, timanto tial ĉar ili jam atingis la vojaĝfinon. Morgaŭ ili pasos de sur la ŝipo, kiel fremduloj senamikaj en nova mondo. Neniun ili konis. Ilia solnura ligilo kun la malnova vivo estis stebita en internpoŝo de lia jako: letero de rekomendo al iomet-parenco de unu el iliaj iomet-parencoj.

Dum la nokto lia menso estis ĥaoso da konjektoj, malsama popolo, malsama vivmaniero. Alia lingvo per kiu ili devos paroli-kompreni. Ĉu ili bone konformiĝos? Ĉu estos por ili loko? Ĉu ili kaj Sonja estas jam tro maljunaj por rekomenci vivon?

Trafis lin ondo da hejmveo. Malgraŭ la odoro de maro kaj farbo, kaj la rulo-vibro de la ŝipo, Jakob reglitis en la pasintecon.

Li denove aŭdis la klakklakon de hufoj, tintadon de ĉaroj sur

vojŝtonoj, la kriadon de infanoj kajzumbabilon ĉe la vendplaco; li denove flaris la varman odoron de prempuŝantaj homoj, de kuirado, de lavado, la akran de fiŝoj, la dolĉan de fruktoj.

Li pensis pri amikoj, la gepatroj kaj filo. Per la spiritaj okuloj li reve rigardis tra mallarĝa plumbkrada fenestro sur la ĵusbalaitan ŝtonvojon en la mateno; kaj en la vespero sur la disĵetitaĵojn post vigle-venda tago.

Ŝajnis, ke neniam denove li efektive vidos tiun vivon; ĝi estis disigita, la homoj forpelitaj. Kelkaj iris en ekzilon, kelkaj estas en koncentraciaj kampoj; multaj mortis.

La nebulo komencis leviĝi de la foraj montetoj. Mevoj kurbeflugis ĉirkaŭ la ŝipo, venteto krispigis la akvon kaj portis spiron de la tero.

"David estus trovinta pacon tie ĉi." La vortojn li voĉis senkonscie, kaj lia mano iris al la ŝultro de la edzino, kvazaŭ li timus, ke ili malbone efikos sur ŝin.

Dudek - kvin jarojn ili havis en David tutan sian mondon, planojn, esperojn, kaj nun, kiel ĉiam, pensante pri li, Jakob trovis sin paŝanta ankoraŭfoje tra la jaroj kun sia filo. Li vidis Davidon infano, knabo, junulo---vireca, vigla, fiera pri sia raso kaj luktanta kontraŭ tiuj ĝin malestimantaj.

Iam David pesis sian patron kaj trovis lin tro malpeza. Li ribelis kontraŭ la antaŭzorgema de Jakobo. "Ili traktas nin kiel bestojn. Kial do cedi antaŭ ili?" Streĉe staranta, li kriis:- "Ni estas Judoj; pri tio mi estas fiera!"

Jam de junuleco Jakob lernis sin regi, peni plaĉi, laŭeble konsenti, kaj fermi la buŝon ferma koncerne la proprajn opiniojn. Li estis milda, amikema homo, sed Judo moamata, malrespektata. Dum tuta vivo li devis elporti mokojn, rikanojn sed li jam de longe konstruis por si internan kribrilon, kiu lasis ilin pasi en lian konscion kvazaŭ la sensenca babilo de infanoj. Sed David havis malsaman temperamenton. Li estis sindefendema, ekflamiĝema . Ofte li venis hejmen kontuzita, sanga, kun vestoj disŝiritaj.

Rigardante en la pasintajn jarojn, Jakob havis la penson, ke la senta sinteno kontraŭ lia raso takte sampaŝis kun la kreskanta David. Dum tiu ĉi aĝo grand iĝis, la malbonvolo kontraŭ la Judoj fortiĝis ĝis tio, ke fine ĝi kulminis en oficialo inspirita presatako, kiu nutris la malbonvolon en kruelan, bestecan malamegon. Kanajloj senbride krimis. La juro okulumis aprobe. Post iom da tempo, ne nur la urba fiularo sed ankaŭ la tuta popolo, riĉa aŭ malriĉa, ludis la sporton turmenti Judojn. Fine faris tion eĉ la gardistoj de la juro, malkaŝe, senrezervo kaj plej tranĉe.

David silentiĝis, kolera, amara. Li estis ano de komitato formita por kontraŭi la turmentantojn, sed protesto kaj politika agado naskis nur ankoraŭ da batoj. Malbono trapasis la landon, semanto timon. Unu nokton la sangsoifo atingis sian ekstremon, kaj la vojŝtonoj ruĝo brilis en la dancantaj flamoj. Morto trafis Davidon en tiu tempo, kaj malmulte mankis, ke Jakobon ankaŭ.

"Pri kio vi pensas, Jakob?" Sonja interrompis lian revon; la demand o reportis lin en la nunon. Momenton li rigardis la montetojn, la ruĝajn kaj grizajn tegmentojn, la flavan strekon da sablo kun la verdaĵo, kaj la movojn kurbo-flugantajn. "Mi pensis, ke tio ĉi ni havos pacon kaj respekton."

..................

Renkontis ilin de sur la kajo maro da vizaĝoj---ridetantaj, serĉantaj. Tio kaj tio homo rekonis homon, kaj regis saluta kriado kaj ekscita rido. Sur la ferdeko pasaĝeroj disé staris kun paknjoj ĉepiede. Ŝipkonatoj faris inter si la lastajn adiaŭojn. Oni jam transiris la ponton teron; ankaŭ Jakob kaj Sonja ĝin proksimiĝis. "La vojaĝo fino," ŝi diris sialingve, kaj riproĉete Jakob rediris ĝin Anglo. Li nekonscie levis la kapon kaj rektigis la dorson dum ili paŝis de sur la ŝipo.

Sunlumo kaj amaso da amaso da vizaĝoj amikecaj. En la fono homfiguro sin apogis je ŝarĝvagono. Ĉe ĝi lia vid haltis momenton, iris plu, tiam revenis al ĝi. La homo ŝajnis rigardegi ilin, kaj Jakob rimarkis, ke sur lia vizaĝo sidas moka malamo, kaj ke lia tuta persono radias naŭzatecon. Tiun aspekton Jakob bone kaj intuicie sciis. Malgraŭ ke li ne povis aŭdi la vortojn, li sentis ties sencon, ĉar la apoganta viro sin turnis al kunulo, dirante:-

"Ankoraŭ unu ŝipplono da sakraj rifuĝulaĉoj!"

(E.R.AUSTIN en ABC Wkly.) Trad. F.R.BANHAM, DBEA.

NOTOJ de la TRAD. ---

Distant relation. Longe mi serĉis ekvivalenton en Esp-o, kaj fine uzis "iomet-parenco." (homo iomete parenca kun alia).

Pesi kaj trovi tro malpeza. Vidu ĉe Daniel 5/27.

La originalo havas lastlinie "shipload of bloody refs." Mi pensas malbone, traduki per "sangaj", kaj hezitis pri "pestaĉaj," "feĉaj" (figuro uzata), "d amn(ind)aj," kaj aliaj. Fine mi uzis "sakraj," ĉar "sakri" laŭ Plena Vortaro SAT egalas "kolerblasfemi," kaj la Francoj havas adjektivon vulgarlingvaĵan derivitan el la verbo "sacrer." "Sacré " signifas "damned" kaj tial povas servi ankaŭ por la similsenca "bloody." Almenaŭ tion mi supozas. Mi do prenis la liberon transmeti tian uzon el la Franca en Esperanton. FRB.

---

SE HOMO RAJTUS skribi kontraŭ alia homo nur kion li povas plenatesta pruvi, verkantoj ne povus kroniki la historion. Samuel Johnson.

NI BEZONAS pligrandigitan alfabeton (simile al la Rusa), per kiu ni povus literumi la Anglan lingvon. Nia nuna Latina alfabeto tion ne povas. G.B.Shaw.

---

ENIGMOJ. (N.) indikas Vorton kun gramatika finajo.

1. LOZANĜO.
   1.Litero. 2.Severega. 3. Ŝurverŝante por igi malseka 4. Imaga linio sur la terglobo. 5. Nevenkebla kutimo. 6. Pagilo.7.Litero.

2. DU-VORTO. Faro de eklezia estro estas birdo.

3. GRANDIĜA VORTO. Mi estas pasiva; aldonu kapon, mi havas sufiĉe; enmetu literon, mi estas maniero de batado; aldonu voston, mi ofte prezentas homon; aldonu voston, mi estas regularo.

4. BIRDO. Mia unua litero estas en kopek sed ne en mon;
   Mia dua litero estas en ĉeval sed ne en bov;
   Mia tria litero estas en klarnet sed ne en korn;
   Mia kvara litero estas en latir sed ne en fab;
   Mia kvina litero estas en filik sed ne en arb;
   Mia sesa litero estas en gravur sed ne en ĉiz;
   Mia sepa litero estas en gimnot sed ne en fiŝ ;
   Mia tuto estas birdo.

5. Re-arangu la literojn de la sekvantaj vortoj, kaj enmetu aŭ almetu literon al ĉiu por formi birdojn. La novaj literoj sinsekve formas alian birdon. APER, RUT, PREDIK, FLIK, TER.

Por solvoj vidu p. 38. IOM.

---

TRADUK-KONKURSOJ.

TRADUKO de KONKURSO 28:

Naciaj virtoj laŭsekvas la modon kaj ŝanĝiĝas kun la tempoj. Estis iam memkontenta ĉefjuĝisto, kiu atentigis pri rabadoj per anglaj krimuloj (kaj anglaj pendigiloj) kiel pruvo, ke siaj samlandanoj estas pli kuraĝaj ol la francoj; sed angloj nuntempe fieras antaŭ ĉio pri sia respektado de l' leĝo. Estis tempo, kiam la angloj ŝatis, esti konsideratoj kiel potoluloj, esti "apartigitaj", kaj al malriĉuloj, esti obeemaj. La angloj ankoraŭ nun amas sin mem, sed ili ne plu montras tion per vanta fanfaronado pri siaj plenaj ventroj. Verdire, ili ne plu havas la plej bone plenigitajn ventrojn en la mondo. Iliaj propraj elmigrintoj fanfaronas, ke ili fartas pli bone ol tiuj, kiuj restas hejme.

Aŭstralianoj, kiuj grumblas en sia lando, iĝas entuziasmegaj pri tiea "normo de vivado", kiam ili unuafoje vidas veran malriĉecon en Anglujo.

Venkinta Grupo: SYDNEY ESPERANTO SOCIETY.

TRADUKOTA TEKSTO 30:

The whole apartment baffled me. I didn't think the way the architect must have thought. In fact the place seemed to be the ans wer to what the builder did with some space the architect had

left over. A caller instinctively reached for stalactites and demanded a ball of string for the purpose of orientation. When the hall reached the dining room, it came out into the open like the subway at 125 Street. Then it pulled itself together again and went smashing past the bedroom into the bathroom, ignoring the living room entirely.

Where the hall crossed the dining room it was really just an imaginary line like the equator. On the offside of this equator was the "kitchen". This was a row of fixtures against the wall, icebox, stove, sink, and garbage can.

It was a frank arrangement. The person manning the kitchen was completely at the mercy of onlooking diners. A piece of butter dropped on the floor, was pronounced dead by onlookers before it could be retrieved, washed off, and put into circulation again. The frazzled cook was on the receiving end of a lot of constructive suggestions. (Louise Randall Pierson: Roughly Speaking.)

Tradukoj devas atingi la subskribinton <u>antaŭ la 10.1.46.</u>

P.E.SCHWERIN, Flat 1, 36 McDougall St., Milsons Point, N.S.W.

---

<u>TRADUKO.</u>

What most advocates of international English fail to realise is that the materialistic arguments they adduce really militate against the language. Wealth, numbers, "dominion over palm and pine," "mastery of the seven seas"---all that blatant Kiplingesque self-assertion is a bid for universal supremacy; and against such supremacy the world will eternally revolt. I fervently hope that Hitler's mad dream of world power will be shattered; but I confidently expect that in the process <u>all</u> such unholy dreams will be shattered also. (Albert Guerard, The France of Tomorrow, 1942; Harvard Press).

Malmulto el la pledantoj por la Angla kiel internacia lingvo vidas ke ĝuste la materialaj argumentoj, kiujn ili uzas, fakte parolas kontraŭ la pretendoj de tiu lingvo. Riĉeco, grandnombreco, "regado super palm' kaj pino," "mastreco super la sep oceanoj"---ĉio tia kruda naciegoismo en la maniero de Kipling ostas provo atingi universalan superecon: kontraŭ tia supereco la mondo eterne batalos. Mi fervore esperas ke forneniiĝos la frenezula sonĝo de Hitler pri mondpotenco; plue, ke ĉiuj tiaj malsanktaj sonĝoj samtempe forneniiĝos, ankaŭ tion mi fide atendas.

Tradukis <u>F.R.BANHAM.</u>

---

<u>SOLVOJ.</u> <u>1.LOZANĜO.</u> E, AKR, AKVUM, EKVATOR, RUTIN, MON, R.
<u>2. DU-VORTO.</u> PAP-AG, PAPAG. 3. <u>GRANDIGA VORTO.</u> AT, SAT, STAT, STATU, STATUT. 4. <u>BIRDO. PELIKAN.</u> 5. <u>BIRDO.</u> PA-S-ER. TUR-T. PERD-R-IK. F-U-LIK. TE-TUD. STRUT.

BIFSTEKO. Septembron 1944 vi legos "Incidento en Varsovio." En ĝi mi erare aliigis "bifsteko" en "bifteko". Kiel mi povis fari tiun "kriantan erarpaŝon," tion mi ankoraŭ ne povas eĉ konjekteti. Mi ŝuldas pardonpeton al s-ro Major kaj liaj eldonantoj, kies korektan tekston mi tiel neprevigeble ŝanĝis. Nur unu afero estas rimarkinda kaj eble ĵetas iometon da lumo sur mian strangan konduton....Nur unu leganto atentigis min pri la eraro.

Sendube mi estis malbone influita de la konata "bifteck" de la Francoj. Plankdire, Kabe difinas "bifsteko" por rostita peco de fileo" (fileo li ne difinas!) Ankaŭ la Plena Vortaro implicite informas, ke ĝi estas bifsteko nur se rostita---kaj maldika! Millidge estas malpli strikta. Por li ĝi estas beefsteak, steak. La radiko estas oficiala.

---------------------------------------F.R.B.

## ASOCIAJ AFEROJ.

GRATULOJN al la samideanoj en Western Aŭstralian Esp. Ligo, kies klopodoj konvinkis la Policestron en tiu ŝtato, ke utilos havi sub sia dispono grupeton da policanoj, kiuj scias la internacian lingvon Esp-o. En Novembro la Ligo komencis kurson en kiu partoprenis 8 polickadetoj. Gvidas la kurson D-ro C.J.Caldera. La sukceso en W. Aŭs. estu al ni aliŝtatanoj piko al pli energia laboro. Ni ĝojos ricevi novaĵon pri tiu kurso de tempo al tempo.

I.E.L. S-ro Goldsmith, Secretary de Internacia Esp.-Ligo, lastatempe avizis, ke la aferoj de la Ligo progressas tre rapide. La ankoraŭ milittempe malgrandigita oficistaro sidas longajn horojn por ordiĝi la ĉiam etendiĝantajn aferojn de la Ligo. Malgraŭ tio, ni estas certaj, ke li bonvenigus VIN, kiel individuan membron de I.E.L. Sendu vian kotizon senprokraste al nia Ĉef-Deligito S-ro L.E.Pfahl, 62 Brighton St., Croydon, N.S.W. Membro kun I.E.L. Jarlibro 5/-; kun jarlibro kaj Gazeto 11/3. Nun estas la tempo montri la Internaciecon de Esp-o per membreco en la Ligo.

B.E.A. S-ro Wilkinson, Sekretario de B .E.A. rekomencis deĵoron la lan d e Okt ., post milittempa servo en la R.A.F.

LIBROSERVO. Nia Peranto en S.Aus., S-ro Buswell, nun havas provizon de tiuj libroj menciitaj sur paĝo 12 de nia Jarlibro.

Kelkaj malnovaj libroj estas denove haveblaj. "Fundamentia Krestomatio" (Zamenhof), la gvidlibro al Esp-a stilo; 472 paĝoj--Prezo 9/-. "Lingvaj Respondoj" (L.L.Zamenhof), respondoj de la majstro al diversaj demandoj, tre helpa al progresintoj---3/9. Medicina Vortaro, 15/-. Nombro d e Libroj, kiuj eldoniĝas en Svedujo denove estas haveblaj. "Hindo Rigardas Svedlandon", 7/6; "Costa Berling", Selma Lagerlof 16/6. "Tra Sovaĝa Kamĉatko," Bergman 13/6. "Sved a Antologio," 22/6. "La Ringo de la Generalo" Selma Lagerlof 4/6. Kaj multas aliaj. N ove eldonita en Anglujo

estas "Romeo kaj Julieto," (Shakespeare) el la Angla tutprozo tradukita. Prezo 3/9. La Sekretario importas kiujn ajn el la supre menciitaj libroj por membroj post ricevo de antaŭpagita mondo.

Pro la pligranda postulo de membroj ni decidis teni pli grandan provizon. En la nova jaro niaj perantoj en W.Aŭs. kaj Vic. ricevos provizaĵon da la jenaj:- Vivo de Zamenhof 4/6; Luno de Izrael 4/-, Naiveco de Pastro Brown 6/6, Sep Vangofrapoj 5/-, Riĉa kaj Sen Nomo 6/6, Vojo Returne 6/6, Pinokjo 4/-, Dormanto Vekiĝas 4/-, Vivo el Francujo 6/6, Aventuroj de Marteno Drake 6/6, Ŝi 6/6. Nia Peranto en W.Aŭs. havos ĝelkajn pliajn librojn kiuj estos videblaj en la klubĉambro.

BONVOLU NOTI. Nia Peranto en VIC., S-ro F.A.PITT, pro feliĉa okazo ne ĉeestos dum la lernejaj ferioj dum Decembro kaj Januaro. Niajn elkorajn gratulojn kaj bondezirojn, por la estonteco, S-ro Pitt.

KORESPONDEMULOJ Novaj Geesperantistoj el Argentino deziras korespondi:-

F-ino M.CHOVAN, Urquiza 126, Necochea, Argentino. Instruistino, pri ĝen. tem.

F-ino R. CHRISTIANSEN, Strato Victoria 365, Necochea, Argentino. Pri Ĝeneralaj temoj, moroj ktp. Baldaŭ iĝos instruistino

F-ino E. ELIZALDE, Caseros 64, Necochea, Argentino. Juna instruistino, Pri ĝen. tem.

S-ro J. HANSEN, Str 14 de Julio 159, Necochea, Argentino. Pri ĝen. tem. kaj edukado. Juna instruisto.

Knabo NAUM FISCHMAN, 752 Pellegrini, Necochea, Argentino. Pri ĝen tem. Interŝ. PM.

Skribu rekte al la koncerna persono.

ELEKTO de A.E.A. Komitato. Ni memorigas grupojn pri la elektado de nia Komitato kaj petas ilin sendi la avizon pri novaj komitatanoj rekte al la Prezidantino de A.E.A. La avizo devas certigi ke la komitatanoj estis laŭstatute elektitaj, kaj mencii la nombron de kotizpagitat membroj en la grupo. Ĝin subskribu la grupa Prezidanto kaj Sekretario.

KOTIZOJ. La Sekretario petegas membrojn, ke ili sendu kotizojn rekte al la Kasistino, F-ino Addis, 25 Greville Av., Flinders Pk. S. Aŭs. kaj ne al la subskribinto.

FELIĈAN KRISTNASKON kaj PROSPERAN NOVJARON al ĉiu leganto de la Estraro de via Asocio.

G.H.HILLERMAN (Sekretario) 15 Morrice St., Lane Cove, N.S.W.

---

KASO de LA RONDO.

| | | | |
|---|---|---|---|
| S-ro Hehir........ | £1.-.- | Al la A.E.A........... | .13.6 |
| S-ro G.Miller..... | 6.- | Al LA RONDO.......... | £3. 4.6 |
| F-ino J.Willens... | 6.- | Elspezoj............. | 4. 1.- |
| F-ino Kemp........ | 6.- | En la Kaso........... | 1. 6.5 |
| F-ino J.L.Couard.. | 6.- | | |
| S-ro L.Miller..... | 6.- | | |
| F-ino P.McLeary... | 12.- | | |
| Syd. Esp. Soc..... | 6.- | | |
| S-ro J.Rose....... | 10.- | | |
| | £3.18.- | | |

In future we shall not enclose notices when subscriptions are due. If you see 146 before your name on your wrapper you will know that your sub. is due in Jan. 46., and 246 will mean that it falls due in Feb. etc. We hope that you will look for the number, and thus help the cashier.

W.A.ADDIS , 25 Greville Ave., Flinders Park, Adelaide, S.Aus.

---

B.E.A.Advanced Written Examination. E.PECK, Kalbar, Queensland.

GRATULON!

El "The Telegraph" (Brisbano): S-ro Truman diris ke la malfaciloj kun la Sovetunio devenas precipe el la diverseco de la lingvoj. Ĉar la tradukoj ne estas ĉiam precize samsencaj inter si.

Mi komentas, ke tial restas ĉiam la eblo, ke la homoj sur la tuta globo peliĝos pro sia volonte akceptita malscio reciproke en la flanojn de atomeca milito. Ĝis kiam ili malsaĝe restos en ĉilingvoĥapso tiomege danĝerega---kaj certe forigebla per Esp-o?

La "War Register" (London, Somero 1945) per saij raportoj, foje detalaj, pruvas ekziston de multaj Germanoj, ĉefe pacistoj, kiuj akre suferis pro sia bonkoreco al la Judaj kunlandanoj.

KARA RONDO:- Mi estos for, de ĉ. 28/12/45 ĝis la komenco de Februaro, kaj ne povos (nek deziros) respondi al korespondantoj kaj mend antoj. Libroj estas haveblaj de S-ino Hill, aŭ de aliaj per antoj. La kursojn mi haltigos dumtempe. Sincere via, F.A.PITT.

KLASO EN MANLY. Kun plezuro mi raportas: Dimanĉon vespere (28.10.45) Pastro Galloway faris interesplenan paroladon---Esperanto as an International Language---antaŭ anoj kaj amikoj de la Presbyterian Men's League, Manly. La sufiĉe multenombra ĉeestantaro tutevidente ŝatis la leksion, kiu bone ampleksis la devenon kaj h istorion de Lingvo Internacia ĝenerale kaj Esperanto aparte.

Profitante la okazon, mi _sugestis starigon de Esp. studkurso kaj proponis miajn servojn kiel instruisto. Pastro Hanlon afable akceptis mian proponon kaj tuj komencis varbi kursanojn. Jam kvar-kvin personoj promesis lerni, kaj mi esperas je frua pligrandigo de la nombro, per baldaŭa komenco. E.A.PRYKE.

S-ro LESLIE PFAHL skribas:-Al I.E.L. Anoj kaj aliuloj kiu intencas aliĝi---Bonvulo pagi viajn kotizojn kiel eble plej frue. La I.E.L. multe bezonas viajn helpojn kaj monon, sen ĝi ne povas progresi. Se vi pagos frue, vi dormos dolĉe.

KVINSLANDO. Winter programs arranged by Mr. E.G.Littleton, one of the two propagandists appo9nted by the A.E.A., held in the Lyceum Club, Queen St., Brisbane, proved entertainment able to d raw the folk and fill the cash-box---funds for propaganda purposes. Mr. Roger Fair (ad. Manager of 4-B-K and 4-A-K) gave a fine lecture on the history of broadcasting. Mr.W.Smith, adv. manager of Vacuum Oil, displayed moving pictures that thrilled the spectators with a birdseye view round the world. Mr. Littleton one evening shared with his audience his experiences in broadcasting studios. On Oct. 27, Mr. Fair talked on Ind ia, with lantern views. By then we hope the lantern fund will stand at a useful "tenner". But apart from the money they net, these presentations make known to outsiders the existence of our local Esperanto Society.

S.WANMER.

"GOING TO TOKYO:- Mr.B.C.BALLARD, of the External Affairs Department, will accompany the Aus tralian Military Mission to Tokyo as political adviser." (The Argus, 23/10/45)

Mr. B.C.Ballard is a proficient Esperantist, and is the son of the Australian Esperanto pioneer and s talwart, Mr. C.W. Ballard.

(Trad) S-ro B.C.Ballard, de la Oficejo por Eksterland aj Aferoj, akompanos la Aŭstralian Armean Delegacion al Tokio kiel politika konsilisto. Li estas kompetenta Esp-isto, kaj filo de la Esperanto-pioniro S-ro C.W.Ballard.

ERAROJ en la Novembra: p.18/11 "Ar gus"; 18/24 ekĉeso; 18/30 foriĝinta; 19/29 komprene; 25/1 deziris; 25/29 maternal; 27/23 signifas; 30/5 nepravigeble; 30/7 atentigas; 30/10 fileo; 30/11 ĝi.

KANADANO LERNAS ESPERANTON. (Romeo Campbell, 159 Ste. Therese, St.Malo, Quebec.)

De multaj jaroj mi estis koninta la estadon de Esperanto, kaj kvankam mi neniam estis studinta ĝin pro t io, ke mi ne sciis, kie mi povus aĉeti tiajn librojn, tamen mi nepre estis decidinta ĝin lerni iun tagon, ĉar mi tre ŝatas la studon de fremdaj lingvoj, ĉefe la ne-tre-malfacilajn. Plie, mi opiniis, ke ĝi estas nepre necesega por la paco inter la malsamlingvaj popoloj. Feliĉege mi eltrovis mian trezoron en la jaro 1944 dum mi estis armeano kaj post kiam mi transmariĝis al Anglujo. Tie mi eltrovis en librejo "A Practical Course in Esperanto," malgrandan libron, kiu apenaŭ ne kostis pli ol duondolaro. Mi tuj ĝin aĉetis kaj avide legadis ĝis la lasta paĝo. Post tri semajnoj mi komencis korespondadon kun pastro L.Long, B.A., de Norfolk, Anglo-

lando (mia korespond-kursa instruanto), kaj baldaŭ li opiniis, ke mi jam pli bone uzas la mondolingvon ol la Anglan, kiun mi studadis depost du-tri jaroj. ĈU li estis prava? Eble jes! Miaflanke mi ankaŭ esprimis la ideojn pli bone ol Hispane (mi studis la Hispanan d um dok du monatoj!). Ĉu tio ne estas nepra atesto pri la f acilegeco de Esp-o?

Tre~~g~~e kontenta d e miaj progresoj, mi pli kaj pli ŝatis la lingvon. Bedaŭrinde, post ne longe mi albataliĝis kaj ne plu povis daŭrigi ĝian studon. Post unu monato mi estis vundita, enmalsanulejigita dum tri monatoj kaj fine revenis al Kanado por esti ekssoldigita. Tiam mi aĉetis aliajn librojn, ĉefe "Step by Step" de M.C.Butler, kaj tute legis la "Vivo de Zamenhof" de E. Privat, plena de intereso. N un mi havas multe da plezuro, korespondante kun diverslingvaj Esp-istoj kaj uzas ĝin eĉ por personaj notoj.

Do, mia transmariĝo estis bonega por mia estonta vivado.

Ĉiu lernu Esperanton!

---

ANKORAŬ AMU, KAJ NE JUĜU.

Jen, Dio, ĉirkaŭ mia korp' la ombroj de l' vesper',
Sed sur spirito mia pli profunda ombro staras;
H o, Di', la plej amita batis min por man' de fer',
Kaj kontraŭ mi la vojon al feliĉo forte baras.

Ho, pikas min la faro ĝis la kor' de mia kor',
Animo de animo mia tremas en doloro,
Konfuze min ja regas, taŭgaj vortoj flugas for
De mi tordata , Di', en tiu ĉi malluma horo.

Ho, justa Di', al mi ja donu rajton venĝi min;
sur ter' ne estas povo kiu taŭge min inspiras---
Ho, Dio! kiel preĝas mi, kaj mi ne aŭdas Vin!
Ĉu vi en turmentego mia Vin de mi fortiras?

Ho, rivereto, lulkantanta
Al dormo florojn, herbojn viajn,
Konsilu min vin aŭskultanta---
Ha, vi respondas vortojn miajn---
"Ankoraŭ amu kaj ne juĝu!"

Ho, nuboj, elstreĉantaj lace
La formojn por ripozi via,
Vigliĝu, d iru kiel pace
Per venĝo batos koro mia---
"Ankoraŭ amu kaj ne juĝu!"

Ho, ŝtonoj en la rivereto,
El viaj ja malmolaj koroj,
La venĝon diru laŭ la peto
Farata nun al vi kun ploroj---
"Ankoraŭ amu, kaj ne juĝu!"

Aero, fajro, akvo, tero,
Kaj idoj viaj, min atentu!
Ĉu mi ĝin serĉu en infero?
Konsilu taŭge aŭ silentu---
"Ankoraŭ amu kaj ne juĝu!"

Ho, tondroj en oreloj miaj,
El konscienco kuregantaj,
Silentu! Jam la tonoj viaj
Min venkas, forte min regantaj---
"Ankoraŭ amu, kaj ne juĝu!"

Jen, Dio, ĉirkaŭ mia korp' la ombroj de l' vesper',
Sed sur spiriton mian tre helega lumo venas;
Ho, Di', la plejamata batis min per man' de fer',
Sed, Di', la Voĉon Vian mi aŭskult kaj komprenas.

Ho, pikas min la faro ĝis la kor' de mia kor',
Sed, Di', animo mia jam eklernas la kompaton
Por tiu, kiu de la amaj faroj vagas for,
Donante por la amikeco nur kruelan baton.

Hi, justa Di', Vi min rifuzas rajton venĝi min;
Sur ter' Naturo, voĉ'de Vi, ja bone min inspiras;
Naturo, kiu ĉiam vole ja obeas Vin,
La bonon sian de neniu iam do fortiras.

-----------------------------MAUD HELM, D.B.E.A.

Kiu birdo havas la plej vastan Flugiletendon?
Vaga albatro: ĝis 11½ futoj.

Kiu animalo estas la plej longe vivipova?
Kelonio: ĝis 152 jaroj.

Kiu mamsuĉulo la plej longe vivas?
H omo: ĝis 114 jaroj.

Kiu el la kvarpiedulo j la plej rapide kuras?
Gepardo (Hinda, ĉita): pli ol 70 mejlojn en unu horo.

-----------------------------

"Kiomlonge vi ludas la gaŭfon?"---"Ĉirkaŭ du monatojn."
"Kio? Vi lertege ludas ja!"---"Tio estas nemiriga. Mi pasigis kvar jarojn, lernante la ludon."

Published by F.R.BANHAM, 2 Banchory St., Essendon, W5. VIC.